

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## La utilitat de l'Esperanto

En aquests últims mesos hem fet servir repetidament de tema per als nostres articles les converses tingudes a Barcelona amb ciutadans dels nous Estats d'Europa. Els nostres lectors deuran recordar els comentaris que hem escrit a propòsit d'una conversa amb un jove finlandès, i d'una altra conversa amb una senyoreta txeca. La cosa que no hem dit encara, i que volem dir avui, és que aquestes converses van ésser possibles gràcies a l'esperanto. Un amic català, excel·lent esperantista, ens féu d'interpret prop dels nostres interlocutors, que posseïen també perfectament l'idioma auxiliar internacional.

Aquests casos pràctics ens han demostrat d'una manera directa que l'esperanto té ja avui una utilitat innegable per a la comunicació entre homes de llengua diferent. Ni el jove finlandès ni la senyoreta txeca a què al·ludim sabien, a part de la pròpia llengua nadiua, altre idioma sinó l'esperanto. I com que ni la llengua finlandesa ni la llengua txeca tenen difusió extraterritorial, el llenguatge que els dos viatgers empraven, a través d'Europa, era l'esperanto. I ells, com tants centenars i tants milers d'esperantistes, poden anar pel món sense grans entrebancs, amb aquest lleuger bagatge lingüístic.

No és fàcil dir amb tota seguretat quin serà l'esdevenidor de l'esperanto. Però ha arribat aquest a un punt d'expansió i a un grau d'utilitat que el fan digne, almenys, d'un respecte provisional. A hores d'ara ens sembla completament fora de lloc el fer mofa de l'esperanto, com encara és costum, per part de molts, a Catalunya. Convé no confondre la causa de l'idioma internacional amb les extralimitacions i extravagàncies dels seus partidaris excessivament ingenus. Potser hi ha hagut per part d'alguns esperantistes una manifestació massa pueril d'entusiasmes, i s'ha caigut, en determinats casos, en una mena d'exhibició pintoresca de les coneixences esperantistes. De totes aquestes coses no en té cap culpa l'idioma compost pel doctor Zamenhof.

D'un editorial de «La Publicitat»

700.014-B

# "KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj  
Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
(Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
(Joventut Catòlica) Ripollet  
*Frateco*  
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
(Creu Roĵa) Girona  
*Lumon*  
St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
(Seminari) Girona  
*Aplec*  
Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnès  
*Esperantista Amikeco*  
Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
(Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
Marquès Duero, 101. Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerica»* Soller

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figuera:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orbitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montgut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnès:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidre:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*      Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

**DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÈ**

**Redaktoroj : Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà**

## Pri niaj kursoj

Denove la esperantistoj komencis en siaj grupoj kursojn de la lingvo internacia. Post la dumsomera ripozo komenciĝis la aŭtuna plugado kaj jen ni atendas la printempan rikolton. Ĉu ni rikoltos multnombrajn kaj bonkvalitan frukton aŭ ni vidos kiel kutime ke la nombro de komencintoj iom post iom malgrandiĝas kaj ke fine restas kelkaj fervoraj lernantoj, kiuj alvenos al la fino de la kurso kun supraĵa kono de lingvo?

Ni konstante spertas, ke la unuagradaj kursoj liveras samideanojn, kiuj povas legi kaj skribi Esperanton pli malpli bone, sed al ili multo mankas por havi plenan konon pri la mekanismo de la lingvo. Ĉeesto en supera kurso estas nepre necesa por kompletigi la embrian konon. Tamen, grandaj malfacilaĵoj prezentigas por efektiviĝi tion. Unue la grupo ne trovas facile spertulon, kiu povus preni sur sin la taskon de vere supera kurso kaj ne ĉiu lingve sperta esperantisto taŭgas por tiu ofico. Krom tio, la malsano de neperfekteco estas malnova kaj esperantistoj el la unuaj rikoltoj ne estas sufiĉe poluritaj por doni la necesan helpon al la novaj. Ili neniam metis al si en la kapon, ke ili devas ellerni la lingvon.

Nia kara kumbatalinto Hodler iam diris en tre interesa artikolo, parolante pri la novaj lernantoj "kiam oni povas iom paroli pri elementaj aferoj, oni rezignas je plua studado". Prave, vi facile povas konstati kiel sensignifa nombro ĉeestas superan kurson. Kio do fariĝis el la unuagradaj lernintoj?. Tute simple; aŭ ili supozas ke la atingita scio sufiĉas por interŝanĝi sensencajn poŝtkartojn, aŭ ili pensas, ke ilia kapo ne taŭgas por plua studado. Ili ankaŭ povas esti instigataj al la forlaso de la komencitaj studoj, kiam ili trovas, ke Esperanto ne donas hodiaŭ sufiĉe praktikan profiton.

Ne estas nia intenco longe paroli pri la hodiaŭa utileco de nia lingvo internacia. Ni celas precipe iom helpi al la enradikigo profunda kaj vera de la lingvo. Pri la utileco, flanka aspekto de idealistoj, ni povus trovi argumentojn kaj pravigojn sed tio ne estas nia celo.

Esperanto, krom la flanko amuza, el kiu oni povas eltiri laŭvolan porcion — kion cetere oni faras tre malavare — havas pli altan kaj noblan celon en la mondo, ol interŝanĝado de poŝtmarkoj, poŝtkarkoj senenhavaj k. t. p. Por tio sufiĉas supraĵa lernado; por tio estas sufiĉa kelksemajna studado. Tiaj esperantistoj restos en niaj vicoj ne pli longe ol ĝis ilia kolektemo aŭ scivolemo estos kontentigita. Certe ni povus fari iun escepton kaj konstati ke post la vekita scivolemo venas plena sindono al la internacilingva efero.

Ĝenerale neniu estas malkapabla por ellerni Esperanton. Volo estas sufiĉa por tio kaj ne granda intelekto. Pli ol unu fojon mi konstatis en miaj kursoj, ke pli multe progresas en la lernado ne tiu, kiu havas lingvistikajn konojn kaj ĝeneralan intelektan kulturon, sed tiu, kiu sin donas plene al la studado, kies entuziasmo kaj lernemo kompensas la mankon de instruo.

Sekve, kion oni devas fari por konservi la maksimuman nombron da lernantoj kaj eltiri plej altan pozitivan profiton el niaj kursoj?

Antaŭ ĉio oni devas elekti — se oni povas elekti, kompreneble — taŭgajn gvidantojn de la kurso. Ni jam diris pli supre, ke ne ĉiu esperantisto taŭgas por instrui Esperanton. Ne sufiĉas, ke la instruanto parolas kaj skribas korekte la lingvon — en nia nacia lingvo mem ne ĉiu kiu uzas la lingvon bone, povas preni sur sin la gvidon de kurso — :estas necesaj kelkaj apartaj kvalitoj por doni vivon al la kurso, konservi la lernantojn en konstanta intereso kaj reteni ilin apud si ĝis la fino de la kulturata verko.

La kursgvidanto sondu la psikologion de ĉiu nova adepto, li esploru kaj eltrovu la inklinojn de la varbito por trovi la ĝustan malfermaĵon tra kiu li inokulos la semon de intereso, sindonemo kaj asimilo. Se li sukcesos sur tiu ĉi vojo, se li tiamaniere povos altiri la valorajn elementojn novajn, tiam facile malfermiĝos rekta vojo por sentigi la spiriton de la lingvo.

Kiel ĉiuj naturaj lingvoj, Esperanto, ne malpli natura ol ili, kiel pruvis diversfoje nia kara profesoro Dalmau, havas sian propran pesonecon, sian spiriton. Se la uzanto ne konatiĝas kun tiu spirito, tiam la lingvo fariĝas peza kaj nefleksebla, sed se oni venkas ĝin, oni renkontiĝas kun elasteco, fleksebleco, kiuj mirigas la lernanton pli kaj pli.

Ni multobligu niajn klopodojn por doni al la kursoj la maksimumon da favoraj ŝancoj por reteni la konvertitojn kaj tiel ni evitos tian amasiĝon de lingvaj mallertuloj, kiuj ne sentas inklignon legi niajn gazetojn, niajn literaturajn verkojn k. t. p. Tia rezultato ne estas naskita de la lingvo mem, ĝi ne devenas de individua mallerteco: ni mem estas kulpaj, ke ni ne sufiĉe kulturis la ellernigadon. Ni propagandas kaj uzas niajn fortojn por la elementaj kursoj kaj al la superaj ni donas flankan gravecon kaj vivon tre mallongan.

Tro ofte ni propagandas, ke Esperanton oni povas lerni en la daŭro de

kelkaj horoj, ne atentante pri tio, ke ĝi postulas kelkajn monatojn de profunda studado, konstanta ekzerciĝado kaj praktikado. La lernantoj estas tiel konvinkitaj, ke kelkaj lecionoj sufiĉos por koni la novan lingvon, ke ili forlasas la studon post kelka tempo konstatinte ke la afero ne marŝas kiel ili antaŭsupozis.

Ni diskonigu la facilecon de Esperanto, sed ni ne diru tion tiel ke oni povus kredi pri absoluta facileco. La facileco de la Zamenhofa verko rezultas el la malfacileco de la naciaj lingvoj kaj nur kompare al ili ĝi prezentas tiun altan gradon de supereco kaj facileco. Ni diru al la novaj lernantoj, ke la tasko, kiun ili entreprenas, postulas sinoferemon, konstantecon kaj intelektan streĉon. Se ni agos tiel ni evitos, ke multaj homoj eklernas la lingvon kaj poste fariĝas ĝiaj malamikoj.

Nun, ĉe la komenco de la lastaj kursoj, ni pripensu kiel grava estas nia instrua tasko por la bono de nia afero. Ni klopodu por ke la novaj varbitoj ĝisoste konvertiĝu.

S. ALBERICH JOFRÉ



## La Malsanktigita Sabato

de I. Zangwill

Alproksimiĝis la momento en kiu mortos la pola centjara avino. Laŭ la averto de la kuracisto, ŝajnis ke ŝi restos viva nur unu dolorigan horkvaronon. Ŝia malsano estis subita, kaj la genepoj, kiujn reproĉeti ŝi ĉiam ĝuadis, ne povis ĉeesti.

Ŝi jam trabatalis la grandan ondon de doloro, kaj estis flosanta preter la limojn de sia tera rifuĝejo. La flegistinoj, forgesante la ĝenon kaŭzitan al ili de ŝia plendemo kaj ŝiaj tropostulaj skrupuloj pri la manĝaĵoj, sin klinis super la lito kie kuŝis la velkinta estaĵo. Ili ne sciis, ke ŝi denove travivas la unikan grandan okazon de sia vivo.

Antaŭ preskaŭ kvardek jaroj, kiam (kvankam jam preskaŭ sepdekjara, kaj vidvino) pola vilaĝo formis ŝian tutan horizonton, ŝi ricevis leteron. Ĝi alvenis je la antaŭvespero de sabato en iu tago de pluva somero. Ĝi venis de ŝia fileto — ŝia sola filo — kiu estris kamparan gastejon je distanco de tridek sep mejloj, kaj estis patro de familio. Ŝi malfermis la leteron kun febra maltrankvilo. Ŝia filo estis kvazaŭ la pupilo de ŝia okulo. La maljuna virino avide legis de dekstre maldekstren la hebrean skribaĵon. Poste malforteco kaptis ŝin, kaj ŝi preskaŭ falis.

Enigita sufiĉe senzorge en la kvar paĝoj estis frazo, kiu por ŝi elstaris

kvazaŭ per literoj el sango. «Mi ne sentas min tre sana nuntempe; la vetero estas tiel subprema kaj la noktoj estas nebulaj. Sed estas negrave; mia digesto estas iom malordigita, jen ĉio». Troviĝis en la koverto rubloj por ŝi, sed ŝi lasis ilin fali planken sen rimarko. Panika timo, vojaĝante pli rapide ol la malakurata poŝto tiama, jam antaŭe portis famon pri subita atako de ĥolero en la distrikto kie loĝis la filo. Jam dum la tuta tago, timego pri ŝia knabo ondadis ĉirkaŭ ŝia koro; la letero konfirmis ŝiajn plej terurajn antaŭtimojn. Eĉ se la unua tuŝo de la ĥolero-diablo ne estis sur li kiam li skribis, tamen laŭ sia propra konfeso li estas en tia stato, en kia la malsano plej facile atakas. Jam nun li estas sur malsanlito — ne, eble sur mortlito, se ankoraŭ ne mortinta. Eĉ en tiu tempo la avineto estis vivinta preter la ordinara aĝo; ŝi jam vidis morti multajn homojn, kaj sciis ke la Mortaĝelo ne ĉiam malrapide plenumas la taskon. Dum epidemio, li estas tro okupata por dediĉi multe da tempo al ĉiu paciento. Patrina instinkto ektiris la kordojn de ŝia koro, logante ŝin al la filo. La fino de la letero ŝajnis enteni specialan aŭguron: «Venu baldaŭ por viziti min, patrineto. Mi ne povos viziti vin dum kelka tempo». Jes, ŝi devas iri tuj — kiu scias ke tiu ne estos la lasta fojo je kiu ŝi rigardos lian vizaĝon?

Sed jen venis terura penso por haltigi ŝin. La Sabato ĵus komenciĝis — antaŭ momento. Veturado, rajdado, ĉia vojaĝado estas malpermesitaj dum la venontaj dudek kvar horoj. Freneze ŝi pripensis la situacion. La religio permesas la malsanktigon al la Sabato nur laŭ unu kondiĉo — ke oni per tio savu vivon. Per nenia streĉo de logiko povis ŝi sin trompi en la kredon ke la resaniĝo de ŝia filo dependas de ŝia apudeco — ne, analizinte la aferon kun la kruela senkompateco de skrupula konscienco, ŝi konfesis ke lia malsano mem estas nur kredebla hipotezo. Ne; iri nun al li sendube estus malsanktigi la Sabaton.

Kaj tamen, sub ŝia tuta rezonado, ŝia konvinko ke li estas morte malsana, ŝia decido ekiri tuj, neniam ŝanceliĝis. Post doloriga baraktado ŝi kompromisis. Ŝi ne povas iri per veturilo — tio laborigus alian personon, krom ŝin mem, kaj, plie, necesigus financan negocon. Ŝi devos piediri. Kvankam peke estas transiri la limon de du mil jardoj preter la vilaĝo — la distanco fiksita de rabena leĝo — tio estas neevitebla. Kaj el ĉiaj vojaĝmetodoj, la piediro estas nepre la malplej peka. La Sankta Dio — Li estu benata — nepre scias ke ŝi ne volas labori; eble en Sia kompatio Li senkulpigos maljunulinon, kiu neniam antaŭe malsanktigis Lian ripoztagon.

Kaj tial, tiun saman vesperon, rapide manĝinte, kaj metinte en sian bruston la karan leteron, la avineto zonis la vestaĵon por marŝi la tridek sep mejlojn. Ŝi ne prenis bastonon, ĉar tion porti, laŭ la talmuda difino, estas labori. Nek ŝi povis porti ombrelon, kvankam estis pluvsezono. Mejlon post mejlo ŝi paŝegis vigle antaŭen, al tiu pala vizaĝo kiu kuŝis tiel malproksime preter la horizonto, kaj tamen ĉiam brilis antaŭ ŝiaj okuloj kiel gvidanta stelo. «Mi venas, mia ŝafido», ŝi murmuris, «la patrineto estas survoje».

Estis varmmalseka nokto. La ĉielo, ruĝa per stranga, hektika, kvazaŭ sorĉa lumo, ŝajnis pendi super la tero kiel ĉerkmantelo. La arboj, kiuj borderis la vojon, estis vualitaj per ĉifonsimila vaporo. Je noktmezo, la nebulo kaŝis la stelojn. Sed la avineto sciis, ke la vojo rekten kondukas. La tutan nokton ŝi marŝadis tra la arbarego, sentima kiel Una, renkontante nek homon nek beston, kvankam la lupoj kaj la urso enloĝis ĝiajn profundaĵojn, kaj serpentoj sin kaŝis en la arboj. Sed nur la senofendaj sciuroj ekkuris trans la vojetojn. La mateno trovis ŝin ellacigita, kaj preskaŭ lama. Sed ŝi daŭre marŝadis antaŭen. Preskaŭ la duono de la vojaĝo ankoraŭ restis por fari.

Ŝi kunportis nenian manĝaĵon; tio ĉi, ankaŭ, estas kontraŭleĝa ŝarĝo, ŝi nek povas aĉeti ion je la sankta tago. Ŝi diris, marŝante, la Sabatmatenan preĝon, esperante ke Dio pardonu la mankon de respekto. La ripetado donis al ŝi partan forgeson pri ŝiaj doloroj. Kiam ŝi pasis tra vilaĝo, la terura famo pri ĥolero estis konfirmita: ĝi flugilojn donis al ŝiaj piedoj dum dek minutoj, poste korpa malforteco estis pli venka ol ĉio alia, kaj ŝi estis devigata klini sin sur la barilo ĉe la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo. Estis preskaŭ tagmezo. Pasanta almozulo donis al ŝi pecon da pano. Feliĉe ĝi estis sen butero; tial ŝi povis ĝin manĝi kun nur malgrandaj duboj pri tio, ĉu ĝi antaŭe tuŝis ion malpuran. Ŝi rekomencis la marŝadon, sed la momenta ripozo nur kaŭzis ke ŝiaj piedoj sin movu pli dolore kaj malfacile. Plaĉus al ŝi bani ilin en rivereto, tio ankaŭ estas malpermesita. Ŝi elprenis de sia brusto la leteron, kaj relegis ĝin kaj spronis sian malpliĝantan forton per krio: "Kuraĝon, mia ŝafido! la patrineto estas survoje." Tiam la plumbkoloraj nuboj fandigis en akraĵn liniojn de pluvo, kiu batis al ŝi la vizaĝon, refreŝigante ŝin dum kelkaj momentoj, sed baldaŭ malsekigante ŝin ĝishaŭte, plipezigante la saturitajn vestojn, kaj igante la vojon amaso da koto, kiu ankoraŭ pli malhelpis ŝiajn malfortikajn paŝojn. Rekte kontraŭ la vento kaj la blovata pluvego ŝi antaŭen lametis. Jam konsumis ŝin nova timo — ĉu ŝi havas forton por daŭrigi? Ĉiun momenton ŝi malpli rapidiĝis; ŝi sin movis kiel heliko. Kaj ju pli malrapide ŝi iris, des pli vigliĝis ŝia antaŭsento pri tio kio ŝin atendas je la fino de la vojaĝo. Ĉu ŝi eĉ aŭdos lian mortoran vorton? Eble — terura penso! — ŝi alvenos nur suflĉe frue por rigardi lian mortintan vizaĝon. Eble jenmaniere punos ŝin Dio pro ŝia malsanktigo al la sankta tago. "Kuraĝon, mia ŝafido!" ŝi plorkriis. "Ankoraŭ ne mortu! La patrineto venas!"

Ĉesis la pluvo. La suno aperis varma kaj arda, kaj sekigis al ŝi la manojn kaj la vizaĝon, poste denove per ŝvito saturis ilin. Ĉiu colo jam estis torturo, sed la kuraĝaj piedoj ankoraŭ antaŭen dolore rampis. Estis mortanta voĉo — ankoraŭ tre malproksima, ho ve! — kiu alvokis ŝin, kaj dum ŝi sin trenis antaŭen, ŝi respondis, «Mi venas, ŝafido mia! Kuraĝon! la patrineto estas survoje. Kuraĝon! Mi rigardos vian vizaĝon; mi trovos vin vivanta.»

Foje vagonisto rimarkis ŝian mizeron, kaj proponis al ŝi veturon, sed ŝi

obstine skuis nee la kapon. La senfina posttagmezo pasadis — ŝi rampis laŭ la arbara vojo, faletante de tempo al tempo pro absoluta sveneco, kaj ŝirante manojn kaj vizaĝon per la dornoj de la vojbordo. Fine malleviĝis la kruela suno, kaj malbonodoraj nebuloj leviĝis el la arbaraj lagetoj. Kaj ankoraŭ la longaj mejloj etendadis sin, kaj ankoraŭ ŝi malrapidis antaŭen, le-targia pro ellaciĝo, apenaŭ konscia, kaj farante ĉiun paŝon nur pro tio, ke ŝi jam faris la antaŭan. De tempo al tempo ŝiaj lipoj murmuris, «Kuraĝon, ŝafido mia! Mi venas». La Sabato jam finiĝis antaŭ ol la avineto, difektita kaj sanganta, kaj nur ne tute svenanta, alrampis al la gastejo de sia filo, ĉe la bordo de la arbaro. Ŝia koro estis malvarma pro fatala antaŭtimo. Ne montriĝis ĉirkaŭ la pordo la kutima sabatnoka amaso da polaj kampara-noj. La sono de multaj voĉoj, strange kantantaj hebrean himnon, elondiĝis al la malluma ekstero. Kaftanportanta viro malfermis la pordon, kaj meĥa-nike levis la montran fingron por ke ŝi eniru senbrue. La avineto enrigardis en la malantaŭan ĉambreton. Ŝia bofilino kaj ŝiaj genepoj sidadas sur la planko — la sidloko de funebrantoj.

«Benata estu la justa Juĝanto!» ŝi diris, kaj ŝiris al si la jupon. «Kiam li mortis?».

«Hierau. Ni devis rapide enterigi lin antaŭ la komenco de la Sabato».

La avineto levis la tremantan voĉon, kaj partoprenis la himnon, «Mi kantos novan kanton al Vi, ho Dio; per dekkorda harpo mi kantos laŭdojn al Vi!»

La flegistinoj ne povis kompreni, kia subita enfluo de forto kaj impulso levis al sidpozo la kvazaŭmoman figuron. La avineto ŝovis en sian velkin-tan bruston la malgrasan manon kaj eltiris paperon, eluzitan kaj flavan kiel ŝi mem, kovritan per strangaj hieroglifoj, kies koloro jam de longe pal-iĝis. Ŝi tenis ĝin preme al la malhelaj okuloj — bela lumo venis en ilin, kaj heligis la milionosulkigitan vizaĝon. La lipoj sin movis trême; «Mi venas, ŝafido mia!» ŝi murmuris. «Kuraĝon! La patrineto estas survoje. Mi ri-gardos vian vizaĝon. Mi trovos vin vivanta!»

El la angla tradukis

LOUISE BRIGGS

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



## Scienco kaj Miraklo

En ĉiu tempo la problemo pri kunigebleco aŭ nekunigebleco de miraklo kaj scienco vive estis diskutata. Ankaŭ en nia epoko ĝi estas pritraktita en multaj libroj kaj broŝuroj. Antaŭnelonge la fame konata universitata profesoro Dro. Johano Ude en Graz, kiu ja doktoriĝis en teologio, filologio,

tir-kaj natursciencoj, en publika kunveno respondis al la ateisto kaj mi-granta paroladisto Dro. Aigner jene pri la problemo:

Ateisto, monisto, materialisto, kiu deklaras, ke ekzistas neniu Dio, ne-niu kreinto, devas diri, kiel Dro. Aigner, ke miraklo ne estas ebla. Sed mi estas konvinkita kristano. Estas do vasta fendego inter Dro. Aigner kaj mi. Se tamen Dio ekzistas — kaj mi absolute ne dubi povas pri lia ekzista-do — tiam la ebleco de mirakloj estas evidenta. Certe, kiu neas tion, tiu konsekvence ankaŭ devas nei miraklojn. Oni ja asertas, ke la ekzakta scienco ne povas toleri miraklon, ke miraklo kaj scienco ne estas kunigeblaj, ĉar la ekzakta scienco konstruas sur la ekzisto de naturleĝoj, sur la neva-riebleco kaj eterneco de la naturleĝoj. Kaj la miraklo, diras la kontestanto de Dio, trarompas la naturleĝojn, la miraklo trableĉas la seninterrompan kaŭzan rilatecon de la naturo kaj per tio malebligas la sciencan esploradon.

Mi mem dum longaj jaroj fakstudadis natursciencan, dum kvin jaroj zoologion kaj botanikon kaj dum du jaroj kaj duono medicinon. Mi do konas la ekzaktajn metodojn tiom bone kiom Dro. Aigner, kaj mi lernis ilian aplikadon. Mi konas kiel li la valoron de la grandaj naturleĝoj: la konstant-leĝon de la materio, la konstant-leĝon pri konservado de energio, la leĝon pri transformado de energio kaj la entropian leĝon. Tiuj leĝoj efikadas hodiaŭ tutsame kiel hieraŭ kaj mi scias, ke ili morgaŭ efikados same kiel hodiaŭ. Mi konas la grandajn leĝojn de la vivo, la leĝon, ke ĉiu vivanta devenas nur de io vivanta, kaj la alian leĝon, ke ĉiu ovo devenas de alia ovo, ĉiu ĉelo de alia ĉelo kaj ĉiu ĉelkerno de alia ĉelkerno. Sed mi tuj devas konstati, ke Dro. Aigner pridubas la ekziston de la naturleĝoj kaj ke li trarompas ilin. Ĉar por la ekesto de la unua vivo tiuj leĝoj, laŭ li, ne ekzistas. Li pretendas, ke io vivanta devenis el io senviva. Eĉ konsentante pri la neverŝajnaĵo, ke la vivo venis sur la teron de alia planedo, ĝi tamen iam kaj ie devis ekesti, kaj, se ne per kreado, kiun Dro. Aigner malakceptas, per pranasko! La konata paleontologo Dro. Branca (Berlino) skribas en sia broŝuro «Der Stand unsrer Kenntnis vom fossilen Menschen» (La grado de nia kono pri la fosila homo): «Ĉiu kiu akceptas pranaskon, devas scii ke li, ĉe nia ekkono de la naturo, akceptas miraklon, miraklon akurate tiel grandan, kiel tiu, kiun la eklezio akceptas. La tuta diferenco tiam konsistas nur en tio, ke oni ĉi tie la agon, kiu efektiviĝas kontraŭ la naturleĝo, t. e. tiun miraklon, alkonfidas al absolute senviva kaj senspirita materio, dum tie oni kredas, ke pure spirita estaĵo, nome Dio, efektivigis la miraklon».

Kiam la diiste konvinkita homo konstatas miraklon, tio tute ne disrompas la naturleĝon. La leĝo efikas poste kiel antaŭe. Nur en ĉi tiu speciala okazo iu forto, kiu staras super la naturfortoj, kiu ilin regadas kaj estradas, nome Dio, en sia libereco intervenis.

Kaj por la diiste pensanta homo estas per si mem afero komprenebla, ke Dio el pli altaj, super la naturo kuŝantaj motivoj, en certa kazo povas efiki kontraŭ la naturleĝo. Estus Dio bela, kiu ne povus trarompi la naturleĝojn de li mem kreitajn!

Miraklo en la propra senco estas ja «eksterordinara, konkreta fenomeno, kiu, superante la kapablecon de la nuraj naturfortoj, estas la rezulto de la sola kaj senpera volo de Dio». La miraklo do ne estas senkaŭza fenomeno, ĉar ĝi efektiviĝas per la interveno de Dio. Sed ĝi ankaŭ ne estas laŭ-kaprica fenomeno, sed ĝi servas al pli alta, super la naturo troviĝanta, religia celo. En la miraklo kuŝas do tendenco, sed nenio mallogika estas en ĝi. Tamen tute mallogika estos tio, kion diras Zola kaj kion devas diri kun li ĉiuj monistoj: «Mi ne kredas je miraklo, kaj mi eĉ ne kredus, se mi vidus, ke ĉiuj malsanuloj subite estus sanigitaj». Kontraŭ tia «sensupozemo» ĉiu pruvado estus absolute vana.

Sed por konstati, ke iu fenomeno estas mirakla, oni tute ne bezonas esti iu scienca fakulo, nek medicinisto, nek filozofo, nek teologo nek natursciencisto ktp., oni nur devas bone uzi siajn sentojn. Ĉu mi devas esti kuracisto por povi konstati, ke pusanta abceso per la apliko de akvo el Lourdes subite saniĝas, aŭ ke ok jarojn pusanta kaj gangrena krurrompo, ĉe kiu ja ostoj disiĝis ĝis centimetro, kiel en la kazo de Ruder, subite kunkreskas? Cetere la medicina scienco plej bone servas por konstati la miraklan saniĝon de vundoj, kiel en la kazoj de Gabriele Gargam, fraŭlino Ernestino Guilloteau kaj fraŭlino Henrieto Haŭton. Eĉ monisto, eĉ sendia kuracisto, devas diri: «En tiuj ekzemple menciitaj kazoj la naturaj fortoj, kiuj efikas ĉe klinikaj procedoj, tute ne sufiĉas por klarigi la saniĝojn». Aŭ oni devas diri, ke ĉiuj kuracistoj, kiuj okupiĝadis pri la menciitaj kazoj, estas aŭ nur trompitaĵoj, nekapablaj fakuloj, aŭ mem konsciaj trompistoĵoj. Kion la multcentoj da kuracistoj dum kvindek jaroj atestas en Lourdes, tion eĉ Aigner ne povas nomi mistifikon, blagon aŭ trompaĵon. Kaj tiun doktoron Boiserie, la multjaran gvidanton de la kuracista oficejo de konstatado en Lourdes, en kiu oficejo kredantaj kaj nekredantaj kuracistoj povas iradi kaj venadi, oni verŝajne ankaŭ ne povas taksii trompiston aŭ trompitan idioton!

Certe la monistaro uzadas la tre neseriozan aserton: «Ĉiuj tiel nomitaj miraklaj saniĝoj tute ne estas tiaj, aŭ ili estas klarigeblaj per sugesto, per psiĥozo aŭ per hipnozo». Mi ja tre dezirus scii, kiamaniere oni povus klarigi per sugesto la subitan kunkreskon de la depost ok jaroj disrompitaĵoj krurostoj de Ruder. Mi same deziregus aŭdi, kiamaniere la ambaŭ de multaj kuracistoj atestitaj subitaj saniĝoj de Guilloteau kaj de Haŭton povis efektiviĝi per psiĥozo de la masoj. Sed la monisto konas la solvon: «Kion oni ne povas klarigi, tio estas psiĥozo», kaj la natura kaŭzeco estas savita kaj oni denove libere spiras, ĉar oni per tio evitas al si ĉian pruvadon. Ĉu tia procedo povas arogi al si ian sciencecon?

Estas memkompreneble, ke la historia enketado pri okazintaj mirakloj devas esti plenumata tute laŭ la reguloj de ĝusta, senantaŭjuĝa historia esplorado. Temas nur pri tio, konstati la fakton kaj pruvi la okazaĵon, ne permesante fortimigi sin de eksterordinaraj fenomenoj. Kiu alproksimiĝas al la fakto konvinkite, ke miraklo, ne estas ebla, tiu jam estas influita kaj konsideras certa tion, kion li unue devus pruvi.

Se vi demandas, kiamaniere la kredanta katoliko taksas la miraklon, oni koncize povas respondi: Neniu miraklo, kiu okazas en Lourdes, aŭ en Limpas, aŭ en Aachen, aŭ ie ajn, estas dogmo por li. Ni neniel estas devigitaj kredi ĝin. Sed estas certe malprudente, nei tion, kio estas garantiita miraklo. Ni katolikoj devas atendi en ĉiu kazo, antaŭ ol ni povas aserti ke iu fenomeno estas mirakla, la rezulton de science-kanona esplorado de niaj ekleziaj aŭtoritatoj.

Mirakloj estas grandagoj de Dio kaj iliaj efikoj konsolas kaj admonas ke super la naturo la kreinto ekzistas, efikadas kaj sin pravas. Iuj komprenas ĉi tiun vokon de la graco, aliaj ĝin ne komprenas aŭ ne volas ĝin kompreni. Sed rilate al efektiva kaj neriproĉeble pruvitaj mirakloj, eĉ se estus konsekrita hostio el kiu fluas vera homsango, aŭ sanganta bildo de la koro de Jezuo, aŭ iu subita saniĝo, t. e. ĉie, kie miraklo estas pruvita, tute ne estas honto aŭ reakciemo aŭ iel malprudentemo, diri sian «Kredo», mi kredas. La provo de profesoro Cohn, klarigi la sangantan hostion per la «*Micrococcus prodigiosus*», plene malsukcesas ĉe la mirakloj en Mirebau kaj Aachen, kiuj estas pruvitaj de multe da senriproĉaj atestantoj, eĉ de fakuloj. Famaj sciencaj esploristoj kiel Ampère, Faraday, Liebig, Secchi, kies kompetenton verŝajne neniu povas nei, estis kredantaj, ili estis miraklo-kredantaj viroj. Scienco kaj miraklo-kredo do ne kontraŭstaras unu la alian. Ĉar kiu kliniĝas antaŭ faktoj, neniam estas reakciema, sed ĉiam progresa. Kiu tamen asertas, ke mirakloj ne ekzistas tiu ĝin unue pruvu.

Certe la mirakloj astas ĝenaj. Ĉar ili diras ion al ni; ili memorigas nin pri la metafiziko, ili postulas enpensiĝon, etik-religian renovigon, ili decide montriĝas severaj admonantoj pri alia mondo, kaj tio plej ofte estas la ĉefa kaŭzo por la kontesto. Seriozaj homoj do tute ne povas ne atenti la veran miraklon, ili devas konsideri kaj pripensi ĝin.

Por ĉiuj ili, kiuj hodiaŭ aljubilas al la monismo, certe iam venos la tago kaj la horo, kiam plenumiĝos por ili tio, kion diras la poeto de la «*Dreizehnlinden*» (Dektri tilioj):

Al Dio kreitaĵo apartenas,  
Ne povas vi de Li forkuri.  
Iam, ĉu morgaŭ aŭ pli poste,  
Vi nepre antaŭ Li genuos. —

JAKOBO SCHMID

Menciita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj.

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

## Antaŭ la tribunalo

«Sinjoraj moŝtoj, juĝistoj bravaj  
 min demandantaj pri mia krimo  
 por la verdikton fari sen timo  
 laŭ leĝa justo, — vi estas pravaj.  
 La sanga kulpo min ŝiras morde  
 kaj kortaŭzantan ŝarĝon mi sentas...  
 Min ĝi torturas... min ĝi turmentas...  
 Konfesos ĉion mi do laŭorde.

... ..  
 Jes, mi memoras, ke antaŭ jaro  
 estis printempo, maja vespero...  
 Jam sur verando verdis hedero,  
 amflustrojn eĥis la foliaro...  
 En koro sangon vipante bolis  
 febraj sopiroj de la printempo...  
 Pelis al peka amo min sento,  
 soifis lipoj... Mi ami volis

... ..  
 Dommastro mia kun milda tuŝo  
 kaptis la manon, al si min prenis...  
 Pro la feliĉo preskaŭ mi svenis  
 dum kisis, kisis min vira buŝo...  
 Li min karesis... La vortoj ravis  
 koron knabinan, koron naivan  
 kaj mi ekiris — vojon deklivan  
 fidante al li... Jes, li — min havis.

... ..  
 Kaj poste?... Poste, dum amaj horoj  
 dolĉaj esperoj koron dorlotis.  
 Liaj promesoj riĉe min dotis,  
 ĝis venis scio kun la doloroj.  
 Sendormaj noktoj, barakto larma  
 ofte vizitis mian animon...  
 Vekis frenezajn pensojn kaj timon  
 en febra cerbo konjekto svarma

... ..  
 En ŝima budo, dum kriza horo  
 naskis bastardon mia utero.  
 Orfa kaj sola en la sufero  
 mi ĝemis... veis kun korangoro.

... ..

Ve! Ve al mi! Min honto instigis.  
 Lin mi sufoke premis al sino;  
 Idon senkulpan peka patrino.  
 Ve! Ve al mi! Mi mem lin mortigis!  
 Ĉar aĉa honto kaj venĝoflamo  
 flagris brulvunde, sentojn sufoke  
 kaj mi... mi, la patrino, mortvoke  
 suĉigis morton el mia mamoo...

... ..  
 Jen... Mi rakontis laŭorde ĉion...  
 Ĉu ne, sinjoroj, ĝuste mi kredas,  
 ke mian krimon vane mi pledas  
 kaj por indulgo mi petu Dion?!

... ..  
 Sinjoraj moŝtoj, vi pravas tute...  
 Sorton similan mi loj jam havis,  
 kiujn printempo venkis kaj ravis...  
 La justan punon mi prenos mute.  
 Do ĵetu min al karcera fundo,  
 ke la sanganta ombro min tentu,  
 kun ve-riproĉo ĝi min turmentu,  
 ĝis cikatriĝos la kora vundo!  
 Do ĵetu min al karcera kelo  
 kaj enterigu oni min viva  
 kaj min blindigu sfero lesiva,  
 ĝis venos savo el la ĉielo!  
 Do ĵetu min al karcera putro,  
 por ke al ŝlima vermo kaj rato,  
 kies intestojn tordas malsato  
 ĉi korpo estu vivdona nutro!  
 Sed juĝu kun mi pri sunradio,  
 maja printempo, ama sopiro,  
 pri la birdkanto, kisoj de viro,  
 destino homa, pri ĉiu, ĉio...  
 mem Dion voku al juĝo veni,  
 kiu nin kreis, nin la vantulojn,  
 kial ne kreis Li nur — sanktulojn,  
 kaj amon kial Li metis en ni?  
 Vokita estu al tribunalo  
 pro la plej granda krimo sur tero  
 kiu pri fruktoj de la utero  
 elpensis leĝon de vandalo.  
 Laŭ tiu leĝo infano eta  
 estas en vivo leĝe stampita,

unu — senpeka, rajte naskita,  
 alia — honta sursarĝo peka.  
 ... ..  
 Pro tiu leĝo patrinoj krimas.  
 Tiu ĉi leĝo diktas la sorton,  
 rabas feliĉon, spiras la morton  
 al tiuj, kiuj la vivon timas.  
 Pro kulpo mia kaj de knabinoj,  
 krime agantaj en malespero,  
 estu ĵetitaj vi al karcero,  
 ekzekutistoj de l' gilotinoj,  
 ĉar dia juĝo kun mil malbenoj  
 trafos justfare nur vin tiranoj,  
 aĉaj murdistoj de la infanoj,  
 vin, leĝfaristoj, vin, leĝhienoj!!

JULIO BAGHY

## XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5-6-7 junio 1927

Iom post iom alproksimiĝas la dato de nia Kongreso en Sóller kaj iom post iom la katalunaj esperantistoj pli profunde sentas la deziron ĉeesti ĝin, ne nur pro la kutima beleco de niaj festoj, tiel fervore organizataj de la lokaj komitatoj, kiuj dronas en laboro por regali plej bone la kongresanojn, sed ankaŭ pro tio ke la fama Sóller, kaj ĝenerale ĉiu urbo en Mallorca, havas magnetan forton altiri al si ĉies admiron kaj ŝaton.

Mallorca ne bezonas kongreson de K. E. F. por altiri la esperantistojn, sed se ni aldonas al tiu natura forto la allogon de niaj kongresoj, ŝajnas ke ni povas konkludi, ke ĉiuj katalunaj esperantistoj svarmos tra la stratoj de Sóller, tiel belaj kaj originalaj, dum la 5-6-7 junio. Kiu ne ĉeestos la Kongreson, tiu certe havas terure mialsatajn poŝojn kaj, ho ve, ne longe post-vivos la kongreson pro bedaŭro kaj envio.

Estas necese, ke niaj grupoj en siaj programoj kaj kunvenoj ofte priparolu la estontan Kongreson de K. E. F. Tíamaniere ni povos eviti la plendon de iu esperantisto, kiu ne ĉeestis nian lastaŭ kongreson ĉar li ne povis informiĝi pri ĝi.

Lastamomente ni ricevas informojn de la O. K. ke Empresa Soler, kiu tiel kontentige aranĝis la vojaĝon, gastadon k. t. p. okaze de nia kongreso en Palma, entreprenis la organizon sub la sama aspekto por la kongreso en Sóller. Ni esperas, ke nia februara numero jam povos anonci la budĝeton por la kongresontoj.

Amikoj, laŭte propagandu niajn proksimajn festojn!

## XIII Internaciaj Floraj Ludoj

## LISTO DE PREMIOJ (1) (fino)

- XX. — De kelkaj privataj samideanoj el Terrassa: ptoj. 50 por temo livervola.
- XXI. — De «Katolika Mondo»: Kvinjara abono por temo «Esperanto kie moderna latino».
- XXII. — De Sro. Joan Barceló el Palma: ptoj. 50 por temo libervola.
- XXIII. — De «Crédito Balear» el Sóller: ptoj. 100 por temo libervola.
- XXIV. — De «Banco de Sóller»: ptoj. 100 por temo libervola.

## VERKOJ RICEVITAJ (2) (ĝis la 24 jan. 1927)

12. Laŭnatura edukado. — 13. Strofoj por Toska. — 14. Odi et Amo. — 15. De vespero al mateno. — 16. Al la edukistoj de la tero. — 17. Vortinda. — 18. Nur pensoj iras trans limo sen pago kaj timo. — 19. La Amo venkos. — 20. Dies nostri quasi umbra. — 21. Skulanco. — 22. Gloria in excelsis et in terra pax. — 23. Ĉu premion, ĉu nenion? — 24. Lingva studo por lingva studado. — 25. Jen ankaŭ proza ama verkaĵo. — 26. Amika luno. — 27. Valentino. — 28. Puisque tu sais chanter, ami, tu sais pleurer. — 29. Laŝon. — 30. Ni fosu nian sulkon. — 31. Solecoj. — 32. La amo daŭras eterne. — 33. Abismoj. — 34. Fride-ricus Rese.

Akcepto de pluaj verkoj finiĝas la 28 febr. 1927.

## N O T O J

Ĉiuj konkursontoj bone legu kaj plenumu la kondiĉojn por akcepto de verkoj aperintajn en la antaŭaj numeroj de *Kataluna Esperantisto*.

Al kelkaj demandintoj pri la temo de la premio XIX ni informas, ke oni povas trovi la jenajn verkojn de poeto Guillèm Colom: *Àligues*. Poema en set cants. Estampa de F. Guasp. Palma. *L'Amor de les tres taronges i altres poemes*. Edicions de «La Revista», núm. 57. estampa de J. Marquès Arbona. Sóller.

## D A N K O N

Plej kore ni dankas la gazetojn, kiuj bonvolis represi nian Alvokon al la XIII Internaciaj Floraj Ludoj. Ni esperas, ke dank' al la eksterordinara diskonigo de nia Festo, la proksimaj Floraj Ludoj havos plej kontentigan sukceson.

DELFI DALMAU, SEKR. Carrer València, 245 — Barcelona

(1) Vidu K. E. n.º 26-27, sept.-oktobro.

(2) Vidu la lastan numeron de K. E.

## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevatajn)

LA ARTO DE MEMDISCIPLINO: *Psikagogio*. — Originale verkita de Charles Baudouin. Biblioteko Tutmonda N-roj 5-6. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S.W. 19.—1926, 95 pĝ.  $17 \times 10\frac{1}{2}$ . Prezo afrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro,

Mi legis ankoraŭ neniun libron el la sama kolekto, sed se mi devas juĝi laŭ la valoro de tiu ĉi, mi nepre devas aserti ke la kolekto meritas legadon kaj atenton de la esperantistoj. Précipe ni devas ĝoji pri la apero de tiu ĉi verketo, originale verkita de la talenta samideano, kiu honoras nian movadon kaj kiu temas pri scienca kaj etika aferoj. La edukado de la volo estas certe tre interesa afero, kaj precipe en nia moderna epoko kiam la malfortiĝo de la nervoj kaj sekve de la volo estas unu el la plej komunaj malsanoj. La aŭtoro raportas pri la diversaj procedoj de memdisciplino enkondukitaj de la homoj en diversaj epokoj: Budhismo, Stoikismo, Kristanismo, Mensa Kuracado, Hipnota sugestio, Laŭracia Persvadado, Psikanalizo, Sinsugestiado, kaj pri ĉiu el ili li faras ĝustan komentarion. En la fino la aŭtoro klarigas sian propran doktrinon, kiun li apogas sur la instruoj de ĉiuj jam konitaj metodoj. Kvankam ne specialisto de tiu scienco psika, kaj mi devas konfesi ke sole iu tia rajtas ja fari kritikon, mi pensas ke la vera malfacilaĵo de la homo kiu volas ĉerpi profiton el tiu ĉi lernado komencas en la momento kiam li pretendas enpaŝi en la praktikadon de la memdisciplino, kaj ke eble ne ĉiu, eĉ tiu mem kiu plene rekonas la pravecon de la doktrino estas kapabla alkonduki sian volon laŭ vojo de li dezirata. Estas eble ke por sekvi la vojon de la psikagogio, por eduki sian volon oni bezonas jam grandan volforton, ĝuste tion kion oni celas. — M. S.

NORDA VENTO, Novelkolekto de Frederiko Karinthy.—Biblioteko Tutmonda N-roj 7-8. El la hungara lingvo tradukis Karlo Bodó. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S.W. 19.—1926, 95 pĝ.  $17 \times 10\frac{1}{2}$ . Prezo afrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro.

Vi malfermas la libron kaj febro tuj vin ekposedas. Vi iras antaŭen sur la paĝojn kaj iom post iom vi forlasas la mondon, senkonsciiĝas, via penso iras tien kaj tien ĉi. La aŭtoro tenas vin en hipnota dormo, li regas vin dum via rigardo glitas sur liaj figuroj misteraj, strangaj, groteskaj. El la dekvar noveletoj, neniun deflankiĝas de la speciala stilo de la aŭtoro.

Bodó, la tradukinto, vere ne facile povis traduki la specialaĵojn de Karinthy, sed li sukcesis kaj havigis al ni tre laŭdindan verkon. Kelkaj neoficialaj vortoj, pri kies senco estas donata klarigo ĉe la fino de la libro, estas uzataj de la tradukinto por pli bone respeguli la stilapartaĵojn de la aŭtoro.

LA SONGHO DE MAKARO de V. Korolenko. — Biblioteko Tutmonda N.<sup>o</sup>

9. El la Rusa tradukis M. Ŝidlovskaja. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S.W.19. — 1927, 48 pĝ.  $17 \times 10\frac{1}{2}$ . Prezo afrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R.M. aŭ 1 dolaro.

Makaro estis drinkemulo. Estis antaŭkristnaska vespero kaj Makaro sentis deziregon drinki... kal li drinkis ĝis ebriiĝo kaj songis. Li songis, ke li mortis kaj ke post longa paŝado li alvenas antaŭ maljuna Tojono (Dio), kiu severe juĝas lian pekan vivon. Li efektive pekis: li trompis, drinkis, ne pagis impostojn k. t. p. sed li suferis. «Vilaĝestroj, asesoroj kaj distriktestroj trolacigis lin postulante impostojn; trolacigis lin mizerego kaj malsatego, trolacigis lin frosto kaj varmego, pluvo kaj sekeco, trolacigis lin la traglaciiginta tero»... Makaro brave defendis sin kaj sukcesis kortuŝi Tojonton kaj per tio atingis sian savon.

La tradukintino havas stilon nekutiman ĉe esperantistoj. Ŝiaj frazoj fluas seninterrompe bele kaj agrable. La rakonto, kiu per si mem estas tre alloga, kun la talenta traduko de Korolenko akiras duoblan valoron.

DEKOKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Eldonis Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. 88 pĝ.  $25 \times 16\frac{1}{2}$ . 1926. 12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svisujo.

Protokolo, Financa Raporto, Statistikoj, Raporto de Internacia Centra Komitato, Konstanta Re prezentantaro, U. E. A. Prezidanto de la Akademio k. t. p.

Tre interesa libro por ĉiu esperantisto deziranta informiĝi pri nia movado. — SALJO.



## Diversaĵoj

**Esperanto ĉe malgrandaj nacioj.**— Ni recevis kelkajn numerojn de la irlanda gazeto *Féclé na nGaedeal*, kiu enhavas tre interesajn artikolojn de nia konata, estimata kunbatalantino, Emma L. Osmond. Nia amikino brave defendas nian idealon kaj ĝuste argumentas por la alpreno de la internacia lingvo ĉe malgrandaj nacioj. Dank' al Esperanto ni havis okazon kanatigi kun la lingvo kaj literaturo de Irlando, la nacio kiun tiel multe oni amas ĉe ni.

**Esperanto kaj la ministro de publika instruado.**— Laŭ propono de Barcelona Esperanto-Societo, la 31 de decembro ĉiuj esperantistaj grupoj kaj societoj sendis telegramon al la Ministro de Publika Instruado en Madrid kun la celo ke en la abiturientan programon de lingvoj oni enkonduku Esperanton.

Vere estus tre grava sukceso de la esperantistoj se la ministro atentus

la peton kaj enkondukus nian lingvon en la reorganizatan abiturientan programon.

**Esperanto kaj Radio.**— Ĝis nun (laŭ Sennaciulo) 112 stacioj dissemi-taj tra 24 ŝtatoj disaŭdigas, ĉu paroladojn, ĉu programojn, ĉu kursojn espe-rantajn.

Nome: Aŭstralio 3, Aŭstrujo 2, Brazilio 1, Britujo 16, Ĉeĥoslovakujo 1, Danujo 3, Finnlando 1, Francujo 3, Germanujo 27, Hispanujo 5, Holando 2, Hungarujo 1, Italujo 1, Japanujo 8, Kanado 4, Latvujo 1, Meksikio 2, Nor-vegujo 1, Rumanujo 1, Rusujo 8, Svedujo 2, Svisujo 2, Urugvajo 1, Usono 16.

**Grave.**— Ĉu vi legis la Alvokon al la tutmonda esperantistaro aperin-tan en nia lasta numero?. Ĉu vi respondis la demandaron?. Urgas ke ĉiu esperantisto plenumu sian devon. Tion postulas la progreso de nia movado.

**Al la grupoj kaj K. E. F. — anoj.**— Oni komencis ordigi la materialon por la Kongreslibro 1927. Sendu kiel eble plej baldaŭ la liston de siaj mem-broj la grupoj kaj adresŝanĝojn kaj korektojn la membroj individuaj kaj abo-nantoj. Tre danke ni akceptos ĉiun sugeston kaj rimarkon.

**Literaturaj konkursoj, 1927.**— 1. Traduko de Angla Proza Literaturaĵo, de 2,000 ĝis 3,000 vortoj. 1-a premio, 30ŝ; 2-a premio, 20ŝ. 2. Originala Teatraĵeto Esperanta, por 3 ĝis 5 roluloj, de ĉirkaŭ 15-minuta daŭro, taŭga por prezentado ĉe Grupkunvenoj. 1-a premio, 30ŝ; 2-a premio, 20ŝ. 3. Originala Artikolo, de 1,000 ĝis 2,000 vortoj. Premio, 20ŝ. — *Kondiĉoj.* 1. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kaj skribi ĝin sur la manuskriptoj. Ili devas skribi la nomon kaj adreson —kune kun la pseŭdonimo —sur apar-tan folion, kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skibante la pseŭ-donimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto. 2. Ĉiu manuskripto fariĝos la propraĵo de la Brita Esperantista Asocio. La Asocio rezervas al si ĉiun rajton pri publikigo de manuskriptoj. 3. La Asocio re-zervas al si la rajton, aŭ ne doni, aŭ dividi, iun ajn premion. 4. En Kon-kurso 1-a fideleco al la *kompleta teksto* estas necesega. Ĉiu konkursanto devas sendi por komparo la originalan presitan tekston, aŭ alian kopion, 5. Manuskriptoj, kun surskribo *Literatura Konkurso*, devas atingi la Aso-cion ĉe 142, High Holborn, Londono, W. C. 1, antaŭ Marto 31-a, 1927.

## Nekrologo

Pere Riera, nia malnova juna kunbatalanto mortis. Kiom fervore li ba-taladis por Esperanto kaj por ĉiu nobla idealo oni tuj divenis ĉe la unua renkontiĝo kun li. Liaj espero, lia energio, li tuta, malaperis subite en la brakojn de la mistera morto, kiu ŝtelire, perfide, kaptis lin. Ni promesas duobligi nian fervoron por kompensi la laboron, kiun vi forlasis. Al la viaj nian kondolencon.

# KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

• Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto». València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



## KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al  
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:  
Ĉiusemajna  
Aktuala Ilustrita  
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de  
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo  
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.<sup>on</sup>, 2.<sup>a</sup>

BARCELONA

## “Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO  
OFICIALA ORGANO

DE LA

## Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj  
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj  
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en  
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anonon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)*

## LA

*article determinatiu*

el, els  
la, les

## J

(sona y)

*i es terminació del plural*

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

*sufix per al*

*femení*

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

*terminació substantiu*

lakto  
urbo  
komerco  
(comerç)

## A

*terminació adjectiu*

blanka  
antikva  
komerca  
(comercial)

## I

*terminació verb (infinitiu)*

kompreni  
labori  
komerci  
(comerciar)

## E

*terminació adverbial*

klare  
konstante  
komerce  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

*temps present*

Mi skribas  
Jo escriĉ

### IS

*temps passat*

skribis  
escriví

### OS

*temps futur*

skribos  
escriuré

### US

*mode condicional*

skribus  
escriuria

### U

*mode imperatiu o subjunctiu*

skribu!  
escriĝu!

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escriĉ la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro*, per la plumo, sur la tablo

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

## L'Esperanto i l'Aviació

Emile Houbart, director de la revista esperantista «La Movado» de París, ha celebrat recentment un interviu amb el famós capità aviador Rignot qui, junt amb el pilot Costes, ha batut el record mundial de la més llarga distància sense parar, anant en aeroplà de París a Djask (5.400 quilòmetres). Ens és plaent de fer conèixer als nostres cars lectors les manifestacions que sobre la utilitat de l'idioma internacional féu l'interviuat capità Rignot. Traduïm de l'esmentada revista:

«Després de perdre de vista París, quan hom es troba al dia següent a Rússia o a Pèrsia; quan hom arriba a Pequín després de set dies o bé a Toquio al cap de nou dies; quan hom retorna de Calcuta passats set dies, -- i que aquests viatges aeris han estat fets en el que va de l'any -- (cal aclarir que això ho deia a mitjans de gener) és evident que per a entendre's amb els habitants dels països travessats, fóra necessari parlar deu, quinze,... tots els idiomes!

«Cosa irremeiable. Què és cas! No hi ha, per ventura, una llengua universal que pot comprendre tant l'anglo-saxó com l'italià, tant el persa com el rus? No cal dir que aquesta llengua proporcionaria els més grans serveis a l'aviador que té a cura un llarg viatge, veient-se mantes vegades obligat a fer-se entendre mitjançant gestos o repapiejar talment un vell, més o menys bé, -- més aviat menys -- un llenguatge que no sap prou bé.

«Quant més augmentarà la potència de volar dels aparells, tant més es deixarà sentir entre els aviadors i passatgers la dificultosa barrera lingüística que representa la diversitat tan nombrosa de parles diferents.

«Recomano als aviadors, els meus companys germans, que procurin ajudar força -- i un interès egoista ens hi obliga -- a fer la propagació de l'Esperanto. Per mitjà d'una sola llengua podrem ésser entesos per tothom, àdhuc en emprendre la volta al món».

En la conferència que sobre el seu viatge donà a la Ràdio-emissora de la P.T.T., també tingué mots d'elogi per l'Esperanto.

Sembla, doncs, que l'idioma internacional comença a trucar a les portes dels aviadors. Tanmateix és d'esperar que en aquesta interessant esfera l'Esperanto farà ràpids passos, -- ai las! -- volades, i llavors podrem dir que ha estat batut el record mundial de rapidesa en l'estudi.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provezkemplero 2 respondkuponoj  
 Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
 (Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
 (Joventut Catòlica) Ripollet  
*Frateco*  
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
 (Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
 St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
 (Seminari) Girona  
*Aplec*  
 Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
 Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
 Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
 (Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
 Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
 Marquès Duero, 101. Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Solleric»* Soller

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montagut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Aruella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sòller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÈ

Redaktoroj : Delfí Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Patriotismo

Ruĝaj nuboj ŝvebis lastatempe super Eŭropo kaj ĉiumomente oni sentis la alproksimiĝon de nova fajra pluvo. Ŝajnas ke la homaro ankoraŭ sopiras al nova buĉado por pruvi sian altan maturan kulturon (?), kiun ellaboris la miljara progresado.

Ĉe diversaj landlimoj gardostaras la unuaj viktimoj, atendantaj la pereigan ordonon por komenci la pafadon. Unu sola fajrero sufiĉas por ke la brulado denove komencu sian detruan laboron, por ke la morto denove festu sian triumfon, por ke la murdoj, perfortoj kaj la plej malnoblaj krimoj, internacie akceptitaj de la milita juro, novafoje multobligu por la gloro kaj plialtiĝo de la homa kulturo.

Sub la masko de patriotismo oni agitadas kaj incitas, oni trompas kaj brutigas. Pretekstante ke oni ofendis la nacian honoron, oni facile naskas popolan movadon kontraŭ iu difinita najbara lando, kiu siavice uzas la samajn procedojn por starigi kun ĝenerala aprobo batalpretan armeon.

Antaŭ ni staras kun sanga reliefo 1914. Antaŭ ni staras la rezultatoj de la Granda Milito, pri kiu dolore atestas miloj kaj miloj da kripuloj tra la tuta mondo. Jen la terura listo:

Anglujo. . . . .	1.170.000
Aŭstralio . . . . .	706.000
Aŭstrujo . . . . .	164.000
Belgujo. . . . .	50.000
Ĉeĥoslovakujo . . . . .	236.000
Finnlando . . . . .	10.000

Francujo . . . . .	1.500.000
Germanujo . . . . .	1.537.000
Italujo . . . . .	800.000
Jugoslavujo . . . . .	164.000
Kanado. . . . .	45.000
Nov-Zelando . . . . .	20.000
Polujo . . . . .	320.000
Rumanujo . . . . .	100.000
Rusujo . . . . .	775.000
Usono . . . . .	157.000

Oni aldonu ankoraŭ tiujn de Bulgarujo, Hungarujo, Portugalujo kaj Turkujo kaj vi povos prezenti al vi la edifan spektaklon postmilitan. Ĉu estas necese ripeti kiom da mizero, doloro kaj sufero ni heredis de la milito?. Ne estas necese ĉar tio plene evidentiĝas antaŭ ni, sed la homaro ne satiĝis ankoraŭ kaj volas atingi la ĉielon per la kreskanta monto de kadavroj. Ĝi volas aŭdi plian fojon la fulmotondron de la tiel perfektaj kanonoj, la zumadon de la fajron semantaj aeroplanoj, la haladzon de la batalkampoj....

La XX jarcento pravas, ke la Homaro atingis la plej superan gradon de stulteco kuu la helpo de tiel diversaj fratigaj doktrinoj, kiujn neniu sentas nek komprenas. Se ni longe devos iri la komencitan vojon, estos pli bone ke iu supera forto fulme neniigu nin.

*En la mondon venis nova sento* kantas nia himno, sed tiu nova sento, kiam ĝi devas paroli sincere montras sin atakema. Ni bele parolas pri la nova sento, pri la interna ideo sed ĝi troviĝas nur en nia buŝo, ne en nia koro. Tiel putriĝinta estas nia animo, tiom da maljustaĵoj ĉirkaŭas nin, tiom da malbono regas super la bono, ke nenio, eĉ neniu, spite la predikoj de la suprenrigardantoj, savos la Homaron.

Branly, al kiu ni ŝuldas la ĉefan iniciaton en la eltrovo de la senfadena telegrafio, opinias ke la scienco ekstermos la Homaron, kaj ni devas opinii kun li, ke ĉiu nova paŝo de la scienco venis por helpi nur parton de la Homaro, kiam ĝi konstruas kaj por frate kaj tute egale konduiti kun ni, kiam ĝi detruas.

Ni, esperantistoj, havas antaŭ ni tre malluman perspektivon, se ni turnas la okulojn al la morala flanko de nia ideo. Kontraŭ ĉio kaj malgraŭ ĉio ni iru nian vojon. Eble oni rezervis por ni la lumon.

S. ALBERICH JOFRÉ

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro,

## Timego antaŭ la Morto

de J. Wittlin

Dio! Mi ne volas mortil! — —

Mi vidis kiel terure aspektas kadavroj,  
mi vidis — kiel abomene malvarmaj estas tomboj,  
mi aŭdis kiel longdaŭre ploregas patrinoj,  
kiam ili siajn filojn metas en tombojn malvarmajn.

Dio! Mi ne volas mortil!

Kion oni predikas al mi pri vanteco de la vivo,  
kion oni predikas al mi pri eterneco postmorta! — —  
Mi scias: heroeco estas nura konsolo por tiuj,  
kiuj falis en servoj al malnobluloj,  
kaj mem — noblaj.

Mi ne volas mortil!

Ĉar mi vidis la vitrecon de okuloj, kiuj iam estis  
Kiel Ĉia ĉielo — ho Dio — lazuraj  
kaj semis serenajn brilojn en ĉiuj;  
kaj nun ili timigas siajn proprajn infanojn  
per ĉi glaciigita, senviva rigardo  
el la ĉerko!

Min — kadavron: ne volas koni mia propra patrino,  
Min — kadavron: mia propra edzino malagnoskas,  
tiu, kiu min volupte alpremadis dum tiom multe  
da jaroj.

Rapide — kiam mi rigidiĝos — ŝi ordonas min forporti  
el la domo, kie mi ŝin amis milojn da fojoj,  
kaj la domon incensigos, ke ne restu fi - odoro,  
kaj la domon incensigos, kvazaŭ post io malagrabra,  
ne amata!

Dio! Mi ne volas mortil! ! — —

Sur ĉiu paŝo, en ĉiu strato,  
sur plena maro kaj sur monta vojo —  
en ĉiu momento, en ĉiu horo —  
sur ora trono kaj en griza arestejo,  
ĉe abunda festeno kaj en maljunul-rezidejo — —  
vintre kaj somere, printempe kaj aŭtune,  
en feliĉo senlima, en doloro senfina:  
— Sur ĉiu paŝo, en ĉia horo,  
ĉiumomente — insidas je mi la morto.

Dio! Mi ne volas mortil!..

Ofte mi iradis dum aŭtunaj vesperoj  
malantaŭ la urbon — kie troviĝas fosajoj  
kaj teruro min kaptis.

Ofte mi vidadis bestan kadavron:  
maljunan ĉevalon, kiu estis laborema,  
hundeton aŭ katon, kiu ĝojigadis la okulojn —  
kaj kaptis min abomeno.

Malbonaj muŝoj — sidis sur la korpoj  
de l' belegaj bestoj —

Korvoj, frugilegoj ŝiradis la internaĵojn  
de bravaj viroj —

Post longaj jaroj — nur blankaj ostoj,  
abunde disŝutitaj sur niaj kampoj  
atestas pri teruraj, amasaj pestoj  
kaj militoj!

Dio! Mi ne volas morti!! — —

Ho, kiel belaj estas la tagoj de la vivo!  
Ho, kiel ĉarmaj estas tiuj niaj noktoj!  
Ho, kiel agrablegaj estas tiuj niaj horoj,  
niaj tagmezoj kaj niaj profund-noktoj  
kaj niaj tagiĝoj kaj sunaj subiroj,  
la grandaj feliĉoj kaj tiuj ĉagrenoj  
sen fino! —

Kiel belege bonodoras  
la floroj de l' kampoj, ĝardenoj,  
ĉiuj verdaĵoj arbaraj kaj herbejaj  
kaj la fojno freŝe falĉita sur la paŝtejo —  
kiel mirinde bele odoras! — —

Kaj kiel dolĉaj estas la fruktoj:  
tiuj de foraj kaj tiuj de proksimaj landoj,  
kaj kiel bongusta — la sekala, nigra pano!  
kaj kiel sukplena — la hela, abela mielo,  
kaj kiel fortigas nin la bovina blanka lakto  
kaj ĝojigas ĉiu mia ter-frukto!

Kaj kian ĝojon vekas en ni tiu voĉo  
de l' birdo arbara, kiu ĉirpas en arb-kavaĵoj,  
kaj la heleco de l' suno kaj la paleco de l' luno,  
la varmeĝo julia kaj sub tilio la ombro,  
kaj tiuj lumetoj de l' muŝoj lampiraj  
kaj la zumadoj super la lago konkava. —

Kaj tiuj ravaj, kaj tiuj sorĉaj  
urboj kaj vilaĝoj, kiujn ni vizitas —

kaj la vizaĝoj de homoj, kiujn ni bone konas  
kaj la vizaĝoj de tiuj, kiuj tra la urbaj ĝardenoj  
svarmas — svarmas kaj svarmas — —

Kaj la movoj, dancoj, vortoj, pensoj, agoj,  
petolaĵoj kaj ŝercaĵoj de homoj —  
kiujn ni dum la tagoj de l' vivo renkontas ...  
Ho, kiel tio nin ĝojigas!

Kaj kiu por ĉiam ne retenos en sia koro  
la melodiojn de l' tonoj, transversitaj de plej sankta  
mano de majstro — je diversaj instrumentoj  
kaj en simfonioj dediĉitaj al Ci —  
je eterna tempo?!

Kaj kiu por ĉiam ne retenos en sia koro  
la flamajn viziojn — pentritajn  
de benanta kaj beata  
man' de artisto?! — — —

La strangajn rakontojn:  
pri doloroj de l' tuta homaro,  
pri la homa feliĉo kaj la homa malbonsorto,  
pri tio, kio ĝojigas kaj pri tio, kio doloras,  
pri tio, kio estas Cia, ho bona Dio, —  
pri tio, kion prenis la infero je sia posedo  
por ĉiam?! — —

— Ĉu mi hodiaŭ restu senigita  
de lum' kaj odoro, melodi' kaj dolĉeco;  
ĝojo pri akvo kaj ĝojo pri pano  
kaj vino?! — — —

Mi perdu la feliĉon euspiradi aeron  
metadi paŝon, movadi per mano,  
kaj la kvietigan dormon?! — —

Ĉu eble mi hodiaŭ seniĝu de l' plej granda  
Cia donaco: de l' Penso — kiu atingas  
la limojn, kie reĝas Cia potenco, —  
kaj fariĝu kadavro el cia simileco?! —

— Dio! Mi ne volas mortii! — —

— Ĉiu ajn homo povas min hodiaŭ ponardi  
kaj mi mortos!

— Ĥolero, tifo povas hodiaŭ min venki  
kaj mi mortos!

— Fajrego povas min cindrigi  
kaj mi mortos!

— Ruinigi min povas pulma inflamo  
kaj mi mortos!



Se en dismoviĝinta Ci estas sinagogo,  
 kiam pezas sur la homoj la teruro de pekoj  
 dum la Juĝa Tago — —  
 Ci kreigas ĉe ĉiu malfacila nasko  
 kaj agonias kune kun almozulino, kiu murmuras  
 litaniojn — dum subiro de l' suno  
 en mizera suburba ĉambreto, — —  
 Ci vivas sur la lipoj de ĉiu bigotulino,  
 kaj estas la bazo de ĉiu aljuro,  
 Cin oni vokas en ĉiu bezono,  
 kaj ne estas ideo sen Ci, — — —  
 do faru, ke Ci estu, —  
 ĉar mi ne volas morti!

Mi devas morti? !  
 Mi, kiu estas Cia fiero?  
 Mi, kiu kreis Cin en ekstazo,  
 kiam, ebria de l' riĉaĵoj de l' tero,  
 mi estis tro maldiligenta, — por serĉi en si sinjoron, —  
 kaj nomis Cin reĝo,  
 kaj gloris Cin en mia kanto? ! — —  
 Mi devas morti?! Mi? — en kies sino  
 eterna vulkano estas ekscitita kaj flamas?! — —  
 — Ĉu Ci jam forgesis tiujn miajn ribelojn?  
 Kiam mi bolis en la profundo kaj bolis kaj bolis,  
 ĝis fine mi eksplodis per ardanta lafo,  
 por Cin superverŝi — Ci: de pensoj miaj la Kreaĵo,  
 Ci — mia ekpenso en hor' de senforto,  
 Ci, kiu havas la nomon de mi: *Dio!*  
*Ci!!!*

Ĉu Ci vidas miajn kunpremitajn pugnojn?  
 — Aŭskultu kion mi diras — antaŭ ol mi mortos:  
 — Se de Cia forto estas signo — tiu morto,  
 per kiu Ci minacas — do sciu, forta Dio,  
 ke mi kreis mem mian feliĉon,  
 alie Ci ĝin tiel ne elŝirus de mi! !  
 — Mia estas la ĝojo! ! Antaŭ si mi humiliĝas,  
 ne antaŭ Ci — antaŭ ol mi mortos!

Kaj mi ankoraŭ vivas! Kaj insultos  
 Cin, ĝis — Ci ne forprenos de mi la spiron!  
 Tie ĉi mi staras! Tie ĉi!  
 Kaj en vizaĝon Cian mi ĵetas la lastan elvokon:  
 Filo mia! De penso *MIA* naskigita! . . .  
 — — — — — — — — — —

— — — — — Dio,  
 Mi ne volas morti!  
 Dio! Mi ne volas morti!  
 Ho Dio, Ni ĉiuj — ne volas morti!  
 En ĝojo ni deziras fruktojn niajn rikolti!  
 Ne buĉados ni nin plu reciproke,  
 ni portas sopiron je l' perdita paradizo:  
 Ni volas forlavi la kulpojn. — —

Kaj se Ci almenaŭ cent trovos justulojn —  
 Lasu nin vivaj!  
 Kaj se Ci almenaŭ cent trovos nekruelajn —  
 Ne faru nin malĝojaj;  
 Kaj se eĉ Ci trovos nur kvindekon,  
 kiu la puran animon ankoraŭ ne perdis —  
 Savu nin ĉiujn!  
 kaj se Ci trovos tiajn, kiajn Ci ŝatas  
 eĉ nur dek —  
 Ne perigu nin ĉiujn.

Detenu Ciajn punojn, detenu Ciajn fajregojn,  
 Ciajn kruelajn militojn, epidemiojn, hajl-batadojn — —  
 Fame ja estas ke Ci estas Sinjor' de la vivo —  
 Jam sufiĉe da Cia puno!

— — Se Ci dek trovos justulojn —  
 Savu nin de malbono!  
 Se nur naŭ, sed sincerajn —  
 Havu kompaton!  
 Kaj se eĉ nur kvin, nur kvin —  
 Detenu la tondro-batojn!  
 Dio! En la nom' de l' torturoj de ĉiuj, kiuj estis  
 ekde l' unua momento de Cia kreo de l' tutmondo  
 ĉi tie, sur ĉi tero — puraj kaj senkulpaj,  
 kaj suferis silentaj sen ia plendo — —  
 mi Cin petegas:  
 Se eĉ nur unu  
 Ci trovos, havantan koron nemakulitan —  
 estu kompatema !!

En miajn orelojn penetras senĉese  
 raŭkiĝintaj plendoj el la kunpremitaj gorgoj  
 de ĉiuj, kiuj suferas, de ĉiuj, kiuj suferis,  
 de l' tuta homaro,  
 kiu dum centjaroj vokas tiel al Ci,  
 vokas al Ci same kiel mi!

... Se eĉ nur unu vivas justulo —  
 vidigu al ni Cian kompaton!  
 Se eĉ nur unu vivas justulo,  
 ekaŭdu nin hodiaŭ — Dio eterna:  
 pardonu niajn pekojn kaj ne punu per morto!  
 — Jen antaŭ Ci staras mi Abrahamo.

El la pola tradukis  
 EDWARD WIESENFELD

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



## Stranga knabinaĉo.

Al fraŭlino Wanda Neumanovicz.  
 Smolensk. La 15-an de Septembro 19..

Wanjo, mia anĝelo!

La vagonaro staras tie ĉi unu horon. Mi utiligas la tempon por plenumi mian promeson, donitan al vi. Vi vidos, mi ĝuste plenumos ĝin: de tempo al tempo mi sciigados al vi ĉion, kion mi faras, kion mi sentas... Nu, nun mi skribas sidante en angulo de hele lumigita salono de la stacidomo. Baldaŭ estos noktomezo, sed tie ĉi regas kutima bruado kaj tumulto, kiu ĉesas nek tage nek nokte en grandaj stacidomoj. Ĵus venis ankoraŭ ia vagonaro. Ĉiuj tabloj estas okupitaj, eĉ al mia izole staranta tablo sidiĝis iaj junaj geedzoj. Ili ion manĝas, kun scivoleco rigardas min kaj mallaŭte, duonvoĉe flustras ion unu al la alia; kredeble, ili interŝanĝas siajn supozojn pri mia persono kaj pri la letero skribata. Mia vizaĝo estas entuziasmoplena, mi scias tion, ja ĉiam sur vizaĝo rebrilas interna humoro de homo, lia interna mondo. Nun, kiel vi antaŭsentas, tuta mi, t.-e., mia koro, pensoj estas plene okupitaj je vi kaj sur mia vizaĝo, sendube, nun rebrilas feliĉo, amo. Miaj najbaroj tial, rigardante min, devas konjekti, ke mi estas feliĉulo, enamiginto, ke mi skribas al mia adorata, nekomparebla, netaksebla fianĉino... Vi vidas, kiel ne flue, ne bele sonas mia parolo al vi, sed pardonu kaj ne forgesu, en kiaj kondiĉoj mi skribas. Laŭtaj voĉoj, de ĉiuj flankoj aŭdataj, bruado, ĉio tre, tre malhelpas al mi dece koncentrigi mian atenton je la letero kaj distras miajn pensojn. Sed vi, mi scias, ne estas postulema.

En la vagonaro mi pasigis pli ol dek horojn kaj tufan tiun ĉi tempon mi sidis apud fenestro, rigardante jen pacajn pejzaĝojn de kamparoj, jen amadmirante arbarojn kun ilia jam velkanta, aŭtuna beleco. Miaj pensoj ĉiam

estis malproksime, apud vi... kaj flaviĝanta foliaro de betuloj sur nigre-verda fono de malgajaj, eterne verdaj abioj, kiujn mi ofte vidis el la vagono, kaj mallarĝaj ĝardenvojetoj apud stacidomoj, sternitaj de forfalintaj folioj, - ĉio kun ia tranĉ-kordoloro rememorigis al mi niajn promenojn dum la lastaj tagoj tra la parko, ankaŭ kun duonenudigitaj arboj kaj sekaj folioj, bruetintaj sub niaj piedoj jen gaje-kiam vi kun propra al vi poetikeco pentris bildojn de nia estonta feliĉo, jen malgaje kaj adiaŭe-kiam vi sopiris, antaŭvidante nian proksiman disiĝon...

Kredu, jes kredu je pli luma estonteco kaj forpelu de vi tuj ĉiun malgajan nubeton, ĵus ĝi ekprovos aperi sur horizonto de via nun izola vivo. Skribul!... Mi kisas viajn ĉarmajn okuletojn.

Ĉiam fidela via Zygmunt.

Al s-ro A. Jaworowski.

Moskvo. 16-an de Septembro 19..

Mia amiko!

Mi ĵus revenis en Moskvon kaj rapidas sciigi al vi mian nunan adreson, esperante havi kun vi, kiel antaŭe, viglan kaj oftan interŝanĝadon de leteroj. Vian lastan leteron interesplenan mi ricevis antaŭ longe kaj, dum mi legis ĝin, mi havis firman decidon tuj respondi ĝin, sed en mia vivo, ĝis tiam senkolora kaj unutona ĝuste tiam okazis io tre grava, kio igis min ne sole prokrasti respondon al vi, sed ankaŭ por longe forlasi ĉiujn miajn kutimajn okupojn. Sed mi ĉion priskribos laŭ ordo. La pasintan someron mi vivis en kamparo, en somerloĝejo de unu riĉa inĝeniero, kiel edukisto de liaj du infanoj. Pro tio mi ĝuis dum la tuta somero nekutime senlaboran (kun la infanoj mi devis pasigi ĉiutage nur 2-3 horojn), satan kaj trankvilan vivon, precipe *satan*: mi grasiĝis kaj la graso provizita sufiĉos por kelkaj monatoj de malsatado, neeviteble atendata en la urbo, krom tio mi ion perlaboris kaj eĉ havos eblon akiri se ne tute novan, do almenaŭ iom portitan kostumon pli konvenan, ol tiu, kiun mi havas nun.

La somerloĝejo kuŝis en negranda belega ebenaĵo, de ĉiuj flankoj cirkaŭita de montetoj, grandega parko kaj arbaretoj; ĝin tra tranĉis pentrinda rivereto Wanda... jes, tia estas nomo de la rivereto beleta!

Mi neniam kuraĝus haltigi vian atenton je tiaj bagateloj, ĉar mi scias, ke en via loĝloko mankas nek arbaretoj, nek montetoj, nek ankaŭ riveretoj, sed tie mankas tute Wanda... dume en la somerloĝejo estis du Wanda'oj belulinoj: la rivereto kaj ŝi... ĝia samnomulino.

Kun ŝi mi konatiĝis *okaze*, kiel ankaŭ ĉio *okaze* estas en la mondo. Memafere, se ni pli atente rigardos nin mem, ni vidos, ke tiu ĉi *okaze* sensanĝe kaj senlace akompanas nin paŝo post paŝo: *okaze* mi naskiĝis malriĉa, *okaze* mi komencis lerni en la universitato, *okaze* mi trovis la oficon ĉe la inĝeniero, *okaze* eĉ iam mi renkontiĝis kun vi kaj amikiĝis...

Antaŭ du monatoj dum unu varmega somera tago mi kutime promenis kun la edukataj infanoj (sepjara knabo kaj kvinjara knabino) tra la parko,

pli ĝuste promenis je la mano la infanoj kaj mi, ion pripensante, nur observis de malproksime, ke ili ne petolu kaj plenumu decregulojn. La promeno jam alproksimiĝis al fino kaj mi kun la infanoj estis proksime de la domo, kiam mi subite ekaŭdis laŭtan ploron de la knabino. Ŝi falpuŝiĝis je arbostumpeto kaj iomete disŝiris puntaĵon de la vestaĵo. La malĝojo de la knabino estis tiel granda, ke je tiu ĉi fojo efikis nek miaj konsoloj, nek admonoj: la knabino deziris nek ĉesi plori, nek iri pluen. Mi staris super la obstinulino hezitante, kiam ies facilaj paŝoj aŭdiĝis post mi. Mi returnis la kapon kaj rigidigis pro miro. Ia nekonata fraŭlino de dekok jaroj proksimume, sufiĉe simple vestita, sed neordinare belega, rapidis helpi al mi. Pli frue, ol mi rekonsciiĝis, ŝi, kun ĉarma rideto sur pale-rozaj lipetoj, afable ekbalancis al mi per la kapo kaj kliniĝis super la ploranta knabino. Post unu momento en ŝiaj manoj aperis de ie kudrilo kaj ankoraŭ post unu momento la knabino jam saltis antaŭ mi, gaje montrante la vestaĵon, sur kiu jam estis tute ne rimarkebla la trueto.

De tiu ĉi tago jam preskaŭ ĉiutage, promenante kun la infanoj, mi havis okazon vidi ŝin jen en la parko, jen apud la rivereto, jen ie aliloke. Baldaŭ ni tiel alkutimiĝis al ŝi, ke la infanoj malgaje revenis hejmen, se ni iam povis nenie renkonti «onklinon Wanda'on», kiel ili nomis ŝin. Ĉion ceteran vi, sendube, jam konjektis kaj mi ne enuigos vin per superflujaj detaloj. Mi nur diros, ke ŝi estas malriĉa kuracistino, havanta monatan salajron nur dekdu rublojn; sed ŝi estas bone edukita, alte inteligenta kaj talenta fraŭlino. Mi vidadis multajn fraŭlinojn, sed, mi konfesas, tia perfektecon, tian ĉiuf flankan disvolvon apenaŭ iu eĉ supozis trovi iam en fraŭlino!.. Ni reciproke amas unu la alian, ni promesis, ke ni de nun estos gefianĉoj kaj eterne, kiajn ajn malhelpojn ni renkontus sur nia vivovojo, apartenos unu al la alia. Kiel signon de tio ĉi, mi portas nun kun fiereco sur mia fingro masivan oran ringon, kiun ŝi donacis al mi antaŭ la disiĝo. Bedaŭrinde, mi ne havis ion similan por donaci al ŝi, sed ŝi konkentiĝis je mia fotografiaĵo, farita ankoraŭ antaŭ du-tri jaroj.

Mi volus doni al vi pli klaran ideon pri la fianĉino kaj ŝiaj neordinaraj kapablecoj, sed mi timas, ke vi ne kredos kaj opinios, ke mi-tre nature, kiel enamiĝinta,—ĉion trograndigas. Jes, mi antaŭvidas tion ĉi kaj mi scias, ke mi estas prava. Sed mi ne estas ema al trograndigado, vi mem vidis: pasos monatoj, jaroj kaj mia ama ardo ne malvarmiĝos kaj ĉarma bildo de belulino Wanda neniam malheliĝos en mia imago, kiel vi tion, eble supozas.

Post unu jaro mi finos universitatan kurson, tiam ni geedziĝos kaj kune venos ien eksterlanden por daŭrigi nian lernadon,—ni tiel interkonsentis. Vere, ni ambaŭ estas malriĉaj, sed ĉu ni ne venkos ankaŭ tiun ĉi malhelpon? Ni ja estas tiom junaj, tiom esperplenaj kaj fortaj je la korpole..

Mi ne komprenis, kion vi volas de mi; eble, vi volas doni al mi ian komision en la urbo? Skribu pli klare kaj pli detale,—mi penos plenumi ĝuste ĉiun vian komision, ĉiun deziron, kia ajn ĝi estus. Skribu!..

Via feliĉa amiko Zygmunt.

Al fraŭlino Wanda Neumanovicz.  
Moskvo. La 17-an de Septembro.

Mia milda anĝelo, mia anĝelsimila Wanjo!

Jen mi ree jam estas en la urbo, mi ree eniĝas en ĝian vantanon vivon, sed pensoj pri vi, mia kara eĉ por unu minuto ne forlasas min. Kie ajn mi estas, kion ajn mi faras, mi ĉiam vidas vian ĉarman vizaĝeton seriozan, mi ĉiam aŭdas vian dolĉan voĉon kaj rememoras niajn orajn revojn.

Post longa serĉado mi, fine, trovis bonan loĝejon. Ĝi estas, vere, iom kara, sed ĝi estas tre komforta kaj kuŝas proksime de la universitato. En la ĉambro mi loĝas sola kaj tio ĉi estas tre grava, ĉar neniu malhelpas al mi en miaj sciencaj laboroj kaj, precipe, en mia revado pri vi kaj nia feliĉo, kiu staras de ni jam ne tiel malproksime, kiel tio ŝajnis al mi antaŭe. Ho, la tempo... tiuj ĉi ok aŭ naŭ monatoj pasos nerimarkeble, kaj tiam jam plu nenio disigos nin!..

Kvankam mi havas ankoraŭ sufiĉe da mono, mi penas tuj trovi ian laboron helpan, — tion ĉi trovi en la granda urbo estas tre simpla afero, — kaj mono ja estas tiom necesa por nia estonteco! Mi ĉiam konsideras tion ĉi kaj nun mi estas tre ŝparema.

Pro Dio memskribu al mi, eble plej ofte, kaj gardu vin kontraŭ malvarmumo, tiom facile ricevebla dum aŭtuno. Memoru, kiom altvalora por mi estas via bonstato.

Ne sopiru, mia kara! Mi kisas mil fojojn viajn lipetojn, okulojn kaj restas ĝis ĉerko mem via fidela.

Zygmunt.

IVAN ŜIRJAEV

(daŭrigota)



## XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5,6,7 junio 1927

Antaŭ kelkaj tagoj ni havis apud ni la prezidanton de la Organiza Komitato, nian laboreman amikon Miquel Arbona kaj el la diversaj projektoj kaj esperoj ni eltiris la plenan certecon, ke ni staras ĉe la sojlo de nova granda sukceso en Mallorca. La organiza laboroj vigle disvolviĝas kaj ĉiu detalo estas zorge atentata por ke ĉio glate prezentigu al la kongresanoj.

Ni estas konvinkitaj, ke ĉiuj balearaj geesperantistoj senescepte kon-

gresos en Sóller kun ni, kiuj devas pli longe vojaĝi kaj pli multe elspezi por atingi la Oritan Insulon.

Ĝis la lasta momento ni atendis informojn de «Empresa Soler» pri la budĝeto por la esperantistoj, kiuj enŝipiĝos en Barcelona kaj deziras aliĝi al la karavano. Intertempe ni povas doni la jenajn ĝeneralajn informojn:

Vojaĝo Barcelona — Palma: ptoj. 52.60 — 33.85 — 18.25 — 10.75 laŭ klaso.

Vojaĝo Palma — Sóller: ptoj. 3.30 — 2.55 laŭ klaso.

Hoteloj en Sóller: ptoj. 7 — 12 — 15 — 20 laŭ klaso.

Ni esperas ke dank' al la komuna vojaĝo kaj gastado, kiun\* organizas «Empresa Soler», ni povos doni pli malaltan budĝeton, kiu nepre instigos ĉiujn K. E. F-anojn kaj amikojn vojaĝi al la belega kongresuibo.

Ne forgesu propagandi konstante por nia XIV.

## LISTO DE PREMIOJ

La januaran numeron ni elvenigis lastamomente celante diskonigi ĉiujn premiojn, sed malgraŭ tiu intenca prokrasto la hodiaŭ anoncataj premioj venis jam malfrue kaj ne povis aperi kun la lasta listo. Ni esperas ke la konkursantoj kaj legantoj pardonos nin, ke ni ne rifuzis la akceptindajn premiojn, tiom pli ke ili estas por temo libervola kaj sekve ne povas malhelpi la organizon.

XXV. — De Banko Peninsular en Palma: ptoj. 100 por temo libervola.

XXVI. — De Esp. Gr. Bela Espero en Binisalem: ptoj 50 por temo libervola.

XXVII. — De Esp. Gr. La Verda Stelo en Consell: ptoj. 50 por temo libervola.

## VERKOJ RICEVITAJ

35. Ni restu fidelaj al la Fundamento. — 36. Socius. — 37. Drommedarius. — 38. Radio super ĉio. — 39. Bela aŭtuna tago finiĝas. — 40. Unua peko. — 41. Se ĵetos mi. — 42. Vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas. — 43. Kion la koro sentas, lango prezentas. — 44. Vivon travivi estas art' malfacila. — 45. Ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto. — 46. Bone faru kaj diri lasu. — 47. Paco kaj feliĉo per Esperanto. — 48. Kun kuraĝo kaj volo antaŭen! — 49. Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos. — 50. Ĉiu ĝuado postlasas ombron. — 51. Ni malkonfidu ŝajnaĵojn. — 52. Procede et semper, Italia, semper. — 53. Elisabeth. — 54. La plej bonaj kantbirdoj estas malgrandaj. — 55. La malnova preĝejo. — 56. Tintas preĝejo. — 57. Neĝas. — 58. Majokanto. — 59. Himno de la mondoburĝo. — 60. Vivu nia kara lingvo.

Akcepto de pluaj verkoj finiĝas la 28 de la kuranta monato.

## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn)

PILGRIMO, de Julio Baghy, eldono de la aŭtoro, Budapeŝto, 1926. Volumo 124-paĝa, 15 × 12 cm. enhavanta 42 poemojn kaj 7 prozaĵojn originalajn, aĉetebla ĉe Hung. Esperantista Societo Laborista, Budapeŝto, VIII, József-körut 9. Prezo: 1 germana marko.

Legante ĉi tiun volumon, oni havas la impreson ke Julio Baghy jam estas matura aŭtoro, kaj ke liaj verkoj estas kompareblaj al tiuj de bona poeto en iu el la plej kulturitaj Eŭropaj lingvoj.

Mi kredas, ke, post Julio Baghy, neniu rajtas dubi pri la plena poezieco kaj *transportkapablo* de nia kara lingvo. Ni, kuŝantaj en iu punkto iom malproksima de la medio kie sin movas la hungara poeto, povas perfekte kompreni lin, liajn sentojn kaj lian estetikon. Kaj oni ne devas forgesi, ke, se *lingvo* internacia estas io efektive tre granda kaj malfacile realigebla, des pli havas tiajn ecojn *poezio* internacia.

Mi supozas, ke la kaŭzo de tio, ke la esperantistoj ĝenerale ne ĝuste taksas la valoron de poezio, aŭ, se vi volas, eĉ de *poetiko*, ne estas nur la malgranda kulturiteco de la *plej ĝenerala* esperantistaro, sed ankoraŭ la reala malfacileco, kontraŭ kiu devas lukti internacia poezio, pro la tiom diferencaj vidpunktoj, ŝatoj kaj inklinoj de la diversaj popoloj. Se en *nura lingvo* oni povas multon atingi per *unueco* kaj per *konvencio*, en *arto* oni pli multe devas respekti la *variecojn* kaj oni ne rajtas postuli regulojn tro *rigidajn*.

La poemoj de Julio Baghy transsaltas ĉiujn barojn kaj preskaŭ ĉiam estas tre klaraj kaj kompreneblaj, kaj cetere nia poeto mastras la lingvon kun eksterordinara talento. Pri la poezia inspiro mem, mi diros, ke, ĉe Baghy, cetere kiel ĉe multaj aliaj poetoj, ŝajnas regi ĉiam la sama muzo kaj rimarkiĝas konstanta inklino al periode revenantaj vortoj aŭ esprimoj. En la poezia leksikono de Baghy svarmas ripetataj vortoj, kiaj: *rusto, fronto, larmo*. Sed tio, tamen, tute ne estas uzado de pure retorikaj procedoj, certe malmodiĝintaj: ĝi eble nur reflektas animstaton, la tragedion de la vivo de nia estimata aŭtoro, kiun ni ekamis kaj admiris okaze de lia unua poemkolekto «Preter la vivo» kaj lia romano «Viktimoj».

El la volumo «Pilgrimo», ni aparte ŝatas la belan enkondukan poemon kaj «Poeto kaj Muzo». Ni, katalunaj esperantistoj, povas esti ĝojaj ke kelkaj el la poemoj de tiu volumo estas premiitaj de niaj Floraj Ludoj. — J. G. C.

NOVA AFRIKO de Th. Monnens, S. J., el nederlanda lingvo tradukis Floriano, 10 × 15,5 cm., 24 p. 1 fr. 50 (unu respondkupono) Espero Katolika, 55, rue de Vaugirard, Paris VI.

Intereseĝa estas la kompatinda historio de tiu mondparto, kiu estis la

sklavomerkato de l' mondo dum kvar jarcentoj, ĝis kiam la Eklezio alportis al ĝi la «ĝojan anoncon». Antikva Afriko multege suferis despli alte nova Afriko leviĝos; ĝi volas forskui ĉiun jugon de Blankulo. La verketo de Th. Monnens ekvidigas la reviviĝon de tiu nigrehaŭta popolo, kiu laboradas por sia savo. — G. R.

OFICIALA KLASIKA LIBRO DE ESPERANTO. Itala, hispana kaj portugala partoj. Kolekto de Esperantista Akademio, eldono de Esperantista Centra Librejo, Paris, 51 rue de Clichy. 1927. 118 pĝ. 15 × 10, Prezo: 3.60 fr. fr.; sendkostoj plie.

Ĉiu esperantisto havas jam sian opinion pri la Klasikaj Libroj ellaborataj de nia Akademio kaj ŝajnas al ni ke komentario estas superflua, tiom pli ke la kompetenteco de la tradukintoj de la itala, hispana kaj portugala partoj estas de ĉiu konata.

Laŭ klariga noto, kiu malfermas la verketon, la broŝuro enhavas, krom la dek-ses reguloj de la gramatiko, ĉiujn nunajn oficialajn radikojn de Esperanto. La unua parto enhavas la zorge korektitajn kaj kompletigitajn tradukojn de tiuj oficialaj radikoj, esceptante la radikojn, kiuj estas sufiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon. La dua parto enhavas la internaciajn radikojn, kiuj eĉ estante netradukitaj, estas ĝenerale kompreneblaj por eŭroplingvanoj. La tria parto enhavas la esperantlingvan difinon de la netradukitaj radikoj, kiuj ne troviĝas en la bonega Vortaro de Kabe. Kiel Aldono troviĝas la fundamentaj vortoj kun la sufikso *um*.

Pri la itala traduko zorgis Sroj. Migliorini, Mazzolini kaj La Colla, pri la hispana Prof. Inglada kaj pri la portugala Prof. Backheuser kaj Sro. Saldanha Carreira. — Saljo.

NOVAJ AMAJ POEMOJ de Jaime Grau Casas. — Kolekto de Kataluna Esperantisto. Eldono de la aŭtoro, al kiu oni povas sin turni por mendoj, str. Claris, 72. Barcelona. 1927. pĝ. 29, 21 1/2 × 14 1/2 Prezo: 1 peseto.

Jen nova verko de nia samlandano Crau Casas, kiu ĝojigos la multajn personojn, kiuj ŝatas la belajn poemojn. La verko havas, kiel antaŭparolon, leteron de la Prezidanto de nia Akademio pri la versfarado kiu ĝuste respondas al diversaj kritikoj en aliaj landoj faritaj. Dudek poemoj konsistigas la kolekton kiun oni legas kun efektiva plezuro, ne nur tial ke la lingvo estas korektega kaj simpla, kvankam riĉesprima, sed precipe pro la harmonio kiu abunde kaj delikate fluas el la facilaj versoj. Unu el la plej belaj, kompreneble laŭ mia gusto, estas la soneto "Vintro"; ankaŭ tre emociiga estas tiu poemo kiu ludas la "Kanto de Amo kaj Melankolio".

Vere dankinda estas la laboremo de nia amiko, kiu de tempo al tempo venas al ni kun verko, inda je tiu nomo, en la mano. Mi povas nur kuraĝigi lin al plua verkado kaj precipe esprimi ke mi ŝatus lin vidi plivastigi la temon de siaj poemoj, kiuj ĝis nun nur en la larĝa kampo de la amo kantadas — M. S.

## Diversaĵoj

**Esperanto kaj Akademio Cots.**— Sendube en Barcelona ni ne trovas pli gravan kaj rekomendiindan Akademion ol Akademio Cots kun tiom multaj centoj da lernantoj, kun tiel vastaj kaj komfortaj lernoĉambroj, kun tiel severe elektitaj profesoroj kaj tiel lerte ellaboritaj pedagogiaj sistemoj

Nu Sro. Cots, pri kiu ni povas diri nur laŭdojn pro lia tuta laboro por la kulturo de nia junularo, kun granda entuziasmo kaj el tuta koro akceptis la organizon de kurso de Esperanto kaj proponis al K. E. F. la kolonojn de "Actividad", la organo de la Akademio, por la propagando kaj, se tio estas nia deziro, klarigo de kompleta kurso pere de la gazeto.

La 5-an de februaro Prof. Dalmau malfermis antaŭ granda amaso da lernantoj la kurson de Esperanto, kies gvidon entreprenis Sro. Josep Alberich. Ĝis nun enskribiĝis kaj kun intereso daŭrigas la studadon 46 lernantoj, kio estas vera sukceso, ne nur pro la alta nombro sed ankaŭ pro la kultura nivelo de la kursanoj, kiuj rapide progresas en la lernado.

**Kurso de Esperanto.**— Nia amiko Conrad Domènech komencis kurson en "Academia Mercantil" kun vera sukceso. Esperable pliaj kursoj komenciĝos en aliaj Akademioj post la ekzemplo de tiuj, kiuj komencis.

**Esperanto kaj Radio.**— Plej proksiman monaton Radio Barcelona denove permesos al K. E. F. la disaŭdigon de esperanto-paroladoj. Nia proksima numero donos ceterajn informojn pri la tagoj kaj horoj de niaj radio-programoj.

**Folkloro kaj Etnografia Grupo.**— La 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Edinburgo montris ke Esperanto havigas neordinaran oportunon por komparaj folkloraj studoj. Rezulte de tio, okazis fakkunsido de Folkloro kaj Etnografio, en kiu oni decidis starigi internacian grupon por la kontentigo de tiu intereso. S-roj J. Van Hengel kaj D. Uitterdijk, el Nederlando, afable proponis malfermi apartan rubrikon de Folkloro en ilia revuo, "Kolektanto", kaj S-ro R. Kodera, el Japanujo, akceptis la funkcion de fakredaktanto.

Kiel unua temo kunlaborota, oni elektis la komparan studon de la popolaj jaraj festoj en diversaj landoj. Tiu laboro estas presigota serio en "Kolektanto", kaj verŝajne konsistigos interesan kolekton. (La unua artikolo aperis en la januara numero.)

Estis ankaŭ proponite, ke la grupo estu uzota kiel helpilo por individuaj studoj de ĝiaj anoj dezirantaj ricevi porkomparajn sciigojn de aliaj landoj.

Ĉiu interesato bonvolu interrilatiĝi kun S-ro Kodera, ĉe Mme Gavarry, 187, rue St Jacques, Paris 5.<sup>o</sup> (ĝis Majo.)

# KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto»,  
València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu  
al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoi kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por  
eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio  
estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan  
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



## KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al  
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:  
Ĉiusemajna  
Aktuala Ilustrita  
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de  
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo  
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.<sup>on</sup>, 2.<sup>a</sup>

BARCELONA

## “Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO  
OFICIALA ORGANO

DE LA

## Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj  
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1.50 usonaj  
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en  
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-  
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi  
tekston publikigotan.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)*

## LA

*article determinatiu*

el, els  
la, les

## J

(sona y)

*i es terminació del plural*

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

*sufix per al femeni*

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

*terminació substantiu*

lakto  
urbo  
**komerco**  
(comerç)

## A

*terminació adjectiu*

blanka  
antikva  
**komerca**  
(comercial)

## I

*terminació verb (infinitiu)*

kompreni  
labori  
**komerci**  
(comerciar)

## E

*terminació adverbial*

klare  
konstante  
**komerce**  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

*temps present*

### IS

*temps passat*

### OS

*temps futur*

### US

*mode condicional*

### U

*mode imperatiu o subjunctiu*

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escric	escrivi	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, *jo estic skrivint*. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## Catalunya a l'estranger

Fa poc més d'un any que gràcies a l'esforç d'un dels esperantistes catalans es va publicar la «Kataluna Antologio», antologia de poetes i prosistes catalans en esperanto. Tant per la qualitat com per la quantitat de contingut (400 planes, paper de fil) l'Antologia Catalana en Esperanto és una obra digna de tota lloança. Impecable en l'estil, en la impressió i en la presentació.

Tot just ha passat un any i gairebé l'edició ha estat esgotada. Arreu del món ha aparegut per mitjà del meravellós idioma del Dr. Zamenhof la bellesa de la nostra poesia i la maduresa de la nostra prosa. Arreu del món s'ha comentat molt favorablement la riquesa del català, aquest llenguatge nostre, ignorat a molts indrets i que gràcies a l'esperanto ha donat fe de vida, però d'una vida plena de totes les dolceses i de totes les energies.

Si l'existència de l'esperanto no fos justificada ja per un sens fi de fets, aquesta sola demostració fóra prou perquè hom veiés en l'idioma internacional un mitjà d'aproximació dels pobles, un mitjà que ens permet profunditzar-nos en l'esperit i neguits dels pobles germans.

És un fet evident, i d'això en tenen una convicció plena els esperantistes catalans, que l'esperanto ha donat a Catalunya unes ales tan lleugeres que arreu del món, en els nuclis esperantistes, hom té un coneixement concret de la nostra vida, de la nostra literatura, del nostre grau de cultura.

I és que l'esperanto és un altaveu portentós que fa sentir els batecs de tots els pobles fins els recones més llunyans. És que la creació del Dr. Zamenhof salta per damunt de totes les fronteres i canta les excel·lències de totes les nacions, agermana els pensaments i va creant un sentiment universal de comprensió mútua i tolerància recíproca.

L'esperanto és la plasmació de la fraternitat universal i de l'aproximació de tots els homes de bona voluntat.

Deu-li vosaltres, estimats lectors, l'ajut que es mereix l'idea noble dels esperantistes.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj

Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
(Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
(Joventut Catòlica) Ripollet  
*Frateco*  
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
(Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
(Seminari) Girona  
*Aplec*  
Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
(Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
Provença, 156 Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerica»* Solter

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagra  
*Palau de Montgut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vitassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRE

Redaktoroj : Delfi Dalmáu, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Jubilea Jaro

Ŝajnas ke kun la alveno de la jubilea jaro oni enblovis en nian movadon freŝan aeron kaj ke ĉiu spiras kun granda trankvilo, pace esperante ke la tuta afero bone iros sian vojon kaj ke nia nuna situacio kaj progresado havas nenion por deziri.

Kvar jardekojn travivis la plej granda mondlingva movado kaj malgraŭ la grandaj klopodoj, laŭdindaj oferoj kaj nekalkuleblaj fortoj eluzitaj por ĝi nia problemo ne maturiĝis, ne vekis necesan intereson, ne permesis al ni paroli pri la estanto, sed nur pri estonto malproksima kaj nevidebla.

Post kelka tempo Esperantujo povos konstati kiom granda aŭ malgranda estas ĝia popolo. Ni povos ĝoji plej kredeble pro la granda nombro da esperantistoj, grupoj, gazetoj, k.t.p. La peza tasko, kiun entreprenis Dro. Dietterle, diskonigos tra la tuta mondo, ke granda nombro da homoj parolas la lingvon de Dro. Zamenhof kaj, se la grupoj raportis ĝuste, ke senfine granda nombro da homoj lernis Esperanton. Antaŭ la okuloj de tro iluziemaj esperantistoj la ciferoj naskos naivajn ekkriojn, ili kantos la triumfon de Esperanto k.t.p. sed, bedaŭrinde, ju pli granda estos la nombro da esperantistoj en la mondo, des pli evidentiĝos kiom malgranda estas la nombro da laboristoj sur nia kampo.

Okaze de nia jubileo ni pripensu kaj atentu pri la diversaj malfortaj flankoj de nia popolo kaj ni kolektu niajn energiojn por dece prilabori tiujn punktojn kaj laŭpove ilin konduki en ĝustan lokon. Ni ne fordonu nin al senpripensa entuziasmo, kiu tenas nin for de la vera fundamento, nuntempe tiel ŝanceliĝanta je ĉiu blovo de la homa ventego.

Se ni turnas nian atenton al la vivo, kiun ĝuas nia gazetaro, tuj evidentiĝas, ke ĝenerale ĉiu esperanta gazeto travivas tre mizeran staton. Neniu, aŭ preskaŭ neniu, ĝuas sendependan ekziston: unuj oscedas, aliaj estas malsanaj kaj la ceteraj nur de tempo al tempo povas vidi la taglumon. Se miloj kaj miloj da homoj tra la tuta mondo predikas la altan celon de Esperanto, kial ĉiu nacia gazeto ne povas havi sufiĉan nombron da legantoj, kial ĉiu internacia gazeto konstante devas plendi pro la manko de abonantoj, kial subtenindaj entreprenoj, ekzemple Literatura Mondo, devis morti?

Mi miras ke tiom multaj eldonejoj riskas entrepreni la eldonon de esperantaj verkoj, se nur terure malgranda nombro da esperantistoj aĉetas niajn librojn. Se ĉiu esperantisto abonus unu solan gazeton kaj aĉetus unu solan libron ĉiujare, kiom pli potenca fariĝus nia forto! Vere admirindaj estas tiuj eldonejoj, kiuj de tempo al tempo havigas al ni novan verkon, kvankam ilia profito estas tiel necerta.

Se vi, kara leganto, iom priatentas la legemon de la membroj de via loka grupo, se vi atentis kian esperantistan vivon havas ĉiu grupano, certe vi konkludos kun ni, ke oni povas kalkuli per la fingroj de unu sola mano tiujn, kiuj abonas gazeton, tiujn, kiuj en la daŭro de unu tuta jaro aĉetas esperanta libron. Ni ĵus spertis per la eldono de KATALUNA ANTOLOGIO, 500 ekzempleroj, ke nur tre malgranda nombro da ekzempleroj restis en la mano de enlandanoj. La plimulto iris eksterlanden. En la esperantista merkato, Katalunujo sendube ludas la plej signifikantan rolon. Tio ja ne signifas ke kiel esperantistoj ni estas mallaboremaj en la legado, ne, kiel katalunoj mem ni spertis jam, ke nia popolo nur hodiaŭ vekigis al la universala vivo, ke nur hodiaŭ ĝi komencas sian paŝadon apud la ceteraj popoloj, kiuj de longa tempo konas kaj amas siajn poetojn, siajn verkistojn. Ni ankaŭ vekigu kiel esperantistoj kaj klopodu konatiĝi kun la tiel riĉa esperanta literaturo, kiu ja superas laŭ kvanto kaj kvalito la literaturan trezoron de multaj malgrandaj popoloj.

Tre malfacila estus la tasko, se ni nun komencus analizi la kaŭzojn de nia profunda dormo kaj pretendus doni konsilojn por la estonto. Tamen, se la jubilea jaro altiris nian penson pri la tutmonda movado, pri kiu ni certe ne havas grandan kaŭzon por ĝoji, ni ne volis forlasi la okazon por esprimi nian se ne pesimisman, almenaŭ nekontentecon pri la enlanda situacio, pri kiu kun plena rajto ni povas paroli kaj ne sen kompetenteco.

Niaj esperantistoj vegetas, niaj grupoj vegetas, sekve ne miru ke K. E.F. ankaŭ vegetas. Niaj grupoj vegetas kiel esperantistaj organizaĵoj. Kiel amuzaj kaj ekskursaj, eble kelkaj el ili havas viglan vivon, sed ĝuste tiu ekskursemo kaj amuzemo de la grupoj estas iel la kaŭzo de la malvigleco de nia movado.

Dolore estas konstati erarajn agadojn. Estas bedaŭrinde, ke ni ne povas paroli pri grandaj sukcesoj aŭ pri promesplenaj perspektivoj. Nia opinio pli efika povas esti sincera esprimo de opinioj, eĉ kiam oni povas riski ies

atakon, ol fermi la okulojn antaŭ la atakanta malamiko kaj nenion fari por defendi sin. Nia movado, ni estu sinceraj, postulas ĉe ni tujan sinoferon de la esperantistoj, se ni ve volas daŭrigi nian iradon al plena disiĝo de fortoj kaj pereco de la tuta afero.

Se nia lingvo staras senmove aŭ ne progresas, tio ne estas kulpo de la lingvo mem nek de la medio ĉirkaŭanta ĝin. La kaŭzojn ni devus serĉi en la esperantistaj rondoj mem, kiuj trankvile kunplektis la brakojn kaj esperas ke per si mem ĉio fariĝos. La kaŭzojn ni trovas ĉe multaj esperantistoj, kiuj multon povus fari por nia afero kaj absolute nenion faras.

La Jubilea Jaro donas al ni okazon por alvoki ĉiujn batalantojn al efektiva laboro. Ĉiu esperantisto havas plej diversajn manierojn por uzi siajn fortojn kaj kapablon por iel labori por la komuna celo. Ĉiu analizu sian agadon kaj konstata ke ĝis nun oni ne faris kiom oni povis kaj devis. Forpasis jam la jaroj de primokoj kaj atakoj. La mondo prezentas pli bonan kampon por nia semado. Ĝi atendas nin por iri kun ni.

La Jubilea Jaro estu la komenco de nia definitiva batalo.

S. ALBERICH JOFRÉ



## Soleco

Bruligas min la flamo de ŝia rememor' ...  
 En senkonsolo ploras silente mia kor' ...  
 Pri ŝiaj helaj ĉarmoj ankoraŭ mi sopiras;  
 ŝian gracion ĉio ankoraŭ nun elspiras.  
 Mi relegas la versojn legitajn apud ŝi;  
 de ŝiaj kantoj ree vibras la melodi' .  
 Al mia vido daŭre ŝiaj pupiloj lumas,  
 al mia aŭdo dolĉe ŝiaj paroloj zumas.  
 Mi sentadas la premon de ŝia eta man' ,  
 la gestojn karesantajn kun ludo de infan' ,  
 aŭ subitajn ekstrecojn de ardanta pasio  
 kaj ebrian gustadon de kisoj-ambrozio.

Kie mi ŝin ekamis, mi silente promenas,  
 kaj pri ŝi flugaj pensoj flirtante al mi venas.  
 Sub tiuj amaj arboj de la trankvila voj' ,  
 en la kuneco ŝia, fluadis mia ĝoj' .  
 Ĉi tie miaj vortoj amoplenaj resonis  
 kaj al mi feliĉigajn amopromesojn ŝi donis.  
 En tiu benko, kie, en intima kviet' ,

per kiso sin malkaŝis nia ama sekret' .  
 Sed nun ripozo tie ne estas tiel paca:  
 en irado soleca mi min sentas pli laca.  
 Kaj des pli nostalgie suferas mia kor' ,  
 ju pli kreskas la flamo de ŝia rememor' ...

\* \* \*

Senĉese mi vagadas tra l' soleca ĝarden' ,  
 kun mia mola koro premita de ĉagren' .  
 De post ŝia foriro, ne plu la belaj floroj  
 parfumas la aeron per mildaj bonodoroj.  
 Ne plu dolĉe min ravas de la birdoj la tril' ,  
 ne plu mian rigardon gajigas suna bril' .  
 Nek la ĉielo nun estas tiel serena,  
 nek mi sentas la ĝojon de la lumo matena...  
 Eĉ en la dolĉa, paca trankvilo de l' esper' ,  
 de post ŝia foriro, premadas min sufer' .  
 Inter ĉiuj belaĵoj, mi — sen ŝi — restis sola;  
 for de ŝia beleco, mi vivas senkonsola.

Kaj ĉie senescepte la solecon mi sentas,  
 kies akra mordado mian koron turmentas.  
 Ho, se iam denove mi povus vidi ŝin!  
 Ho, se ŝiaj okuloj denove celus min!  
 Sub la fajro de ŝia amoplena rigardo,  
 en mia laca korpo estiĝus nova ardo!  
 Sed por ĉiam neeblo fariĝis tio ĉi:  
 nun ŝi ja nur vivadas en mia fantazi' .  
 De post ŝia foriro, promenejo ĝardena,  
 la mondo, mia koro ... ĉio restis malplena.  
 Kaj, en tiu terure turmentanta malplen' ,  
 mi mortas ... de l' soleco pro l' kruela ĉagren' !

JAUME GRAU CASAS



(daŭrigo)

Stranga knabinaĉo.

Al s-ro A. Jaworowski.

La 18-an de Oktobro.

Mia kara amiko!

Mi tre ĝojas, ke vi estas ravita de mia sciigo pri la fianĉiĝo kun Wanda,

ke vi kredas je seriozeco de mia plua intenco kaj plene aprobas min. Ho, se vi povus vidi, mia Wanjo estas tia trezoro, tia perfekteco! Ankoraŭ en la antaŭa letero mi intencis diri ion detale al vi pri ŝi, sed mi timis vian antaŭjuĝon. Rimarku, kiom da plej kuraĝaj planoj havas ŝia kapeto, kiom da espero! Kaj kia kapabla ŝi estas! Ŝi delonge revas pri eksterlando, kie ŝi povus lerni kaj disvolvi siajn kapablojn, kaj ili estas disolveblaj en du direktoj, tute malsamaj: laŭ speco de sia nuna profesio, ŝi revas fariĝi doktorino, aŭ kio ankoraŭ pli multe allogas ŝin, teknikistino-elpensistino. Ĉu vi dubas? Mi men longe ne volis konfidi al ŝi ofte aŭskultante ŝiajn entuziasmajn parolojn pri ŝia lasta emo, sed, unufoje ekvidinte ŝiajn teknikajn desegnaĵojn kaj grandan kolekton da modeloj, kiujn ŝi faris propramane kaj preskaŭ tute sen ilaro, mi konvinkiĝis proprokule, kiom talenta ŝi estas kaj kiom ŝi bezonas je speciala instruado. Imagu, mi vidis ĉe ŝi desegnaĵojn de unu aparato por aerveturado, kiu permesos flugi al iu ajn sen helpo de nuntempaj aerŝipoj. La aparato estas tre simpla kaj, laŭ ŝiaj vortoj, ĝi estos akirebla por iu ajn. Mi nenion komprenas en meĥaniko, ankaŭ en aviado, tial mi ne povas juĝi pri indecoj aŭ mankoj de ŝia elpensajo tamen tiu fakto mem, ke la juna fraŭlino dediĉas sian liberan tempon al tiaspecaj seriozaj laboroj, ŝajne, jam elokvente parolas pri ŝiaj neordinaraj kapabloj kaj originaleco. Kaj ŝiaj aliaj ecoj?... Mi estas senfine feliĉa, havante tian fraŭlinon mia fianĉino kaj konscio de tio ĉi donas al mi fortojn pli pacience toleri mizerojn de mia nuna vivo studenta. Komence mi, veninte tien ĉi, loĝis en bela kaj sufiĉe komforta ĉambro, sed mi baldaŭ konvinkiĝis, ke mia monujo treege maldikiĝas de tago al tago, ke mi devas pli singardeme elspezi mian monon kaj mi jam decidis ŝanĝi la loĝejon je pli modesta kaj pli malkara, sed oni priŝtelis min. Unufoje, reveninte keĵmen mi kun malĝojo konstatis, ke mia monujo malaperis.. Kompreneble, ĉiuj serĉadoj restis senrezultataj. Nun mi loĝas en malgrandeta ĉambraĉo sur subtegmento. La ĉambraĉo estas pli malgranda, ol la antaŭa kaj malgraŭ tio en ĝi ni loĝas triope. Miaj kunuloj havas litojn, sed mi dormas sur la planko inter iliaj litoj, ĉar mankas spaco por la tria lito. Kompreneble, tio ĉi estas bagatelo: la litoj de miaj kamaradoj estas nur iom pli molaj ol la mia improvizita kaj, kiam dum nokto mi sentas malvarmon, miaj bonaj kunloĝantoj afable permesas al mi kuŝi iom da tempo sur rando de ilia mallarĝa lito kaj varmigi de iliaj korpoj. Tio ĉi, mi ripetas, ne estas grava, — ja homo estas facile kaj baldaŭ alĉutimiganta al iaj ajn kondiĉoj de la vivo, — tio ĉi ne estas ankoraŭ granda malĝojo. Sed jen nia vera malĝojo: ĉiuj ni ne povas ĝis nun trovi ian kvankam plej malgrandan laborenspezon kaj, se la afero daŭros tiel ankoraŭ unu monaton, oni forpelos nin el la ĉambraĉo, se ni antaŭe ne mortos pro malsato. Ni delonge ne tagmanĝas kaj estas neelparoleble ĝojaj, se iu el ni sukcesas ie pruntepreni kelkajn kopekojn por aĉeti por nia komuna manĝo panon kaj kolbasojn. Sed tiu ĉi operacio postulas de ni tro multe da penoj kaj trudemeco, — neniu donas al ni monon volonte, ĉar oni scias, ke ni riĉiĝos ne baldaŭ, pli ĝuste — neniam... Ĉion superfluan el

niaj kostumoj kaj cetera havaĵo ni delonge jam vendis aŭ portis en garattipruntejon kaj delonge jam miaj kunuloj kun ĉagreno rigardas mian oran ringon de Wanda kaj ne senkaŭze ofte aludas, ke ni ne rajtas uzi senutile tian luksaĵon. Sed vi komprenas, ke mi ne povas seniĝi je ŝia donaco. Mi gardas ĝin tiel, kvazaŭ ĝi estas Wanda mem. Hodiaŭ matene ni longe priparolis nian financan kaj ekonomian staton. Dum la interkonsiliĝo mi kaŝis la manon kun la ringo en poŝon kaj ne kuraĝis elpreni ĝin de tie ĝis fino mem de la interkonsiliĝo. Tiamaniere la ringo evitis danĝeron, kiu minacis al ĝi.

Tiun ĉi leteron mi sendas ne afrankita, vi scias jam kaŭzon de tio. Sinjorinon Laptev'on mi ankoraŭ ne vidis, tamen mi ĝuste plenumos vian peton. Ne forgesu min — vian malnovan amikon — en la mizerego kaj skribu.

Via amike Zygmunt.

Al fr-ino Wanda Neumanovicz.

La 25-an de Oktobro.

Mia ĉarma, neforgesebla Wanjo!

Dankon, dankon por viaj varmaj leteroj kaj alteŝatataj konsiloj. Ĉiu via letero liveras al mi tiom da ĝojo kaj feliĉo, ke mi ne scias, kio okazus al mi, se mi ne havus vin, se vi ne subtenadus en mi kredon kaj esperon je pli bona estonteco.

Bedaŭrinde, mi ne povas skribi al vi longan leteron, — por ĝi tute mankas materialo. Estu trankvila, mi ĉiam estas fidela al vi kaj dum mia tuta vivo tie ĉi mi ne havis eĉ unu okazon interparoli kun ia fraŭlino, mi ĵuras! Sekve, viaj antaŭtimoj kaj antaŭsentoj sekretaj, kiujn vi aludas en la letero estas tute senkaŭzaj. Kredu, mia anĝelo, kiam homo ne havas pecon da pano por kvietigi sian malsaton, tiam ĉiuj pensoj de li estas sole kaj sole direktataj al pano kaj plu al nenio. Mi fartas bone, nur mi iom malsatas. Tamen mi jam alkiutimiĝas al tiu ĉi malagrablajo kaj sentas, ke homo malsata estas pli vigla kaj pli elpensema, ol sata. Nun mi loĝas en malgranda ĉambreto. Miaj du kunloĝantoj estas bonegaj kamaradoj; se ni sukcesos trovi ian flankan laborenspezon, ni estos plene feliĉaj.

Detalojn de mia vivo vi sciiĝos dum nia intervidiĝo, kiu, kvankam tre malrapide, tamen senhalte, alproksimiĝas kun ĉiu nove-pasinta tago.

La poŝtejo kuŝas malproksime de nia loĝejo, mi petis hodiaŭ matene miajn kunloĝantojn, ke ili aĉetu ie en butikoj poŝtmarkon por tiu ĉi letero, sed ili, kiel intence, nenie povis ĝin trovi. Tial mi estas devigata sendi al vi la leteron neafrankita. Pardonu.

Kun varmaj kisoj kaj luma espero je estonteco feliĉa

tute via Zygmunt.

Al s-ro A. Jaworowski.

La 9-an de Novembro.

*Mia amiko plej kara!*

Mi estis surprizita, ĵus ricevinte la monon de vi. Jen estas senduba signo de vera amikeco kaj nova konstato de boneco de via animo! Kredu, mia amiko, mi neniam forgesos vian oferemon kaj en estonteco mi penos meriti vian konfidon al mi. Via mono venis fre ĝustatempe; se ĝi ne estus ricevita, hodiaŭ oni elĵetus min el la ĉambro sur straton. Sed nun mi estas savita. Dum lastaj tagoj ni preskaŭ nenion manĝis, jam neniu pruntedonas al ni eĉ unu kopekon. Kaj se mi ne havus la ringon de Wanda, ni mortus. Mi fordonis ĝin en garantipruntejon kaj ricevis de tie prunte du rublojn. Ho, kion mi sentis, kiam mi devis seniĝi je tiu ĉi donaco de mia Wanda, kion mi sentis! Nenia homo, kiam li, mortante, seniĝas je vivo, sentas tian doloron mortigan, kian mi sentis dum oni trarigardis, pesis kaj taksis la karan ringon! Sed vi ne supozu, ke mi por ĉiam disiĝis kun ĝi, ne! Tio ĉi ja estas neebla! Ĵus mi havos superfluan monon, mi tuj elaĉetos ĝin.

Miaj kunuloj, sciiginte, ke mi subite riĉiĝis, ankaŭ ĝojiĝis kaj de hodiaŭ mi plu ne dormos sur la planko, — Levitanskij proponis jam al mi sian liton kaj li mem de nun dormos iom da tempo sur mia antaŭa lito-sur la planko. Entute Levitanskij estas bravulo, li nenie pereos: li estas elpensema kaj sinoferema en ĉiuj krizaj cirkonstancoj de la vivo. Se li ne estus iom maldiligenta, li estus ideala homo. Bedaŭrinde, mi ne povas diri la saman pri mia alia kunloĝanto Ojidalov...

Mi komencis tiun ĉi leteron matene, sed mi devis interrompi ĝin. Nun mi daŭrigos. Aŭskultu: horizonto de nia vivo pliklariĝas, — estas proksima horo de nia liberiĝo de la mizerego, kiu ĝis nun premegis nin de ĉiuj flankoj. Kiam mi skribis al vi, revenis el butikoj miaj kunuloj, kiujn mi sendis por aĉeti manĝaĵojn. Ili revenis gajaj, bonhumoraj. Ĉu povis okazi alie? Ni jam delonge manĝis nenion, krom pano kaj hodiaŭ ni havos dank' al vi abundajn kaj luksajn manĝaĵojn. Nu, ili alportis bulkojn, kolbasojn, teon, sukeron, unugrandan haringon, — la lasta estis metita en malnovan gazetfolion. Ni delonge vidis nenian gazeton kaj tiu ĉi folio malseka kaj makulita, dum la teo liveris al ni ankaŭ ne malgrandan plezuron kaj ni tralegis ĝin atente de la supro ĝis la malsupro mem. Kaj ho, feliĉo, jen kie estis surprizo! Ni trovis tie unu anoncon multepromesan, kiu, mi sentas, estas saviga por ni. Bedaŭrinde, sur la gazetfolio ni nenie povis trovi daton, kaj estos tre ĉagrene, se la gazeto estas tre malnova kaj ni malfruiĝis... Sed al diablo la dubojn, ni esperu! Ja, evidente, tre riĉa virino Frambovski anoncas, ke ŝi deziras helpi mone al junaj talentaj elpensantoj, poetoj kaj cet. Ŝi petas, ke oni sin turnu al ŝi persone ĉiutage inter la 6-a kaj 8-a de vespero.

Vi sendube imagas, kian ĝojon, kiajn lumajn esperojn, kiajn, poste, dispu-

tojn elvokis inter ni la anonco. Ni tuj decidis, nepreterlasante la okazon, hodiaŭ sin turni al la bonfarantino nekonata. Ni jam lotis kaj Levitanskij devos hodiaŭ je la tempo fiksita viziti la riĉulinon kaj sciigi pri kondiĉoj detale.

Pri rezultato de tiu ĉi nia provo mi skribos al vi post nelonge. Nun mi skribos ankoraŭ al Wanjo, ŝi delonge atendas mian leteron.

Mi amike premas vian bonan, amikan manon kaj ripetas: mi korege dankas vin, mi neniam forgesos vian ĝustatempan helpon. Ĉiam kaj ĉie via amiko.

Zygmunt.

Al fr-ino Wanda Neumanovicz  
La 9-an de Novembro

Mia ora, netaksebla Wanjo!

Viajn du leterojn mi ricevis siatempe, mi dankas vin por tiuj varmaj sentoj, kiujn vi esprimas en ili. Mi ankaŭ sentas, ke nia amo reciproka ĉiam kreskas, malgraŭ nia disiĝo. Se mi ne skribas ĉiam pri tio al vi, vi mem devas konjekti, ke mi ĉiam pensas nur pri vi, ke ĉiam revas pri tiu tago feliĉa, kiam ni ree, post longa disiĝo maldolĉa, estos jam plu ne disiĝeblaj...

Mia kara! Mi devas peti pardonon de vi... Pardonu min, mia ĉarma anĝelo: dum lasta tempo mi toleris tian mizeregon, ke mi, por ne morti pro malsato, kuraĝis fordoni en garanti-pruntejon vian ringon. Kvankam tiuj du rubloj, kiujn mi tie ricevis prunte anstataŭ via ringeto, estis granda riĉeco por mi, tamen kion mi sentis tiam, mia kara!... Tranĉdoloro premegis mian koron, kiam via ringeto, heredita de via panjo kaj kun tia amo ĝis tiam konservita de vi, estis en malpuraj, maldelikataj manoj de oficiistoj de la pruntejo, kiuj antaŭe ol akcepti ĝin, longe trarigardis ĝin, pesis, taksis... Sed kion fari? Mi opinias, ke mia vivo estas pli valora por vi, ol la ringo... Tamen vi ne maltrankviliĝu, mia ora Wanjo, mi baldaŭ elaĉetos ĝin kaj, kie antaŭe, portados ĝin sur tiu fingro, kien ĝin metis antaŭ la disiĝo viaj blankaj, maldiketaj fingretoj. Mi ĵus ricevis monon de unu amiko kaj, ŝajne post kelkaj tagoj jam plu neniam sentos ian mizeron aŭ bezonon je mono.

Anime kaj korpe

via ĉiam fidela Zygmunt.

Ivan Ŝirjaev

(daŭrigota)

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

## XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5-6-7 junio 1927

AL LA GRUPOJ. — Ni estos tre dankaj al la grupoj, se ili bonvolos sendi kiel eble plej baldaŭ liston enhavantan nomojn kaj adresojn de iliaj membroj. Ni deziras, ke la Kongreslibro enhavu kompletan kaj fidindan adresaron de ĉiuj niaj membroj.

PROPAGANDO. — La propagando de nia estonta Kongreso ne dependas nur de la Organiza Komitato kaj de K. E. F. Estas necese ke ĉiu grupo aŭ izolaj esperantistoj per la loka gazetaro aŭ per paroladoj diskonigu nian baldaŭ okazontan jarfeston. Tiamaniere kun la propagando de la Sóller-a Kongreso oni ankaŭ propagandos por Esperanto.

KONGRESA BUDĜETO. — Ni ricevis de "Empresa Soler" jenajn informojn pri la vojaĝo kaj restado en Sóller:

Vojaĝoj, restado en Sóller kaj ekskurso, unua klaso luksa . . . .	185 pt.
» » » » » » , » » ordinara . . . . .	150 »
» » » » » » , dua klaso . . . . .	110 »
» » » » » » , tria klaso . . . . .	75 »
» » » » » » , » » , sen kajuto	65.50 pt.

La montritaj prezoj enhavas ir-revenan vojaĝon Barcelona-Palma, ir-revenan fervojan vojaĝon Palma-Sóller, gastadon en Sóller dum la tri kongrestagoj, marekskurson al Torrent de Pareys aŭ ekskurson al Puig Major, laŭ deziro de la kongresano, kaj veturilan transporton de la kongresanoj de la Palma haveno al la stacidomo.

La budĝeto ne enhavas trinkaĵojn: vinon, likvorojn, mineralajn akvojn, k. t. p. Ĝi ankaŭ ne enhavas trinkmonon.

La tagmanĝo en Torrent de Pareys aŭ Puig Major konsistos el malvarmaĵoj, kiujn ĉiu kongresano estos devigata akcepti en Sóller antaŭ la ekskurso.

Nia aprila numero donos ceterajn informojn pri enskribiĝo kaj pago.

## XIII Internaciaj Floraj Ludoj

## VERKOJ RICEVITAJ (fino)

61. Kavaliro de sinjorino. — 62. Aberi txikia, Geurea baña. — 63. Ne ekzistas landlimo por la doloro, nek por la amo. — 64. Se per angoro kunpremata estas la koro, ridu frato. — 65. Floro al la rivereto. — 66. Paroli kiel oni pensas, agi kiel oni diras. — 67. Paroli kiel oni pensas, agi kiel oni diras. — 68. Ĉiam antaŭen! — 69. Scio estas la Fundamento de Saĝeco. — 70.

Puikus iritaciu malsintojas. — 71. Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo. — 72. Unisono. — 73. Je maintiendrai. — 74. Esperanto triumfu! — 75. Ĉar arbo havas koron. — 76. La stelaro. — 77. Multaj estas vokitaj, sed nemultaj elektitaj. — 78. Bonhumoro kaj gajeco. — 79. IXa. Simfonio. — 80. Home, sweet home. — 81. Ho virina koro, kiu kapablas diveni viajn decidojn. — 82. Manila. — 83. Kaj knabo iĝis viro. — 84. Stelo, floro, koro. — 85. Ĉu? — 86. Sentencoj de l' Prioro. — 87. Mi esperu. — 88. El la amo fontas feliĉego kaj malespero. — 89. Ni iru. — 90. Ita est. — 91. Sempre avanti. — 92. A. e. i. — 93. Bella Italia. — 94. Mi servas. — 95. Agnosco veteris vestigia flamae. — 96. Ĉio pasas. — 97. Zamenhofano. — 98. Malproksima. — 99. Frosto. — 100. Varmkora. — 101. Nordinsulo. — 102. Krejcero. — 103. Ravito. — 104. Lamillaj. 105. Bergerac. — 106. Bela Espero. — 107. Excelsior. — 108. Aŭtunas. — 109. Mondvojaĝo de fervora oratoro. — 110. Amo vivigas kaj mortigas. — 111. Venas ĉagreno sen granda peno. — 112. Homo serĉu la homecon. — 113. Amiko studadu. — 114. Libero! — 115. Ne povas ĉiu homo esti pap' en Nomo. — 116. Ekbrilu hispana suno! — 117. Vivu la humoro. — 118. Problemo de la Patreco. — 119. La Tineo. — 120. Encikliko. — 121. Mizera Lazaro. — 122. Kioma koro estas. — 123. La amo de la Geisao Yamatori. — 124. La malnova birdo. — 125. La bufo. — 126. Estas mi. — 127. Orskarabo kaj Libelo. — 128. Malgaja historio. — 129. Se iu diras "mi amas Dion" kaj ŝian fraton li malamas, tiu estas menso-gulo. — 130. Kiu fine estas mi. — 131. Capis bovis carquinyolis. — 132. Ĉu valoras tiom filozofii, kiam la vivo estas tiel mallonga? — 133. Supren. — 134. Kiom? — 135. Kiu glavon levos, de glavo pereos. — 136. Ĉu kun, ĉu sen supkulero, la mort' tutelage vin eltrinkos. — 137. Homaron Vi kreis perfekte kaj bele??? — 138. Vanitas vanitatum et vanitas omnium. — 139. Se donas Di' al vi favoron, li sendas vin for el la dom'. — 140. Dulce loquentem Lalagen amabo. Dulce ridentem. — 141. Gimnaziano. — 142. Qui l' encerta l' endevina. — 143. Al simplecama sanktulino, simpla kant'. — 144. Tutkatolika. — 145. Mia feliĉo. — 146. Emkolo. — 147. Vera amo subigas eĉ la morton. — 148. Sufero kaj revo la vivo-vereco. — 149. Du ĉapitroj plu. — 150. Ĉu vi ĉion memoras, eĉ kolorojn eĉ sonojn? — 151. Familio estas lernejo de amo. — 152. cosy + isiny = (cosy + isiny) n. — 153. Mia koro. — 154. Bonveno al miaj gastoj. — 155. Ĝoju. — 156. Konfido. — 157. La lastaj estos la unuaj. — 158. Ni kantu. — 159. Esperanto triumfu! — 160. Soleco.

## NOTOJ

La premiintoj kiuj ankoraŭ ne efektivigis la premiojn, bonvolu tion fari plej baldaŭ!

La aŭtoroj de la verkoj noj. 114, 128, 130, 135, 136, 137 kaj 138, estas petataj tuj sendi al ni fermitan koverton enhavantan iliajn nomon kaj adreson.

DELFI DALMAU, SEKR. Carrer València, 245 — Barcelona

## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn)

SERVOKAPABLA! MARCUS TYBOUT de la belga aŭtoro G. Eekhoud, esperantigita de L. Bergiers, kun antaŭparolo de O. Stöber, publikigita de Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig, Salomonstr. 15. — Volumo 20 de la «Internacia Mondliteraturo». 1927.70 pĝ. 19 × 13. Prezo: 1.60 markoj.

Bone bindita, altkvalita papero, klara kaj pura preso. La antaŭparolo estas laŭdega por la aŭtoro kaj por la tradukinto. Mi timis ke legante la verkon mi seniluziĝos, ke ĝi ne povos satigi la esperigon de la antaŭparolaj laŭdoj. Mi trompiĝis. «Servokapbla» estas kortuŝa, emociiga, altkvalite *realista* verko, lingvoriĉe verkita kaj tradukita, pruvante la lertecon de nia juna samideano Bergiers por Esperanto kaj por literaturo. Gratulon al ĉiu partoprenintaj la operigon de tiu ĝuiga nova volumo de la «Internacia Mondliteraturo». — D.D.

NIĈJO MENSOGULO KAJ ALIAJ RAKONTOJ, de I. Al. Bratescu — Voinesti. — Biblioteko Tutmonda n.<sup>o</sup> 10. El la Rumana tradukis T. Morariu. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S.W.19. — 1927,63 pĝ. 17 × 10 1/2. Prezo frank. de la unua serio (10 numeroj): 4 RM. aŭ 1 dolaro.

La enhavo konsistas el la jenaj noveletoj: Niĉjo Mensogulo, «Al vojaĝanto decas vojiro», La ideto, La pelto de Isaja, Niketo kaj La najtingalo. En sia antaŭparolo la tradukinto diras al ni, ke Bratescu estas ĝisfunda esploranto de la infana animo kaj vere tiu speciala kapablo de la verkisto montriĝas neimiteble en «Niĉjo Mensogulo» kaj «Niketo». «Al vojaĝanto decas vojiro» kaj «La pelto de Isaja» majstre pentras bonhumoran trajton de rumanoj kaj «La ideto» kaj «La najtingalo» priskribas tre kortuŝan dramon de koturnino kaj najtingalo. Post la legado de la ŝatindaj noveletoj neniu povas ne aserti, ke Bratescu posedas naturdotitan verkistan kapablon, kiun malofte oni rimarkas en aliaj aŭtoroj.

Pri la traduko de Morariu ni povas diri nur laŭdojn. Li plene sukcesis transporti en nian lingvon la ĉarmon kaj belon de la originalo. Vane ni laŭdados la altan valoron de la verketo: oni legu ĝin, se oni volas konvinkiĝi, ke ni ne trograndigas, se ni diras, ke la lasta volumeto de Biblioteko Tutmonda estas majstra verko.

Kun «Niĉjo Mensogulo» finiĝas la unua serio de Biblioteko Tutmonda. Por la dua serio estas anoncataj tre interesaj volumoj. Ŝajnas al ni, ke por la malalta prezo de la serio — 1 dolaro t. e. 6 pesetoj — neniu literaturamanto povas forlasi la okazon havigi al si tiel valoran kolekton. — SALJO.

JE LA NOMO DE L' VIVO. — Filozofi-lirikaj fragmentoj originale verkitaj de E. Izgur, kun enkonduko de E. Lanty kaj antaŭparolo de N. Kruĉinin.

Kolekto de Sennacieca Asocio Tutmonda, havebla ĉe ĝia eldonfako Colms-trasse 1-111, Leipzig - O - 27. 1927.216 pĝ. 18 × 13 1/2. Prezo: 2 markoj.

Se Izgur venus en la verkistan rondon kun tiu ĉi verko kiel unua produktajo de lia talento, ĝi sola sufiĉus per loki lin sur la unuan vicon de plenkonsciaj eminentuloj, sed Izgur jam donis al la homaro multajn aliajn similiajn trezorojn kaj lia lasta verko estas plia ŝtupo en lia pilgrimado al la vero kaj lumo. Ĉiu fragmento de «Je la nomo de l' Vivo» valoras pli multe ol tutaj verkoj de aliaj aŭtoroj, kies plumoj bele rakontas, bele priskribas sed nenion diras. Ĉiu frazo de Izgur estas sentenco, ĉiu lia sceno prezentas la mizeron de la homaro tiel longe baraktanta por liberigi sin de tiel diversspecaj katenoj.

La verko enhavas prologon kaj kvin ĉapitrojn: En malproksimon, Servado al la Morto, Religio, Ribelo de l' konscio kaj Sur la vojo al la venko. En Epilogo la poeto kantas la venkon de la Vivo super la Morto. Dank' al la ĉiopova scienco la homo fariĝas senmorta kaj la Homaro povas ĝui plene la ĉarmon de la Vivo.

El lingva vidpunkto la verko meritas ankaŭ laŭdon. Nur pri kelkaj malmultaj punktoj ni povus iom kritiki. — SALJO.



## La Sankta Biblio en Esperanto

Antaŭ mi, su la tablo, kuŝas luksa ekzemplero de La Sankta Biblio, kiun mi ricevis antaŭ kelkaj tagoj de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, antaŭnelonge eldonita de tiu ĉi Societo kaj la Nacia Biblia Societo de Skotlando.

La Malnova Testamento estas tradukita de Dro. Zamenhof kaj la nova estas preparita de traduka komitato sub la aŭspicoj de la Brita Kongreso de Esp. kaj de la Brita Esp. Asocio, kun Sro. Pastro J. Cyprian Rust. La prezo de la ordinara eldono, toŝe bindita, estas 6 ŝ. Pli bona eldono, sur delikata papero, estas aĉetebla en tri diversspecaj bindaĵoj, po 8 ŝ. 6 p., 12 ŝ. 6 p., kaj 20 ŝ. Por mendoj oni turnu sin al la eldonintoj, 146, Queen Victoria Street, London, E. C. 4.

Kiel kolosan laboron devis plenumi nia majstro por esperantigi tiel monumentan verkon, ĉiu esperantisto povas ĝin prezenti al si facile ĉar La Sankta Biblio estas pli-malpli konata de ĉiu homo. Al la perfekteco de traduko de ambaŭ Testamentoj aldoniĝas la korekteco de la presado, la beleco de la eldono kaj la arteco de la tuta libro. Vi legas, legadas kaj neniu preseraro makulas la frazojn, fluajn, en stilo facila kaj agrabla. Komparante la tekston esperantan kun la latina teksto aŭ kun tiu de aliaj modernaj lingvoj, oni malkaŝas ĝenerale plian klarecon kaj precizecon ĉe la esperan-

ta. Mi estas certa, ke multaj pastroj uzos nian Bibliion por klarigi al si multajn versetojn, kiuj estas malprecizaj en la latina teksto. Tio pruvas nerefuteble la superecon de Esperanto, kiu permesas precizecon kaj klarecon, kiun ne havas multaj aliaj naciaj lingvoj.

En la verko mankas ses libroj: Tobias, Judith, Saĝeco, Eklesiastiko kaj ambaŭ I kaj II Makabeoj, kiuj apartenas al la Malnova Testamento. Sekve ĝi ne akordiĝas plene kun la Katolika Biblio kaj, kompreneble, katolikoj ne subtenos kaj propagandos la libron. Alia pli grava kaŭzo retenos de subteno la katolikojn t. e. ĉar la originalaj, plej antikvaj tekstoj de la Biblio, laŭ la katolikoj, multfoje bezonas taŭgan aŭ kompetentan interpreton kaj klarigajn notojn pro sia multsenca ebleco kaj estas sciata, ke al la katolika fidelularo estas malpermesata la legado de Biblio ne entenanta la kompetentajn notojn. La katolikoj opinas, ke tiu manko de interpreta unueco disŝiris ja en mil sektojn la Protestantismon, kies partianoj forĵetis la relojn de sia religia vagonaro, kaj tial disiĝadas milvojen aŭ en konstantan dovojiradon.

Mi ne volas profundigi en la aferon por konkludi ĉu tiu aŭ tiu ĉi estas sur la ĝusta vojo. Mi intencis rimarkigi tion, ke la grandega laboro de Zamenhof, kiu tiel ame fordonis tiom multajn horojn al la peza tradukado, ne estos ĝuata de ĉiuj esperantistoj pro tio ke super la partianoj de diversaj religiaj doktrinoj regas nerompeblaj ordonoj.

El la raporto de Sro. J. M. Warden, sekretario de la Esperantista Biblia Komitato, mi ĉerpas la jenajn interesajn fragmetojn.

“Unu el la kondiĉoj de la Biblia Societo estas, ke ĉiu nova traduko de la Biblio devas veni el la manoj de komitato konsistanta el Britaj Kristanoj, post esploro de ili. Kiam do la traduko de Zamenhof estis kompletigita kaj fine ricevita en ĉi tiu lando post la milito, la Esperantista Biblia Komitato estis reorganizita, por enhavi anojn sciantajn la Hebrean lingvon; Pastro John Cyprian Rust estis ĝia prezidanto, kaj mi mem ĝia sekretario. Tiu komitato, de dek personoj, zorge tralegis la tradukojn, plenigis kelkajn senintencajn forlasojn, kaj, kiam necese, faris ŝanĝojn, kiel rajtigis ilin D-ro Zamenhof. Tiu parto de la laboro postulis multe da tempo kaj da studado. Ĉiun libron esploris almenaŭ du anoj de la komitato, kaj pri specialaj punktoj oni konsultis Pastron J. E. McFadyen, profesoro pri Malnovtestamentaj Lingvo kaj Literaturo en la Glasgova Kolegio de la United Free Church.”

“Multaj malhelpoj estis renkontitaj, pro la sekvoj de la milito kaj alie; sed feliĉe oni povis ĉiujn venki, kvankam iafoje nur post bedaŭrinda tempoperdo. Iuj korespondantoj supozis, ke oni povus transdoni al la presistoj la manuskripton de la Majstro tiel, kiel ĝi staris. Tio certe ne estis la opinio de D-ro Zamenhof mem: kontraŭe li donis al la komitato plenan rajton fari ŝanĝojn, necesajn por certigi fidelan tradukon, liberan de la eraroj, en kiujn povus fali ia sola homo, kiom ajn kompetenta. Mi ne scias, ĉu iam antaŭe unu sola persono tradukis la tutan Malnovan Testamenton, kun eble la escepto de Luther; kaj nature la verko de Zamenhof ne povis esti perfekta.

Sed la ŝanĝoj faritaj dum la reviziado estas nemultaj; ĉar la komitato kons-tatis la tradukon de Zamenhof kiel bonegan. Ankaŭ ne ekzistas ia bazo por la supozo, ke la traduko jam havebla por Esperantistoj ricevis ian sektanj influon. Kiel ni ja scias, la Majstro tradukis la Bibliion kiel literaturan ver-kon; kaj la reviziado de la komitato okazis sammaniere. La komitatanoj estas el diversaj eklezioj: komence unu-du Katolikaj pastroj konsentis kunlabori, sed bedaŭrinde la aprobo de iliaj superuloj estis rifuzita”

“Dum la daŭro de sia laboro la Majstro enkondukis novajn vortojn, kiel ankaŭ plibonigitajn formojn de esprimo. Oni opiniis bone efektivi-gi tion en la pli fruaj libroj, kaj ankaŭ unuformigi “paralelajn tekstojn”, kiam la originalo tion permesas. Tiun parton de la revizio (kiun Zamenhof mem farus, se lia vivo daŭrus sufiĉe) entreprenis iuj komitatanoj, inter kiuj estis du Akademianoj kaj unu alia Lingvakomitatano. Mi povas certigi al ĉiuj, ke la sola deziro de tiuj reviziantoj estis fari ĝuste tion, kion la Majstro mem farus: kaj ĉiu do povas certigi, ke la volumo jam eldonita ne enhavas ion kontraŭan al la Fundamento de Esperanto. Ĉar la Nova Testamento aperis, kiam nur malmultaj el la Zamenhofaj tradukoj estis uzeblaj por gvidado, oni jam kaptis la okazon, por pliakordigi ĝin kun la Zamenhofa stilo.”

Al ĉiuj esperantistoj senescepte mi rekomendas la aĉeton de La Sankta Biblio. Al religiuloj por pli bone kompreni la sanktan libron, al sen-religiuloj por ĝui bonan Esperanton kaj al ateistoj por pliakrigi kun pli bo-naj fundamentoj siajn atakojn.

S. ALBERICH JOFRÉ.



## Diversaĵoj

**Scienca Enketo pri Esperanto.**— Ĉe la Universitato de Minnesota, Usono, oni faras esploron pri la sociala psikologio de la Esperantistaro. Bonvolu sendi al jena adreso *Esperanto, University of Minnesota, Usono* respondon al tiu ĉi demandaro; 1. Sekso, 2 Aĝo via dum esperantiĝo, 3. Jaro de via esperantiĝo. 4. Kiom da jaroj vi lernis nacie. 5. Profesio aŭ stato en momento de via esperantiĝo. 6. Lasta grado de via nacia instruiĝo. 7. Kio aŭ kiu vin esperantigis. 8. Kian intereson, utilon vi trovis en Esperanto. 9. Kiel vi lernis Esperanton. 10. Via nuna profesio. 11. Via patrinlingvo. 12. Via urbo lando. 13. Via nomo.

**XIX Kongreso Universala de Esperanto.**— 28 julio-4 aŭgusto en Dan-zig. Ĝis la 31. XII. 1926 aliĝis 53 gesamideanoj el 9 diversaj ŝtatoj. Sami-deanoj, kiuj ne povos ĉeesti la XIX-an, helpos al ĝia sukceso aliĝante kiel helpkongresanoj. Ili pagas la kongresan kotizon (25 sv, fr.) kaj ricevos la kongres-insignon kaj ĉiujn kongresajn dokumentojn, Por faciligi la parto-

prenon en la kongreso al kiom eble plej multe da personoj, UEA starigis servon de kombinita biletaro, kiu entenas ĉion: kongreskotizo, aranĝoj, ekskurso al Zoppot, sestaga restado kun manĝo ktp. La biletoj jam nun povas esti mendataj ĉe UEA, 12 Bd. du Théâtre, Genève. Prezoj: A (unuaranga) fr. 200, B (duaranga) fr. 160, C (simpla) fr. 125. Samideanoj, firmoj kaj institucioj, kiuj povas elmeti videble la kongresan afiŝon, sendu siajn adresojn por senpaga ricevo al XIX Universala Kongreso de Esperanto en Danzig. Aldonu respondkuponon.

**VII Kongreso de SAT.**— 12-16 aŭgusto en Lyon. *Kongresejo:* La Kongreso okazos en la salonego "Emile Zola" de kooperativo "L'Unitaire", 127. rue Boileau, Lyon. VI. *Kotizo:* Egala je SAT-kotizo. Oni sendu ĝin per naciaj biletoj al la prezidanto, kdo. Marcel Roux, 90, rue Boileau, Lyon, VI. *Eldonaĵoj:* La Komitato eldonis 20 poŝtkartojn kun esperanta teksto kaj reklamo pri la Kongreso. Prezo afrank.: 4 fr. fr. *Aliĝoj:* Ĝis nun 28. Il. 27 aliĝis 30 kongresanoj.

**Aressanĝoj.**— "Aplec" Esperanta Grupo en Sabadell transloĝiĝis al str. Montserrat 9. 1.— Barcelona Stelo en Barcelona havas sian novan sidejon ĉe str. Provença 156, telefono G. 2610. Ni deziras al ambaŭ grupoj tre sukcesan vivon en ilia nova batalejo.

**Specimenamantoj.**— Sur niaj paĝoj jam tre longan tempon ni anoncas ke provekzemplerio kostas du respondkuponojn, tamen ni konstante ricevas petojn de specimena numero sed neniu petinto sendas la respondkuponojn nek abonas, malgraŭ tio ke ni ĉiam atentis tuj plenumi la petojn. Ĉu ni longe devos presigi apartan nombron da ekzempleroj por la kolektantoj de specimenoj?

**Rusa Poŝto kaj Esperanto.**— Lastatempe la rusa poŝto eldonis respondkartojn kun teksto en franca, rusa kaj esperanta lingvoj. Oni rememoru ke okaze de la kongreso de SAT oni eldonis specialajn poŝtmarkojn pri la kongreso kaj ke antaŭe estis farita alia eldono kun teksto en Esperanto. Laŭdinda tasko tiu de la esperantistoj en la Soveta Respubliko.

**La Scienco kaj Esperanto.**— En ekstremoriento la scienculoj pli kaj pli uzas Esperanton. La observatorio de monto Taten, proksime de Tokio, ĵus publikigis en tiu ĉi lingvo sian ampleksan aerologian raporton por la jaro 1926.

De post la lasta jaro la japanaj medicinistoj aperigas sciencan ĵurnalon en Esperanto kaj japana lingvo "Psikiatrio" pri la problemoj de psikologio kaj neŭrologio, sub la direkto de Dro. Junko Sibata de la hospitalo Imura-Bioin de Hatagaya, proksime de Tokio.— IES.

**Nova Komitato.**— Esp. Societo Nova Sento, Barcelona, elektis en sia lasta kunsido la jenan komitaton: J. Gorriz, prez.; P. Vives, vicprez.; J. Bolós sek.; A. Almirall, vicsekr.; J. Coll, kalkulisto; S. Vives, kasisto; E. Gili, bibliotekisto; A. Rivera, J. Paré, J. Llunell kaj R. Burgada, voĉdonantoj.

**Esperantista Centra Librejo.** — Sro. Teodosio de la Cruz, Serrano, 58, Madrid, informas nin, ke li estas elektita delegito de la nomita librejo, kies katalogon oni povas ricevi de li senpage. Mendojn oni devas antaŭpigi per poŝtmandato aŭ hisp. pm. Oficiala Klasika Libro (hisp. port. itala partoj) ptoj. 1.25, Fundamenta Krestomatio ptoj. 3.50. Oni aldonu sendkoston.

**Esperanto en Radio Barcelona.** — La parolado de Dro. Marian Solà okazos la 23 de la kuranta monato je la 20.30 Pro diversaj kaŭzoj, sed precipe pro tio ke la programo de la stacio estas superŝutita per koncertoj kaj operoj el Granda Teatro Liceo, oni ne povis doni al ni difinitan tagon por niaj proksimaj paroladoj, kiuj estas submetitaj al la postuloj de la ĝenerala organizo.

**Paska Konferenco en Praha.** — 16-19 aprilo. Oficiale kunvokita de la Internacia Oficejo de Edukado okazos en Praha Paceduka Konferenco, kies alvoko al ĉiuj edukistoj kaj patrinoj vekis intereson en ĉiuj pedagogiaj rondoj de la mondo, precipe en Usono, Anglujo kaj Nederlando, kie anonciĝis eminentaj partoprenoj, ĉefe ekster la esperantista rondo. Oni urĝe alvokas ĉiujn grupojn priparoli la aferon kaj ankaŭ interesi instruistojn kaj pensemajn gepatrojn. Espereble la baldaŭ okazonta Konferenco estos nova sukceso por Esperanto.

**Alvoko al Verkemaj Esperantistoj Ĉiulandaj.** — Ni serĉas en ĉiuj landoj esperantistojn, kiuj estas kapablaj verki aŭ traduki diverstemajn artikolojn pri literaturo, tekniko, scienco kaj aliaj temoj. Interesiĝantoj sendu tuj siajn adresojn per simpla pk. al Sro. L. Dederichs, Sallstr, 124, Hannover, Germanujo.

**Universala Esperantista Pacifista Ligo.** — Lasta Alvoko! Dum du jaroj ni klopodas starigi fortan pacifistan ligon; ni alvokis en la Esperantogazetaro, ni skribis al la Naciaj Societoj, ni korespondadis kun interesuloj, — sed ĝis nun *nur en unu lando* (Ĉeĥoslovakujo), la pacifistoj energie kaj fruktplene laboras.

En nia lasta cirkulero, ni klare montris nian celon: «*unuigi per Esperanto ĉiujn direktojn en la pacmovado, por formi unu grandan internacian forton por la paco*».

Por atingi tion, ni nepre bezonas la helpon kaj subtenon de ĉiu *Esperantisto-Pacifisto*. Ligo sur papero ne efikas.

Se ni ne akiras la bezonatan kunlaboron en multaj landoj, tiam estos *neeble*, daŭrigi nian laboron.

De la rezultato de ĉi tiu alvoko dependos, ĉu nia Ligo havas ekzistrajton.

Al vi, Esperantistoj - Samideanoj, la decido! por; U. E. P. L. JULIA ISBRÜCKER, Prezidantino. Oostduinlaan 32, Hago (Holando).

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola  
teknika gazeto

## Internacia RADIO-REVUO

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

### KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originala popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

### PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ  
KONKURSO KUN MULTNOMBRAJ PREMIOJ  
(i. a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 N.<sup>o</sup> N.<sup>o</sup>) UNU DOLARO aŭ egalval. en nacia mono  
Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ, de  
naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret.

Redaktoro: Ing. E. Aisberg.

ELDONEJO: ETIENNE CHIRON. 40, rue de Seine. PARIS-VI

### KATOLIKA MONDO

Esperanto-organo de Internacio  
- Katolika. -

—  
Aldono: La Juna Batalanto

—  
Aperas monate. Fondita 1921

—  
Abono: egalvaloro de 1.25 s. v.  
- fr. kvaronjare. -

—  
Redaktejo kaj Administrejo:  
Elberfeld. Germanujo

### Ĉiuj skoltoj

#### Ĉiuj amikoj de Skoltismo

abonu

la internacian monatan gazeton  
ilustritan

### SKOLTA HEROLDO

Oficiala organo de  
«Skolta Esperantista Ligo».

—  
abonprezo: 1 sv. fr.

—  
Adreso: Pastro Ramboux, 22, Cours  
Albert I, en Paris - VIII.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)*

## LA

*article determinatiu*

el, els  
la, les

## J

(sona y)

*i es terminació del plural*

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

*sufix per al*

*femeni*

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

*terminació substantiu*

lakto  
urbo  
**komerco**  
(comerç)

## A

*terminació adjectiu*

blanka  
antikva  
**komerca**  
(comercial)

## I

*terminació verb (infinitiu)*

kompreni  
labori  
**komerci**  
(comerciar)

## E

*terminació adverbial*

klare  
konstante  
**komerce**  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

*temps present*

### IS

*temps passat*

### OS

*temps futur*

### US

*mode condicional*

### U

*mode imperatiu o subjunctiu*

Mi skribas  
Jo escriu

skribis  
escrivi

skribos  
escriurá

skribus  
escriuria

skribu  
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escriu la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## El nostre congrés a Sóller

Gairebé arreu del món, els esperantistes celebren anyalment els seus congressos nacionals on s'apleguen en gran nombre els adeptes del gloriós Zamenhof per tal d'ajuntar llurs esforços i idees i conjuntament treballar per al millor progrés de l'Esperanto.

La Federació Catalana d'Esperantistes, legalment constituïda des del V Congrés Universal d'Esperanto celebrat a Barcelona l'any 1909, ha celebrat fins ara, sempre amb un èxit falaguer, tretze Congressos i dotze Jocs Florals Internacionals.

Aquest any a Sóller, els dies 5-6-7 de juny, tindrà lloc el XIV Congrés i tot fa esperar que novament els esperantistes de parla catalana es trobaran durant els dies esmentats a la bella ciutat de la Illa Daurada.

Dels diferents actes que es preparen, indubtablement té un relleu extraordinari la festa dels Jocs Florals Internacionals, no solament per la simpatia que la festa en si té per a tots nosaltres, sino que també per l'alta importància que la mateixa representa dintre del camp literari del món esperantista.

Han estat rebuts 160 treballs procedents de més de 25 nacions. Entre els treballs rebuts n'hi ha de molta vàlua, no solament en l'aspecte literari, sino com estudis científics de diferents ordres.

La Federació Catalana d'Esperantistes, en recordar als seus membres el deure d'assistir al XIV Congrés, invita tots els qui desitgin conèixer d'aprop el moviment esperantista o bé fruir la bella terra mallorquina a inscriure's com a congressistes, aprofitant els avantatges del pressupost que la F. C. d'E. té convingut amb l'«Empresa Soler» de Palma.

Viatges, excursions i estada a Sóller durant els dies de Congrés: 1-a preferència ptes. 185; 1-a ordinària ptes. 150; 2-a classe ptes. 110; 3-a classe ptes. 75; 3-a coberta ptes. 65. 50.

Remeteu l'inscripció (10 ptes.a compte) a Bretón de los Herreros 18, 1-er, 1-a, Barcelona. — S'accepten inscripcions a la Farmàcia Bartomeu, Tallers, 81 (Plaça Universitat) Barcelona.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

## OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplerio 2 respondkuponoj

Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
(Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
(Joventut Catòlica) Ripollet  
*Frateco*  
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝirona Espero*  
(Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
(Seminari) Girona  
*Aplec*  
Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
(Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
Provença, 156 Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerico»* Soller

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montgut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÈ

Redaktoroj : Delfí Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Subtenu K. E.

La plej bona subteno, kiun povas deziri iu gazeto, estas tiu, ke ĝiaj legantoj konstante diskonigu ĝin kaj klopodu varbi novajn abonantojn.

Nia *Kataluna Esperantisto*, kies ekziston neniu grava danĝero minacas, hodiaŭ sin turnas al siaj abonantoj kun la peto ke ili klopodu pligrandigi la nombron de la abonantoj por ke ĝiaj paĝoj povu esti pli multaj en baldaŭa tempo.

Se ni povus aldoni al la nunaj 16 paĝoj 8 pliajn, t. e. 96 en la jaro, tiam la granda provizo da valoraj verkoj vane atendantaj publikigon en nia redakcio, trovus lokon en nia gazeto kaj la aŭtoroj de la meritaj verkoj, tiel riĉe alvenintaj al niaj Internaciaj Floraj Ludoj, ricevus per la publikigo plian rekompencan al ilia meritoplena tasko.

Nia deziro povus efektiviĝi, se 200 pliaj abonantoj estus atingitaj. Tiam, sen plialtigo de la abonprezo, oni povus publikigi belan 24-paĝan gazeton kun abunda enhavo. La literatura aspekto de K. E. fariĝus rimarkinde pli granda kaj sekve pli ŝatata internacie. Ĝi povus okupi rimarkindan lokon en nia movado.

Oni ne apiniu ke ni diras utopion, kiam ni parolas pri 200 pliaj abonantoj. La nunaj abonantoj de K. E. ne superas la 25% de la kataluna batalantaro. Ne estus do granda laboro varbi ĝis la 40% de nia popolo por ke nia gazeto povu plenumi sian projekton.

Niaj legantoj komencu la necesan propagandon por efektiviĝi la sugestitan ideon. Post kelka tempo ni havos pli valoran gazeton, ol ni havis ĝis nun.

Jofre Rudel

(Provençala trobadoro, 1140-1170)

Hejmon, patrujon ne forgesos mi,  
eĉ logite de amo malproksima.  
De ili reaperos jam neni' :  
am' min trenas al lando malproksima.

Kiu ĝojojn, malĝojojn vidas —Di' —  
kaj donis kaŭzon al am' malproksima,  
subtenu fidon por kuraĝ' en mi  
ĉar kor' vivas en amo malproksima.

En vivo kaj en mort' persistos mi  
en tia arda am' ,se malproksima;  
kaj flamos la sanktega fajr' de ĝi,  
egale en proksim' aŭ malproksima.

Mi ĝuos je nenia ampasi'  
se ne ĝuas je l' amo malproksima;  
nek pli belan virinon trovos mi  
ĉu en propra la hejm' , ĉu malproksima.

Trad. JAUME GRAU CASAS



(fino)

Stranga knabinaĉo

Al s-ro A. Jaworowski

La 11an. de Novembro

Mia karega amiko!

Laŭ mia promeso mi daŭrigas nun mian leteron, senditan al vi, ŝajne, antaŭ du tagoj. — Mi kaj Ojidalov longe kaj malpacience atendis revenon de Levitanskij. Kiam, fine, li revenis, ni superŝutis lin per niaj demandoj. Levitanskij havis malgajan mienon kaj estis malkontenta je io kaj neparolema. Post longa demandado ni tamen sciigis, ke la bonfarantino efektive ekzistas kaj serĉas «stultulojn» senlaborajn kaj naivajn, similajn al ni, kiuj supozas, ke oni tuj ŝutos al ili oron, ĵus ili venos en ŝian antaŭĉambron. Pluajn detalojn ni ne povis ricevi de li, li tuj enlitigis kaj longe kuŝis, kva-zaŭ ion konsiderante kaj senĉese turniĝante de unu flanko sur la alian kaj iun insultante. Mi konfesas al vi, mi sentis, ke ĉiuj miaj esperoj kaj planoj, kiuj jam maturiĝis en la kapo de tiam, ĵus ni tralegis la anoncon, rompiĝas,

ke tiu malkuraĝa, malforta radio de espero, kiu penetris timeme en nian ĉambraĉon, estingiĝas. La nokton li devis pasigi sur la planko kaj mi sur lia lito. Tian komforton mi delonge ne ĝuis jam, tial, metinte je dispono de sorto mem ĉiujn zorgojn, mi tuj ekdormis. Nokte iu vekis min, el ĉiuj fortoj puŝante kaj alpremante min al la muro. Levitanskij malvarmiĝis sur la planko kaj nun esperis varmigi siajn malvarmajn membrojn je mia korpo. «Zygmunt, — li ekflustris al mia orelo, kiam mi, tute alpremita al la muro, povis nek turniĝi, nek ekmovi iun mian manon, aŭ piedon, — Zygmunt, vi morgaŭ iru al ŝi». «Kien»? — mi demandis ankaŭ flustre. «Al ŝi.. ĉu vi ne komprenas? Ŝi estas diable riĉa, vi vidis kaj se al mi ne prosperis la afero pro manko en mi de diplomatio, vi, mi scias, ĉion aranĝos». Mi demandis pri detaloj de lia vizito, sed li tuj laŭte insultis iun kaj post nelonge ekronkis. Frumateue li ien foriris kaj plu mi ne vidis lin dum tiu ĉi tago ĝis mia reveno. Nenion dirinte al Oĵidalov pri mia intenco, tiom neatendite kaj sekrete trudita al mi de Levitanskij, mi vespere ekiris laŭ la adreso, montrita en la gazetfolio. Ŝi loĝas malproksime de ni en centro mem de la urbo, en granda kaj bela domo. Pordoj de la antaŭĉambro estis malfermitaj, mi eniris kaj jam intencis penetri en sekvantan ĉambron kun duonfermita pordo, de kie aŭdiĝis voĉoj, kiam antaŭ mi aperis altkreska, grasvizaĝa figuro de pordisto kun glate razita mentono kaj malkontenta, fiera mieno kaj baris mian vojon. Li kun malŝateco ekrigardis mian tre modestan kostumon kaj truajn botojn, por unu momento sulkis la vizaĝon, kaj per grava, estra mangesto postulis, ke mi restigu en la antaŭĉambro mian ĉapelaĉon kaj pelton. Mi tuj obeis kaj, restinte en mia multeportita hejma jakso, eniris en la ĉambron. Ĝi estis negranda, sed lukse meblita kaj ornamita. Tra ĝi, neaŭdeble paŝante laŭ dika, mola tapiŝo, promenis du ĝentelmenoj mano ĉe mano, duonvoĉe interparolante kaj tute ne atentinte min, sur mola velura kanapo sidis malriĉe-vestita junulo kun pala zorgatakita kaj maltrankvila vizaĝo. Alpremiĝinte al apogilo de la kanapo kaj streĉinte la okulojn, li senĉese ekrigardis jen la ĝentelmenojn, jen grandan fermitan pordon kun arĝenta anso kaj arte ornamitan de figurĉizaĵoj; en la manoj li tenis grandan paperkunvolvaĵon. Ĵus mi alproksimiĝis al li, la pordo malfermiĝis kaj la junulo, kiel freneza, salte leviĝis de la kanapo kaj tuj malaperis post la pordo, apenaŭ ne faliginte ian dikulon kun ruĝa kaj ŝvitkovrita vizaĝo, kiu kun granda paperujo sub la brako, ĵus forlasis la ĉambron. La ĝentelmenoj interŝanĝis okulsignojn kaj ekridetis, ne haltante eĉ por unu momento. Mi haltis apud fenestro kaj penis ordigi en la kapo pensojn, ĥaose amasiĝintajn, kaj min prepari por jam proksima renkontiĝo kun tiom enigmoplena bonfarantino de gento homa, aŭ pli ĝuste de talentuloj, al kies nombro mi volis nun esti alkalkulita. La junulo eliris el la ĉambro mallevente la kapon kaj, neniun rigardante, iris en la antaŭĉambron. La ĝentelmenoj haltis antaŭ la pordo, dum iom da tempo ili ankoraŭ ion priparolis kaj nur post tio unu el ili malaperis post la pordo. La alia restis apud ĝi kaj kun scivoleco trarigardis sur ĝi la figurĉizaĵojn. Sed pasis nur unu minuto, la ĝentelmeno

eliris el la ĉambro kaj interŝanĝis kun sia kunulo kelkajn frazojn. Post tio ili ambaŭ aliris al mi kaj ĝentile proponis al mi eniri al la bonfarantino.

Ŝi montriĝis altkreska, imponanta virino de tridek kvin jaroj proksimume kun serioza, iom sopiranta vizaĝo kaj longaj belaj manoj, nudaj ĝis la kubutoj kaj ornamitaj de juveloj. Ŝi sidis je negranda tablo kaj per penetranta rigardo longe esploris min de la kapo ĝis la piedoj. Mi siavice observis ŝian mienon kaj penis konjekti, kian impreson faris je ŝi mia persono. «Ĉu vi ankaŭ venis pro mia anonco?» — Ŝi demandis, flanken turnante la kapon kaj ne deturnante la okulojn de mi. — «Mi avertas vin, ke mi povas atentí nur seriozan proponon. Min atakas senindulge tiom da homoj, bezonantaj je mono, sed mi tute ne celas doni almozon al mizeruloj, mi faris jam unu eraron... mi deziras kuraĝigi vere talentajn homojn kaj akceli iliajn sciencajn elpensaĵojn, se ili prezentas efektive ion seriozan kaj efektivegeblan. Mi ja ne povas riski... Por kio vi bezonas monon? Mi tute ne atendís tian demandon. Mi ja ne povís post tia ŝia elokventa averto montri mian mizeregon kaj simple peti «almozon», tial mi uzis ruzaĵon. Mi tuj ekmemoris pri flugaparato de Wanda kaj ekparolis pri ĝi, kvazaŭ pri mia propra elpensaĵo. Mi penis rememori ĉiujn detalojn pri ĝi, kiujn mi aŭdis iam de Wanda mem, kaj ne forgesis ankaŭ doni liberon al mia fantazio. Ŝi aŭskultis min atente kaj, kiam mi finís, demandis pri mia aĝo kaj nomo. Ĉion tion ĉi ŝi enskribis en sian notlibron. «Via projekto estas tre interesa kaj subteninda» — ŝi diris poste, — «ĉu vi havas desegnaĵojn de la aparato?» Mi ree mensogis, dirinte, ke la desegnaĵojn mi havas, sed ili estas en vilaĝo, kie mi pasigis la someron, ke mi alportos ilin al ŝi, se ŝi bezonas je ili. «Jes, ili estas necesaj. Mi montros ilin al kelkaj spertuloj. Morgaŭ mi forveturos je miaj aferoj. Reveninte hejmen post du semajnoj, mi havos okazon ree preparoli la aferon. Ĉu vi bezonas nun monon? Kiom?» Mi ree ne atendis la demandojn kaj, konfuziĝinte, silentis, rigardante ŝian zorgatakitan vizaĝon. Ŝi post ioma hezitado etendis al mi du orajn dekrublajn monerojn kaj petis, ke mi subskribu ian paperon, sur kiu ŝi antaŭe skribis ion per bela virina skribmaniero.

Jen, mia amiko, estas miaj aventuroj de la lastaj tagoj. Mi ne pensas pri tio, ĉu mia ago estas honesta, ĉu mi iam ree venos al la bonfarantino. La unuan demandon vi mem solvu, la alian solvos la tempo. Kaj mi nun estas senlime ĝoja, ke mi havas eblon tuj elaĉeti la ringon de Wanda kaj ke mi estas por longa tempo garantiita de plua malsatado. Eldiru vian opinion pri ĉio skribita kaj ne juĝu min tro severe; kiam homo malsatas, li ne povas multe rezonadi pri nobleco, konveneco kaj aliaj «ec» oj, — ilin priparolu, pripensu satuloj.

Kore via Zygmunt.

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Al fr-ino Wanda Neumanovicz

La 15-an de Novembro

Mia kara knabino!

Mi rapidas trankviligi vin, — vian ringon mi ĵus elaĉetis kaj nun mi ree portas ĝin sur mia fingro kaj ĉiminute rigardas ĝin, kvazaŭ amadmirante je vi mem. Serĉante ian laborenspezon, mi tute okaze konatiĝis kun unu tre grava kaj riĉa persono, kiu vere interesiĝas je ĉiaj sciencaj elpensajoj kaj malavare subtenas ĉiun seriozan provon en tiu ĉi regiono. Unufoje, kiam mi interparolis kun la persono, mi rakontis pri vi, via emo al elpensajoj kaj precipe pri via projekto de la flugaparato. Tiu ĉi persono tre interesiĝas je vi kaj je via projekto... Tiu ĉi persono povas fari netakseblajn servojn al vi; mi petas, sendu al mi viajn desegnaĵojn de la aparato. Mi kisas vin kaj petas senprokraste plenumi mian peton.

Via Zygmunt

Al s-ro A. Jaworowski.

La 1an. de Decembro

Kara amiko!

Vian leteron mi ricevis antaŭ kelkaj tagoj kaj de tago al tago prokrastis respondi je ĝi. Vi scias, mi estas nekaŝema, mi ŝatas veron. Nu, tial mi devas diri al vi, ke via letero surprizis min, konsternis. Vi tro severe juĝas min, sed se vi vivus en tiuj kondiĉoj, en kiuj tiam estis mi, mi ĵuras, vi agus same, eĉ, eble, pli malbone, «pli malnoble»! Kiam homo dronas, estas nature, ke li kaptas per la manoj ĉion, kion ajn li renkontus proksime sur akvosupraĵo, trabon, tabulon, ŝnuron, eĉ, kiel oni parolas en la proverbo, pajleron, — kaj neniu iam poste riproĉos lin, ke li, pro sento de memkonservo, instinkte kaptas tiun aŭ alian objekton, ne konsiderinte, kio ĝi estas kaj kiaj sekvoj estos, se li sin savos de la drono per ĝia helpo. Ĉu tiel? Nu, mi ankaŭ estis dronanta, mi vane longe serĉis savon, mi vane kriegis, petante helpon. Mian voĉon supersonis ventego kaj, ĵus mi, elturmentita, kolektinte ĉiujn fortojn, elstarigis supren la kapon, furiozaj ondoj ree rapidis, sin amuzante je mia senhelpeco, subakvigi ĝin. Kaj kiam, ŝajnis, jam estis nenia espero je savo, mi kaptis la anoncon, mi faris «la malnoblan», kiel vi nomas ĝin, agon, proklaminte la elpensajon sciencon de Wanda mia persona elpensajo. Jen, kiel oni devas ĝuste rigardi la aferon, antaŭe ol juĝi severe min. Mi ne scias, kiom konvinkiga por vi estas tiu ĉi klarigo, sed mi sentas, ke mi agis ĝuste, ĉar mia konscienco estas trankvila...

Vi petas priskribi al vi pluajn detalojn de mia «aventuro», — sed ĉu ili nun jam ne estas superfluaĵ? Wanda sendis al mi la desegnaĵojn, mi transdonis ilin al s-ino (ŝi estis vidvino) Trambovski, kiu siavice prezentis ilin al juĝo de kompetentuloj. Feliĉe, ni pli proksime konatiĝis unu kun la alia

antaŭe, ol venis verdikto de la kompetentuloj, alie mi ree estus eljetita al la volo de la sorto fatala... La projekto de Wanda montriĝis nur «ridinda infanaĵo, neniam efektivebla kaj elmontranta signojn, ke ĝia aŭtoro havas nenan ideon eĉ pri plej elementaj leĝoj de fiziko, meĥaniko kaj cet». Vi vidas, ke mi ne profitis el la elpenaĵo de Wanda, kion vi timis kaj je kio vi jam riproĉis min. Nun mi estas fianĉo de la sinjorino — bonfarantino kiu, mi devas aldoni, neniam estis aŭ celis esti bonfarantino. Ŝi celis per sia anonco sole trovi inter vizitontaj ŝin viroj konvenan fianĉon. Ĵus ŝi trovis, pordoj de ŝia domo fermiĝis kaj jam delonge neniu, krom mi, transpaŝas ĝian sojlon. Kiel okazis tio ĉi? Mi mem ne povas klare prezenti al mi ĉion tion ĉi, sed, ŝajne, en ĉio estas kulpa Wanda. Kiam mi ricevis de nuna mia fianĉino dudek rublojn, mi tuj decidis elaçeti la ringon kaj tion ĉi mi efektive faris dum tiu sama tago, kaj kiam mi venis al ŝi, ŝajne, je tria fojo, mi jam havis sur la fingro la ringon. Dum nia interparolo ŝia rigardo haltis sur la ringo kaj nature ĝi vekis ŝian scivolecon. Mi, vi scias, ne ŝatas mensogi, mi malkaŝe rakontis al ŝi pri Wanda, pri mia mizerego, pri ĉio... Tre nature mia sincereco infektis ŝin je tio sama... kaj la afero estis aranĝita iel nerimarkeble, facile kaj firme.

Nia geedziĝo okazos post la Nova jaro kaj, kiam mi finos universitan kurson, ni forveturos en Krimeon, kie ni havas propran somerloĝejon komfortan...

Se vi ekdezirus esti nia akompananto tien, ni ambaŭ tre dankus vin... kaj mi havus bonan okazon tiamaniere repagi al vi mian iaman ŝuldon.

Kun amika manpremo

Via Zygmunt

Al fr-ino Wanda Neumanovicz.

La 15-an de Decembro.

Estimata Fraŭlino!

Mi resendas viajn desegnaĵojn. Kelkaj kompetentaj homoj trarigardis ilin kaj aŭdis miajn klarigojn de ili kaj ĝenerale de via projekto. Ili trovis vian projekton kuraĝa kaj originala, kvankam, ŝajne, neefektivebla. Kion fari? Tamen vi ne malesperu, vi ja scias ke vojo de ĉiuj elpensistoj kaj ĝenerale de ĉiuj grandaj homoj komence estas dornesternita kaj nur poste sur ĝi oni povas renkonti rozojn. Ĉe vi, parolante sincere, mankas sciencista antaŭpreparo, vi devos ankoraŭ multe kaj serioze labori kaj lerni por atingi ian sukceson en la ŝatata de vi regiono. Mi scias, vi estas malriĉa... mono ĉiam mankas ĉe vi, — sed, feliĉe, nun tio fariĝis tute ne atentinda bagatelo: de tiam, kiam mi fianĉiĝis kun riĉa... Ĝustokaze, mi devas sciigi al vi, ke ni devas forgesi niajn iamajn tiom naivajn, sendube vi ankoraŭ memoras ilin, pure infanaĵajn promesojn, revojn. Nu, pripensu vi mem pripensu prudente, logike, ĉu ni povus ion atingi en nia vivo, estante am-

baŭ malriĉaj? Nin atendus nur disreviĝo, mizerego!.. Mi bedaŭras, ke mi mem pli frue ne konsideris tion ĉi kaj tre dankas mian fianĉinon, ke ŝi ĝuste ekrigardis la aferon kaj ĝustatempe avertis min de tiu falsa kaj danĝera paŝo. Nun mi estas riĉulo. La fianĉino posedas krom luksa domo ankaŭ du bienojn kaj belan somerloĝejon en Krimeo sur bordo de la maro. Se vi deziras lerni, mi ĉiam estas preta, por viaj bonservoj kaj kun plezuro provizos vin eĉ je mono, bezona por tio. Ankaŭ, se vi ekdezirus iom ripozi some-re en la feliĉega sudo, ĉiam por viaj bonservoj estas nia somerloĝejo. Tiujn ĉi ambaŭ proponojn mi faras al vi laŭ deziro de mia estonta edzino. Se vi nur povus scii, kiel ŝi amas vin kaj kiel simpatias al vi! Vere, ŝi povas anstataŭi al vi vian patrinon mortintan! Venu al ni, vi mem vidos tion!

Nia edziĝosoleno okazos la 8-an de Januaro, sed ni eĉ post ĝi restos en la urbo ĝis kiam mi finos universitatan kurson. Nur tiam ni forlasos la polvan, enuigan urbon kaj transloĝiĝos en Krimeon.

Mi konsilas al vi serioze pripensi la proponojn, tiaj okazoj nun estas maloftaj.

Kun alta estimo

preta servi al Vi Zygmunt Trynieszewski.

P. S. Ha, mi tute forgesis! Ĉu vi memoras tiun ringon, kiun vi heredis de via patrino kaj kiun vi tiam donacis al mi? Nu, kia ĉagreno! Mi ie perdis ĝin. Skribu, kion vi preferas: mi povas sendi al vi anstataŭ ĝi alian luksan ringon, aŭ ian alian juvelon valoran, aŭ, fine, monon.

Z. T.

Al s-ro A. Jaworowski

La 12-an de Januaro

Karega amiko!

Vian leteron mi ricevis antaŭ longe kaj via gratultelegramo venis ĝuste dum nia soleno. Ni estis tre kortuŝitaj de viaj bondeziroj kaj siatempe ni ankaŭ toastis por via sano.

La edziĝosoleno estis tre gaja, sed ankaŭ tre laciga. Mi kun la edzino ankoraŭ ĝis nun ne povas tute trankviliĝi post tiu ĉi tumulto.

Vi skribas, ke vi volonte okupus ian oficon en ia granda bieno de mi, sed... ĝuste nun mi pripensas planon de grandaj reformoj en la mastrumaĵo de la edzino. Unue ni devos plimalmultigi nian oficistaron, poste-plimalgrandigi ilian salajron... Kaj mi ne scias, ĉu vi konsentos servi ĉe ni je tiuj kondiĉoj, kiujn mi ellaboras nun?

Niaj elspezoj je la mastrumaĵo estas grandegaj kaj tio ĉi ne devas longe daŭri. Ja ni devos ion pripensi pri estonteco...

Se vi serioze deziras ŝanĝi vian oficlakon, vi skribu pri tio pli detale, eble, ni interkonsentos kaj aranĝos la aferon.

Pardonu, mi finas, oni vokas min...

Sincere via Zygmunt

P. S. Mi tute forgesis sciigi al vi jenan malsaĝan akcidenton. Ĉu vi memoras Wanda'on, nu, tiun... mian iaman fianĉinon? Rigardu, kia stranga knabinaĉo ŝi montriĝis: tute sekrete, eĉ ne antaŭsciiginte min, ŝi venis en la urbon, iamaniere trovis la domon de mia nuna edzino kaj antaŭtage de nia geedziĝo venis al ŝi. La edzino, ŝajne, mi jam skribis al vi, kiel ŝi amis Wanda'on kaj ĉiam simpatiis al ŝi, la edzino, sciiginte kiu ŝi estas, afable akceptis ŝin. Kaj meze de ilia paca konversacio, tiu ĉi knabinaĉo elprenis de ie kaŝitaŭ revolveron kaj pafis en la edzinon. Feliĉe ŝi ne trafis ŝin. Oni, kompreneble, tuj senarmigis ŝin kaj kondukis... Survoje ŝi liberiĝis el manoj de la kondukintoj kaj sin ĵetis sub radojn de preteririnta tramvagono... Ĝis nun por ni estas sekreto, kio igis ŝin tiel agi? Mi, laŭ peto de la edzino, proponis al ŝi monon por ebligi ŝian pluan lernadon, eĉ invitis ŝin gasti en Krimeon... Stranga knabinaĉo ŝi estis! Nu, kion ŝi celis, kion ŝi atingis?... Ĉu ŝi jaluzis? Neeble! Tiu ĉi penso eĉ neniam venis en niajn kapojn. Ĉu ni supozis?.. — Z. T.

IVAN ŜIRJAEV



## Kiel en fabelo

de W. Sieroslaws

Zonjo dormas maltrankvile.

Hieraŭ ŝi ree enŝteliĝis en la paĉjan bibliotekon, ree prenis libron kaj legis. Ŝi tiel amas la belajn historiojn kun ilustraĵoj kaj eĉ sen ilustraĵoj, historiojn pri princoj, amantaj Cindrulinon, ankaŭ historiojn pri sovaĝaj rabistoj atakantaj dum malluma nokto vojaĝantojn en malproksimaj arbaroj.

Zonjo dormas maltrankvile.

En la malgranda kapeto deliras fantaziaj bildoj kaj jen ree vekas ŝin en teruro.

Sed vidante nur la lumon de l' nokta lampeto kaj ekmemorante ke apude malantaŭ la nefermita pordo dormas paĉjo, ŝi trankviliĝas baldaŭ.

Kelkfoje jam paĉjo koleretis ke ŝi enŝteliĝas en la bibliotekon, kelkfoje ridis, ke ŝi kredas al la fabeloj kiuj troviĝas en la libroj kun ilustraĵoj aŭ kiujn rakontas la maljuna Barbarino. Ĉar paĉjo diris ke ne ekzistas princoj nek kavaliroj, ne ekzistas drakoj, nek rabistoj. Paĉjo devas ja pri tio scii.

Sed Zonjo ne povas forpeli la revojn el la kapeto, kaj ne volas forpeli.

Kaj Zonjo kredas ke iam ĉio plenumiĝos; ke ŝi vidos la princon en ora kaleŝo, kiu alveturos, riverencos antaŭ panjo kaj forveturigos ŝin kun si en

reĝan palacon, timante survoje nek drakojn, nek malbonajn kavalirojn, nek rabistojn. Tiam paĉjo konvinkiĝos ke ĉio ĉi estas vero.

Estas nur domaĝe ke princoj kaj rabistoj loĝas malproksime, kaj malofte vizitas tiujn ĉi regionojn. Ecepte nur se iu estas alivestigita?...

Zonjo enpensiĝas.

La nova ekonomo aspektas tute kiel kavaliro. Nur el la okuloj malbono vidiĝas, kaj Zonjo timas lin ĉiam. Ŝi eĉ diris tion al paĉjo. Sed paĉjo ridis je ŝi kaj diris, ke tio estas simpla ekonomo kaj eĉ posedas bonajn atestojn. Tiel diris paĉjo, sed Zonjo ne kredas. Zonjo sentas, ke tio estas malbona kavaliro, kun kiu ne volas renkontiĝi la princo. Kaj tial li ne alvenas...

Tiel revas Zonjo kaj ree ekdormas. El sonĝa nebulo eliĝas ia figuro. La vizaĝon ŝi konas, kaj la voĉo—konata. Iu simila al la nova ekonomo, sed ne li, kaj eble li, nur terura, timiga. Vestita iel alie, portas sabron ĉe la flanko kaj teruran ponardon en la zono... Densa arbaro, li kaŝas sin inter la arboj, kvazaŭ atendante iun... Kaj tie malproksime aŭdiĝas jam sonoriloj kaj brilas en la suno ora *karoso*... La princo! la princo veturas!...

Zonjo volas kuri renkonte al li, sed jen la malbona kavaliro elŝovas sin el malantaŭ arbo. La terura sabro kvazaŭ malbonaŭgura fulmo falas sur la kapon de l' malfeliĉa princo, la sango fluas per vasta strio...

— La malbona kavaliro mortigis la princon!

Kun tiu ekkrio vekigis Zonjo.

Ŝia laŭta krio penetras la murojn de l' larika kortego. Sed tuj apud la liteto de l' infano staras defendantoj: paĉjo kaj panjo.

— Ŝi ree legis iajn malspritaĵojn — diras la maljuna sinjoro al sia edzino — aŭ la malsaĝa Barbarino rakontis al ŝi ion pri la bandit-atako en Firlej.

Zonjo sentas protekton apud si kaj trankviliĝas iom post iom.

— Nu, dormu trankvile, malgrandulino — diras paĉjo — ne rigardadu en librojn kaj memoru ke ĉio ĉi estas fabeloj.

— Ne, ne, paĉjo — protestas ŝi ankoraŭ iomete dormema.

— Dormu! Ĉio ĉi estas fabeloj.

Kora kiso, kaj Zonjo ree restas sola en la ĉambro.

Sed nun ŝi efektive ĝojas, ke ĝi estis nur sonĝo kaj ke la malbona kavaliro ne mortigis la princon.

La nokta lampeto briletas per ŝanceliĝa lumo. La princo kaj la malbona kavaliro malaperas ĉiam pli kaj pli en nebulo... Zonjo dormas.

Ŝi dormas nun forte kaj trankvile.

Ĉio ĉi estas fabeloj.

Kaj ŝi tute ne aŭdas kiel la pordo malfermiĝas mallaŭte, kiel iu ŝteliras sur la fingroj tra la ĉambro, iu simila al la nova ekonomo, sed ne li, kaj eble li, nur terura, timiga, kun masko sur la vizaĝo, kun revolvero en la mano. Kaj ŝi tute ne aŭdas, kiel la fenestro malfermiĝas sen bruo, kaj el la ĝardeno enŝoviĝas tra ĝi en la ĉambron ankoraŭ du homoj, malbonaj kavaliroj, ankaŭ maskitaj, ankaŭ armitaj.

Ĉe malklara lumo de l' lampeto ili interkomprenas sin per movoj, la unua montras al ili la pordon de paĉjo.

Zonjo ne aŭdas, ne vidas.

Ŝi dormas.

Princoj ne ekzistas, kaj malbonaj kavaliroj ankaŭ ne ekzistas.

Zonjo dormas trankvile.

Vekas ŝin nur terura krio de paĉjo.

— Al mi! Banditoj!

Seka krako de revolvera pafo kaj ĉio silentiĝas.

Zonjo ne scias, ĉu ĝi estis vero aŭ nur sonĝo.

Sed jen dua pafo en la ĉambro de panjo.

Zonjo kuras per siaj nudaj piedetoj tra la ĉambro, ŝi malfermas la pordon al paĉjo.

Kaj ŝi haltas.

De l' vizaĝo de l' nova ekonomo falis jam la masko.

La malbona kavaliro mortigis paĉjon!!

El la pola tradukis

EDWARD WIESENFELD



## Antaŭhistoria homo en ĉirkaŭaĵo de Praha

Jam en tempo praantikva loĝis en la centro de bohema lando, kie nun kuŝas Praha, la homo. Unuajn pruvojn pri lia ekzisto ni havas jam el la tempo diluvia, tiel nomata pli antikva epoko ŝtona. Kiam vivigis niajn regionojn grandaj aroj da boacoj, rinoceroj, sovaĝaj ĉevaloj kaj mamutoj, antaŭuloj de nunaj elefantoj, aperas tie ĉi la unua homo — sovaĝulo, ĉasis-  
to sur plej malsupera ŝtupo de la civilizacio. Laŭ nunaj trovoj ni scias, ke li ĉasis ĉiujn ĉi bestojn, bakis ilian viandon sur fajrujoj kaj tranĉis ĝin per ŝtona tranĉilo. Pro medolo li per kruda, neprilaborita ŝtono dishakadis la ostojn, el mamutaj dentoj li faris siajn simplajn instrumentojn. Ĉe fino de tiu ĉi epoko la homo tute malaperis el nia regiono.

Denovajn postesignojn homajn ni trovas en la «pli juna epoko ŝtona» (eble 4000 jarojn antaŭ nuna kronologio). Tiam vivas la homoj jam are, ili fondas konstantajn loĝolokojn kutime en proksimo de akvo kaj ne okupas sin plu sole per ĉaso, sed ili havigas siajn vivrimedojn ankaŭ per bredo de brutaro kaj per terkulturado. Ilia armilo estas ŝtono akriĝita kaj glatigita, kiun ili fiksas en tenilojn el ligno aŭ cerva korno. La tiama homo fabrikas

por si vazaron plejparte globoforman, ornamitan per engravuritaj spiraloj kaj volutoj. En ĉirkaŭaĵo de Praha estis trovitaj ankaŭ valoregaj vazoj kun koloraj ornamoj. Siajn mortintojn enterigis tiu popolo metante ilin en tombon kaŭre kuŝantaj kaj aldonante juvelojn el traboritaj konketoj, ostajn koralojn kaj en vazoj manĝon. Tiel estis en tombo trovitaj restoj de kvarono da porko. En tiu epoko venas ĉi tien fremduloj, kiuj bruligas la mortintojn kaj alportas al ni belaspektajn kaj ĉarme ornamitajn vazojn de arta kaj nobla formo.

En tempo iom pli posta ankaŭ nia loĝantaro lernis fari pli graciajn vazojn; el tiu epoko devenas plaĉa piroforma vazaro, kaj lerte faritaj ŝtonaj hakiloj kaj pioĉoj, ĉar oni sciis jam ankaŭ trabori la ŝtonon.

Alta vazaro, kruĉo — aŭ pokaloforma de karaktero nordika kaj samtempe aperantaj vazoj de thuringa karaktero en formo iom alia, sed kun simila ornamo (farita per ŝnureto en molan argilon) estas el epoko transira, kiu daŭris proksimume inter la jaroj 4000-2000 antaŭ nuna kronologio. Dum tiu epoko vizitis nian regionon fremdaj komercistoj uzantaj vazaron de formoj tute novaj, juvelojn faritajn el konketoj mediteraneaj kaj vivantaj laŭ maniero tute malsimila. Por defendo de siaj karavanoj ili konstruis malgrandajn fortikaĵojn. La komercistoj alportis la unuajn, plej primitivajn metalajn instrumentojn, kupran stangeton, akrigitan unuflanke en alenon, aliflanke en ĉizilon.

Proksimume 3000 jaroj antaŭ kristana kronologio ni trovas en regiono de Praha ĉasistan popolon. Ĝi portas pafarkon kaj sagojn kun ŝtona pinto koroforma. Al siaj mortintoj ĝi metas en la tombon ruĝajn bele ornamitajn vazojn en formo de sonoriloj. Multaj tombaroj el tiu epoko pruvas, ke la nombro de loĝantaro forte kreskis.

Dum la sekvinta tiel nomata pli maljuna epoko bronza vagas tra nia lando tiom da komercistoj portantaj kun si metalon, ke baldaŭ disvastiĝis kaj iĝis ordinara la uzo de bronzaĵoj produktaĵoj. Oni donacas bronzaĵojn juvelojn en la tombojn, kie la mortintoj kuŝas ĉiam kaŭre. Por plifirmigi la tombon, estas sur ĝin metata aŭ surŝutata ŝtonaro. El tiu epoko devenas grandaj trovoj de bronzaĵoj ilaro kaj juveloj. Ilin kaŝis tie antaŭ miljaroj la komercisto, kiu estis poste malhelpita reveni.

En la pli juna bronza epoko (proksimume 1000 j. antaŭ nuna kronologio) venas en nian regionon nova gento. Laŭ du direktoj, el nordo trans la montaro Krkonoŝe kaj laŭ la fluo de rivero Labe alproksimiĝas fremda popolo, kiu baldaŭ okupis la fruktodonajn ebenaĵojn ĉirkaŭ Labe kaj iris laŭ la riveroj ĉiam antaŭen. La novaj homoj bruligis siajn mortintojn kaj enterigis ilian restaĵon en cindrujoj. Trans limo sudokcidenta el Bavario, trans montoj de Ŝumava eniris dum tiu periodo alia gento. Ankaŭ ĝi bruligas la mortintojn, sed ĝi metas la cindrujon en argilajn tumulojn, kiuj havas iam ŝtonan internon. Influo de la fremduloj estas tre forta kaj la indigenoj lernas iliajn morojn. Ankaŭ ili komencas cindrigi siajn mortintojn kaj enterigi ilin en cindrujoj.

Dum tiu tempo dense loĝis la popolo en regiono de Praha. En la nuna Ŝárka estis konstruitaj grandaj fornoj por fando de bronzo. Amase estis tie fabrikataj bronzaĵoj, ilaro kaj juveloj kaj de tie vendataj en la ĉirkaŭajn sidejojn. Oni povas kredi, ke ĉiujare printempe tie okazis granda foiro, al kiu venis la loĝantaro de tuta ĉirkaŭaĵo kaj ke tio estas la deveno de la nuna kermeso okazanta tie ĉe la preĝejo de sankta Mateo ĉiun printempon.

Kiam estis en jaro proksimume 600 antaŭ nuna kronologio ĉe ni trovita fero kaj ekkonitaj ĝiaj bonaj ecoj, precipe ĝia forĝeblo, rapide ĝi anstataŭas la produktojn el bronzo, kiu de tiam estas uzata preskaŭ sole por juveloj. El tiu tempo estis trovita apud Praha interesa tombaro cindruja. En unu tombo estis tie enterigita ia eminenta viro, riĉe ornamita per juveloj. Li estis bruligita kun tuta veturilo kaj ĉio restinta estis metita en tombon elfositan proksimume unu metron sub la ternivelo. El sama epoko estas ankaŭ tomboj aliaj, kun skeletoj kaj bele ornamita vazaro. Sendube ili devenas de fremduloj loĝantaj inter la indiĝenoj.

Postesignojn de la kulturo latina (tiel nomata laŭ la loko La Fène en Svislando) ni trovas el periodo poste veninta, komencanta proksimume 200 j. antaŭ nuna kronologio. Tiam nova, militema kaj potenca popolo okupis la landon kaj subigis la loĝantaron. Restis post ili en la viraj tomboj feraj glavoj, lancoj kaj ŝildoj, en la virinaj — braceletoj el bronzo, el vitro aŭ el lignito, ankaŭ agrafoj, kolĉenoj kaj ringoj por ornamo de la kruroj, ĉio ofte kun belaj reliefaj ornamoj. La skeletoj estas ĉiam rekte streĉitaj. Tiu periodo daŭris proksimume 100 jarojn.

Dume disvastiĝas el roma imperio ĝia kulturo en la barbarajn landojn kaj ankaŭ la loĝantaro de antaŭhistoria Praha konatiĝas kun ĝi. En la regiono de nuna Dejvice kaj Bubeneč ekestis kelkaj grandaj sidejoj kun komuna tombaro. Oni vidas tie pruvojn pri sufiĉe alta civilizacio. Estis tie ferfandejo liveranta multe da fero. La loĝantaro estis multlalte progresinta, ĝi zorgis pri interkomunikiĝo konstruante bonajn ŝoseojn, ĝi kulturis grenon, plugis per bonaj plugiloj, uzis ferajn rikoltilojn, manajn muelilojn. Ĝi sciis baki panon en forno tre simila al nuna, ĝi bredis brutaron kaj korbirdojn, okupis sin pri diversaj metioj. Vintre amuzis sin la popolo glitante sur glacio kaj veturante sur neĝo per malgrandaj glitveturiloj. Ĝi ludadis per ĵetkuboj kaj skribi ĝi sendube ankaŭ sciis, ĉar estis trovitaj tie bronzaĵoj, faritaj precize laŭ roma modelo. Oni enterigis en tiu epoko la mortintojn aŭ rekte kuŝantajn aŭ bruligitajn en cindruoj.

En la epoko de popolmigrado (dum 2.<sup>a</sup>-4.<sup>a</sup> jarcento de nuna kronologio), kiam la barbaroj komencis ŝanceligi la fundamentojn de roma imperio, aperas ĉe ni nova gento. Iliaj tomboj estas riĉaj, apud rekte kuŝantaj skeletoj oni trovas ofte orajn kaj arĝentajn juvelojn, kombilojn kaj koralojn, glavojn, ŝildojn, tranĉilojn, sagojn. Kuŝas ĉe ili argila vazaro kaj vitraj pokaloj. Unuopaj tiaj tomboj estas en nordokcidenta parto de nia lando, en ĉirkaŭaĵo de Praha estis elfositaj sole du tombaroj el tiu epoko.

Same enterigis la epoko sekvinta t. n. princa, kiu daŭris ĝis 12.<sup>a</sup> jarcento. Tre ofte estis tiam almetata fera tranĉilo, iam vazo aŭ malgranda sitelo ligna. Juvelo kuŝanta en tomboj tiutempaj estas plaĉa, iam oraj orelringoj kaj specialaj ringetoj kun unu fino S-forma, versimile ornamaĵo por la haroj. Butonoj kun belaj ornamaĵoj kaj spronoj estas ankaŭ malkovrataj. Kaj de tiu tempo ĉiam pli malriĉa estis la tombo.

Ĉe ni komencis jam epoko historia.

OTTO GINZ



## XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5-6-7 junio 1927

**KONGRESA BUDĜETO.** — Oni rememoru ke la lasta numero de K. E. publikigis la oficialan budĝeton: laŭ klaso, ptoj. 185, 150, 110, 75, 65, 50. Jam nun oni povas enskribi. La enskribiĝo kostas 10 pesetojn, kiujn oni deprenos ĉe la pago de la tuta kosto. Oni povas sendi per poŝtmandato sian enskribiĝon al str. València, 245, Barcelona. Pliajn informojn oni povas ricevi ĉe la prezidanto de K. E. F. str. Bretón de los Herreros, 18, 1-1. Barcelona. Ankaŭ oni povas informiĝi ĉe Restaurant Pàtria, placo Sepúlvera, ĉiumerkrede je la 22-24, kaj ĉe Apoteko Bartomeu, str. Tallers, 81, apud Placo Universitat.

Ni petas la grupojn kaj delegitojn ke ili kolektu la enskribiĝojn kaj kiel eble plej baldaŭ ili informu nin pri la nombro de enskribiĝoj.

**EKZAMENOJ.** — Kiel en la antaŭaj kongresoj oni havos okazon en Sóller submetiĝi al ekzameno por atingi la diplomon de lernado, kapableco aŭ profesoro. Partoprenontoj anoncu sin ĉe la prezidanto de la O. K. s-ro Miquel Arbona, Sóller.

**PROPONOJ.** — Ni estos tre dankaj, se oni bonvolos informi la O. K. kiel eble plej baldaŭ pri la diversaj proponoj kaj projektoj prezentotaj al la XIV.

## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA VERO PRI SUDA TIROLO. — 1919-1926. Kompilita laŭ fidindaj aktoj kaj aŭtentikaj faktoj, de Hans Fingeller. Esperantigita laŭ deziro de la aŭtoro. Eldonita kaj publicita de la aŭtoro, 1927.

Jen bona esperantigita plendo kontraŭ la italigo de tiu regiono. Anatemmo kontraŭ faŝismo. Interesa rakonto pri agadoj kaj kontraŭagadoj en nia malfacila supreniro al paco kaj amo. — *Dojo*.

KÖLN APUD LA REJNO, Gvidlibro tra Köln (Kolonjo) senpage ricevebla de Städtisches Verkehrsamt en Köln, Germanujo.

La belecon de la malnova germana urbo, sidanta ĉe la bordo de Rejno, la poeziplenan riveron, oni povas plej bone admiri en la ĵus eldonita gvidlibro, kiun ornamas belegaj gravuraĵoj reliefigantaj la ĉarmon de la simpatia Kolonjo.

LA KVAKERISMO. — Mallonga skizo pri la historio kaj kredoj de la religia societo de amikoj populare nomataj *kvakeroj*. Verkis T. Corder Catchpool kaj eldonis Friends' House, Euston Road, London N. W. 1. 1926, 16 pĝ. 18 × 12, Prezo: 2 pencoj.

La broŝuro klarigas kiamaniere aperis la kvakeroj kaj la diversajn specialaĵojn de ilia kredo. Ĝi raportas pri la sintenado de la kvakeroj okaze de la lasta milito, kiuj, kun kelkaj esceptoj, rifuzis militservi kaj preferis la malliberejon pli volonte ol surmeti la buĉistan uniformon.

BES-a ADRESARO. — Adresaro de esperantistoj el diversaj landoj eldonita de Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Ĉeĥoslovakujo. 1927, 46 pĝ. 15 × 11<sup>1</sup>/<sub>2</sub>. Prezo: 0.50 sv. fr.

La konata Adresaro ĵus elvenis en sia sesa eldono kun la kutimaj informoj pri esperantistoj dezirantaj interŝanĝi pk. objektojn aŭ korespondi pri iu speciata temo.

LA KARTO MISTERA, de Cleveland Moffet. Tradukis Edward S. Payson kaj eldonis British Esperanto Association, 142, High Holborn, London, W. C. 1. 1927, 44 pĝ. 46 × 10. Prezo: 1 ŝilingo, plus afranko.

La demono trafas la korpon de bonanima homo kaj devigas lin murdi ŝteli, k.t.p. La *karto mistera* respegulas la krimojn de la demonregato, kiu ne povas vidi la bildojn de la karto mistera sed kiu estas de ĉie forpelata, se li montras la teruran karton. Kompreneble la rakonto havas nenian verŝajnecon nek ian intereson. La stilo ne estas sufiĉe eleganta kaj preseraroj abundas.

MIRAKLAJ AVENTUROJ DE SINJORO LONGKRURULO. — Rime verkita kaj el-

ponita de Dreves Uitterdijk L. K. domo «Zamenhof» Hilversum (Holando) 1927, 76 pĝ.  $17\frac{1}{2} \times 26$  Prezo afrank.: 3 sv. fr.

La libro enhavas 152 bildojn kaj 162 strofojn. La aventuroj de Longkrurulo estas speciale amuzaj kaj ĉiu esperantisto volonte legos la facilan tekston, kies spriteco estas ialoke tre originala kaj trafa. Pri la rimo mem ni ne volas esti postulemaj kaj fermas la okulojn ĉe la diversaj lokoj kie ni povus halti por kritiki.

Se vi volas ridi dum kelkaj minutoj legu la strofojn de Sinjoro Longkrurulo.

**FAJREROJ.** — Poemoj originale verkitaj de Adalberto Smit. Eldonita de S. A. Holanda Esperanto Oficejo, Laren — Holando. 1927, 63 pĝ.  $14\frac{1}{2} \times 11\frac{1}{2}$ . Prezo: 0.50 SM.

La unua poemaro de Smit pruvas ke la aŭtoro havas grandan inspiron kaj ne malgrandan poetan talenton ĉe la tradukado. Kelkaj poemoj meritas apartan laŭdon pro la beleco de la ĝuste elektitaj rimoj. Se ni devus kribri ĉiujn poemojn enhavatajn de «Fajreroj», kelkajn ni devus forĵeti, sed tio ne forprenas belecon de tiuj, kiuj estas veraj juveloj.

**LA SCHIAVITŬ LINGUISTICA DELL' ITALIA.** — De Avv. Giuseppe Giani. Broŝuro en itala lingvo kun la celo diskonigi la celon kaj signifon de lingvo internacia.

SALJO



## Diversaĵoj

**En Palma de Mallorca.**—La 18-an de la pasinta januaro okazis ĝenerala kunsido de «Esperantista Klubo Palma» kaj estis elektita la jena nova komitato: prez. S. Crespi; vicprez. J. Matas; sekre. J. Barceló; vicsekr. A. Fiol; kasisto N. Terrasa; bibliotek. K. Meneu; voĉdonantoj, A. Noguera, A. Nadal, G. Cortada.

La esperantemo kaj agemo de tiuj novaj komitatanoj estas garantio, ke ili daŭrigos kaj, se eble, superos la laŭdindan agadon de siaj antaŭuloj en la gvidado de «Esperantista Klubo Palma» kaj en la propagando de nia afero en Mallorca.

**Raporto de «Sinjoro Delsudo».** — Sro. Maurice Hyde el Rabaul (Nov-Gineo), kiu lastatempe vizitis nin, raportas en «La Suda Kruco», organo de la aŭstralaziaj esperantistoj, pri siaj impresoj dum la lasta vojaĝo. Parolante pri sia restado en Katalunujo li diras:

En Barcelona mi vane serĉis la ĝustan stacion de la subtera fervojo (la plej bona subtera fervojo, kiun mi iam vidis), kiam mi aŭdis voĉon: «Pardonu, sinjoro, ĉu mi povas iel utili al vi?» kaj ne konata samideano tuj

gvidis min al la celata loko, per kio mi sukcesis trafi vagonaron por grava veturo.

—En Katalunujo, en urbo Vich mi denove vizitis amikojn, kiuj min gastame kaj sindone akceptis kiel en mia lasta vojaĝo en Eŭropo. Ni tre ĝoje rekuniĝis ĉe la stacio, kaj ili min kondukis al sia hejmo, kie mi havis la saman ĉambron, kiel en antaŭa vizito. Kiom da domoj, pensionoj, bangaloj estis mia hejmo dum la pasintaj dek du jaroj, kaj jen mi revenas kaj denove okupas eĉ la saman liton, dum ekstere la noktogardistoj kantas «Laŭdata estu Dio! La dua jam batis. Serena!» Katalunujo faras same sorĉan, logan efekton kiel ĉiam. Aferoj antikvaj restas flankon ĉe flanko de aferoj modernaj: Esperanto, radiotelefonio, k.t.p.

**Ĉu la «Tutmonda Statistiko» sukcesos?** — Dro. Dietterle raportas ke ĝis la 1-a de februaro alvenis 1457 respondoj: el asocioj, federacioj k.t.p. 46, el grupoj 760 kaj de izole vivantaj esperantistoj 651.

Ni denove admonas niajn legantojn, ke ili senprokraste respondu, se ilin koncernas la respondo, aŭ respondigu la demandaron kiel eble plej baldaŭ.

**Esperanto en Radio Barcelona.** — La 27-an de la kuranta monato, je la 20.30, hispana somera horo, Dro. Jobé parolados pri «Neceseco de lingvo internacia en scienco kaj precipe en medicino». Aŭskultintoj bonvolu sendi pk. al Radio Barcelona.

**La nova Spesmilo-Movado.** — El «Holanda Esperanto-Pioniro ni ĉerpas: ĝis nun la progresado de l' renovigita Spesmila ideo estas tre kontentiga, eĉ superas nian esperon.

La tempo sin montras matura por ĝia reapero dum la Jubilea-Jaro, ĉar ne nur multaj Esperanto-organoj kaj korporacioj sin montris entuziasmaj subtenantoj kaj promesis akcepti la sistemon en sia administracio dum ili bonvole disvastigas niajn propagandilojn per siaj gazetoj, sed ankaŭ eĉ pluraj bankoj kaj financaj institucioj jam donis pruvojn de varma intereso, kiu multe promesas.

La plena Esperanto broŝuro pri la sistemo nun estas presota, kaj nur tiam la efektiva agado povos komenci. Kiel ni diris la biletoj (1/2, 1, 2, 5 kaj 10 S) estas aĉeteblaj ĉe ni, sed pro teknikaj malfacilaĵoj, la kompletigaj valormarkoj de minima valoro ne povos esti pretaj antaŭ la komenco de aprilo.

La restarigo de tiu idealo de nia mortinta pioniro Ĉefeĉ estas por mi persone plej ĝojiga fakto. Mi ja memoras la entuziasmon kun kiu li parolis pri ĝi dum nia festo sur la «Bastoj» (dum la Dresdena kongreso 1908) post kiu la ideo restadis por mi intime ligita al lia simpatia persono. Tial mi estas feliĉa esti elektita de l' cirkonstancoj, povi kroni mian 25-jaran pionirecon per kunlaborado en tia grava rimedo por Esperanto evoluado. Dreves Uitterdijk.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola  
teknika gazeto

## Internacia RADIO-REVUO

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

### KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originala popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

### PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ  
KONKURSO KUN MULTNOMBRAJ PREMIOJ  
(i. a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 N.<sup>o</sup> N.<sup>o</sup>) UNU DOLARO aŭ egalval. en nacia mono  
Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ, de  
naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret.

Redaktoro: Ing. E. Aisberg.

ELDONEJO: ETIENNE CHIRON. 40, rue de Seine. PARIS-VI

### KATOLIKA MONDO

Esperanto-organo de Internacio  
- Katolika. -

—  
Aldono: La Juna Batalanto

—  
Aperas monate. Fondita 1921

—  
Abono: egalvaloro de 1.25 s. v.  
- fr. kvaronjare. -

—  
Redaktejo kaj Administrejo:  
Elberfeld. Germanujo

### Ĉiuj skoltoj

Ĉiuj amikoj de Skoltismo

abonu

la internacian monatan gazeton  
ilustritan

### SKOLTA HEROLDO

Oficiala organo de  
«Skolta Esperantista Ligo».

—  
abonprezo: 1 sv. fr.

—  
Adreso: Pastro Ramboux, 22, Cours  
Albert I, en Paris - VIII.

# Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, també pagada a la bestreta.

*Art. quint.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

*Art. sisè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

*Art. setè.* — El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

*Art. vuitè.* — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

*Art. novè.* — Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. desè.* — La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

*Art. onzè.* — Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

*Art. transitori.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## El XIV Congr s esperantista a S ller

Properament tindr  lloc a S ller el XIV Congr s de la Federaci  Catalana d'Esperantistes i els Jocs Florals Internacionals que tant han fet con ixer arreu del m n la bella festa catalana i han despertat en els nuclis esperantistes escampats per tots els indrets de la terra un inter s extraordinari per les coses de casa nostra.

Si b  es veritat que el moviment esperantista a Catalunya no ha assolit el grau de progressos que ha assolit a altres llocs,  s un fet innegable que el petit nucli d'esperantistes que inici  a Catalunya la idea del Dr. Zamenhof va saber de bell antuvi internacionalitzar la festa de la poesia i avui  s Catalunya una cosa ben coneguda i respectada a molts llocs que sense l'Esperanto tal vegada no l'haurien arribat a con ixer, almenys de la manera que se la coneix i estima ara.

S ller, la bella ciutat mallorquina, la que fa ofrena al visitant de la flor de tarongina i de la blavor del seu mar, mar ben seu i de cap altre, aquest any crida els esperantistes de parla catalana i els poetes de tot el m n que per mitj  de l'Esperanto canten l'amor, la bellesa i la vida, a la bella festa dels Jocs Florals, jamai tan ben aparellats amb la natura com ho seran a S ller.

Els esperantistes mallorquins, especialment els de S ller, han sabut preparar tan bellament totes les festes anunciades amb motiu del proper Congr s Esperantista, que seria quelcom imperdonable si tots els defensors de l'idioma internacional no es trobaven a la ciutat dels tarongers els propers 5-6-7 de juny.

Els nostres lectors trobaran en aquest n mero totes les dades referents al Congr s. El preu redu t dels viatges i estada a Mallorca fa creure que tots els nostres amics aprofitaran l'avinentesa i vindran amb nosaltres a fruit uns dies que difcilment hom oblidar .

# "KATALUNA ESPERANTISTO"

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provezkzemplero 2 respondkuponoj  
Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

<i>Esperantista Klubo Palma</i> Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca		<i>Artés:</i> Sro. Manuel Monrós
<i>Empòrdana Ebenajo</i> (Girona)	Armentera	<i>Armentera:</i> Empordana Ebenajo
<i>Esperanta Nesto</i> (Joventut Catòlica)	Ripollet	<i>Banyoles:</i> Sro. Joan Aulina
<i>Frateco</i> Placo Pi i Margall, 14.	Vendrell	<i>Figueres:</i> Sro. Carles Varela
<i>Ĝirona Espero</i> (Creu Roja)	Girona	<i>Girona:</i> Sro. Josep M-a Dalmau
<i>Lumon</i> St. Antoni, 64.	Terrassa	<i>La Garriga:</i> Sro. Joan Blancafort
<i>Studenta Juneco</i> (Seminari)	Girona	<i>Mahó:</i> Sro. S. Ortega Barceló
<i>Aplec</i> Montserrat, 9, 1.er	Sabadell	<i>Manlleu:</i> Sro. Marian Vilardell
<i>Bela Espero</i> Carretera de Vich, 41.	Manresa	<i>Manresa:</i> Sro. Josep Albagés
<i>Esperanta Idealo</i> Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés		<i>Mataró:</i> Sro. Francesc Torres
<i>Esperantista Amikeco</i> Plaça Bernardí, 10.	Manlleu	<i>Molins de Rei:</i> Sro. A. Canals
<i>Esperanta Burgono</i> (Centre Democràtic)	Rubi	<i>Monistrol de Montserrat:</i> Sro. F. Orobitg, Pastro
<i>Internacia Frateco</i> (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet		<i>Palafrugell:</i> Sro. Francesc Sagrera
<i>Paco kaj Amo (Soc.)</i> Planeta, 16, pral.	Barcelona	<i>Palau de Montgut:</i> Fino. Lluïsa Bargés
<i>Barcelona Stelo</i> Provença, 156	Barcelona	<i>Palma de Mallorca:</i> Sro. Narcís Bofill
<i>Barcelona Esperanto-Societo</i> Bretón Herreros, 18, 1.	Barcelona	<i>Reus:</i> Sro. Enric Aguadé
<i>Esperantista Grupo «Solleric»</i> Soller		<i>Ripollet:</i> Sro. Josep Planas, Pastro
		<i>Rubi:</i> Sro. Joan Ratés
		<i>Sabadell:</i> Sro. J. Bracons
		<i>St. Adrià del Besòs:</i> Sro. S. Arnella
		<i>St. Martí Sapresa:</i> Sro. Joan Rieradevall
		<i>Sta. Coloma de Farnés:</i> Sro. Pere Costa
		<i>Sta. Coloma de Gramanet:</i> Internacia Frateco
		<i>Sallent:</i> Sro. Lluís Solé
		<i>Sóller:</i> Sro. M. Arbona
		<i>St. Feliu de Pallarols:</i> Sro. J. Collelldevall
		<i>Terrassa:</i> Sro. Ramon Marsà
		<i>Teyà:</i> Dro. Jacint Barrera
		<i>Vendrell:</i> Fino. Maria Julivert
		<i>Vich:</i> Sro. Pere Farrés
		<i>Vidreres:</i> Sro. Josep Macià
		<i>Vilanova i Geltrú:</i> Sro. Jaume Fort
		<i>Vilassar de Mar:</i> Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO-KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRE

Redaktoroj : Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Al la Kongreso kun fervoro

Novafaĵe la katalunaj esperantistoj renkontiĝos en unu el la kongresoj de nia Federacio, kiu tiel longatempе laboras en nia lando por la progreso de la lingvo internacia kaj novaĵe estos Insulo Majorko la scenejo de niaj festoj kaj kunvenoj.

En Palma, okaze de nia Kongreso de 1925, la kongresanoj faris tre firmajn paŝojn: ili promesis helpi la eldonon de Kataluna Antologio kaj ni efektive povis ĝin havi post kelka tempo. Sólter estu plia ŝtupo en nia progresado kaj ĝi havigu al ni la tiel ofte petitan materialon de propagando, tiel bezonatan de niaj propagandistoj, tiel necesan por la plua disvolvado de nia programo.

Al la Kongreso ni iru kun la deziro ĝui la belecon de la Insulo kaj ĉarmojn de niaj festoj, sed ni iru kun plano por nia estonta laboro. Se ni forĝos tiun ĉefan flankon de la Kongreso, ni eble multe ĝojos pro la travivitaj plezuroj sed pri la estonteco de nia enlanda movado ni eble havos okazon malĝoji post nelonga tempo.

Ĝi estus fermi la okulojn antaŭ abismo, se ni ne kuraĝus konstati, ke nia movado travivas tre danĝeran krizon. Ni trompus nin mem, se ni ne volus rimarki la malvarmiĝon de niaj batalantoj. Kaj ĝuste nun, kiam la internacilingva problemo estas rigardata ĉe ni kun simpatio kaj intereso, ŝajnas ke la esperantistoj malaperis kaj malatentas la favoran okazon.

La plej gravan kaŭzon de tiu krizo naskas tio ke la gvidantoj de niaj grupoj kaj de la Federacio mem estas ĉiam la samaj individuoj kaj pro tio

oni ja ne rajtas plendi, ke la konstante superŝarĝitaj batalantoj sentas sin lacaj kaj sopiras al ripozo. Krom tio oni facile povas konstati, ke nur tri-kvar individuoj portas sur siaj ŝultroj la tutan pezon de la laboro kaj nepre nia movado devas suferi la sekvojn de tiu tro limigita nombro da laborantoj, kiuj ne povas plenumi la postulojn de la organizo.

Al la Kongreso de Sóller ni iru kun renovigita fervoro. Ni portu al ĝi iniciativojn kaj sugestojn por la plua disvastigado de Esperanto en nia teritorio. Ĉiu kongresano devas atenti ke la plej bela festo de la kongreso povus esti laborkunsido plena de novaj ideoj, superŝutita de entuziasmo de la ĉeestantoj. Ni atentu tiun punkton kaj faru ke la Kongreso en Sóller donu al nia movado tiun rivigliĝon tiel necesan por la estonta plua irado de nia movado.

S. ALBERICH JOFRÉ



## Aŭtuna Elegio

En parko malgaje aceroj flaviĝas;  
Kaj sekaj folioj laŭ blovo de l' vento  
De sia parenca branĉet' deŝiriĝas  
kaj flugas en morta silento.

Tra densa nebulo, ĉielon kovranta,  
Simila al rondo senforma kaj pala  
Siu montras la suno, senvarme lumanta  
kaj ŝajnas mistera, fatala.

Marmoraj kolonoj de blanka verando  
Per floroj ne estas nun ĉirkaŭvolvitaj,  
Forvelkis kaj falis la bela girlando  
Al ŝtupoj malvarmaj, granitaj.

Sur longa aleo de l' parko mi iras.  
Sub miaj piedoj susuras folioj.  
Min la senrideta aspekto inspiras —  
Aperas ĉi tiuj linioj.

Kaj mi rememoras pri tempo somera,  
Pri floroj en haroj de bela knabino,  
Pri amo unua, pri ploro sincera,  
Pri longa sufero, pri fino...

N. V. NEKRASOV

## Vojiri kun la luno

de Prudenci Bertrana

Fidi al propraj kruroj, al propra vojo, kaj iri tra ĝi kun akompano de la luno, estas la plej granda ĉarmo ĝuebla por aventurema homo. Vojiri kun luno estas, el ĉiuj iradoj, la malplej laciga; ĝi estas por iremulo frandaĵo, tiu plej kara al animo, tiu kiu ĉerpas el vojiro vicon da mistero kaj sorĉoj. Kun luno ĉiuj vojoj ŝajnas al vi mallongaj kaj ĉiuj estas ornamitaj de revoj. Vi marŝadas frate akompanata de via ombro, milde detranĉita sur la blanko de la vojo fidele sekvataj de la arĝenta astro, kiu vin observadas kun siaj grandaj bonmienaj okuloj kaj ridetas al via kuraĝo, kun malfermita kaj admiranta buŝo. Sur la amasoj da ŝoseŝtonoj, la rubusujoj de la flankfosaĵo, kaj la herboj de la terdeklivoj, ĉiuj polvoplenaj pro la varmega intenseco de tagmezo, la luno ellasas la delikatecon de sia malvarmiga lumo. Vi rimarkas la foreston de la terura taga korpremo, de tiu revarmo de forĝejo kaj de tiu cindreca unutoneco kiu blindigas kaj sufokas vin. Preter vi, en kampoj, en montetoj kaj senkulturejoj, en arbaroj kaj rokaroj, la sama neĝado de palaĵoj komplete refreŝigas al vi pulmojn kaj rigardon.

Vi dankas al luno tiun konstantan prigardadon de viaj paŝoj, kaj admiras la sorĉan virton de ĝia spegulo, kiu resendadas al vi lumon filtritan kaj mildan, purigitan de trointensaĵoj kaj ardecoj.

Kaj lunlumo ankoraŭ pli agrablaj igas al vi la objektojn kaj vin distras kun la fantomjonglado de siaj kombinaĵoj, de siaj rebriloj kaj de sia malvigla pureco.

Ĉio vidiĝas kvazaŭ tra vualo: silka kaj arĝenta vualo, el senkompara kaj volupta poezio. Vojetoj ŝajnas kvazaŭ perlamoŝtuloj; blankaj farmodomoj dissemataj en la veluro de densaĵoj sendas al vi opalajn helecojn; fluantaj akvoj brilas kvazaŭ hidrargo kaj kvietaj akvoj kun la obsedanta pala mistero de larmujo, kaj graciaj nubŝiraĵoj flugas tra ĉielo kaj diseriĝas laŭ diskretaj brilaĵoj, dum ie ekfajras polurita surfaco de roko aŭ folio kaj treniĝas, preskaŭ apud la grundo, malpeza kaj kvazaŭ fuma nebulo.

Unutoneco de la ĉefvojo malaperas pro la kontrastoj de profundaj ombroj kaj de spacoj kiujn luno heligas.

De tempo al tempo vian progreson baras mola malhelaĵo: la vojo aspektas kvazaŭ tranĉita de abismo; sed enabismigonte, vi sentas vin vindataj de agrabla duonombro. Arbotrunkoj, rokoj kaj arbustoj, tie aspektas el nedifinebla monstreco. Ili vin iom imponas, kvazaŭ vi iradus inter stranga amaso da malgraciaj bestoj, endormiĝintaj laŭ perfortaj kaj minacaj sintenoj. Vi rimarkas ke luno vin forlasis, kaj, tamen, vi ĝin vidas kaŝigintan, vin sekvantan, malantaŭ la monto.

Vi dirus ke via amikino amuzas sin, ludante kaŝludon, per via timiĝo. Tuj poste vi ĝin ekvidas apud montardorso. Ĝi ludas la ritmon de viaj paŝoj: se vi saltetas, ĝi saltetas: se vi kaŝriĝas, ĝi kaŝriĝas. Jen tie ĝi tute

vidiĝas; tie ĉi nur peco; vi rigardante kun gajeta mieno de petola infano.

Kelkafoje ĝi kvazaŭ glitadas sur la rokopintoj; alifoje, batalas kontraŭ dornaĵoj; penetras tra branĉaro; ekfagras en la maldensaĵoj kvazaŭ granda kolorluma fajrkandelo; elreliefiĝas absurdajn gestojn de gigantaj arboj; kaj iam, apenaŭ sukcesas hele traguti inter la punktoj de foliaro.

La daŭro de vojirado mallongiĝas pro varieco de tiu spektaklo.

Poste ebenaĵo venas: granda sinsekvo de bluaj nuancoj. Montoj en horizonto apenaŭ siluetiĝas super ĉielo, kie vibradas luna lumpolvo; grenoj dormas sub ŝirmo de ondiĝanta elvaporado; lumkontrastoj de la arbaro estas milde moderaj; milioj verdas per freŝega kaj malvarmiga verdo, kaj agavoj kaj poploj kvazaŭ ŝtelas al lumo ilin karesanta, iom el ĝia argento.

Kaj la vojo antaŭ vi longiĝas, sen tio ke ĝia longeco, nek malesperiga rekteco, vin ĉagrenas. Kuu luno, ebena vojo aspektas dekliva: tio estas pruvita iluzia efekto, bona servo kiun noktaj vojirantoj dankas al sia akompanantino. Kaj suprendeklivoj ankaŭ sin kaŝas en tiu reva malprecizeco de la pejzaĝo. Ofte, la vojo, antaŭ vi, surgrimpas monteton. Grizo de heligitaj arbustoj kuniĝas kaj miksiĝas kun duongriza nuanco de ĉielo kaj nuboj, kaj tiam la hela rubando de ĉefvojo kvazaŭ prenas allogan aranĝon de transsaltilo por ensalti en la stelplenan malplenaĵon.

Nenio komparebla, laŭ ideala beleco, al vojirado en lunlumo tra senhoma arbaro, en profundaĵo, aŭ laŭlonge de rivero. Tio estas rigardadi vicon da vizioj el senkompara fantazia beleco. Ombroj estas faritaj el teruro, alloganta teruro de knabo songanta siajn unuajn erotikaĵojn en scenejo de arbara sorĉejo. En impona kaj nigra densaĵo de foliaro, en grandaj dornoplennaj internaĵoj, ekvidiĝas tremetantaj makuloj kaj pale blankaj figuroj, tute similaj al karnoj de nudaj dancistinoj; interne, plej profunde, kelkaj strekoj de intensega heleco aspektas kvazaŭ gardantaj noktlampo, el nekonataj ritoj; flankoj troplenigitaj de rulŝtonetoj, litoj el perloj; herbaj tufoj randotranĉitaj de la luno, riĉaj kaj larĝaj edziĝlitoj, kie nevideblaj estas la edziĝpetolaĵoj, kaj kie ŝajnas ankoraŭ vidiĝi elstaranta ornamaĵo de helaĵoj: vasta lando de feinoj kaj gnomoj, de misteroj kaj sorĉaĵoj. Kaj de tie vin alfluas agraĵaj elspiroj, miksaĵo de tiu ellasita de apenaŭ videblaj arbarfloretoj, de elvaporigoj de malseka sablaro, de ŝlimo kaj sekaj foliaĉoj, kiuj elspiras ankoraŭ la tagan varmiĝon.

Poste, kvietaj kaj endormiĝintaj vilaĝoj pasas. Luno desegnas sur la stratoj la elstarajn de la malegalaj tegmentoj. Vi aŭdas en domoj ronkadon de bestoj, kaj eĉ malantaŭ fenestro malalta, tiun de astma maljunulo. Kato trairas la helan rubandon kaj kaŭras sin sub ĉaro kaŝata en la potenca konstruaĵo de ombroj kiuj dividas la vojon. Vi vidas palan lumon kiu gardas eble la febron de malsaneta infano Ĝi brilas post kurteno de fenestreto, kie floras polvoplenna diantujo. Vi malrapidiĝas vian marŝon kun deziro esplori la destinon kiu minacas tiun estaĵon. Sed luno, supre, en ĉielo, vin rigardadas. Ĝi haltis kiel vi mem, trankvila, ridetanta, iom sarkasma, invitanta vin preteriri la doloron, ĉar tiuj kiuj iras sur vojoj de la tero, same

kiel astroj kiuj travagas la spacon, ne povas esti sentimentalaj nek la morton devojigi.

En senhoma loko vi respertas solenan impreson de la ebenajo vadanta en malprecizaj helaĵoj. Silenton de la nokto rompas hundobojado. Staranta sur la pinto de telegrafa fosto, salutas vin strigo al kiu luno komandas optimismon. Facila venteto harmonie sonorigas la ferfadenojn. Vi preteriras limŝtonon kiu atestas duonmejlon. Kun kaduka avideco ĝi kliniĝas en apudan vinberkampon, sur la pli alta vojborde. Akvoj de la vojfosajo kun jaroj kaj pluvoj ĝin subfosadis. Pli poste vi renkontas ponton. Luno oblikve ĝin heligas, kaj en la torentoj la ombro de la arko deformiĝas kaj tordiĝas inter la ŝtonoj. Resono de viaj paŝoj sur sonora arko de la ponto, silentigas impertinentajn ranojn.

Kaj tiuj signifaj epizodoj de la vojo ornamas al vi nokton, kiu trakuras rapide kaj amike. Sunleviĝo elrozas. Malproksime sonoras, kaj korvo traflugas, traflugas stulte timema.

Luno paliĝas delikata kaj verdeca, kun maldiafana brilo de malpolurita kristalo, enŝovita en la violkoloran horizonton.

Kaj atinginte vian hejmon, sendanke vi ĝin forfermas.

Trad. el kataluna  
MARIAN SOLÁ



## Ŝtelĉasisto kaj Ĝendarmo

Hugo estis ne nur granda ŝtelĉasisto, sed ankaŭ granda ruzulo. La tagon antaŭ la malfermo de la ĉasado li sidis kun la ĝendarmo Grimpo kaj kelkaj amikoj ĉe glaso da vino.

«Ĉu vi tiun jaron ankaŭ jam flaris ĉamrostajon, Hugo?» ŝercdemandas la ĝendarmo.

«Certe, jes».

«Kiom da virĉamoj vi kaptis?»

«Dek virĉamojn kaj ses ĉaminojn».

«Vere? Kaj tion vi diras al mi tiel senĝene!»

«Grimpo, ne faru malbonajn spritaĵojn. Pruvu al mi, ke mi mortpafis ilin!»

«Diru al mi serioze, kiom da ĉamoj vi ŝtelĉasis tiun jaron?»

«Ĝendarmo, antaŭe diru al mi serioze, kiom da ŝtelĉasistoj vi kaptis?»

Ĉiuj ridas. Grimpo eksilentas.

«Vi, ĝendarmo, morgaŭ la ĉasado malfermiĝos. Tiam la homaĉoj kun siaj ĉaspermesoĵ supreniros la montojn kaj forpelos la bestojn al mi. Mi

volas savi por mi tiom, kiom mi povos. Morgaŭ frumatene mi iros ĉasadi».

«Ne tro fanfaronu!»

«Tiel certe, kiel mi nun malplenigas tiun glason ĝis la fundo, mi morgaŭ ĉasos ĉamojn. Mi supreniros en la Altvalon. Ĉe la Ŝtonkorno mi malkovris belan aron da ĉamoj».

Li malplenigas sian glason. La ĝendarmo leviĝas kaj kolerigite eliras el la ĉambro.

«Ĝi tiun burleskulon mi morgaŭ tiel mistifikos, ke li ankoraŭ je Kristnasko konvulsie spiregados, ridas Hugo kaj la ceteraj kunridas.

Dum la nokto li efektive suprengrimpas al la Altvalo kaj kiam la suno leviĝis, li kuŝas en la rokoj de la Ŝtonkorno. Depost multaj tagoj li zorge esploradis le venadon kaj iradon de la bestoj. Ĉi tien ili devas veni. Li troviĝas en embusko kaj spione observas.

Unu horo pasis. La sangoruĝa disko de la suno malrapide leviĝadas de post la disŝiritaj rokaĵoj. Subite lia delikata orelo ekaŭdas, el la profundegaĵo, la faladon de ŝtonetoj. Apenaŭ aŭdeble grincadas la malmola rokaro. Malrapide ili suprenvenas, unu post la alia, sed konstante alproksimiĝadas.

Kiam la unua ĉamo, pafita en la bruston, alten saltas kaj la eĥo de la pafado tondradas ien kaj reen inter la rokmuroj, la tuta aro dum momento ekhaltas kvazaŭ sorĉita. Embarasite ili ĉirkaŭrigardas kaj enspiras la aeron en siajn naztruojn. El kie minacas la mortdanĝero? Ili ne flaras la pafiston, sencele kuradas tien kaj ĉi tien kaj subite malaperas flanken.

Forta ĉamino rapidas tute proksime preter Hugo.

«Haltu!» li ekkrias.

Ŝi surprizege haltas momenton kaj samtempe la mortiga kuglo atingas ŝin. Ankoraŭ kelke da saltoj kaj ŝi teren falas. Li portas ŝin tien, kie kuŝas la unua. Poste li malrapide komencas senigi ilin de la intestoj; tiam li surmetas la ĉasaĵon sur siajn ŝultrojn kaj zorge malsupren grimpas.

Kiam li, post penega grimpado, pasis la plej krutajn rokojn, li iom ripozas kaj kaŝas la bestojn sub grandaj ŝtonplatoj. «Nun li venos baldaŭ. Li certe venos». Li spionrigardadas en la valon. Tre malproksime sur la deklivo li ekvidas nigran punkton. Per la lorneto li ekkonas la ĝendarmon.

«Mi volas rapidigi lin». Li ekprenas la pafilon kaj pafas en la aeron. La viro en la profundo ekhaltas kaj surprizegite ĉirkaŭokulumas.

«Nun li ekvidis min. Baldaŭ li do ŝvitos. Mi ankoraŭ volas fortigi min». Trankvile Hugo eltiras manĝaĵon kaj botelon el la poŝo kaj komforte kuŝiĝas sur la ŝtonaĵo. «Estas tamen plezuro, ĉasadi ĉamojn kiam la ĝendarmo ĉeestas!»

La suno agrable varmigas lian vizaĝon. Li oscedas kaj apogas sian kapon sur la brakojn. Preskaŭ li endormiĝas.

«Oho, Hugo, kion vi faras?» li diras al si mem kaj subite stariĝas. Kelkajn centojn da paŝoj malsupre de li la ĝendarmo ekaperas.

«La frenezulo ja kuras kiel ŝtelisto! Nu, atentu! Mi lin bone kondukos!»

Li turnas la internon de sia jako eksteren, survestas ĝin tiamaniere kaj kloŝas nigran kapuĉon sur sian kapon, tiel ke nur la duona vizaĝo restas videbla. «Ĉi tiun homon Grimpo certe ne konas!»

Nun li komencas suprengrimpi. La ĝendarmo lin ekvidas kaj rapidigas siajn paŝojn. Komence Hugo marŝas malrapide por ke la ĝendarmo venu pli proksimen. Iom post iom li grimpas pli rapide. La persekutado bele ekfunkcias. Ambaŭ supreniras en la sama sulkego. Jen unu, jen alia ekaperas de malantaŭ bloko kaj subite denove kaŝiĝas. Tio daŭras duonan horon.

Hugo ŝvitas. La persekutanto persistas.

Subite la ĉasisto nevidite surgrimpas la flankan eĝon de la sulkego, trairas la apudan sulkon kaj en la tria longsalte rapidegas malsupren.

Kiam la ĝendarmo ne plu vidas sian ĉasaĵon, li estas momenton surprizita. Sed tuj li divenas la ruzon. Li malsuprensaltadas en la dua sulkego, por, se eble, alveni la unua malsupre kaj tie spione atendi la alian. Kru-ta roka eĝo troviĝas inter ili. Grimpo estus perdinta tro da tempo, se li ĝin ankaŭ surgrimpus.

Kiam li alvenas ĉe la alirejo de la sulkego, aŭdiĝas forta ĝojkrio de malproksime supre. La ĉasisto nevidite survoje turniĝis kaj resupreniris.

La ĝendarmo pro kolero sangmordas siajn lipojn. Sed cedi li ne volas, nepre ne! Li do denove suprengrimpas, spiregante kaj kun ruĝa vizaĝo.

Hugo atendas ĝis kiam li ree estas proksime. Nun li grimpas flanken el la rokoj kaj atingas herbejon. Li oblikve suprenmarŝas. La ĝendarmo sekvas ne tre malproksime. Ĉi tie la marŝado estas relative facila.

Ambaŭ kuradas per ĉiuj siaj fortoj. Baldaŭ la paŝtejo kuŝas post ili. Krutaj rokmuroj ŝajnas bari la vojon. Sed sur la mallarĝa listelo de akvo-kondukilo Hugo sukcesas antaŭeniri.

Subite li renkontas stakon da pinbranĉoj metitaj sur la kondukilon por protekti ĝin kontraŭ falantaj ŝtonoj. Penso ekfulmas en lia kapo. Li kuŝiĝas, penege rampas sub la branĉojn kaj tie restas sub bonega kovrilo, kunpremanante perforte sian spiregantan bruston.

Post nelonga tempo li aŭdas la pezajn paŝojn kaj la fajfantan spiregon de sia persekutanto kaj nun li sentas sur sia dorso la paŝon de la najlitaĵ ŝuoj. La ĝendarmo sensuspekte kuras super la dorson de la ŝtelĉasisto. «Li eltenas longe», pensas Hugo.

Kiam li ne plu aŭdas la paŝojn, li pene elvenas de sub la branĉoj kaj sur la kondukilo li reiras la saman vojon, kiun li estas veninta. Poste li ekpafas el sia pafilo. Tuj la ĝendarmo returniĝas. Hugo supren kuras la krutan paŝtejon kaj supre li elĉerpote sidiĝas sur ŝtonon. «Nun sufiĉas, alimaniere mi mem forspiregas la pulmon el mia brusto».

Fine ankaŭ Grimpo alvenas. Li havas kankreruĝan vizaĝon, ĝemegas kiel vundito, tusegas kaj preskaŭ ne plu kapablas rekte stari.

«Estas do tamen vi, malbenita Hugo», fajfspiras li. «Fine mi vin kaptis, kondamnita ŝtelĉasisto! Dum jaroj mi spionadis vin. Nun oni ridos pri vi en la valoj kaj sur la vojoj».

«Aŭdu, Grimpo, lasu min libera! Mi donos al vi ambaŭ ĉamojn».

«Kiel, ĉu vi ankoraŭ volas subaĉeti min? Tio kostas multe al vi!»

«Estu frankvila, Grimpo, prenu la ĉamojn! Poste ili ne plu estos haveblaj».

«La granda sinjoro! La ĉamoj nepre apartenas al mi! Formetu la pafilon! Kaj nun antaŭen, en la vilaĝon, fripono vi».

«Mi restas ĉi tie».

«Ĉu vi efektive ne volas obei? Ĉu mi perfortu?»

«Vidu ĉi tien, Grimpo, mi montros al vi ion gajigan!»

Malrapide li tiras falditan karton el sia poŝo.

«Hodiaŭ estas la unua tago de la ĉasado. Sinjoro ĝendarmo, jen mia ĉaspermeso».

Grimpo staras kvazaŭ trafita de fulmo. Poste li elpuŝas el inter la grincantaj dentoj: «Vi malbenita fulmotondro vi, kial vi do kuradis?»

«Sinjoro ĝendarmo, kie estas skribite en la leĝo, ke la kurado estas malpermesita?»

JAKOBO SCHMID

## XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5-6-7 junio 1927

Niaj lastaj numeroj donis jam la diversajn informojn necesajn por aliĝi kaj partopreni nian baldaŭ okazontan Kongreson de Sóller. Por eviti erarkomprenojn ni donas ilin denove hodiaŭ kun speciala peto ke oni atentu ilin bone kaj ke ĉiu partoprenonto plenumu kiel eble plej baldaŭ sian devon.

La Organiza Komitato interkonsentis kun «Empresa Soler» difinitan prezon enhavantan la vojaĝojn, gastadon, ekskursojn k t. p. (vidu la martan numeron). Tiuaj prezoj (ptoj. 185, 150, 110, 75, 65, 50 laŭ klaso) postulas antaŭan enskribiĝon. Ĉe la enskribiĝo oni devas pagi kiel garantion 10 ptojn. La enskribiĝon oni povas sendi al K. E. F. str. València, 245, Barcelona aŭ oni povas turni sin al Apoteko Bartomeu, str. Tallers, 81 (apud placo Universitat) Barcelona, kie oni akceptos enskribiĝojn.

La diversaj enskribiĝintoj devos pagi la tutan koston de la budĝeto antaŭ la 1-a de junio. La biletojn por la vojaĝo, gastado ktp, oni povos ricevi ĉe la sidejo de KEF, la 3-an kaj 4-an de junio, matene je la 10-12 aŭ posttagmeze 16-18 horo.

Tiu, kiu ne volas aliĝi al la oficiala karavano, povas aĉeti la vojaĝbiletojn ĉe Companyia Transmediterrània, Via Layetana, 2. Barcelona. La biletojn oni povas akiri unu tagon antaŭ la vojaĝo aŭ la saman tagon, matene de la 10-a ĝis la 12-a. La prezo de la vojaĝo Barcelona-Palma estas laŭ klaso; ptoj. 52.60, 33.85, 10.25, 10.75, (Ceterajn informojn vidu en nia februara numero).



Partvidaĵo de Sóller




Aspekto de la haveno de Sóller




Biniaraix (vilaço apud Sóller)




«Mirador» (rigardejo) de Biniaraix




Kampardomo



Farmdomo «Binibissi»



«Morro de sa vaca» (marbordo de Mallorca)



Vidaño de «Torrent de Pareis»

*Oficiala forveturo de Barcelona.*

Sabaton 4 de junio je la 20.30.

La vaporŝipoj de Companyia Transmediterrània staras dekstre de monumento Kolumbo, je cent metroj proksimume, (ŝipo «Mallorca»).

## KONGRESAJ SCIIGOJ

*Oficiala Festeno.*—La kutima festeno, kiun ni havas ĉiujare sub la prezido de la Reĝino de la Floraj Ludoj, postulas antaŭan enskribiĝon, kiun oni povas sendi jam nun al la O. K. Sro. Miquel Arbona, str. Batach 34, Sóller. La pagon oni povos fari ĉe la Akceptejo, ptoj. 12.50. (Menuo: rizo, langusto, rostaĵo, salato, glaciaĵo, fruktoj, ĉampano, ktp.)

*Kongreslibro kaj insigno.*—La O.K. presigis belan Kongreslibron priskribantan la ĉarmajn lokojn de la kongresurbo kaj enhavantan multajn gravuraĵojn el Sóller kaj ĉirkaŭaĵoj. Ĝi ankaŭ preparis belan insignon. Ĉiu kongresano povos ricevi la libron kaj insignon ĉe la akceptejo prezentante la membrokarton de KEF. aŭ la kongreskarton.

*Membrokartoj.*—Ili estas jam senditaj al la grupoj, kiuj pagis la unuan kvaronjaron 1927. Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, rapidu kvitigi sian ŝuldon por tuja ricevo de la membrokartoj. Al la izolaj aliĝintoj ni sendas la membrokarton kun tiu ĉi numero, se ili estas abonantoj de K. E., aŭ per la poŝto, se ili ne estas abonantoj. La grupoj bonvolu stampi la kartojn kaj surskribi la nomon de la membro. (Vidu regulon VIII de nia regularo).

*Standardoj.*—La O. K. petas la diversajn grupojn, kiuj havas standardon, ke ili bonvolu ilin preni kun si al Sóller por helpi la kutimajn propagandajn manifestaciojn kaj kunvenejojn.

*Delegitoj de Grupoj.*—Ĉe la Malferma Kunsido ili bonvolu prezenti siajn rajtigilojn. Se ili rajtas voĉdoni por la membroj de la reprezentata grupo ili deponu ĉe la kongresa sekretario la membrokartojn. Post la parolado de la prezidanto ili povos fari la kutiman salutparoladon al la Kongreso.

*Labora Kunsido.*—Ĉe la Malferma Kunsido oni anoncos la tagordon. Proponojn kaj sugestojn oni sendu al la sekretario de KEF, aŭ senpere al la O. K. Oni ricevis inviton de Navàs por la Kongreso de 1928. Aliaj urboj dezirantaj akcepti la XV skribu baldaŭ al la sekretario de KEF.

*Ekzamenoj.*—Se oni ricevos enskribiĝojn, ili okazos en Sóller sub la kutima programo de nia Federacio. Bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ al O. K.

*Ekspozicio.*—La O. K. organizis propagandan ekspozicion. Ĝi petas ĉiujn amikojn ke ili helpu la sukceson de la ekspozicio sendante propagandan materialon. kiun oni resendos post la Kongreso. Kun danko oni ricevos poŝtkartojn, librojn, broŝurojn, afiŝojn. ktp.

*Kongresa adreso.*—Organiza Komitato de la XIV Kongreso de KEF. Sro. Miquel Arbona, str. Batach, 34, Sóller.

## BILANCO DE K. E. F.

de la 1.<sup>a</sup> Julio 1926.<sup>a</sup>, ĝis la 15.<sup>a</sup> Majo 1927.<sup>a</sup>

ENSPEZOJ:	Saldo, en la 1. <sup>a</sup> Julio 1926. <sup>a</sup> . . . . .	654'25	
	Donacoj. . . . .	255'—	
	Vendo de K. E., ŝlosiloj, vortaroj, k. a. . . . .	45'50	
	Kvitancoj, (kotizoj kaj abonoj) . . . . .	<u>1.736'90</u>	2.691'65 ptoj.
ELSPEZOJ:	Eldonado de «Kataluna Esperantisto» . . . . .	1.881'—	
	Poŝtmarkoj, por alsendo de K. E. kaj aliaj korespondaĵoj . . . . .	220'40	
	Al la Konstanta Rezentantaro de la Esp. Mov., nia kotizaĵo de 1926. <sup>a</sup> . . . . .	150'—	
	Ĝeneralaj elspezoj. . . . .	<u>80'40</u>	2.331'80 ptoj.
	Saldo, en la 15. <sup>a</sup> Majo 1927. <sup>a</sup> . . . . .		<u>359'85</u> Ptoj.

JAUME HERP, *kasisto*

## P R O G R A M O

## UNUA TAGO (5 junio)

- Je la 8.50: Alveno de la kongresanoj.
- Je la 10-a: Malfermo de la Kongreso ĉe la Urbdomo.
- Je la 11. 30: Malfermo de la ekspozicio de esperantaĵoj.
- Je la 12: Meso ĉe la paroĥa Preĝejo.
- Je la 15. 30: Vizito al la Biblioteko de «Foment de Cultura de la Dona».
- Je la 17. 30: Vizito al «Coves (kavernoj) dels Estudiants» kaj promonado tra la ĉirkaŭaĵoj de Sóller.

## DUA TAGO (6 junio)

- Je la 8. 30: Labora kunsido en la sidejo de Esperantista Grupo Sollerie (str. Reial 15).
- Je la 10: Festo de la Floraj Ludoj en la teatro «Defensora Sollerense».
- Je la 13: Oficiala Festeno ĉe Restoracio Ferrocarril.
- Je la 16: Ekzamenoj kaj ferma kunsido en la sidejo de la nomita grupo
- Je la 21. 30: Muzikvespero ĉe sociato «La Unión» honore al la kongresanoj. Oni kantas La Espero'n.

## TRIA TAGO (7 junio)

- Je la 7: Marekskurso al «Torrent de Pareis» (Oni revenos je la 13-a).
- Je la 17: Adiaŭkunveno en la sidejo de Esp. Grupo «Sollerie».
- Je la 18: Forveturo de Sóller al Palma kaj enŝipiĝo en Palma.

## XIII Internaciaj Floraj Ludoj

VERDIKTO

## ORDINARAJ TEMOJ

## ORIGINALAJ TEKSTOJ

## I. Versaĵo kantanta amon.

*Natura Floro - Ĉefa Premio.*

La verko N.<sup>o</sup> 105, devizita «Bergerac» atingis la ĉefan honoron poezian. Menciindaj estas apud ĝi, N.<sup>o</sup> 100, «Varmkora; N.<sup>o</sup> 13, «Strofoj por Toska» kaj N.<sup>o</sup> 2, «Kiu el vi estas senpeka».

## II. Proza amo verkajo.

Premiita: N.<sup>o</sup> 48, «Kun kuraĝo kaj volo antaŭen!»  
Menciinda: N.<sup>o</sup> 147, «Vera amo subigas eĉ la morton».

## TRADUKITAJ TEKSTOJ

## I. Esperantigo de kataluna versaĵo.

Premiita: Neniu.  
Menciinda: N.<sup>o</sup> 83, «Kaj knabo iĝis viro».

## II. Esperantigo de kataluna prozaĵo.

Premiita: N.<sup>o</sup> 159, «La lastaj estos la unuaj».

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

LIBERVOLAJ

## ORIGINALAJ TEKSTOJ

## LONGAJ VERSAĴOJ

100 pta. premio de Ĝia Moŝta Urbeŝtraro de Sóller.  
Premiita: N.<sup>o</sup> 108, «Aŭtunas».  
Menciindaj: N.<sup>o</sup> 22, «Gloria in Excelsis et in terra pax»; N.<sup>o</sup> 1, «Pax».

## MALLONGAJ VERSAĴOJ

50 pta. premio de S-ro Narciso Bofill, 50 pta. premio de S-ro Prez. de K. E. F., 50 pta. premio de S-ro Direkt. de K. E. kaj 50 pta. premio de Esp. Klubo Palma.

Premiitaj: N.<sup>o</sup> 100, «Varmkora».

» 42, «Vivo glate ne fluas-ĉiam batas kaj skuas».

» 41, «Se ĵetos mi».

» 13, «Strofoj por Toska».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 44, «Vivon travivi estas art' malfacila». — N.<sup>o</sup> 104, «Lamillag». — N.<sup>o</sup> 66, «Paroli kiel oni pensas, agi kiel oni diras». — N.<sup>o</sup> 43, «Kion la koro sentas lango prezentas». — N.<sup>o</sup> 85, «Ĉu?» — N.<sup>o</sup> 2, «Kiu el vi estas senpeka». — N.<sup>o</sup> 11, «Ĉu la bestoj ankaŭ havas animon?» — N.<sup>o</sup> 5, «Semper Idem». — N.<sup>o</sup> 101, «Nordinsulo». — N.<sup>o</sup> 98, «Malproksima».

#### LONGAJ PROZAĴOJ

100 pta. premio de la Komitato de K. E. F.

Premiita: N.<sup>o</sup> 7, «Gedanken sind zollfrei».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 18, «Nur pensoj iras trans limo sen pago kaj timo». — N.<sup>o</sup> 52, «Procede et semper, Italia, semper». — N.<sup>o</sup> 140, «Dulce loquentem Lalagen amabo, Dulce ridentem». — N.<sup>o</sup> 126, «Estas mi». — N.<sup>o</sup> 87, «Mi esperu». — N.<sup>o</sup> 127, «Orskarabo kaj Libelo».

#### MALLONGAJ PROZAĴOJ

50 pta. premio de «Barcelona Esp. Societo».

50 » » » «Du Sennomuloj».

50 » » » Grupo «Lumon» el Terrassa.

Premiitaj: N.<sup>o</sup> 152, «cosny + isiny = (cosy + isiny).

» 23, «Ĉu premion, ĉu nenion?».

» 147, «Vera amo subigas eĉ la morton».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 37, «Drommedaris». — N.<sup>o</sup> 141, «Gimnaziano». — N.<sup>o</sup> 6, «Pasero sperta ne bezonas averton». — N.<sup>o</sup> 119, «La Tineo». — N.<sup>o</sup> 40, «Unua peko». — N.<sup>o</sup> 134, «Kiom?» — N.<sup>o</sup> 124, «La malnova birdo». — N.<sup>o</sup> 133, «Supren». — N.<sup>o</sup> 125, «La bufo». — N.<sup>o</sup> 25, «Jen ankaŭ proza ama verkaĵo».

#### TRADUKITAJ TEKSTOJ

##### LONGAJ VERSAĴOJ

100 pta. premio de Esp. Grupo «Sollerik».

Premiita: N.<sup>o</sup> 21, «Skulanco».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 86, «Sentencoj de l'Prioro». — N.<sup>o</sup> 17, «Vortinda». — N.<sup>o</sup> 117, «Vivu la humoro». — N.<sup>o</sup> 138, «Vanitas vanitatum et vanitas omnium».

##### MALLONGAJ VERSAĴOJ

50 pta. premio de privataj Terrassanoj.

Premiita: N.<sup>o</sup> 61, «Kavaliro de Sinjorino».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 156, «Konfido». — N.<sup>o</sup> 153, «Mia koro». — N.<sup>o</sup> 88, «El la amo fontas feliĉego kaj malespero».

## LONGAJ PROZAĴOJ

100 pta. premio de D-ro. R. Torres Carreras.

100 » » » Banc Peninsular.

Premiitaj: N.<sup>o</sup> 14, «Odi et Amo».

» 35, «Ni restu fidelaj al la Fundamento».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 78, «Bonhumoro kaj Gajeco». — N.<sup>o</sup> 10, «Panem et Circensis». — N.<sup>o</sup> 27, «Valentino». — N.<sup>o</sup> 51, «Ni malkonfidu ŝajnaĵojn». — N.<sup>o</sup> 114, «Libero». — N.<sup>o</sup> 151, «Familio estas lernejo de amo». — N.<sup>o</sup> 34, «Fidricus Rex». — N.<sup>o</sup> 149, «Du ĉapitroj plu».

## MALLONGAJ PROZAĴOJ

50 pta. premio de S-ro. J. Barceló.

50 » » » «Bela Espero».

50 » » » «Verda Stelo».

5 — jara abono, premio de «Heroldo de Esperanto».

Premiitaj: N.<sup>o</sup> 81, «Ho Virina koro, kiu kapablas diveni viajn decidojn».

» 120, «Encikliko».

» 112, «Homo serĉu la homecon».

» 53, «Elisabeth».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 46, «Bone faru kaj diri lasu». — N.<sup>o</sup> 47, «Paco kaj feliĉo per Esperanto». — N.<sup>o</sup> 79, «IX Simfonio». — N.<sup>o</sup> 82, «Manila». — N.<sup>o</sup> 137, «Homaron vi kreis perfekte kaj bele!» — N.<sup>o</sup> 77, «Multaj estas vokitaj, sed nemultaj elektitaj». — N.<sup>o</sup> 71, «Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo».

## DIDAKTIKAJ VERKOJ — LONGAJ

100 pta. premio de Crèdit Balear.

Premiita: N.<sup>o</sup> 16, «Al la edukistoj de la Tero».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 63, «Ne ekzistas landlimo por la doloro, nek por la amo». — N.<sup>o</sup> 76, «La stelaro». — N.<sup>o</sup> 113, «Amiko, studadu». — N.<sup>o</sup> 36, «Socius».

## MALLONGAJ

50 pta. premio de «Ĝerona Espero».

Premiita: N.<sup>o</sup> 29, «Laŝon».

Menciindaj: N.<sup>o</sup> 94, «Mi servas». — N.<sup>o</sup> 24, «Lingva studo, por lingva studado». — N.<sup>o</sup> 12, «Laŭnatura edukado». — N.<sup>o</sup> 69, «Scio estas fundamento de saĝeco». — N.<sup>o</sup> 64, «Se per angoro kunpremata estas la koro, ridu, frato».

## DIFINITAJ TEMOJ

Temo-Premio de «Kataluna Esperantisto».

**Natura evoluo de Esperanto.** — Dumviva abono.

Premiita: N.º 115, «Ne povas ĉiu homo esti Pap' en Romo».

Temo-Premio de «Internacia Radio-Revuo».

**Kion kaj kiel mi aŭdas per radio** — Dumviva abono.

Premiita: N.º 109, «Mondvojaĝo de fervora oratoro».

Menciinda: N.º 116, «Ekbrilu hispana suno».

Temo-Premio de «Espero Katolika».

**Dia amo.** — Dumviva abono.

Premiita: N.º 129, «Se iu diras «mi amas Dion» kaj sia fraton li malamas, tiu estas mensogulo».

Temo-Premio de «Katolika Mondo».

**Esperanto kiel moderna latino.** — Kvinjara abono. Ne konkursita.

Temo-Premio de «Paco kaj Amo» el Barcelona.

**Kiel ni sukcesigos niajn kursojn.** — 50 ptoj.

Premiita: N.º 45, «Ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto».

Menciinda: N.º 49, «Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos».

Temo-Premio de S-ro. Jaume Grau Casas.

**Studo pri lingvo kaj literaturo de iu malgranda popolo.** — 50 ptoj.

Premiita: N.º 62, «Abéri txikia, Geurea baña».

Menciindaj: N.º 54, «La plej bonaj kantbirdoj estas malgrandaj. — N.º 73, «Je maintiendrai». — N.º 106, «Bela Espero».

### RIMARKIGOJ!

Se iu el la aŭtoroj de la nomitaj verkoj sendis pseŭdonimon, bonvolu tuj klarigi al ni sian veran nomon.

La laŭreato per la Natura Floro, plej honora premio, rajtas elekti la Reĝinon de la Solena Festo kiu okazos dum la proksima Kongreso de K. E. F. en Sóller. Li ankaŭ rajtas enspezi 50 ptojn., sumon donacitan de nia malavara amiko S-ro. Teo Jung por helpo al la ĉefa laŭreato, se li alveturas la Florludan Feston el eksterlando.

DELFI DALMAU

Sekr. de la XIIIaj. F. L.  
Carrer València, 245 — Barcelona

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

## Diversaĵoj

**Fermo de kurso en Akademio «Cots».**—La 10-an de la kuranta monato havis okazon en la nomita akademio la fermo de la kurso de Esperanto organizita de KEF. Sub la prezido de Sro. Cots okazis la solena fermo de la kurso, kiu sub la gvido de Sro. Josep Alberich tiel sukcese disvolvigis dum la antaŭfiksita trimonata kursperiodo.

Oni donacis belan diplomon al ĉiu kursano kaj valoran premion al kelkaj gekursanoj, kiuj montris apartan perfektigon kaj lernemon.

Ni kore dankas la diversajn helpintojn en la kursorganizo kaj aparte al la direktoro de la Akademio, Sro. Cots, kiu tiel bonvole akceptis la organizon de la kurso kaj efike helpis por ĝia kontentiga sukceso.

**Nova kurso.** — En la Esperantista Societo «Nova Sento» komenciĝis nova kurso de Esperanto gvidata de la profesoro de ĉi tiu Societo Sro. Artur Domènech Mas. 40 lernantoj atente aŭdas la facilan paroladon de ĉi tiu fervora samideano.

**Al la Interŝanĝistoj Filatelistoj kaj Kolektistoj de poŝtkartoj.**— Laŭ pluraj petoj, ni proponas la kreadon de vasta asocio por permesi al ĉiulandaj kolektistoj reciprokan interkonatigon instigantan al ĉiuspecaj interŝanĝoj.

Tiu-ĉi asocio posedos sian propran gazeton redaktotan franclinge kaj esperante. La gazeto enhavos la liston de ĉiuj membroj kaj ankaŭ informojn pri aperoj de poŝtmarkoj kun konsiloj de spertaj kolektistoj. Se, kiel ni esperaj, ni ricevos ĉiujn helpojn, kiujn ni antaŭvidas, la unua numero de tiu-ĉi bulteno — kompreneble rezervata nur por la anoj — aperos proksime.

Jam dank' al niaj personaj rilatoj en esperantaj rondoj, ni estas certigataj pri multaj aliĝoj en diversaj landoj.

Diru plue ke estos senpaga la aliĝo sed la anoj devos aboni la monatan bultenon. Abonprezo en Franclando : 8 franc. frankoj malplikarigita al 6 fr. frankoj por abonantoj de B. T. F. C. kaj membroj de U. E. A. (aliaj landoj: 14 kaj 12 fr. frankoj).

Diversaj premioj, speciale pligrandigoj de la abontempo kaj eĉ dumvivaj abonoj, estos *donataj* al la anoj kiuj akirigos pli da 3 novaj aliĝoj.

Aliparte por la kolektistoj ne konantaj francan aŭ esperantan lingvojn, aperos speciala multlingva kodo.

Ĉiu filatelisto intencanta riĉigi sian albumon sen multaj kostoj interŝanĝe de siaj propraj «duobloj», ĉiu kolektisto de ilustritaj kartoj deziranta tutmondan korespondadon bonvolu sendi al ni sian aliĝon, konigante nur la celon kaj la kondiĉojn de sia propono pri interŝanĝado.— LÉVY. 45, rue Courloison. Provins (S. et M.)

**Esperanto en Radio Barcelona.** — La 25-an de la kuranta monato, je

la 20.30, hispana somera horo, parolodos D-ro Bartomeu pri «Utileco de Esperanto ĉe la farmaciistoj.

**Pri tutmonda lingvo.** — Nia Esperanto estas filo aŭ, se oni preferas, sintezo de niaj indo-eŭropaj lingvoj. Lastatempe kelkaj revemuloj — cetero tute ne lingvistoj — opiniis, ke tio tute ne sufiĉas kaj ke internacia lingvo devus esti la sintezo de ĉiuj kulturaj lingvoj uzitaj en la mondo: «tutmonda» lingvo. Poste, kiam ni interrilatigos kun la loĝantoj de la planedo Marso, oni sekve estos devigata elpensi novan «universalan» lingvon!.. Sed ni restu provizore sur nia tera globo. Eĉ tie la praktika kiel la teoria kunfandiĝo de la ĉefaj lingvoj de l' mondo estas utopio: la ĥina, la rusa, la araba ekzemple, por nomi nur tiujn tri, apartenas al lingvaj familioj, kiuj, *en sia respektiva pureco*, havas nenion komunan. Sintezo inter ili ne estas ebla, kiel nebla rezultanto inter fortoj, kiuj agas en diversaj planoj sen komuna punkto. Permesu alian komparon, eble iom trivialan, sed tuj kaj de ĉiuj kompreneblan: vane zoologo penus naskigi idon de hundo kaj kaprino. Tia tamen estus la klopodo de tiuj, kiuj esperas, ke kunigo de speciale eŭropaj lingvoj kun speciale aliaj donus vivantan lingvon! Ĝi estus por *ĉiuj* terure malfacila ĵargono.

Ni estu praktikaj homoj, kiuj volas realigi noblan idealon. Nian kastejon ni konstruis sur la firma fundamento de la indo-eŭropaj lingvoj, ni ne suprenaltigu ĝin en fantaziajn nubojn! — TH. CART

**Rezolucio prezentota ĉe la Ostend Rotary-internacia Kongreso.** — Pro tio ke la interrilatoj inter Rotary-Klubo kaj Rotary-anoj el diversaj landoj plivastiĝas, la Rotary-Klubo ĉe Perth Amboy, New Jersey, U.S.A. prezentas por la konsidero de la Rotary-Kongreso ĉe Ostend la peton ke la Kongresanoj akceptu Esperanton kiel la oficialan internacian helplingvon por Rotary Klubo. Tiu ĉi klubo opinias ke la akcepto de Esperanto plifaciligos kaj pligrandigos tiajn internaciajn interrilatojn.

La Perth Amboy Rotary Klubo tutkore jese voĉdonis tiun Rezolucion Marton 30, 1927.



## Lastmomentaj sciigoj

La Sekretario de la Juĝantaro de la XIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj informas nin, ke la aŭtoro de la verko premiita per la Natura Floro estas S-ro Ĉuvi Lovostan, kiu bonvolis transdoni al la Organiza Komitato de la Kongreso sian rajton elekti Reĝinon de la Festo.

Estas elektita kiel Reĝino de la Floraj Ludoj la ĉarma Fraŭlino Margarida Colom, el Sóller.

Ni prezentas niajn riverencojn al la nunjara Reĝino kaj niajn gratulojn al la laŭreata poeto.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola  
teknika gazeto

## Internacia RADIO-REVUO

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

### KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originala popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

### PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ  
KONKURSO KUN MULTNOMBRAJ PREMIOJ  
(i. a. komplete radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 N.<sup>o</sup> N.<sup>o</sup>) UNU DOLARO aŭ egalval. en nacia mono  
Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ, de  
naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret.

Redaktoro: Ing. E. Aisberg.

ELDONEJO: ETIENNE CHIRON. 40, rue de Seine. PARIS-VI

---

## A tots els federats i abonats



Preguem a tots els abonats a KATALUNA ESPERANTISTO i a tots els federats que no hagin pagat encara l'abonament de 1927 i les cotitzacions vençudes que ho facin de seguida per tal de no crear dificultats a l'administració i a la bona marxa del periòdic i de la Federació.

Es un deure que hom ha d'acomplir.

# Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions, que afecten als esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per a el millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyin i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran el seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, també pagada a la bestreta.

*Art. quint.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

*Art. sisè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

*Art. setè.* — El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenientes per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

*Art. vuitè.* — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

*Art. novè.* — Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. desè.* — La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

*Art. onzè.* — Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Constant Representació de les Societats Nacionals Esperantistes.

*Art. transitori.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona carrer València, 245.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## Al marge de l'Esperanto

En Josep M.<sup>a</sup> Junoy, el conegut escriptor, director de «La Nova Revista», diu entre altres coses a «La Veu de Catalunya» del 30 d'abril:

No he comprès mai els atacs d'ironia i de menyspreu amb què ha estat tractat l'Esperanto. M'han semblat sempre, per bé que, de vegades, els atacants hagin estat persones de positiva qualitat, d'una colpidora injustícia. Els càrrecs que s'han fet a l'idioma universal concebut pel doctor Zamenhof són uns càrrecs — com esdevé moltes vegades — que es fan, injustament, a les seves qualitats.

En nom de l'estètica — (pobra estètica, quantes i quantes incomprendions i estulteses es cometen en ton nom!) — s'ha volgut presentar l'Esperanto com una vera desgràcia. Com una llengua sense suc i sense bruc. Com una artificialitat grotesca.

Fins i tot en aquest punt de l'estètica — on les discussions i els parers oposats no s'acabarien mai — crec que és injusta una actitud d'hostilitat irreductible envers l'Esperantisme.

L'ésser esperantista vol dir posseir un sentiment lloable d'expansió, una necessitat noble de solidaritat.

A Catalunya hi ha un nucli Esperantista important que mereix, no tan sols tots els nostres respectes, sinó, fins i tot, tota la nostra admiració.

Els escriptors catalans, que disposen d'un cercle lingüísticament reduït d'expansió, tenen més interès que cap altre sector internacional d'escriptors a lloar i acreditar aquest noble i generós idioma d'intercanvi.

L'esperanto és digne de la consideració de tots.

Es un vehicle intel·lectual d'una legitimitat perfecta i d'una reconeguda eficàcia.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj  
 Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
 (Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
 (Joventut Catòlica) Ripollet  
*Frateco*  
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝirona Espero*  
 (Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
 St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
 (Seminari) Girona  
*Aplec*  
 Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
 Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
 Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
 (Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
 Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
 Provença, 156 Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
 Bretón Herrerros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Solleric»* Soller

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montagut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubi:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besós:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÈ

Redaktoroj: Delfí Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Raporto pri la XIV Kongreso de K. E. F.

Sóller, 5-6-7 junio 1927

La raportanto devas peti indulgon al la leganto kaj precipe al la diversaj amikoj, kiuj partoprenis nian lastan Kongreson, se lia raporto ne respegulas ĝuste la tagojn tiel dolĉe travivitajn en Mallorca. Sur la paperon li ne povas transporti la ĉefajn trajtojn de la Kongreso, t. e. la gastamon kaj afablecon de la insulanoj, la helecon de la Orita Insulo kaj la nepriskribeblan ĉarmon, kiun nur al Mallorca la naturo donis. Al tiuj specialaj ecoj de nia XIV aldonu la brilecon de la festoj kaj vi ĝuste komprenos kiel malfacila fariĝas adekvata raporto.

Ni devas peti antaŭan senkulpigon, se ni forgesos iun nomon aŭ detalon: la tasko estas malfacila kaj ni povas promesi nur ke ni klopodos fidele revivigi la kongresajn tagojn.

### *Antaŭ la Kongreso*

Dank' al la fervoro de niaj samideanoj kaj al la laboremo de la O. K. Esperanto ĝuas tre favoran publikan opinion en Mallorca. Oni povas diri ke ĉiuj ĵurnaloj kun entuziasmo estis priskribintaj la altan signifon de nia afero kaj esprimintaj sian dankon, ke la esperantistoj plian fojon kunvenas en Mallorca por festi sian jaran Kongreson. Ni devas citi aparte la lokan gazeton «SÓLLER», kiu larĝe malfermis siajn kolonojn por propagandi la Kongreson.

La Sóller-anoj ĉiel klopodis agrablighi la restadon de la kongresanoj en Sóller. Pro tio ili okazigis diversajn festojn honore de la esperantistoj kaj konsentis gravan rabaton al la kongresanoj ĉe ĉiuj spektakloj.

## UNUA KONGRESTAGO

*Alveno de la Kongresanoj*

Post belega kaj bonega vojaĝo elŝipiĝis en Palma de Mallorca ĉirkaŭ 50 esperantistoj, kiuj la antaŭan vesperon enŝipiĝis en Barcelona. Ĉe la haveno de Palma atendas kvinkedo da Palmaj esperantistoj. Kelkajn minutojn poste ili ĉiuj troviĝas en la vagonaro survoje al Sóller. La vagonaro veturas tra belegaj montoj kaj fine oni vidas ĉe la valo la belegan kongresurbon. Estas tre interesa la alveno al Sóller. La vagonaro veturas de la supro de monto farante longajn kurbojn. Sóller, ĉe la fundo de la valo, similas fabelan vizion. La orang-kaj olivarboj svingas siajn branĉojn kvazaŭ amikaj brakoj akceptus vin.

Ĉe la alveno de la kongresanoj muzikistaro ekludas La Esperon. Granda aplaŭdado salutas la alvenantojn. Ni rigardas tra la fenestro kaj vidas en la unua vico la prezidanton de la O. K. nian tre karan amikon Miquel Arbona, la membrojn de Esperantista Grupo Sollerica kaj grandan popolamason.

Manifestacie, antaŭ la tuta popolo, la kongresanoj iras al la Urbdomo.

*Oficiala akcepto kaj malferma kunsido*

Je la deka proksimume la Salono de Kunsidoj de la Urbdomo estis plena de esperantistoj kaj de scivolema publiko. Kvankam la salono estas tre granda ĝi ne sufiĉis kaj multaj esperantistoj kaj granda publiko devis resti en la ĉirkaŭaj ĉambroj.

La kunsidon prezidis la Urbestro, la Juĝisto, kelkaj konsilanoj, la reprezentanto de la Paroĥestro, la Prezidanto de la O. K. kaj la komitato de KEF.

La Urbestro, Sro. Miquel Casasnovas, salutas la kongresanojn kaj ĝojas ke oni elektis Sóller kiel kongresurbon, kio estas granda honoro por li kaj por ĉiuj urbanoj. Li proponas sian propran personan helpon kaj tiun, kiun lia ofico signifas por ĉiel helpi nin dum la restado en Sóller. En la nomo de la kongresanoj respondas Sro. Delfi Dalmau dankante la urbestron kaj la tutan popolon pro la frata akcepto, kiun ĝuis ĉiuj alvenintoj. Li laŭdis la belecon de la tuta insulo kaj precipe tiun de Sóller. Li ankaŭ skizis la celon de Esperanto, kiu volas unuigi ĉiujn homojn kaj grave helpos al pli bona socia ordo.

Sro. Miquel Arbona, Prezidanto de la O. K. donis sian bonvenon al la esperantistoj kaj en la nomo de la organizantoj petas senkulpigon (troigita modesteco) pro la manko de sperto en la organizo de kongresoj. Li diras ke la hodiaŭa tago estas glora por la loka movado kaj li esperas ke ĝi donos bonajn fruktojn por nia afero.

Sro. S. Alberich, prezidanto de KEF, legas la jenan paroladon:

«Antaŭ du jaroj ni havis ankaŭ grandan plezuron kongresante en la bela insulo Mallorca. Se antaŭ du jaroj ni havis en Sro. Bofill la tutan animon de la Kongreso, ni havis ĝin nunjare en tiu de nia amiko Arbona, kiu kun siaj samurbanoj tiel multe kaj senripoze laboris por la Kongreso de KEF. Ĉiu Kongreso, ĝenerale, postulas la sinoferon de la plej fervora por ke ĉio iru bone sian vojon, sen baroj, kun la plej bona espero de feliĉa sukceso.

Ne nur la organizo de Kongreso kun la tiel diversaj timoj, esperoj kaj kapdoloroj, kiujn nur la organizanto ĝuste povas taksi, postulas tiun sinoferemon de fervorulo; ankaŭ ĉiu komuna laboro de la esperantistoj superŝutas per granda laboro la ĉiaman viktimon kaj ĉar la viktimoj aŭ viktimitoj, permesu al mi la vorton, ne estas multaj en nia rondo, ni de tempo al tempo rimarkas ian malvigligon, kiu malaperas ĉe la alveno de nova standardisto.

En la vicoj de nia Federacio ni havas kelkajn kuraĝulojn kaj nur dank' al ilia konstanta helpo kaj kunlaborado ni havas hodiaŭ por la dek-kvara fojo la grandan plezuron kunveni en Kongreso. Tiel same ĉiu grupo de esperantistoj en nia lando havas siajn konstantajn subtenantojn, kies senĉesa batalado firme tenas la standardon.

Longa estas la vojo, kiun la esperantistoj iris dum sia kvardekjara batalado kaj longa estas la vojo ĝis la fina venko, sed se la longeco de la vojo jam irita fariĝis duoble pli peza pro la moko kaj priridoj de la skeptikuloj kaj antaŭjuĝantoj, la longeco de la ankoraŭ irota vojo fariĝas pli hela, sen la antaŭaj dornoj kaj vangofrapoj.

Esperanto, eble, venis tro frue en la mondon. Ĝi venis kiam la neceseco de internacia rilatado estis relative ne granda, aŭ almenaŭ, ne sufiĉe postulata de la progreso. Nur hodiaŭ, kiam Radio disvastigas siajn ondojn tra la tuta mondo kaj kun granda reliefo evidentigas la necescon de internacie komprenebla lingvo, nur hodiaŭ kiam la brava Linbergh superflugas la timigan Atlantikon kaj en 33 horoj iras de Nova Jorko al Parizo, nur hodiaŭ kiam la aŭtomobilo, vagonaro, telefonio kaj telegrafio komprenigas al ni ke la antaŭa neperceptebla amplekso de la tero fariĝas subite videbla kaj perceptebla kiel nia manplato, la homoj ekrigardas nian aferon kun intereso kaj ne plu vidas en ĝi utopion. Ili ne plu vidas en Esperanto utopion ĉar pli grandaj *utopioj* realiĝis: venki la aeron, paroli al homoj je centoj kaj miloj da kilometroj troviĝantaj, ktp.

Kaj ni staras, amikoj, nur ĉe la sojlo de tiuj grandaj homaj progresoj. Post kelke da jaroj, la hodiaŭ nur iom sentata neceseco de internacia helpolingvo, fariĝos postulo tuj solvota kaj tiam alvenos por Esperanto la tiel atendata horo.

Iu povus dubi ke ne Esperanton oni alprenos kiel lingvon internacian, ĉe la konstato ke aliaj projektoj batalas por la sama celo, ke el niaj propraj rondoj iu elŝteliĝas en la kontraŭan kampon. Se Esperanto sukcesis dum sia kvardekjara vojirado tiom multajn homojn altiri al si, se dum la perio-

do de nesentata neceseco de lingvo internacia, kiel ni diris jam, Esperanto kreis literaturon, kiun povas envii kelkaj popoloj, se ĝi tiel profunde enradikiĝis en nia koro, ni povas esti plenaj de optimismo pri la estonteco de nia afero, ni povas trankvile ridi pri la konkurenco de aliaj projektoj. Ni atentu, tamen, ke Esperanto ne estas projekto sed fakto. Ni diru kun plena sincereco, ke eĉ se nia tuta laboro por Esperanto favorus iun alian ekzistantan aŭ ekzistantan neŭtralan lingvon, ni ne bedaŭrus, ke ni decidis al la problemo multajn horojn, multajn pesetojn, eĉ kelkajn vivojn. Ni batalas por la ideo mem de lingvo internacia, por ke la homoj sen humiliĝo povu esprimi siajn ideojn, por ke la homaro pli bone vivu.

Eble iu el vi diras al si: ŝajnas ke la parolanto sin turnas ne al esperantistoj sed al publiko, kiun oni volas varbi al nia afero. Vere ŝajnas, sed ĉar mi estas plene konvinkita ke pli bone por Esperanto estas konservi la varbitojn kaj sukcesi ilin konvinki, ke ĉiu devas fari por ĝi sian malgrandan laboron, ol varbi novajn batalantojn, kiuj ne havas ekzerciĝon nek sperton en la batalado por nia ideo, mi klopodis doni al vi kelkajn ideojn, klarajn, kaj mi volus esperi, pezajn, por doni al vi plian energion por la plua antaŭenirado.

Ni estas lacaj, multaj kunbalantoj falis, aliaj sentas sin malvarme en niaj vicoj. Antaŭ la proksimiĝanta venko ni ne disiru, ni ne disfalu. Nun estas tempo de laŭplana laborado, de firma starado. Ni konstruis tre altan templon, pardonu al mi la alegorion, kaj ni devas firme ĝin subteni. Se iu el ni mallevas la manojn, la templo fariĝas pli peza sur ni. Ni ĉiuj subtenu energie, ni altiru helpantojn al la laboro, freŝajn brakojn ni serĉu por helpi la jam kadukajn, sed dum ni povos, ni staru, la venko estas nia».

S. ALBERICH JOFRÉ

Post la parolado de la prezidanto la jenaj delegitoj salutis la Kongreson: Sro. Pere Escayola, el Esperanta Burgono (Rubí); Sro. Marian Solà el Lumon (Terrassa); Sro. Salvador Busquets el Aplec (Sabadell); Sro. Narcís Bofill el Esperantista Klubo Palma (Palma), el Bela Espero (Binisalem), el Verda Stelo (Consell) kaj en la nomo de la esperantistoj el Capdepera; Sro. Joan Oliveras el Internacia Frateco (Sta Coloma de Gramanet); Sro. Josep Alberich el Barcelona Esperanto-Societo (Barcelona); Sro. S. Alberich el Paco kaj Amo (Barcelona), Sro. Jaume Grau Casas el Barcelona Stelo (Barcelona) kaj el Bela Espero (Manresa); Sro. Coll el Nova Sento (Barcelona).

Ĉiujn paroladintojn kaj salutintojn oni varme aplaŭdis. La aŭtoritatoj kaj neesperantista publiko, kiu atente aŭskultis la esperantajn paroladojn, fervore laŭdis la belsonecon de Esperanto kaj esprimis sian miron, ke la esperantistoj tiel flue ĝin parolas.

La sekretario, Sro. Jaume Grau Casas, legas leterojn kaj telegramojn de la jenaj samideanoj, kiuj esprimas sian aliĝon al la Kongreso, bedaŭ-

rante ke ili ne povas ĉeesti: Sro. Pere Costa el Sta. Coloma de Farnés, Sro. Pere Domènech el Vilassar de Mar, Sro. Bernat Coll el Palma de Mallorca, Sro. Josep Canaleta el Sta. Coloma de Farnés, Sro. J. Comadran el Sabadell, Sro. J. Oliver, prezidanto de Aplec (Sabadell), Sro. Teo Jung el Horrem, Sro. Josep Casanovas el Girona kaj Sro. Francesc Barceló el Palma de Mallorca.

Kiel ĵurnalistoj ĉeestis Sroj. Marian Ramis d'Ayreflor, de la ĵurnalo «Correo de Mallorca»; Pere Peyró, de la ĵurnalo «La Almudaina»; Francesc Colom, de la revuo «Sóller».

La prezidanto fermas la kunsidon kaj invitas la ĉeestantojn partopreni la tujan malfermon de Ekspozicio kaj ankaŭ li rekomendas, ke oni akurate ĉeestu la diversajn kunvenojn.

### *Propaganda Ekspozicio*

En la sidejo de «Defensora Sollerense» la Sóller-aj esperantistoj havas sian grupon. Belan ekspozicion de esperantaj presaĵoj ili organizis en tiu sidejo. La Urbestro malfermis la ekspozicion kaj la prezidanto de la grupo, Sro. Miquel Arbona, faris paroladeton klarigante la signifon de la ekspozicio kaj la gravecon de la esperanta gazetaro. Dum kelkaj tagoj la ekspozicio estis vizitata de multnombra publiko.

### *Esperanta Meso*

Tagmeze okazis la esperanta meso en la paroĥa preĝejo, kie kuniĝis la katolikaj kongresanoj por aŭdi la predikon de pastro Bartomeu Font, kiu diligente plenumis sian taskon. Ĉe la publiko oni vidis multajn neesperantistojn, kiuj atente aŭskultis la predikon, kies sencon ili ja ne povis kompreni.

### *Kongreslibro kaj insigno*

En la sidejo de Esperantista Grupo Sollerice oni donacis al ĉiu kongresano ekzempleron de la Kongreslibro kaj insignon. Ni devas danki la O. K. ke ĝi havigis al ni tiel belan libron kun tiom multaj gravuraĵoj tre zorge presitaj kaj kies enhavo konigas al ni skize la historion de Sóller kaj multajn detalojn pri ĝiaj turismaj kvalitoj.

La kongresinsigno estis metala medalo kun reliefa ŝildo de la urbo. Ĝi bele ornamis la bruston de ĉiu kongresano, kiu fiere montris ĝin dum la kongresaj tagoj.

Ni vere dankas al la Sóller-aj amikoj, ke ili tiel malavare regalis nin ĉiamaniere kaj havigis al nia Federacio plian sukcesan Kongreson.

### *Vizito al «Foment de Cultura de la Dona» kaj «Coves dels estudiants»*

Posttagmeze la kongresanoj komune vizitis la bibliotekon de «Foment de Cultura de la Dona». Mankas al ni taŭgaj vortoj por dece laŭdi la bele-

con de tiel ĉarma biblioteko. Inter la centoj da volumoj ni vidis ekzemple-  
ron de «Kataluna Antologio». La laboro de la subtenantoj de la Biblioteko  
estas duoble laŭdinda pro tio ke ili havas nenian oficialan helpon.

Post la vizito, promenante tra belegaj lokoj, sub la branĉoj de la orang-  
arboj kaj admirante panoramojn de nesuperebla ĉarmo, la kongresanoj vi-  
zitis la «Coves dels Estudiants», naturaj kavernoj, kiujn nur en Mallorca  
oni povas trovi. La miljara laborado de la akvo donis al ni subterajn pa-  
radizojn, antaŭ kiuj oni restas muta pro la grandiozeco de la naturo.

Post la vizitoj ĉiu kongresano vagadis tra la ĉirkaŭaĵoj de Sölller laŭ-  
dante ĉiumomente la senkomparan belecon de la lando.

## DUA KONGRESTAGO

### *Labora kunsido*

Ĝi okazis en la sidejo de Esperantista Grupo Sollerica, sub la prezido  
de Sro. S. Alberich Jofrè, akompanata de la komitatanoj Sroj. Narcís Bofill,  
Jaume Pruna, Josep Alberich kaj Jaume Grau Casas.

La Sekretario, Sro. Grau Casas, raportis pri la agado de la Komitato,  
plendante pro tio ke ĉiam la samaj personoj devas fari la laboron, kaj alvo-  
kante novajn samideanojn al la gvidado de nia Federacio. Li menciis la  
kursojn organizitajn de la Komitato, la paroladojn kiujn membroj de KEF.  
faris en propagandaj kunvenoj kaj la intertraktojn havigitajn kun la Interna-  
cia Centra Komitato pri la eldono de nova «Kataluna Ŝlosilo». Li montris  
per kelkaj argumentoj la necesecon, ke ni baldaŭ disponu je novaj propa-  
gandiloj kaj instruiloj pri Esperanto en kataluna lingvo, kaj speciale reko-  
mendis labori en tiu direkto al tiuj membroj de la Federacio, kiuj en la es-  
tonteco gvidos la katalunan movadon.

Sro. Jaume Pruna legis la bilancon, kaj ĝi estis aprobata. En la 15-a  
de majo estas en kaso ptaj. 359.85.

Laŭ propono de la Prezidanto, la Kongreso decidis aliĝi al la voĉdono  
farita de la Brita Esperanta Asocio, per kiu oni esprimas la deziron ke  
«Universala Esperanto-Asocio», la oficiala institucio tiel grava por nia  
movado, plene akordiĝu en sia jarlibro, gazeto kaj ceteraj eldonaĵoj, al la  
Fundamento de Esperanto kaj al la konsiloj de la lingvaj institucioj. Sam-  
tempe la Kongreso decidis rekomendi al ĉiuj federacianoj la aliĝon al U. E.  
A., ĉar ĝi plenumas grandan taskon en la praktika kampo, tute subtenindan  
de la samideanaro.

Sro. Grau Casas anoncas, ke en la venonta kunveno de la Eldona Ko-  
mitato de «Kataluna Antologio» li proponos al la akciuloj, ke la profito re-  
zultanta el la vendado de tiu verko estu donata al nia Federacio, por eldo-  
ni la Katalunan Ŝlosilon. Ankaŭ oni proponos, ke la akciuloj oferu por  
tiu celo parton de la kapitalo, kiun oni devas redoni al ili. Plie, li sciigas  
ke la unua luksa eldono de la «Antologio» estas preskaŭ elĉerpita, kaj ke  
la verko ĵus estas rekompencita de la Lingva Akademio.

Sro. Alberich Jofrè sciigas ke Sro. Josep Maria Junoy, la eminenta direktoro de «La Nova Revista», grava kataluna gazeto pri literaturo kaj arto, aperanta ĉiumonate en amplekso de pli ol 100 paĝoj, publikigis artikolon tre favoran al Esperanto sur la kataluna ĵurnalo «La Veu de Catalunya» kaj krome intencas publikigi ĉiumonate paĝon pri Esperanto sur «La Nova Revista». La Kongreso decidis sendi dankan telegramon al la konata verkisto kaj kritikisto kataluna Sro. Junoy.

La Prezidanto raportas pri la peto, kiun pere de Sro. Chaler ricevis la Federacio por organizi en la proksima jaro nian Kongreson en Navàs. En Navàs estas tre malmultaj esperantistoj, sed la organizon de la Kongreso prenis sur sin kun la esperantistoj ĉiuj lokaj societoj, sub la helpo de la urbestro.

Sro. Dalmau varme subtenas la ideon organizi Kongreson en Navàs ne pro la frukto kiun ni povos rikolti por Esperanto en la kongresurbo mem sed precipe pro tio ke en la regionoj Bergadà kaj Bages nia afero povos enradikiĝi kaj trovi plian antaŭenpuŝon.

Sro. Bofill subtenas ankaŭ la ideon kaj esprimas sian opinion ke KEF. nepre devas okazigi ĉiujare sian Kongreson kaj Florajn Ludojn, se ni volas eviti al ĝi la morton.

Oni decidis akcepti Navàs por la estonta Kongreso kaj ke oni sendu telegramon al la urbestro de tiu urbo sciigante lin pri la decido de la Kongreso.

Je la 10.30 oni fermas la kunsidon.

### XIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj

La plej bela festo per kiu oni povas regali nin dum niaj Kongresoj, sendube estas la ĉiam novaj Floraj Ludoj, en kiuj kuniĝas la beleco de Poezio kun la beleco de niaj fraŭlinoj, kun la amsopira printempo kaj revoj de nia koro.

Je la deka la komforta teatro de «Defensora Sollerense» estis jam plena de esperantistoj kaj publiko avida admiri la esperantan feston. Pro la neatendita longeco de la labora kunsido nur je la 10.30 eniras la lokaj aŭtoritatuloj kaj la membroj de la Juĝantaro de la XIII-aj.

Ĉe la scenejo, tre bele ornamita per floroj, tapiŝoj kaj luksa trono por la Reĝino, sidiĝis: dekstre, Lia Urbestra Moŝto, la reprezentanto de la Paroĥestro, la Prezidanto de KEF. la Prezidanto de la O.K. kaj Sro. Josep Alberich; maldekstre, la Prezidanto de la XIII Floraj Ludoj, Sro. Jaume Grau Casas, la Sekretario, Sro. Delfi Dalmau kaj la membroj de la Juĝantaro Sroj. Narcís Bofill, Marian Solà, kaj Sro. Josep Ventura.

Lia Urbestra Moŝto, Sro. Miquel Casasnovas diras en Esperanto «oni malfermas la Feston» kaj Sro. Dalmau stariĝas kaj komencas la legadon de la Raporto:

## «Sinjorinoj! Sinjoroj!

La antaŭaj Sekretarioj de la Floraj Ludoj estas lertaj verkantoj kaj eĉ talentaj poetoj. Ili ne nur klare montris la signifon de ĉi-tiu Festo: ili elokvente priskribis ĝian devenon kaj ĝian belecon.

Mi simple konstatos kelkajn detalojn por utilo, por evoluigo laŭ ĝia konstanta pligraviĝo, de nia Instituto.

Sed nun estas solena momento pro kaj por la triumfintoj de la XIII-aj Floraj Ludoj. Iliaj nomoj, iliaj meritoj postulas mian tutan atenton. Ni ĉiuj kuniĝis por ilia honorigo kaj solenigo.

Nia poeto-reĝo en la nuna Festo estas nova nomo, nova granda poeto de Esperantujo: Sro. Ĉuvi Lovostan el Budapeŝto, Hungarujo.— Esperantujo benos nian Institucion kiu malkovras la kreantojn de la lingvo.—Kompaktindaj matematikistoj, gramatikistoj kaj lingvistoj kiuj pretendas krei lingvon. Ili ja povas ĝin pridiskuti kaj analizi. Sed la italan lingvon kreis Dante, poeto, Esperanton kreis Zamenhof, poeto. Ĉiujn lingvojn kreis la *krea* povo de homo aŭ de popolo. Kaj kiam lingvo ne plu havas homojn aŭ popolon *kreantajn*, ne plu vivas, ĉar ne plu evoluas, ne plu fluas. La Katalunan lingvon rekreis Verdaguer, kiel la provencalan rekreis Mistral, *poetoj!*

Zamenhof estas aŭtoro de vivanta lingvo, ĉar li estis kapabla *senti* la sublingvan komunecon kaj la komunan sublingvon de la Homaro. Zamenhof povis tion senti ĉar li estis Poeto. Niaj poetoj kaj popolo, Esperantujo, estas la vera vivofonto de Esperanto. Komuna sento, forta, profunda komuna sento savos komunan lingvon. Jen la biologia vojo, kies reĝoj naturaj, veraj dioj, estas la poetoj. Pro amo kaj por amo estas homa vivo. Amokaŭzo kaj amocelo de poetoj, nediskutebla simbolo de Amo kaj beleco, de poezio, estas Virino: Minerva, Venuso, Afrodito. Tial apud la poeto-reĝo estas en nia Festo la beleco-reĝino. Belege reprezentos prezide al ni tiun sanktan simbolon la kortuŝe bela Solleranino Fino, Margarida Colom.

Ni riverence akceptu Ŝian Reĝinan Moŝton. Ni danku Ŝin por la bonvolo honori nian Feston per Ŝia brila prezido. Bonvenu, bonvolu, nia Reĝino.»

(En tiu ĉi momento la aŭtoritatuloj iras al la enirejo de la salono akcepti la Reĝinon, Fino, Margarida Colom, kies trenaĵon subtenas du belegaj paĝioj, knabinetoj Maria Colom kaj Lola Estartús, kaj Korteganinojn, Finoj. Caterina Marquès, Maria Ledesma Oliver, Paula Colom, Francesca Pizà, Rosa Ma. Ledesma, Magdalena Colom, kaj kun ili laŭpare revenas al la estrado, dum orkestro ludas konvenan muzikaĵon).

—«Majesta Reĝino, ne kiel tion esprimas ĝenerale tiuj vortoj, sed, eksterordinare, senpeke, senmakule, ĉar, Majesta Vi, Reĝino Vi, pro virina beleco, pro poezia soleneco.

— Miriga Kortego de Amo, ĉarma ombro kaj dolĉa akompano de bela Reĝino.

— Bonvolaj aŭtoritatuloj de Sòller, — kaj de nia Movado  
— Vin ĉiujn mi humile, laborule salutas.»

## ORDINARAJ TEMOJ

### I. VERSAĴO KANTANTA AMON

El la grupo I, — mallongaj originalaj versaĵoj — kiu estas plejnombre konkursita — ĝi atingis 40 verkojn — la membroj de la Juĝantaro estas petitaj elekti la plej aman poemon, la plej beletristikan, por la ĉefa premio de la F. L., por la Natura Floro, la karakteriza premio de nia Festo kaj de nia Instituto. Plej multe ili voĉdonis por la milda poemo «Renkontiĝo» kies aŭtoro, Ĉuvi Lovostan, el Hungarujo, estas la plej honorita poeto de nia nuna Festo. Bedaŭrinde personaj cirkonstancoj malfaciligas lian ĉeeston. Kaj ĉar li ne povas persone alparoli la Reĝinon, li sendis la jenan saluton al Ŝi:

#### Reĝino:

Humile via servanto sidas ĉe la skabelo de Viaj piedoj. Forsonis la muĝo de l' kordo la lasta, aŭdiĝas nur profundaj ĝemoj de koroj tuŝitaj.

Kiom mi sopiris, Reĝino, ĉi-tiun momenton! Kiom mi admiris, kiom envie mi deziris kunesti Vian popolon en Lando Kataluna: en regno de amo kaj floroj. Kiom mi admiris la kavalirojn de l' kantoj, kiuj rajtis prezenti al Vi siajn koro-trezorojn en nobla turniro!

Doloris kaj ploris ankaŭ mia koro, Reĝino, kaj Via nobla popolo atentis miajn suferojn kaj honoris ilin plej-dolora inter tiuj de la vetkantantoj.

Larmoj de poetaj turmentoj ŝanĝiĝas je tiuj de ĝojo ploranta, kiam frata kompreno ilin rebriligas per larmoperloj de Viaj okuloj.

Via popolo, Reĝino, honoris mian sopiron doloran, permesis al mi veni spirite al Via lando, preni Viajn florojn naturajn kaj elekti la reĝinon, kiu inde reprezentu la popolon de floroj, de belo, de koroj senthavaj.

Lando Kataluna! En Vi ĉio, en Vi ĉiu estas bela kiel sonĝo, ĉarma kiel revo, rava kiel sopiro, nedistingebla, neelektebla multo de ravanta pompo, konkuranta kun suda sunbrilo blindiganta.

La kavaliro blinda sin mallevas al Viaj piedoj Reĝino, spirito lia nun ĉe Vi ripozas.

Neniam Vi min eble renkontos, Reĝino, Neniam, Reĝino, mi Vin vidos, kiel memoron de unua-lasta renkontiĝo, permesu, Reĝino, prezenti al Vi la florojn, kiujn ornamas larmoperloj de poeta sopiro, sangogutoj de koro ŝirita — kaj permesu rakonti la nunan majestatan momenton, kiam mi revenas en mian landon al miaj geamatoj!

Pentekosto, 1927.

ĈUVI LOVOSTAN

## Renkontiĝo

Mi vokas ŝin. Ŝi estas malproksime.  
Malamoj, limoj, mejloj nin disigas.  
Tra baroj trudaj korojn tamen ligas  
La sent' intime.

Mi aŭdas ŝin, Ridet', arĝenta sono  
De ŝia lip' orelojn nun atingas.  
Jen ŝi! Ventet' rubandojn kvazaŭ svingas  
Ĉe ŝia zono.

Mi kaptas ŝin! La manojn ambaŭmane...  
»Ne kuru for! Ja ridas via ĝemo!  
Rifuĝi kun alloga rifuzemo  
Vi volas vane! »

Mi kisas ŝin! ... Nur reva bild' ĝi estas...  
Fantom', nebul' disiĝa, malapero... ,  
Nur la parfumo dolĉa en aero  
Memore restas.

Mi ploras. Ŝin mi do neniam havos?  
Neniam ŝin mi tenos sur genuoj?  
Nin dankoplenaj, ĝojaj larmofluoj  
Neniam ravos?

Mi amas ŝin! Ĉu amos min la sorto?  
Ĉu nin renkonti iam ĝi permesos?  
Ĉu dum la viv' disesto nia ĉesos  
Aŭ nur ĉe morto?

Mi havos ŝin! Trans nigra morta maro  
Anim' animon trovos per la sento!  
... Kadavrojn dume portos en silento  
La nigra ĉaro.

ĜUVI LOVOSTAN

(Lin reprezentis kaj emociige legis lian poemon en la Festo Sro. Josep Ventura, el Terrassa).

Plej proksime al tiu estas elektitaj la poemo N.º 2, de nia belga poeto Jan van Schoor, kaj N.º 13, de la germana Hans Windisch-Sartowsky.

Kiel eksterordinaraj premioj al la grupo de la *mallongaj originalaj* versajoj estas aljuĝitaj:

- 50 pta de Sro. Narciso Bofill
- 50 » de Sro. Prezidanto de K. E. F.
- 50 » de la Direkt, de K. E.
- 50 » de Esp. Klubo Palma

al la verkoj

N.º 100, de Varma Järvenpää el Finnlando. N.º 42, de Srino. Catharina J. Roskes-Dirksen el Nederlando. N.º 41, de Sro. S. Grenkamp-Kornfeld el Paris. N.º 13, de Hans Windisch-Sartowsky el Germanujo.

#### MENCIINDAJ KONKURSAĴOJ:

N.º 44, de S-ino. Catharina J. Roskes-Dirksen el Nederlando. N.º 104, de Varma Järvenpää el Finnlando. N.º 66, de S-ino. Marthe Petit el Franclando. N.º 43, de S-ino. Catharina J. Roskes-Dirksen el Nederlando. N.º 85 de S-ro. Teo Jung el Germanlando. N.º 2, de S-ro. Jan van Schoor el Belglando. N.º 11, de S-ro. Hans Windisch-Sartowsky el Germanlando. N.º 5, de S-ro. Jan van Schoor el Belglando. N.º 101 de Varma Järvenpää el Finnlando. N.º 98, de Varma Järvenpää el Finnlando.

#### II. AMA PROZAĴO

El la grupo 2 konsistanta je 26 Mallongaj Originalaj Prozaĵoj, la Juĝantaro devis elekti la plej belan por la II-a Ordinara Premio. Preskaŭ ĉies voĉdonojn meritis la verko N.º 48, de S-ino. Lucette Faes, el Belglando. Por la sama premio voĉdonita estis ankaŭ la verko N.º 147, de Anna Groschoff el Germanlando. Tial ni mencias ĉi-tiun apud la antaŭa.

Por la grupo de la Mallongaj Originalaj Prozaĵoj ni ankaŭ aljuĝis la premiojn de:

- Barcelona Esp. Societo, 50 ptoj.
- Du Sennomuloj 50 »
- Grupo Lumon 50 »

kiujn atingis la verkoj N.º 152, de S-ro. E. Aisberg el Franclando. N.º 23, de S-ro. Karl Minor el Germanlando. N.º 147, de Anna Groschoff el Germanlando.

#### EL TIU ĈI GRUPO ESTAS MENCIINDAJ

N.º 141, de S-ro. Francisco Azorín Poch el Hispanujo. N.º 6, de S-ro. I. Ŝirjaev el Ruslando. N.º 119 de Jakobo Schmid el Svislando. N.º 40, de Sro. S. Grenkamp-Kornfeld el Franclando. N.º 134, de Kristiano Mallerta el Germanlando. N.º 124, de Jakobo Schmid el Svislando. N.º 133, de Kristiano Mallerta el Germanlando. N.º 125, de Jakobo Schmid el Svislando. N.º 25, de Karl Minor el Germanlando. N.º 37, de J. Kramer el Nederlando.

N.º 50, de Helena Hempel el Pollando. N.º 39, de Grenkamp-Kornfeld, el Paris. N.º 123, de aŭtoro petata konigi sin al ni. N.º 110, de Günter Erber el Aŭstrujo. N.º 67, de S-ino. Marthe Petit el Franclando.

## ORDINARAJ TRADUKAJ TEMOJ

### I. *Esperantigo de la kataluna versaĵo de Joan Alcover «Record de Sòller».*

Neniu konkursaĵo plene meritas la premion, sed menciinda estas la verko N.º 83, de S-ro. Jaume Herp Sanmartí, unika alveninta por ĉi-tiu grupo, ne pro tiu bedaŭrinda fakto, sed tial ke la aŭtoro vere montras inspiron. Mankas nur al li esperantista perfektigo kaj teknika verskono. Kaj tio estas ja facile atingebla kiam oni posedas inspireblan spiriton por literaturo kiel pruvis per tiu menciinda traduko Jaume Herp.

### II. *Esperantigo de la kataluna prozaĵo «Ramon de Montjuich» de Josep Pla.*

Ankaŭ por tiu grupo alvenis nur unu konkursaĵo. Malbedaŭrinde ĝi estas tiel bona ke ĝi plene meritas la premion. Ĝia N.º estas 157 kaj ĝia aŭtoro S. Alberich Jofré.

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

### LONGAJ ORIGINALAJ VERSAĴOJ

Premio: 100 ptoj. de Moŝta Urbeŝtraro de Sòller.

El 6 konkursaĵoj estas premiita:

N.º 108, de S-ro. Ed. Jung el Franclando.

Menciindaj:

N.º 22, de S-ro. Francesco Pizzi el Italujo. N.º 1, de S-ro. Jan van Schoor el Belglando. N.º 26, de S-ro. Francesco Pizzi el Italujo.

### LONGAJ ORIGINALAJ PROZAĴOJ

Premio: 100 ptoj. — Komitato de K. E. F.

7 verkoj konsistigis ĉi-tiun grupon. La voĉdonaro favoris tiun al kiu apartenas la N.º 7, de S-ro. I. Ŝirjaev el Sovet-Unio.

Menciindaj:

N.º 18, de S-ro. I. Ŝirjaev el Rusujo. N.º 52, de S-ro. Cav. Dott. Arturo Ghez el Italujo. N.º 140, de S-ro. Joseph Berger el Hispanujo. N.º 126, de S-ro. Jakobo Schmid el Svisujo. N.º 87, de F-ino. Ida Búcker el Germanlando. N.º 127, de S-ro. Jakobo Schmid el Svisujo.

### LONGAJ VERSAJ TRADUKOJ

Premio: 100 ptoj. — Esp. Grupo Sollerio.

6 verkojn entenas ĉi-tiu apartaĵo. Ĉefa merito estas aljuĝita al

N.º 21, de F-ino. Louise Briggs el Anglujo.

Menciindaj:

N.º 86, de S-ro. Felix Dyba el Germanujo, N.º 17, de Fino. Louise Briggs el Anglujo. N.º 117, de S-ro. H. Steding el Germanlando. N.º 75 de S-ro. Edv. Wiesenfeld el Polujo. N.º 138, de S-ro. Edv. Wiesenfeld el Polujo.

## MALLONGAJ VERSAJ TRADUKOJ

Premio de kelkaj privataj Terrassanoj: 50 ptoj.

El 9 verkoj tiaspecaj atingis la premion:

N.º 61, de P. Lapiene el Litovujo.

Mencion:

N.º 156, de Kristiano Mallerta el Germanujo. N.º 153, de Kristiano Mallerta el Germanujo. N.º 88, de S-ro. Heinrich Garke el Germanujo. N.º 80, de S-ro. Joseph Berger el Hispanujo.

## LONGAJ PROZAJ TRADUKOJ

Premio de Dro. Torres Carreras: 100 ptoj.

Premio de Banc Peninsular: 100 ptoj.

Grava verkaro konsistigas ĉi-tiun grupon:

Premiitaj: N.º 14, de S-ro. Jan van Schoor el Belglando. N.º 35, de S-ro. H. J. Bulthuis el Nederlando.

Menciindaj:

N.º 78, de S-ro. Joseph Berger el Hispanujo. N.º 10, de Eduard Capdevila el Barcelona. N.º 27 de Louise Briggs el Anglujo. N.º 34, de Joseph Berger el Hispanujo. N.º 149, de José Suárez el Hispanujo. N.º 51 de Helena Hempel el Pollando. N.º 114, de Fran Janjić el Jugoslavujo. N.º 151 de S-ro. J. Figueras el Terrassa.

## MALLONGAJ PROZAJ TRADUKOJ

Premio de S-ro. J. Barceló, ptoj. 50

Premio de «Bela Espero»: » 50

Premio de «Verda Stelo»: » 50

Premio de «Heroldo de Esperanto»: 5-jara abono.

Jen la rezultato de la voĉdonaro por tiu multnombra verkaro (29)

Premiitaj: N.º 81, de Joseph Berger el Hispanujo. N.º 53, de Josep Ventura el Terrassa. N.º 120, de aŭtoro petata konigi sin al ni. N.º 112, de S-ro. Siegmund Prager el Belgujo.

(La premio de «Heroldo de Esperanto» por tiu lasta)

Menciindaj:

N.º 47, de S-ino. Lucette Faes el Belgujo. N.º 46, de S-ino. Lucette Faes el Belgujo. N.º 79, de S-ro. Joseph Berger el Hispanujo. N.º 82, de S-ro. Joseph Berger el Hispanujo. N.º 137, de S-ro. Edvardo Wiesenfeld el Pollando. N.º 77, de Fino, Natalia Ŝirjaev el Ruslando. N.º 71, de S-ro. Karl Czech el Ĉekoslovakujo.

## LONGAJ DIDAKTIKAJ VERKOJ

Premio de Crèdit Balear. 100 ptoj.  
6 verkoj konkursis por tiu premio.

Jen la rezultato:

Premiita: N.º 16, de Jozefo Major el Francujo.

Menciindaj:

N.º 63, de Jozefo Major el Francujo. N.º 76, Dr. Karl Friedl el Francujo. N.º 113, de Dr. Adolf Halbedl el Aŭstrujo. N.º 36, de J. Kramer el Nederlando. N.º 118, de aŭtoro petata konigi sin al ni.

## MALLONGAJ DIDAKTIKAJ VERKOJ

Premio de «Ĝerona Espero»: ptoj. 50.

Jen la rezultato por la 6 verkoj alvenintaj por tiu-ĉi konkurso:

Premiita: N.º 29, de Dr. Leopold Dreher el Pollando.

Menciindaj: M. 94, de H. L. J. Vermuyten el Belgujo. N.º 24, de Karl Minor el Germanujo. N.º 12, Karl Giessmann el Germanujo. N.º 69, de Sydney J. Smith el Anglujo. N.º 64, de E. Aisberg el Francujo.

*Natura evoluo de Esperanto*

Premio de «Kataluna Esperantisto». Dumviva abono.

Nur unu konkursaĵo alveninta. Sed ĝi meritas esti

Premiita: N.º 115, de Dr. Karl Schüppel el Germanujo.

*Kion kaj kiel mi aŭdas per Radio*

Premio de «Internacia Radio Revuo». Dumviva abono.

Tri verkaĵoj konkuris por ĝi. Preskaŭ unuanime la Juĝantaro elektis por esti

Premiita: N.º 109, de Günter Erber el Aŭstrujo.

Menciita: N.º 116, de Hildegard Nickel el Germanujo.

*Dia Amo*

Premio de «Espero Katolika». Dumviva abono.

Nur du verkaĵoj konkursis por ĝi. Unuanime elektita por esti

Premiita: N.º 129, de Mossèn Joan Font Giralt el Banyoles.

*Kiel ni sukcesigos niajn kursojn*

Premio de «Paĉo kaj Amo». Ptoj. 50

El kvar studaĵoj por tiu grupo estas du tre bonaj. La voĉdonaro elstarigis por esti

Premiita: N.º 45, de Teodoro Kilian el Ĉekoslovakujo. Menciita: N.º 49, de D. Leopold Dreher el Pollando.

Suplemento al «Kataluna Esperantisto»

XIV<sup>a</sup> Kongreso de  
Kataluna Esperantista Federacio

Sóller 5 - 6 - 7 junio 1927




La Reĝino de la XIII Floraj Ludoj  
FRAÚLINO MARGARIDA COLOM



La Reĝino, kun sia Ama kortego: Fraŭlinoj Rosa Maria Ledesma, Caterina Marquès, Paula Colom, Adelaida Ledesma, Magdalena Colom kaj Francesca Pizà.




Grupo de Kongresanoj.




Grupo de Aŭtoritatuloj kaj pioniroj.





La kongresanoj antaŭ la Urbodomo.



Ekskurso al «Torrent de Pareis».

*Studo pri lingvo kaj literaturo de iu malgranda popolo*

Premio de Sro. Jaume Grau Casas: 50 ptoj.

Tiu difinita temo interesis kaj atingis 4 bonajn konkursaĵojn.

Premiita: N.º 62, de Amalia Núñez el Navarra.

Menciindaj: N.º 54, de P. Lapiene el Litovujo. N.º 73, de Liem Tjong Hie el Java. N.º 106, de Ed. Jung el Francujo.

Premio de Banc de Sòller: Ptoj. 100.

Specialajn lokojn okupas du verkaĵoj: N.º 2, menciita ducele: por la Natura Floro kaj por alia premio. Kaj N.º 64, kiun ni envicigis kun la mallongaj didaktikaĵoj, ĉar ne estis speciala grupo por ĝia speco: humoraĵo, cele bagatelaĵo; kaj kompreneble ĝi apartigis en tiu grupo kvankam ĝi estas vere premiinda pro ĝia literatura boneco. Tial ni dispartigis la premion de Banc de Sòller por ilin dece premii per 50 ptoj. al ĉiu. Iliaj aŭtoroj respektive estas Jan van Schoor el Belgujo, kaj E. Aisberg el Francujo.»

(Sro. Josep Ventura el Terrassa reprezentis la ĉefan laŭreaton Ĉuvi Lovostan, kaj emociige legis lian poezion «Renkontiĝo». Aliajn premiitojn reprezentis kaj legis verkaĵojn, gesamideanoj Josep Alberich, Fino M. Molins, Marian Solà, Fino. Montserrat Grau, Abdon Bordoy, Antoni Barceló, Francesc Fuster, Miquel Arbona, Guillem Cortada, Andreu Fiol, Narcís Bofill, Joan Barceló, Marian Jaquotot, Nicasi Terrassa, Salvador Galvany, Aureli Nadal, Jeroni Massanet, Josep Miró, Gabriel Fuster, Antoni Nadal, Pere Rodríguez, Fino. Maria Fiol kaj pastro Pastor).

## CELO KAJ OFERO

«Ni devas danke memori, ke ne nur la Institucio de la F. L. forte interesas nun la esperantistajn aŭtorojn, sed ankaŭ el centroj de nia movado intereso estas pruvita per ofero de premioj. Tio, estas kuraĝiga por ni; ĉar de antaŭ jaroj la katalunlingva popolo, malgranda, malriĉa, oferas milojn da pesetoj por internacia literatura konkursaro, kaj ni penos ankoraŭ daŭrige oferi ĉiujare. Sed justa estas internacia partopreno por la F. L., ne nur cele de premioj sed ankaŭ ofere.

Ni deziras honorige nomi ree hodiaŭ la eksterlandajn oferantojn de premioj por la F. L. ĉi-jaraj, *Sron. T. Jung, Heroldon de Esperanto, Amerikan Esperantiston, Katolikan Mondon, Esperon Katolikan, Internacian Radio-Revuon*, kaj ilin peti, kiuj tion ne jam faris al ni, efektivigi siajn oferojn rekte al la koncernaj difinitoj. Ni publikigas la adresojn de ĉiuj premiitoj por faciligo ke oni sendu al ili kuraĝigojn kaj gratulojn.

Vere dankindaj estas la membroj de la Juĝantaro, kiuj dum kelkaj semajnoj devas laboregi por konscie prijuĝi tiom da verkoj, inter kiuj estas kelkaj longaj, kaj foje tre malfacile elstarigeblaj la plej meritaj el similkvallitaj konkursaĵoj.

Estas hodiaŭ grava nia Institucio. Aktiva kaj efika ĝia funkciado. Profunde kaj vaste enradikiĝinta en Esperantujo. Ĉiuj literaturamantoj

helpu ĉiel al ĝia daŭrigado, kiu bezonas nuntempe ĉies atenton kaj oferon. Kiuj tion dubas demandu al ĉiulandaj gesamideanoj kiuj persone kaj intime konstatis ĝian agadon: Marie Hankel, Louise Briggs, S-ino. Osmond, Joseph Berger, Robert Kreuz, Ed. Privat, Kolomano de Kalocsay, Julio Baghy, Teo Jung, Frans Schoofs, T. Cart, Grosjean Maupin, kaj aliaj altaj pioniroj de nia Internacia Movado.

#### ORDINARAJ TEMOJ — PREMIOJ — TRADUKOJ

Bedaŭrinde estas ĝenerale tro malmulte konkursitaj, ĉefe tiun-ĉi fondon. Ni tuj aldonu senkulpage al la katalunlingvaj samideanoj, kiujn pli rekte koncernas tiuj konkursoj, ke multaj el ili estas jam forte kaptitaj por redaktado de nia gazeto, regado de nia federacio, gvidado de kursoj kaj eĉ kelkaj, senrajtigitaj pro partopreno en Juĝantaro. Kaj ankaŭ, la katalunlingva teritorio estas malgranda. Sed ĝi estas tiel esperantema, ke malgraŭ tiuj faktoj restas ankoraŭ multaj samideanoj kiuj povus kaj devus celi la tradukajn ordinarajn temojn de la F. L. — nome niaj neforgeseblaj, Pujulà, Bremon, Sabadell, Josep Grau, Cases, Rosselló, Pellicer, Albagés, Galceran, Domènech, kaj aliaj malnovaj lertaj, talentaj kaj iamaj pioniroj niaj, Esperantistaj patroj niaj. — Ili rememoru nin, siajn idojn, defendantojn de iliaj ideoj kaj agoj kaj celoj; ili ne forlasu nin, ni ankoraŭ bezonas ilian helpon kaj akompanon. La Floraj Ludoj atingis tian gravecon kaj tian pezon ke estas ĉiuj niaj ŝultroj necesaj por subtenado kaj antaŭenigado de nia universala institucio enradikiĝinta, bele sukcesinta, en Esperantujo, por esperantuja kulturo kaj poezio, por esperantuja vero kaj belo, por esperantuja paco kaj amo. — Kaj niaj novaj samideanoj, niaj idoj? Ĉu ankaŭ niaj idoj forlasos nin? Kial ili ne povas, ne klopodas konkursi? Ĉu ili ne komprenas ke ni lernis kaj konkursis ankaŭ malsukcese, kial lernantoj? Kaj eĉ plenaĝaj, post multjara laborado kaj lernado, ni foje ankaŭ malsukcesis? Ili, do, provu, almenaŭ pruvu ke ili volas akompani kaj helpi nin kiam ili jam konscias ke ni ne trompis ilin pri la boneco kaj praveco de nia lingvo kaj de nia celo.

#### SPERTO PRI TEMOJ

Ofte difinitaj temoj estas tre malmulte aŭ tute ne konkursitaj. Ĉefe kiam oni difinas temon ne profunde kaj ĝenerale interesan en esperantujo.

Tamen ĉiujare pli kaj pli grandiĝas la nombro de la verkoj por temoj libervolaj. Eĉ studaj verkoj alvenis ĉi-foje multaj kaj gravaj, sed ne por la difinitaj temoj. Tial ni petis la ĉefajn oferantojn permeson por aljuĝi al libertemaj sed bonaj kaj gravaj verkoj, premiojn anoncitan por difinitaj temoj. Ni devas danki ke ĉiuj ĝenerale konsentis por bono de nia afero.

#### TRADUKO KAJ ORIGINALO

Ĉu literature oni povas, jes aŭ ne, juĝi tradukon sen komparo kun la originalo?

Se literaturaĵo estas monotona, vortare malriĉa, gramatike ne tre pura, stile malbela, kaj science esprimas evidentajn erarojn, ĝi estas malbona ĉu tradukita aŭ originala, ĉu fidele aŭ malprecize esperantigita. Kontraŭe, se ĝi estas belstila, korekta lingve kaj sence, interesa aŭ emociiga, profite aŭ plezure leginda, ĝi estas bona. Mallerta tradukanto ne povas elekti kaj sukcesi por bona verko. Eĉ se ial ajn li trafus tradukindaĵon, lia traduko prezentus malbonaĵon. Lerta tradukanto, tamen, plibonigus neelektindan originalon.

Ĉe teknikaj verkoj, iaj stilaj kaj gramatikaj makuloj estas pardoneblaj. Foje ne lingve pura konkursaĵo estis aliscience grava, kaj kontraŭe. Sed ĉe verkoj cele literaturaj, vortaraj, gramatikaj kaj stilaj eraroj estas ĉiam gravaj difektoj.

Konklude mi opinias ke, ne temante pri specialaj tradukaj kaj retradukaj provoj, oni povas prijuĝi same, originalon kiel tradukon, sen neceso ke Juĝanto konu kaj komparu la originalon de traduko.

#### GRAVECO DE LA PREMIO

Niajn Florajn Ludojn nun konkuras vere gravaj verkoj. Tial devas esti laŭeble valoraj premioj. Kaj por tiaj premioj decas konkuro kaj batalo per korekteco, originaleco kaj ĉia graveco de konkursaĵo. Tial ni preferis elteni la premiojn plenaj, ne dividi ilin, malgraŭ ke foje samkonkursaj verkoj montris proksimuman meriton. Nia Institucio ne nur celas premii bonajn verkojn, sed ĉefe stimuli al verkado kaj al perfekteco de la Esperanta literaturo.

#### GRUPIGO DE KONKURSAĴOJ

Estas konkursantoj kiuj celas preskaŭ ĉiujn premiojn. Ili sendas preskaŭ tiom da verkaĵoj kiom da premioj estas proponitaj, kaj surskribas rimarkigon por ke ĉiu verko konkursu malsaman premion. Se tiaj aŭtoroj estus vere enciklopediaj kaj plej talentaj esperantistoj, ili ankoraŭ devus esti samtempe inspiruloj, kaj tre laboremaj, ĉar ni grupigas la verkojn laŭ originaleco kaj literatura speco, laŭ tradukeco kaj longeco. Se ili estus tiel privilegie dotitaj kaj tial multe kaj diverse da verkoj sendus, neniu rimarkiga sursbribo estus necesa por atingi ĉiujn premiojn. Vole ne vole, bona grupigo de la konkursaĵoj faligus ĉiujn premiojn al iliaj verkoj. La Sekretario ja ne povas grupigi versaĵojn kun prozaĵoj, longajn manuskriptojn kun mallongaj k. t. p. Kontraŭe eĉ malgraŭ la diritaj rimarkigoj de konkursantoj, la Sekretario devas atente ekzameni ĉiun konkursaĵon por ĝia lokigo kaj premiara distribuo decaj.

#### INSPIRO KAJ PRAKTIKO

Aliflanke la Florajn Ludojn konkuras niaj plej eminentaj aŭtoroj, aŭ novaj verkistoj tre atente verkante plej korekte kiam inspiro diktas al ili.

Kaj ofte tiuj novuloj sendas pli bonajn fruktojn de la spirito ol kvazaŭ-profesiuloj kiuj fidas al praktikeco, kaj ambicie sentas sin pli puŝitaj de deziro por premioj plej multaj ol de inspiro por verkado.

#### SENUTILAJ REZONOJ

Ĉe la malfermo de la kovertoj entenantaj la nomojn de la aŭtoroj, surprize mi legis de kelkuloj notojn kun klarigoj pri la konkursaĵoj kaj rezonoj por atingi premion. Tio pruvas ke ili ne havas ĝustan ideon pri la utilo de la senditaj kovertoj. Oni forgesas ke ili nur taŭgas por konigi la aŭtoron de ĉiu verkaĵo kiam la Membroj de la Juĝantaro jam estas voĉdonintaj, kaj la rezultato ne estas ŝangebla. Plie devas esti nur tiu konvinka fakto: boneco de la konkursaĵoj.

#### LA PAPERFOLIOJ

La paperfolioj de ĉiu manuskripto estu skribitaj nur sur unu flanko kaj ne estu centimetre pli ampleksaj ol  $30 \times 20$ , nek malpli ol  $20 \times 15$ . La necesa pakigo kaj sendo de la verkaro de unu al alia juĝanto, foje landojn malproksimajn, riskigas la difektiĝon de la manuskriptoj se ili estas amplekse ne bone kunmetebaj.

#### NOVAJ KONDIĈIGOJ

La plinombrigo de la konkursaĵoj prezentas novajn kondiĉigojn necesajn. Ĉiu juĝanto por bona plenumo de sia tasko bezonas minimuman tempon kiu fariĝas longa se li devas tralegi kaj kompari tiom da manuskriptoj. La verdikto devas esti pretigita kaj publikigita antaŭ la Solena Festo de la F. L. kiu okazas printempe dum la kongreso de K. E. F. Nova kondiĉigo kiu povas havigi la necesan tempon estas la sendigo de duobla kopio de ĉiu manuskripto por ebligo ke la juĝado estu efektivigata de du membroj samtempe kaj tiel duobligi la juĝadan tempon al ĉiu membro.

Bona ideo estas ankaŭ, kiun Frans Schoofs rimarkigas, ke estu du Juĝantaroj: Unu por versaj, kaj alia por prozaj konkursaĵoj, de nun, kiam tiom grava fariĝis nia Instituto.

#### FINA KOMENTO

Pri la konkursaĵoj ni almenaŭ diru la ĝeneralan impreson de la XIII-aj Floraj Ludoj.

Ĉe la poezia verkaro sentiĝis la manko de Julio Baghy, Kolomano de Kalocsay, Jaume Grau kaj Artur Domènech. Neniu originala poemo vere brilis eksterordinare. Sed la prozaĵoj havigis al ni gravajn verkojn: la tradukon de la kataluna rakonto, de S. Alberich; tradukon de 5 ĉapitroj de Don Kihoto, de Bulthuis; Esperantigon de «L'Arlésienne», de Jan van

Schoor; belajn originalojn de Ŝirjaev kaj Lucette Faes; rimarkindajn didaktikajn verkojn Jozefo Major, k. a.

Ni esperu ke la grandaj poetoj de Esperantujo montriĝos pli konkursemaj en la proksimaj Florludoj, kaj ĉiam pli nia Instituto fariĝu granda literatura Allogilo de Esperantujo.»

DELFI DALMAU

Longa aplaŭdado premias la taskon de Sro. Dalmau, kiu legis sian raporton kun granda klareco.

S-ro Jaime Grau Casas, Prezidanto de la nunjaraj Floraj Ludoj, alpaŝas sur la scenejo kaj legas la sekvantan paroladon:

Bela Reĝino,  
Ĉarmaj Korteganinoj,  
Respektindaj Aŭtoritatoj,  
Sinjorinoj kaj Sinjoroj,  
Gesamideanoj:

Kun nedirebla emocio mi klinas min antaŭ Vi, majeste bela Reĝino, kaj mi staras antaŭ vi, fervoraj partoprenantoj de tiu ĉi poezia festo, por fari la kutiman paroladon, per kiu la Prezidantoj de la Floraj Ludoj brile kronas nian solenaĵon, glosante ĝian spiriton kaj kun edifa senco dirante ion pri ĝiaj diversaj aspektoj.

Dankon tutkoran mi ŝuldas pro la honoro al mi farita, ĉar mi ne povas min kredi inda sekvanto de la eminentaj samideanoj kiuj prezidis la Florajn Ludojn, nun okazantajn por la dek-tria fojo.

Tamen, mi kuraĝis akcepti la devon paroli al vi, — devo cetere nur ĝojiga kaj honoriga —, ĉar, se ne propran meriton, entuziasmon mi posedas, plej ardan entuziasmon por nia poezia festo, kie ni ĉiuj sentas ke niaj animoj vibras sub la signo de Amo, de Beleco, de Poezio, kie ni gloras la formon de nia lingvo kaj la spiriton de nia ideo, kie ni admiras niajn verkojn kaj aklamas niajn verkistojn, kie, unuvorte, ni kunvenas por *sent* — kaj ne por okazigi, kun nur ekstera soleno, simplan literaturan konkurson.

En la kvaraj Floraj Ludoj, dum la kvina Kataluna Kongreso okazinta en Sant Feliu de Guixols unu monaton antaŭ la Eŭropa milito, mi unuafoje aŭdis deklami esperantajn poemojn, komprenante de ili nur kelkajn vortojn kaj tamen eksentante la mirindan harmonion de nia kara lingvo. De tiam mia koro intime alligiĝis al la Esperanta poezio, mi ellernis gramatikon kaj stilon kaj komencis partopreni, kiel multaj aliaj samideanoj, niajn konkursojn, mi poste helpis al ilia organizo, mi akiris ioman sperton en la verkado kaj precipe en la tradukado de poemoj en Esperanto, kaj fine mi konvinkiĝis plene, absolute, ke la internacia lingvo havas antaŭ si, ankaŭ en poezio, grandan estontecon. Mia fervoro por la poezio senkulpigos min, do, se mi kuraĝas, ne parolante tamen kun aŭtoritata pretendo, pripa-

roli antaŭ vi, nur kun iom da amika konsilo, aferojn pri kiuj mi havas propran sperton.

Per nia poezia festo, estimataj gesamideanoj, ni volas atingi du celojn. Unue, ni penas diskonigi kaj triumfigi Esperanton kiel lingvon universalan. Sed, due, ni asertas ke la Zamenhofa kreaĵo estas mirinde taŭga por literaturo kaj portas en si tian poezion, ke ĝi povas unuritime batigi ĉies korojn, ke ĝi kapablas vekti ĉe la diversaj animoj de la homoj komunan senton de beleco, ke ĝi parolas per misteraj kaj subtilaj vortoj al la plej alta parto de la homa spirito.

Laborante por la celo de lingvo internacia ni renkontas mokon kaj skeptikecon, sed ni sukcesas post pena laboro varbi novajn adeptojn. Kaj, kiam ni volas vidigi la artan, la spiritan valoron de nia lingvo, tiam, nekredibla afero, ni ankaŭ renkontas ĉe la esperantistoj mem pridubantojn kaj eĉ malamikojn. Ĉu vi scias kial tio ĉi okazas? Tial, ĉar havi universaleman spiriton ĉe la lipoj, ne estas havi ĝin ĉe la koro; ĉar aspiro al perfekteco ne estas ankoraŭ posedo de perfekteco; ĉar necesas granda laboro por altigi sin al tiu nivelo, de kie ni povas ekvidi la spektaklon de la mondo, kun klara percepto pri ĝia mistera unueco kaj pri ĝia bela varieco.

La malŝateman esprimon *Poezio, ne!* povis eljeti iu sin nomanta samideano, sur gazeto dediĉata al la propagando de Esperanto. *Poezio, ne!* ŝajnas ripeti de tempo al tempo kelkaj spiritoj, kiujn ni devas kompati ĉar ili estas sekaj kaj nekomprenemaj, ili ne amas la arton kaj ne sentas la solidarecon kun batalantoj el la sama tendaro!

Por aserti la forton, la efikon, la superecon de *Poezio*, ni kuniĝas en tiuj ĉi festoj de la Floraj Ludoj. Kaj ni povas esti certaj ke ni ne estas solaj, ĉar multaj samideanoj el plej diversaj landoj spirite akompanas nin, kaj en sia koro ili kantas kun ni himnon al la *Poezio*, kiu estas eterna kaj universala, same kiel estas eterna kaj universala, malgraŭ ĉiuj baroj tempaj kaj lokaj, la spirito kiu movas nin, esperantistojn!

Ni klopodu, per nia tuta forto, daŭrigi la kulturadon de la Esperanta poezio, nia longe konata Cindrulino! Per tio ni helpos rekte la valoron kaj la vivon de Esperanto, kaj ni kontribuos al ĝia enkonduko en la interrilatojn de la popoloj. Eĉ ni pensu, ke, se halto en nia movado iam malebligus la plenan triumfon de nia ideo, tamen la parton de triumfo atingita montrus tiam la produktado de niaj verkistoj, kiu permesus al la estonta homaro konstati ĝis kia grado laboris por alta celo homoj superintaj la honton de materialista kaj senideala epoko.

Sed la tasko starigi poetikan arton en Esperanto estas grandega. Se la celo de internacia lingvo estas malfacila, pli malfacila ankoraŭ estas la celo de internacia poezio. Pri la lingvo ni havas *Fundamentan* gramatikon kaj modelan stilon en multnombraj verkoj literaturaj. Sed pri la poezio ekzistas, oficiale, nenia bazo, nenia fundamento, nenia leĝo, nenia konvencio, kaj ni disponas nur je kelkaj modeloj de nia Majstro, kiuj montras *parton* de la ebla poetiko en Esperanto, sed ne la tutan poetikon.

Eble la sola oficiala regulo, en esperanta poetiko, estas la permeso forigi la finaĵon *o* de la substantivoj ne akuzativaj en ununombro. Kaj tamen aŭdiĝis nekompreneblaj plendoj kontraŭ la uzado de tiu permeso forigi la finaĵon *o*, sola aludo al poetiko entenata en la Fundamento.

Tio estas karakteriza ekzemplo de la anarkio reganta en la esperanta poetiko, kiu forte baras ĝian progreson. La sola leĝo estas kontraŭstarata, kaj, aliflanke, aferoj kiuj restas kaj devas resti en libereco, estas prezentataj de kelkaj samideanoj kiel *leĝo*.

Tie ĉi mi aludas precipe la problemon de la *ritmo*. Nenie oni leĝdonis pri ĝi, kaj tamen multaj samideanoj, ĉefe tiuj, kiuj edukiĝis sub la influo de la germana kulturo kaj ne dediĉis sin profunde al poezio, pretendas ke sole estas korekta la *rigora ritmo laŭ piedoj*. Centfoje estas dirite, ke, apud tia *rigora ritmo*, rajtas ekzisti ankaŭ la *libera ritmo* uzata diversmaniere ĉe la latinidaj lingvoj. Kaj ankoraŭ rajtas ekzisti en Esperanto *ĉiuj* poetikaj formoj de *ĉiuj* lingvoj, kun la sola limigo trudata de minimuma *klareco* kaj *harmonio*. Leganto de Esperantaj poemoj devas forlasi la rutinon de sia patra lingvo kaj peni kapti la spiriton de la legata verko.

Koncerne la rimon, ankaŭ ekzistas malfacilaĵoj. Ĝenerale oni interkonsentis forigi la *sufiksajn rimojn* (eta-eta; ado-ado) kaj la *korelativajn* (iam-iam; ie-ie), sed oni ne akordiĝas pri la ceteraj rimoj. Krom la *perfektaj rimoj* de ĉiuj akceptataj (nomo-domo), kelkaj aŭtoroj uzas *rimojn kun nur konsonanta sameco* (dianto-brilanta), sed ili malaprobas *rimojn kun nur vokala sameco* (celo-beno), kiujn ni povas nomi *asonancoj* aŭ *duonrimoj*. Male, aliaj aŭtoroj, kiuj estas partianoj de la rimoj kun nur vokala sameco, alimaniere nomataj *asonancoj* aŭ *duonrimoj*, malaprobas rimojn kun nur konsonanta sameco. Ankoraŭ alia rimmaniero ekzistas, nome, tiu kiu uzas *rimojn kun konsonanta simileco*, ne kun konsonanta *sameco* (inda-falinta).

Mi nur skizis kelkajn problemojn al kiuj donadas solvon iom post iom niaj poetoj per siaj produktaĵoj. Sed, anstataŭ atendi ke nur la praktiko solvu tiujn problemojn, ĉu ne estus konvene — edukante per tio la legantan publikon — iomete fiksi *teorie, akademie* nian poetikon per kelkaj reguloj, samtempe konservante al la poetoj sufiĉan liberecon? Kun iom fiksita poetiko, ni evitus la hodiaŭan staton de neakordiĝo, en kiu, ekzemple, iuj verkistoj volas *ĉian* liberecon en *rimo*, sed samtempe malaprobas la liberecon en *ritmo*.

Tamen, oni devus agi tre singarde, kaj, ĉar la sento pri beleco estas tre diversa, nia internacia esperanta poetiko devus ĉefe *reguligi* kaj ne *malpermesi*, konservante, kiel dirite, la plej grandan liberecon eblan por la poetoj. Mi ja ne deziras malpermeson, sed *difinon* de la eblaj liberecoj, tiamaniere ke ni sciu ke ili ekzistas same ĉe la ritmo kiel ĉe la rimo kaj favoras egalrajte ĉiujn sistemojn de versfarado.

Niaj Floraj Ludoj, kiel ĉiu scias, celas instigi al poeziamo, sed ili ne sentas sin kun aŭtoritato por sugesti solvojn al la priparolitaj problemoj. Sufiĉas por la gloro de nia festo, ke ĝi humile sed persiste premias kaj ku-

raĝigas la poetojn, la literaturistojn, ĉiujn, kiuj amas la arton de la bela esprimo.

Ni faras tion iom rapide, pro la amaso da ricevataj verkoj kaj la malfacila organizo de la laboro, kaj tial la partoprenantoj en niaj konkursoj ne devas esti tro severaj, kaj ili ankaŭ ne devas senkuragiĝi se iliaj verkoj iafafoje ne estas sufiĉe atentitaj de la Juĝintaro. La Floraj Ludoj estas ideala festo por niaj animoj kaj ne pretendas taksi la meriton de ĉiu, sed nur kunigi ĉiujn en sama aspiro kaj en sama ĝojo.

Post la faritaj konsideroj, estas jam tempo ke mi finu mian paroladon.

Dankon al vi, partoprenintoj de nia festo, malproksimaj homoj dufoje fratoj niaj pro via kompreno de nia idealo pri Belego, dankon al vi pro via ĉeesto spirita en tiu ĉi loko, plej inda sidejo por Poezio, de kie ni volus sendi al vi la parfumon de la floroj, la dolĉecon de la maturaj fruktoj kaj la mirigan blumon de ĉielo kaj maro, samtempe sentigante al vi la noblecon en la okuloj kaj la firmecon en la mano, per kiuj bonvenis nin la loĝantoj de tiu ĉi gastama urbo de Sóller.

Dankon al ĉiuj, kiuj iel helpas, subtenas aŭ protektas nian feston: al la Esperantaj gazetoj, kiuj disvastigas la alvokojn al tiuj ĉi konkursoj; al niaj amikoj, kiuj esprimis sian specialan ŝaton por la Floraj Ludoj; al ĉiuj esperantistoj, kiuj sekvas kun intereso ilian disvolviĝon; al la tuta batalanta samideanaro... Ankaŭ en nia komuna ĝojado pri poezio ni volas starigi, manon ĉe mano kaj koron ĉe koro, unu grandan rondon familian!

I ara, permeteu-me que en la llengua nostra us saludi a tots vosaltres, senyores i senyors, i digui unes paraules d'agraïment per la vostra afectuosa atenció i el respecte amb què haveu escoltat la nostra festa, entenent-ne només, ací i allà, alguns mots d'origen llatí.

Imagineu-vos, amics, quina cosa tan meravellosa són aquests Jocs Florals, en els quals han pres part i ens acompanyen espiritualment homes dels més diversos països, que sota la infinita varietat de llengües, de costums, de temperaments, senten també l'ideal de la poesia, s'emocionen davant dels espectacles de l'ànima humana i de la natura, i saben parlar d'amor, de bellesa, de sentiment, fent-se entenedors uns als altres per mitjà d'aquesta llengua a la difusió de la qual ens dediquem els esperantistes, en el nostre desig de donar al món, a tots els pobles del món, més comprensió recíproca, més afecte, més fraternitat.

Les últimes paraules que he dit en esperanto eren adreçades a tots els qui de llunyans països han pres part a la nostra festa, i jo els deia que, en agraïment a llur presència espiritual, voldria, des d'aquest lloc meravellos, irradiant de quietud i benestar sota la bellesa del sol que daura la vostra Illa, fer-los arribar una mica del parfum de les vostres flors, de la dolcesa dels fruits madurs, de la visió d'aqueixos cel blau i mar blau, i una mica també de la vostra hospitalitat, que els parlés dels ulls brillants i mans obertes de la gent de Sóller.

Cap més lloc, sinó aquest, no podriem trobar tan acollidor per a una

fiesta de poesia. Les belleses naturals que ens envolten a penes ens deixen reposar els ulls meravellats, i tot ens recorda que som ací en terra clàssica, amarada de sublimitats; aquella terra que, a part de tota altra raó, es fa estimar de nosaltres, aimants de la poesia, per ésser la mare d'un brillant estol de poetes, d'aquells altíssims poetes que es digueren, que es diuen encara i que es diran sempre Miquel Costa i Llobera i Joan Alcover.

A tots vosaltres cal que regraciem en acabar aquest acte; al poble de Sóller, a les dignes autoritats, a les entitats i particulars que han ofert premis, als organitzadors del nostre Congr s Esperantista, a tots els concurrents, i, per damunt de tots, a la Reina dels Jocs Florals i a les donzelles de la seva Cort d'Amor, que amb l'esclat de llur bellesa han coronat superbament la nostra festa, deixant en el cor de tots nosaltres un inesborrable record.

I, per  ltim, ja que tan gentilment heu escoltat els parlaments en una llengua que molts de vosaltres no coneixeu, per  que alguns, n'estic segur, comen areu d'aprendre amb entusiasme, ara, en la nostra llengua, en la llengua de Ramon Lull, d'Auzi s March i de Bernat Metge, i amb paraules plenes de regust pairal, plau-me de dir-vos: Ad u siau.

JAUME GRAU CASAS

Granda ovacio sonas  e la lastaj vortoj de S-ro Grau.

La Urbestro elparolas «la festo estas finita» kaj la Reĝino kaj Korteganinoj malsupreniras la estradon akompanataj de distingindaj samideanoj, kiuj kun videbla fiero iras kun ili tra la parteroj kaj kondukas al la

#### OFICIALA FESTENO

 tkaŭ 70 personoj  estis la oficialan festenon, kiun prezidis la Reĝino kaj ŝiaj Korteganinoj. La prezidan tablon okupis ankaŭ Lia Urbestra Moŝto, la Prezidanto de K. E. F. tiu de la O. K., nia diligenta kaj kara Bofill kaj aliaj pioniroj.

Estas superflue diri ke dum la festeno regis granda entuziasmo  ar oni ne vidas festenojn sen tiu speciala sento, sed al niaj festenoj aldonigas tia frateco kaj amikeco inter la  eestantoj, ke tio estas aparte rimarkinda eco de nia bela festo.

 e la malŝtopo de la  ampano ekpluvegis la tostoj kaj paroladoj. Por eviti forgesojn ni volas citi neniun absolute. Ni diru simple ke pli ol du-dek  eestantoj starigis kaj kantis sian amon al Esperanto. Multaj el la paroladintoj estis neesperantistoj kaj esprimis grandfrazo sian simpatian al nia afero, kiu per la Floraj Ludoj kaj kunsidoj evidentigis al ili, ke tio ne estas simpla propagando de lingvo, sed fakte vivanta kaj harmonia homa kreaĵo. Ni ankaŭ citu ke kelkaj paroladintoj, inter ili iu verkisto, diris ke Mallorca, malgraŭ la dividanta maro, sentas sin frato de Katalunujo, kies lingvon havas kiel propran la insulanoj.

Niaj pioniroj uzante la okazon esprimis milmaniere la belecon de la Reĝino kaj Korteganinoj, kies fajraj okulradioj estis multe pli kapturnigaj ol la ĉampano mem. Al la organizintoj, kaj precipe al la modesta Arbona, oni dankis senfine pro la bela organizo kaj pro tio ke ili havigis al la transmaraj esperantistoj novan okazon ĝui la ununuran Mallorca-n landon.

Subite eksonis la notoj de nia himno kaj *La espero* entuziasme fluis el niaj lipoj. Tio estis la lasta rimarkindaĵo de la rememorinda festeno.

### EKZAMENOJ

Je la 16-a komenciĝis la ekzamenoj, kiuj okazis sub la juĝo de Sroj. Delfi Dalmau, Marian Solà kaj S. Alberich-Jofrè.

Sro. Miquel Arbona brile sukcesis atingi la Diplomon de Profesoreco. Sroj. Andreu Arbona, Francesc Colom, Gabriel Meneu, Antoni Nadal kaj Aureli Nadal atingis tiun de Kapableco.

### FERMA KUNSIDO

Sub la prezido de la samaj samideanoj, kiuj prezidis la laboran kunsidon, oni komencas la Ferman Kunsidon je la 18.

La Sekretario legas kelkajn leterojn kaj telegramojn, kiujn oni ricevis. Oni aplaŭde salutas la legadon de ĉiu telegramo aŭ letero, kies enhavo ĝenerale estas saluto al la Kongreso.

La Prezidanto bedaŭras ke pro malsano li estas devigata forlasi la postenojn per kiuj honoris lin la enlandaj esperantistoj, kaj petas ke oni anstataŭu lin. Post longedaŭra interŝanĝado de opinioj oni decidas okazigi eksterordinaran kunsidon en Barcelona por solvi la nun ne solveblan problemon kaj prokrasti por tiam la elekton de nova Komitato.

En la nomo de ĉiuj kongresanoj la Prezidanto dankas la samideanojn en Sóller por la granda laboro, kiun ili plenumis ĉe la organizo de la sukcesa Kongreso kaj precipe li dankas Sron. Arbona, sur kiu pezis granda parto de la laboro.

### MUZIKA FESTO

Nokte, je la 9.30, okazis la anoncita festo en la sidejo de Societo «La Unión», kies grandegan ĉambron plenigis granda nombro da esperantistoj kaj publiko enurba.

Malfermis la feston per paroladeto tre lerta la sekretario de la Societo, Sro. Josep Bauzá, kiu esprimis sian aliĝon al la celo de la esperantistoj, kies sanktan laboron li admiras kaj aplaŭdas.

Sub la gvido de pastro Miquel Rosselló orkestreto ludis diversajn komponaĵojn tre lerte kaj harmonie. Fino. Flora Busquets regalis la ĉeestantojn per sia belega voĉo.

Entuziasme oni aplaŭdis ĉiujn kunlaborintojn en la bela programo.

Sro. Delfi Dalmau faris belegan paroladon pri la moderna sistemo de la

instruado de lingvoj, reliefigante ties utilecon en la lernado de Esperanto. Praktike li pruvis la utilecon de Lingvofono per disko en Esperanto. Al la multnombra ĉeestantaro oni disdonis presaĵon enhavantan la tekston de la leciono, kiun per la gramofono tre klare elparolis Dro. Privat.

La ĉeestantoj miris, ke ili povis tre bone ĉiun vorton kompreni.

Sro. Dalmau aŭskultis tiukaze unu el la plej grandaj ovacioj.

Por fini la feston oni ludis nian himnon, kies strofojn la ĉeestantaj geesperantistoj kantis tre bone.

## TRIA KONGRESTAGO

### MAREKSKURSO AL «TORRENT DE PAREIS»

Ĉirkaŭ la 9-a, 60 gekongresanoj proksimume enŝipiĝis ĉe la haveno de Sölller por marekskursi al «Torrent de Pareis». Post unuhora dancado sur la malbonintencaj ondoj, la kvar boatoj kun la kongresanoj atingis la celon de la ekskurso. Kun granda laboro la ekskursantoj iom post iom elŝipiĝis. Kelkaj ne volis riski baniĝon kontraŭvolan kaj restis en la boatoj.

«Torrent de Pareis» estas torento tre impona pro la kruteco de la montoj, kiuj formas ĝin. Ju pli oni eniras en la torenton, kiu senduble estas tre impona dum la sezono de pluvoj, des pli oni restas kun larĝe malfermitaj okuloj pro la grandiozeco de la belaĵoj de la naturno. Bedaŭrinde mankis tempo por detale esplori la lokon kaj la ekskursantoj baldaŭ devis reveni en la ŝipetojn por daŭrigi ankoraŭ pli furiozan dancadon.

Multaj ekskursantoj suferis marmalsanon kaj tio faris tre malgaja la tutan ekskurson, ĉe kies komenco oni laŭte kantis kaj ĉe kies fino oni funebre silentis.

Feliĉe ni reatingis la marbordon de Sölller kaj kiam ni ĉiuj ree surpasis la firman teron, oni reciproke sin gratulis, ke la fiŝoj ne gustumis nin.

### ADIAŬKUNVENO

En la sidejo de la loka grupo, je la 17-a, kunvenis la kongresanoj por la lasta fojo. Sro. Arbona estis korege gratulata de ĉiuj ĉeestantoj ne nur pro la kontentiga programo de la Kongreso sed ankaŭ pro la eksterordinara sukceso kaj precipe pro la intereso, kiun li kun siaj kunbatalantoj sciis vekti ĉe la popolo, kiu tiel serioze rigardas nian aferon.

Iom poste la gekongresanoj triviĝis ĉe la stacio por forveturi. Sro. Casasnovas, la simpatia kaj afabla Urbestro, adiaŭis la forveturantojn bedaŭrante, ke ili jam forlasas lian urbeton, kiu sentis sin honorata en plej alta grado akceptinte la esperantistojn. La membroj de la O. K. kaj de Esperantista Grupo Sollerica, la ĉarma Reĝino kaj belegaj Korteganinoj, granda popolamaso, staris malgaje pro la rapide forflugiintaj gajaj tagoj. Duoble pli malgajaj estis la forveturantoj, kiuj devis forlasi la agrablan kongresurbon kun la belaj floroj, arboj kaj afablaj loĝantoj.

La vagonaro ekruliĝis kaj lasta manpremo disiĝis.

Adiaŭ, granda popolo, por la tuta daŭro de nia vivo vi restis reliefe gravurita en nia koro.

#### POSTKONGRESAJ NOTOJ

Ni publike devas danki la Balearan gazetaron, kiu per sia helpo grave influis sukcesigi la Kongreson.

La jenaj gazetoj kaj ĵurnaloj publikigis longajn raportojn pri la Kongreso: «Sóller», «El Dia», «La Vanguardia Balear», «Actualidad Balear», «Correo de Mallorca», «La Almudaina» kaj «La Ultima Hora».

### Adresoj de la Premiitoj en la Floraj Ludoj 1927

- Sro. Ĉuvi Lovostan. - Délibáb-utca, 23. - Budapest. Hungarujo.  
 Sro. Varua Järvanpää. - Vammala, illo. - Finnlando.  
 Srino. Catharina J. Roskes-Dirksen. - Anemoonstraat, 96. - den Haag (Hago) Neder.  
 Sro. S. Grenkamp-Kornfeld. - 4, rue de Vaugirard. - Paris (VI). Francujo.  
 Sino. Lucette Faes. - Igue. rue d'Hérentals, 100. - Anvers. Belgujo.  
 Sino. Anna Groschoff. - Rismarkstr. 7-IV. - Hagdebourg. Germanujo.  
 Sro. E. Aisberg. - 33, Bd. des Batignolles. - Paris (VIII) Francujo.  
 Sro. Karl Minor. - Bralunsallee, 10. - Hamburg. Germanujo.  
 Sro. I. Širjaev. - gub. de Vologda. - Baklanka. Rusujo. (C. C. C. P.).  
 Fino. Louise Briggs. - West Lea. - Armley (Leeds). Anglujo.  
 Sro. P. Lapiené. - Universitetas. - Kaunas. Litovujo.  
 Sro. Jan van Schoor. - Julius de Geysterstraat, 149-I. - Antwerpen. Belgujo.  
 Sro. H. J. Bulthuis. - Daguerrestraat. 54. - den Haag. Nederlando.  
 Sro. Ed. Jung. - 1, quai Finkmatt. - Strasbourg. Francujo.  
 Sro. Joseph Berger. - Claudio Marcelo, 18. - Córdoba. Hispanujo.  
 Sro. Joseph Ventura. - Creu, 75. - Terrassa.  
 Sro. Seigmunt Prager. - 103, Longue rue Lozana. - Antverpeno. Belgujo.  
 Sro. Josefo Major. - 7, Avenue de la Gare. - Juvisy-sur-Orge (Seine et Oise) Francujo.  
 Dro. Leopold Dreher. - Starowislna, 37. - Kraków. Polujo.  
 Dro. Karl Schüppel. - Friederich Franzstr, 41. - Parchim (Meklenburg) Germanl.  
 Sro. Günter Erber. - Ruckerlberggürtel, 13. - Graz (Stirio) Aŭstrujo.  
 Mossèn Joan Font Giralt. - Sta. Maria del Collell. - Banyoles.  
 Sro. Teodoro Kilian. - D. Kounice. - Moravio. Ĉeĥoslovakujo.  
 Fino, Amalia Núñez. - Mayor, 48, 3.º - Pamplona. Navarra.  
 Sro. S. Alberich. - Bretón de los Herreros. 18 - Barcelona.

## Adresoj de la Menciitoj en la Floraj Ludoj

- Sro. Jan van Schoor. - Julius De Geyterstraat, 149-I. - Antwerpen. Belgujo.  
 Sino. Catharina J. Roskes-Dirksen. - Anemoonstraat, 96. - den Haag (Hago).  
 Nederlando.  
 Sino. Marthe Petit. 33, rue Chabot-Charny. - Dijon. Francujo.  
 Sro. Teo Jung. - Horrem b. - Koln. Germanujo.  
 Sro. Hans Windisch Sartowski. - Dintenstr. 35b. - Berlin. Germanujo.  
 Sino. Anna Groschoff. Bismasckstr. - 7-IV. - Hagdeburg. Germanujo;  
 Sro. Francisco Azorín Poch. - Claudio Marcelo, 18. - Córdoba. Hispanujo.  
 Sro. Í. Širjaev. - gub. de Vologda. - Baklanka. Rusujo.  
 Sro. Jakobo Schmid. - Müslin-weg, 2. - Bern. Svislando.  
 Sro. S. Grenkamp-Kornfeld. - 4, rue de Vaugirard. - Paris VI. Francujo.  
 Sro. Kristiano Mallerta. - Cimberustrasse, 1. - Kölu-Dentz. Germanujo.  
 Sro. Karl Minor. - Bralunsallee, 10. Hamburg. Germanujo.  
 Sro. Jaume Herp Sanmartí. - Codols, 16 - Barcelona.  
 Sro. Cav. Dott. Arturo Ghez. - Società Telefonica. Trieste. Italujo.  
 Sro. Joseph Berger. - Claudio Marcelo, 18. - Córdoba. Hispanujo.  
 Fino. Ida Bücker. - Behler-strato, 5. - Schölanke (Ostbahn). Germanujo.  
 Fino. Louise Briggs. - West Lea. - Armley (Leeds). Anglujo.  
 Sro. Felix Dyba. - Moltkestr., 4. - Berlin-Niederschöntausen. Germanujo.  
 Sro. H. Steding. Berck-Str., 10. - Bremen Horn. Germanujo.  
 Sro. Edvardo Wiesenfeld. - Ogradowa, 3. - Varsovio. Polujo.  
 Sino. Helena Hempel. - Lyczakow, 46. - Lwów. Polujo.  
 Sro. J. Kramer Jr. - Westerstraat, 149. - Enkhuizen. Nederlando.  
 Sro. Günter Erber. - Ruckerlberggürtel, 13. - Graz (Stirio) Aŭstrujo.  
 Sro. Francesco Pizzi. - Venezie. Italujo.  
 Sro. Heinrich Garke. - Donaüstr., 51. - Bremen. Germanujo.  
 Sro. Eduard Capdevila. - Carders, 29. - Barcelona.  
 Sro. José Suárez. - Bataneros, 6. - Córdoba. Hispanujo.  
 Sro. Fran Janjič. - Ilica 40, - Zagreb. Jugoslavujo.  
 Sro. Jacint Figueras. - St. Ildefons, 21. - Terrassa.  
 Fino. Natalia Širjaev. - gub. de Valogda. - Baklanka. Rusujo. (C. C. C. P.).  
 Sro. Karl Czech. - Bohemio. - Neudek. Ĉeĥoslovakujo.  
 Srs. Jozefo Major. - 7, Avenue de la Gare. - Juvisy-sur-Orge (Seine et Oise)  
 Francujo.  
 Dro. Adolf Halbedl. - Schulgasse, 24. - Graz. Aŭstrujo.  
 Dro. Karl Friedl. - Muchargasse, 31. - Graz. Aŭstrujo.  
 Sro. Hector L. J. Vermuyten. - Grétrystrato, 53. - Antwerpen. Belgujo.  
 Sro. Karl Giessman. - St. Antonstr. 184. - Krefeld. Germanujo.  
 Sro. Sydney J. Smith. - 43, Hornsey Rise Gardens. - London, N.º 19. Anglujo  
 Sro. E. Aisberg. - 33, Bd. des Batignolles. - Paris VIII.º Francujo.  
 Sro. Hildegard Nickel. - Blücher Platz, 2. - Potsdam. Germanujo.  
 Dro. Leopold Dreher. - Starowislna, 37. - Kratów. Polujo.

Sro. P. Lapiené. - Universitetas. - Kaunas. Litovujo.

Sro. Liem Tjong. Hie. - Semarang. Java.

Sro. Ed. Jung. - 1, quai Finkmatt. - Strasbourg. Francujo.

Sro. Varma Järvanpää. - Vammala, illo. Finnlando.

Srino. Lucette Faes. - Lg<sup>ue</sup> rue d'Hérenthals, 100. - Anvers. Belgujo.

Grave! Ĉiu premiita estas petata indiki al la Sekretario de la Floraj Ludoj kiel la mono devas esti sendata por certigi la ricevon kaj la efektivigblon en la respektiva lando. Ĉiu Diplomo ĉu pri premio ĉu pri mencio kostas unu-svisfrankan valoron, kiun ni deprenos de la premio al tiu kiu deziras ricevi la diplomon. La jarabono al «Kataluna Esperantisto» kostas 6 sv. fr. deprenotajn de la premioj, se la ricevontoj ne esprimos malkonsenton.

Ĉiu menciito deziranta ricevi Diplomojn kaj *Kataluna Esperantistō-n* devas sendi la diritajn sumojn.

---

## Pri la «Kataluna Antologio»

La Eldona Komitato de «Kataluna Antologio» sciigis al ni, ke tiu grava verko ĵus estas «rekompencita de la Akademio».

El la 500 presitaj ekzempleroj, estas disvenditaj 476 en 35 landoj, nome: Katalunujo, 189; Britujo, 89; Germanujo, 38; Ĉeĥo-Slovakujo, 20; Svisujo, 18; Francujo, Hungarujo, 11; Usono, 10; Rusujo, 8; Italujo, 7; Finnlando, Nederlando, Belgujo, 6; Aŭstrujo, Polujo, Rumanio, Svedujo, 5; Danujo, Ĥinujo, 4; Bulgarujo, Estonio, Norvegujo, Litovujo, 3; Jugo-Slavio, Latvujo, Argentino, Brazilo, Japanujo, Kubo, 2; Meksiko, Palestino, Filipinaj Insuloj, Aŭstralio, Irlando, Nederlanda Hindujo, 1.

Baldaŭ oni vendos la restantajn ekzemplerojn, kaj la Komitato redonos al la helpintoj de la eldono la monon pruntedonitan. La profito eniros la kason de «Kataluna Esperantista Federacio», por helpi la eldonon de nova «Kataluna Ŝlosilo».

---

## Nova Komitato

La 10-an de julio okazis eksterordinara kunsido de KEF. Oni elektis la jenan komitaton. Sroj. Delfi Dalmau, prezidanto, Marian Solà, Josep Ventura, Sebastià Chaler, Jaume Herp, Josep Cantó, Ramon Marsà, Narcís Bofill, Miquel Arbona, Angel Valdepeñas kaj Jaume Pruna.

Sro. Marian Solà estis elektita Direktoro de «Kataluna Esperantisto».

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)*

## LA

*article determinatiu*

el, els  
la, les

## J

(sona<sup>ny</sup>)

*i es terminació del plural*

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

*sufix per al*

*femeni*

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

*terminació substantiu*

lakto  
urbo  
komerco  
(comerç)

## A

*terminació adjectiu*

blanka  
antikva  
komerca  
(comercial)

## I

*terminació verb (infinitiu)*

kompreni  
labori  
komerci  
(comerciar)

## E

*terminació adverbial*

klare  
konstante  
komerce  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

*temps present*

### IS

*temps passat*

### OS

*temps futur*

### US

*mode condicional*

### U

*mode imperatiu o subjunctiu*

Mi skribas  
Jo escric

skribis  
escrivi

skribos  
escriuré

skribus  
escriuria

skribu  
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo*

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola  
teknika gazeto

## Internacia RADIO-REVUO

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

### KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originala popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

### PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ  
KONKURSO KUN MULTNOMBRAJ PREMIOJ  
(i. a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 N.<sup>o</sup> N.<sup>o</sup>) UNU DOLARO aŭ egalval. en nacia mono  
Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ, de  
naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret.

Redaktoro: Ing. E. Aisberg.

ELDONEJO: ETIENNE CHIRON. 40, rue de Seine. PARIS-VI

## FULLES DE PROPAGANDA

### D'ESPERANTO

A dues pessetes el centenar podeu adquirir les fulles de propaganda publicades per la Barcelona Esperanto-Societo. Text en català, arguments de gran força convincent, útils a tot bon propagandista.

Dirigi les comandes a

**Barcelona Esperanto - Societo**

Bretón de los Herreros, 18, 1.<sup>er</sup>, 1.<sup>a</sup>

BARCELONA

## "Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO  
OFICIALA ORGANO

DE LA

### Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj  
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj  
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en  
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

## El XII Congrés d'Esperantistes catòlics a Assís

### EL PRESIDEIX UN CATALA

Des del 4 al 10 del present mes, els esperantistes catòlics han celebrat a Assís, pàtria del més gran pacifista i propagador de la germanor universal, Sant Francesc, el XII Congrés Internacional.

Assistiren al Congrés representants de França, Txecoslovàquia, Itàlia, Alemanya, Lituània, Espanya, Hongria, Austria, Suïssa i Holanda. La representació espanyola la portava mossèn Joan Font Giralt, prevere, professor del Seminari Col·legi de Santa Maria del Col·lell (Girona), el qual, en la primera sessió, i per aclamació, fou nomenat president del Congrés, i posteriorment president de la Unió Internacional d'Esperantistes Catòlics.

En les sessions del Congrés, que es desenrotllaren en mig de la més fraternal intercomprensió, gràcies a l'ús de la llengua auxiliar, malgrat la diversitat d'origen dels reunits, tractà de la manera d'aconseguir propagar entre els catòlics la llengua Esperanto, que tants i tants grans serveis pot reportar a la causa de la Santa Església. Els reunits hagueren de lamentar la passivitat de molts catòlics, davant l'activitat desenrotllada pels enemics de l'Església, qui usen ja aquesta llengua en les seves relacions internacionals.

Ultra les sessions, tingueren lloc diverses solemnitats religioses a honor de Sant Francesc, en els diversos temples de la ciutat, especialment el diumenge dia 7, a la Basílica de Santa Clara, on predicà un bell sermó en Esperanto, el president del Congrés, mossèn Font i Giralt.

El dia 9 els congressistes, qui el dia abans s'havien traslladat d'Assís a Roma, foren rebuts en audiència especial pel Sant Pare, el qual els donà la seva paternal benedicció.

També a Roma foren rebuts els congressistes en sessió solemne per la Junta d'Acció Catòlica, en un dels salons del Vicariat. Parlaren en Esperanto els representants de diversos països assistents al Congrés i restà la Junta d'Acció Catòlica fortament impressionada de la facilitat amb què mitjançant la llengua internacional arriben a entendre's els membres de regions les més diverses.

Després de visitar el més notable de Roma, els representants retornaren a llurs respectius països, disposats a treballar cada dia més per a fomentar la Unió Internacional d'Esperantistes Catòlics.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj  
 Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

<i>Esperantista Klubo Pālma</i> Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca	
<i>Empordana Ebenajo</i> (Girona)	Armentera
<i>Esperanta Nesto</i> (Joventut Katòlica)	Ripollet
<i>Frateco</i> Placo Pi i Margall, 14.	Vendrell
<i>Ĝerona Espero</i> (Creu Roja)	Girona
<i>Lumon</i> St. Antoni, 64.	Terrassa
<i>Studenta Juneco</i> (Seminari)	Girona
<i>Aplec</i> Montserrat, 9, 1. <sup>er</sup>	Sabadell
<i>Bela Espero</i> Carretera de Vich, 41.	Manresa
<i>Esperanta Idealo</i> Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés	
<i>Esperantista Amikeco</i> Plaça Bernardí, 10.	Manlleu
<i>Esperanta Burĝono</i> (Centre Democràtic)	Rubi
<i>Internacia Frateco</i> (Coop. La Colmena)	Sta. Coloma Gramanet
<i>Paco kaj Amo (Soc.)</i> Planeta, 16, pral.	Barcelona
<i>Barcelona Stelo</i> Provença, 156	Barcelona
<i>Barcelona Esperanto-Societo</i> Bretón Herreros, 18, 1.	Barcelona
<i>Esperantista Grupo «Sollerie»</i> Supercelo	Soller
<i>Coroleu, 15</i>	Barcelona

<i>Artés:</i> Sro. Manuel Monrós
<i>Armentera:</i> Empordana Ebenajo
<i>Banyoles:</i> Sro. Joan Aulina
<i>Figueres:</i> Sro. Carles Varela
<i>Girona:</i> Sro. Josep M-a Dalmau
<i>La Garriga:</i> Sro. Joan Blancafort
<i>Mahó:</i> Sro. S. Ortega Barceló
<i>Manlleu:</i> Sro. Marian Vilardell
<i>Manresa:</i> Sro. Josep Albagés
<i>Mataró:</i> Sro. Francesc Torres
<i>Molins de Rei:</i> Sro. A. Canals
<i>Monistrol de Montserrat:</i> Sro. F. Orobitg, Pastro
<i>Palafrugell:</i> Sro. Francesc Sagra
<i>Palau de Montgut:</i> Fino. Lluïsa Bargés
<i>Palma de Mallorca:</i> Sro. Narcís Bofill
<i>Reus:</i> Sro. Enric Aguadé
<i>Ripollet:</i> Sro. Josep Planas, Pastro
<i>Rubi:</i> Sro. Joan Ratés
<i>Sabadell:</i> Sro. J. Bracons
<i>St. Adrià del Besòs:</i> Sro. S. Arnella
<i>St. Martí Sapresa:</i> Sro. Joan Rieradevall
<i>Sta. Coloma de Farnés:</i> Sro. Pere Costa
<i>Sta. Coloma de Gramanet:</i> Internacia Frateco
<i>Sallent:</i> Sro. Lluís Solé
<i>Sóller:</i> Sro. M. Arbona
<i>St. Feliu de Pallarols:</i> Sro. J. Collelldevall
<i>Terrassa:</i> Sro. Ramon Marsà
<i>Teyá:</i> Dro. Jacint Barrera
<i>Vendrell:</i> Fino. Maria Julivert
<i>Vich:</i> Sro. Pere Farrés
<i>Vidreres:</i> Sro. Josep Macià
<i>Vilanova i Geltrú:</i> Sro. Jaume Fort
<i>Vilassar de Mar:</i> Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: MARIAN SOLÀ

## Respondu, amiko!

Nia antaŭa K. E. F-a Prezidanto, nia ŝatata, laborema, fervora kamarado S. Alberich, devis ĉesi la prezidan kaj direktadan laborojn de nia Federacio kaj de ĝia presorgano pro devigaj ordonoj de lia kuracisto. Tamen li ankoraŭ helpos nin silente, senpostene, pionire! — Ni konas lin.

Nia serioza jam plunjara kasisto de K. E. F. samideano Herp, daŭre, labore, fervore restas nia kara necesa kasisto.

Cantó, nova esperantisto el Reus, administre helpos en nia komitato.

Marsà, Chaler, Valdepeñas, Pruna, Bofill kaj Arbona, voĉdone gvidos kaj subtenos komitate nian K. E. F.

Bofill, la baleara fama pioniro de nia Movado, plie akceptis la sekretariocon, de la XIV-aj Floraj Ludoj, honore grava, labore granda tasko internacia!

Josep Ventura, poeto, sperta energia kamarado, multfoje premiita florldinto, plurfoje florlda Juĝinto, pli ĝuste, ĉiam florldinta, ĉu premialjuĝe ĉu premiatinge, akceptis la ekzekutivan rolon de nia Federacio, la sekretarian postenon. Notu lian adreson: Carrer Creu, 75, en Terrassa.

Marian Solà, la ĉefa reprezentanto de K. E. F. en la internaciaj Institucioj de Esperanto kaj de Esperantujo, la esperantatoro kaj esperantodoktoro de nia Federacio, estas ĝia nuna vicprezidanto kaj direktoro de la «Kataluna Esperantisto.»

Mi akceptis la prezidantecon de K. E. F.

Ni estas ĉiuj malriĉaj kaj devigataj profesie perlabori niajn vivrimedojn. Ni povas atenti niajn Federaciajn aferojn nur troigante nian ĉiutagan laboron.

Nia Federacio estas mondeficita ĉar ni pagas por la Centra Komitato, por regula aperigo de «Kataluna Esperantisto», por organizo de Floraj Ludoj, de Kongresoj, k. c.

Ni ricevas neniam oficialan subtenon. Kontraŭe: vi ĉiuj memoras ke antaŭ tri jaroj nia kuraĝa Bofill devis heroe defendi nian organizaĵon por atingi permeson okazigi nian Kongreson en Palma. Vi memoras ke antaŭ du jaroj K. E. F. estis punita al pago de 500 pesetoj. Vi scias ke ni devis plurjare defendi nian rajton eĉ nur saluti ĉe la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ĵusa provincestra ordono fermigis la lernejon kaj Centre Republicà en la urbetoj Rubí kaj Navàs, kie instruis kaj propagandis Esperanton viglaj samideanoj: Pli grve: la samideanoj en Navàs estis petintaj kaj atingintaj organizi la proksiman Kongreson de K. E. F.

Vi, estimata leganto, vi kara simpla kunfederaciano, vi kiu havas tempon, vi kiu havas monon, eĉ malmultan: ni bezonas vian tempon por ke vi varbu abonanton al nia gazeto, aliganton al nia federacio; ni bezonas de vi monon por subteni nian organizaĵon. Se vi ne povas bileton por cent aŭ mil pesetoj, sendu bileton por 25 aŭ 50 pesetoj; sed, ĉiuokaze, se vi simpatias al K. E. F. kaj al K. E. kaj al nia fervoro kaj ofero por daŭrigi ilian ekziston kaj agadon, respondu al ni, helpu nin!

DELFI DALMAU  
Prez. de K. E. F.



## Ramono de Montjuic

de Josep Pla

La tragedia morto de mia amiko Ramono, urbano el la norda deklivo de monto Montjuic — tiu apud Poble Sec (1) — plenigis min de malĝojo kaj rememorigis al mi certan epokon de mia vivo. Ramono, la mortinto, posedis malgrandan parkon de amuziĝoj konsistantan el karuselo kaj barako kun pim pam pum (2). Somere la parko funkciadis kaj vintre la magia potenco de transformado de la posedanto, faris el la parko salonon de posttagmeza balo. La tuta instrumentaro okupis malhelan fundon de korto en unu el la stratoj de Poble Sec, kiuj grimpas sur la monton.

Ramono estis dimanĉa amiko. Vintre, tiuepoke, post tagmanĝo, li iris preskaŭ ĉiun dimanĉon en la suburbon. Poble Sec, je tiu horo, estis plena de terspacoj de silento kaj de grandaj makuloj de varmeta suno kaj odo-

(1) Nomo de kvartalo en Barcelona.

(2) Vicstarantaj marionetoj, kiujn oni renversas per pilkoj.

ris oranĝojn. Iafoje oni aŭdis post stratangulo bruadon de infanoj. La drinkejoj ŝajnis zumanta abelaro pro la peza sonado de la gitaroj. La ludanto, montrante ruĝan ŝtrumpeton, kun cigaredo ĉe la orelo, harfrizo kunrulita kiel vaflo sur la frunto, sin ĉirkaŭigis de rondo de la buŝoj duonmalfermitaj de la servistinoj.

Mi rememoras, kvazaŭ tio okazus nun, la voĉon de kantoro de maljuna blindulo kun barbo, tre alta, kiu iradis tra Poble Sec kantante la kantaĵon pri la ŝippereo de «Valbanera» (3). La najbaroj eliris sur la balkonon por aŭdi lin, la virinoj en subjupoj, la viroj en la flaveca magazena robo. Kiam la blindulo iris preter la drinkejon li piedpremis la arakisajn ŝelojn kaj ĉar tiu bruado certe al li ne plaĉis, li saltadis kiel birdo por transiri rapide. Ĉe la pordo de la drinkejoj ĉiam staris iu laboristo juna, oblikva figuro, kun la gladita blua vestaĵo, la grandviziera ĉapo iom flanken, dianto ĉe la orelo, indiferenta, kun iom da koka krueleco ĉe la lipoj. Tie estis ankaŭ vicoj de kastilaj knabinoj, kun pomkoloraj vizaĝoj, kun nigraj gladitaj haroj, akvumitaj kaj ondigitaj. Tiuj knabinoj iafoje ekpuŝis la malgrandajn soldatojn, ĉifitajn kaj platnazajn, kiuj manĝadis oranĝojn kaj arakisajn ŝelojn.

Oni renkontis multajn kriplulojn kaj almozulojn kaj ialoke ili starigis kvazaŭ barikadon per la lambastonoj, la torditaj ostoj, la bastonoj kaj la aliaj instrumentoj de la almozuloj.

Ni laŭiris la ŝoseon de Montjuic, faris ĉirkaŭpromenon tra la vojeto ĉirkaŭanta la glacison, sidiĝis por vidi la ĉielon, kiu estis blanka de nuboj kaj havis pecojn duone bluajn, duone verdajn, duone rozkolorajn kaj poste kun timiana trunketo ĉe la lipoj, kun la koro kaj kapo ie ajn, kun enposigitaj manoj, irante tra la vojo de la unua parko de Montjuic ni atingis la malsupron de la monto, kaj ofte ni ĵetis enrigardon en la posttagmezan balon de la malfeliĉa Ramono.

Ni eniris tien kun certa antaŭgardo ĉar la interna aero, tre densa, deturnigis la vizaĝon kaj la lumo estis duba. Kiam la okuloj al kutimiĝis al ĝi, oni vidis en la mezo de la budo, kvadratan kioskon konsistantan el kvar stangoj, ĉirkaŭatan de kokineja metalteksaĵo. Interne de tiu kaĝo staranta en tia fuma maro, estis tri muzikistoj iom nebulaj alkroĉigantaj al siaj instrumentoj kvazaŭ al savotabulo. La gasa lumo rebriligis de la orumita metalo de *fiskorno* funebran reflekon. Ĉe la fundo oni vidis en atmosfero de vesperiĝa rulkurteno, la tegitajn karuselajn ĉevaletojn. Inter tiu grandega amaso kaj la velo de la velsalono estis granda fendo tra kiu oni vidis la stelojn.

Kiam la muzikistoj ne blovdadis, en la velsalono estis densa murmurodo. Iafoje el tiu granda svarmado ĉokoladkolora je la hispana maniero, pafaŭdiĝis ekkrio de iu fraŭlino kvazaŭ risorto estus elsaltinta ĉe ŝi. La infa-

---

(3) Subakviĝinta ŝipo, kiu pereigis ĉiujn pasaĝerojn.

noj ludis kaŝludon inter la kruroj de la gedancantoj kaj iafoje tri aŭ kvar ruliĝis sur la planko kvazaŭ bulo. Ĉiam sidis sur la seĝoj iu patrino mamnutranta sian filon. La koloro senviva, delikateca, prilaborita, plena de ŝiraĵoj de tiuj patrinoj, en tiu lumo, pensigis min, mi ne scias kial, pri la pentraĵoj de Sislez.

Ramono portadis ĉiam ĉe la mano kanon per kiu li gradigis la gasbeĵojn kaj formetis de ili la meĉpendaĵon. Li malaperadis kvazaŭ angilo, li estis ĉie, kriadis al la muzikistoj, klarigadis dubojn, cirkuligis la homamason starantan ĉe la pordo.

La muziko anstataŭ soni, iafoje ĝemis, iafoje blekis. Tio estis biologia muziko, kiu atingis la fundon de nia interno. Kiam ĝi ekludis formiĝis ĉirkaŭ la kaĝo homa ringo, dika, diverskolora, ŝanĝiĝanta kvazaŭ ĝi bolus. La tagojn de granda festo altiĝis super la kapo de la homiamaso la plumajo de iu soldato, kaj tio ŝajnis la tenilo de la ringo. La gaslanternoj, pro la polvo, ruĝiĝis, la atmosfero estis polvaĵo kaj la aero pleniĝis de malgrandaj pusaj aknoj.

Ramono estis malgranda homo, malgrasa, kalva, kun brovoj harriĉaj kaj larĝaj. Li portis gladitan kolumon el gumo kaj rondajn manumojn el celuloido. Oni vidis ke la iluzio de tiu homo estus fariĝi duonartisto ĉar li permesis al si la kreskon de la ungoj, diris la aferojn senpripense kaj havis certajn inklinojn al dandismo: ekzemple li estis ŝatanto de la fantazia veŝto. Tiu ĉi tuta fluo de la spirita vivo de Ramono finiĝis ĉe lia pasio fiŝkapti per kano ĉe la rifaro, kio mirigis lin.

Ramono estis homa haŭtmalplenaĵo, kiu kutimis kaŝi sub konvena ŝajno sian grandegan mallaborem. En la fundo li estis tio, kion la bonaj verkistoj nomas nekrompenito. Li trovis, ke tio estas la elpruvo de lia supereco, ekzemple, havi okupon, tiun de la balo, la tagon, kiam ĉiuj festas.

Ramono loĝis en la karuselo. En la turbo li havis la kuirejon. En la ventro de unu el la kartonaj ĉevaloj, kiuj leviĝas kaj malleviĝas, li havis la manĝaĵejon. Li pendigis la vestaĵojn ĉe la trumpetoj de la nimfoj de la ventorgen. Ĉe la movseĝo ornamita per rozoj—tiu seĝo, kiun ĉe la karuseloj uzas la patrinoj de la infanoj—li akceptis la publikon. En tiu kvazaŭ ronda kavaĵo, kiu troviĝas inter la ŝakso kaj ĉirkaŭa lignaĵaro, kiu turniĝas, li havis kvar kestojn malgrandajn kaj mizerajn kun kvar ŝuoj malnovaj kaj kelkajn kanojn por fiŝkapti.

Kio estis plej originala, tio estis la dormoĉambro: Ramono kaŝiĝis en la blovilon de la orgeno de la karuselo. La blovilo estis fiksita al la karuselo pere de dentradaro kaj turnilo. Kiam la karuselo turniĝadis la blovilo ŝveliĝis kaj malŝveliĝis. La blovilo havis formon de senkapigita piramido kiam ĝi estis plena de vento, ĝi estis kvazaŭ buŝo de rano kun fera akso vindita per ledoj kaj ĝi moviĝis horizontale ĉe la posta flanko de la friso de la nimfoj kaj dancistinoj, kiuj havas orumitan trumpeton el kartono ĉe la buŝo kaj ŝvelintajn vangojn.

Mi rememoras ke certan tagon mi komprenigis al Ramono la danĝeron, kiun prezentis dormi en tiu kaŝejo.

— Ĝam la karuselo, oni ne scios kiel, komencos turniĝi, la blovilo kunpremiĝos kaj vi mortos ovaĝigita. Sed feliĉe, mi diris al li ridante, dum vi estos gladata kiel pantalono, sonoros ĉiuj senagordaj trumpetoj de la nimfoj kaj dancistinoj.

— Tio estas morto ne malagrabra - li diris kun la infaneca vanteco, kiun sentas ĉiuj artistoj, kiam oni parolas al ili pri iliaj strangaĵoj, gratante al si per la longa flava ungo de la malgranda fingro la verukojn de la frunto kaj la arbaran densecon de la brovoj.

Kiam mi sciigis pri la morto de Ramono, mi iris al la parko de amuzaĵoj. Mi eniris en la legomejon. Tie ne estis ia vivanto. Mi jam ekforiris kiam mi vidis, ke venas virino kun sako da paperoj sur la dorso, kun oranĝo ĉe la mano.

Hieraŭ oni enterigis lin-diris la virino. — Oni eltiris lin mortinta el la blovilo...

— Kaj de kio li mortis?

— Neniu ĝin scias. Antaŭhieraŭ li ankoraŭ iris al la rifaro kaj hodiaŭ jam paco al lia cindro.

— Ĉu vi estas el la kvartalo? — mi demandis al la virino.

— Jes, kial?

— Ĉu la najbaroj ne aŭdis la bruon de la trumpetoj de la karuselo la nokton, en kiu li mortis?

— Ŝajnas al mi, ke mi ion aŭdis pri tio... ĉu vi estas policano?

Mallonga paŭzo. Poste,

— Ĉu sinjoro Ramono havis malamikojn?

— Mi ne scias, sed, kiu scias!

— Eble iu el la rifaro, ĉu vi ne opinias? — mi diris por diri ion.

— Li estis malsukcesinto — diris la virino sence: — Prezentu al vi ke en la kestoj eĉ paperpecon oni ne trovis.

— Vi kolektas paperojn sur la stratoj, ĉu ne? — mi diris ne levante la kapon.

— Jes, sinjoro, kial?

Alia mallonga paŭzo. Per mia maldika bastono kun tuberoj mi disŝutas iom da tero kaj per la ferpinto mi tuŝas ŝtonon blankan kaj puran.

Kaj ĉe la enterigo, ĉu estis multe da publiko? — mi diris distrita.

La virino ekrigardis min, ŝiaj trajtoj malligiĝis, ne povis sin deteni de rido kaj poste komencis senŝeligi la oranĝon.

Mi rigardis la virinon iom ŝanceliĝe. Mi rimarkis, ke mi celis anseron kaj trafis aeron. Mi pensis pri la lasta enterigo, pri kiu oni diris al mi, ke ĝi estis tre ĉeestata. Mi diris al ŝi:

— Pardonu.

Kaj jen paŝon post paŝo mi eliris sur la straton,

El la kataluna lingvo trad.

S. ALBERICH JOFRÉ

## La Legendo de l'Edelvejso

En la mistera Nordo, en la tempo kiam la diaĵoj ne hontis vivi en la najbaraĵo de la humila homo, iam naskiĝis princineto, kiu ricevis la dolĉan nomon, Edelvejso.

Ŝi estis filino de la dio Frosto kaj de blondhara knabino. Ŝi kreskis en belo kaj bono, kaj kiam ŝi estis deksesjara, ŝi estis la plej bela knabino el la tuta Nordo.

Longaj, helblondaj haroj grandamase kovris ŝiajn ŝultrojn kaj dorson per larĝaj kaj moviĝemaj ondoj. Grizaj okuloj, dolĉaj kiel veluro, lumigis lioblankan vizaĝon.

Ŝi estis ĉiam vestita per blankaj vualoj, kiujn la vento senĉese flirtigis.

Malvarmon ŝi ne devis timi, ĉar ŝi estis duondiino, kaj ŝi do, duonnuda, gracia kiel ebura statueto, kuris kaj dancis tra neĝo kaj vento.

Neniu ankoraŭ sukcesis ŝin alproksimiĝi, ĉar, lerta kaj rapida, ŝi ĉiam malaperis en plej neatingeblajn abismojn, aŭ en plej densajn arbarojn.

Tie ŝi sin sentis kvieta, kaj ŝi babilis kun siaj malnovaj amikoj, la maljunaj abioj, kies foliaro tremetis pro amo al la filineto de Frosto.

Ofte Edelvejso surgrimpis plej altajn montojn, kaj la ĉamoj kun akvumitaj okuloj timeme kaj mire rigardis tiun blankan aperaĵon, kiu tiel facile saltis sur plej krutajn altaĵojn.

Kaj en la malproksimeco, iu hakisto aŭ ĉasisto timigite krucosignis, ĉar per blankaj vualoj ankaŭ sin vestis la diino Nebulo, kiu blindigas la homojn kaj ilin kondukas sur erarajn vojojn, ĝis fine ili mortas pro malvarmo kaj malsato.

Iun tagon, nigrokula knabo el la varma Sudo alvenis en la lando de neĝo kaj frosto.

Mire li rigardis ĉirkaŭ si tiun naturon tiel diferencon de tiu, en kiu li ĉiam vivis.

Li ludis per la neĝo lilia, li promenis inter la malhelaj abioj kie regas eterna silento, kaj lia animo pleniĝis per la lin ĉirkaŭanta poezio.

Iam dum siaj vagadoj, li haltis apud glaciiginta lago. Neĝeroj silente kaj malpeze falis, kaj la vento sola, per sia malgaja siblado, rompita la pezan silenton. Malĝojo ekkaptis la knabon, kaj surprenis lin kiel plumba mitro. Li sentis sin tiel laca! Liaj okuloj fermiĝis kaj li songis pri ĝojo, suno kaj varmeco. Li songis pri la bluaj akvoj kiujn dolĉa venteto karesas, pri la floroj bonodoraj sub ĉielo lazura, pri belaj knabinoj kiuj dancas kaj kantas. Lin lulas la kantoj, lin ebriigas la parfumoj, lin karesas la venteto... Li volas sin levi, sed li ne povas...

Neĝo jam falis en densaj eroj, kaj la revanta junulo nenion rimarkis. Li revivis multajn aĵojn el sia infaneco, pri kiuj li neniam plu pensis. Estis anguleto en lia ĝardeno, kie li iam trovis mortintan papilion; poste, vizaĝo de knabineto, kiun li foje vidis, kaj kiu jam de longe mortis. Li pli kaj pli en-

profundiĝis en tiu duona dormo, kiam subite dolĉa voĉo lin diris: "Ne dormu, amiko. Dormi en neĝo nepre kondukas al morto!"

La junulo mire levis la kapon. Suno, floroj kaj revoj foriĝis fulmorapide, Lilia aperaĵo staris en blanka pejzaĝo, kaj la knabo, ĝin vidante, profunde emociiĝis.

Kiam Edelvejso sentis fiksatajn sur ŝi la nigrajn okulojn de la fremdulo, ŝi ruĝiĝis kaj volis forkuri. Sed la junulo ŝin tiel malgaje rigardis, ke ŝia virina koro kompatis lin. Ŝi restis. Ili rigardis unu la alian longe kaj silente, kaj ili adiaŭis ĉar la diino Nokto jam eketendis siajn malhelajn vualojn.

La du infanoj revenis la sekvantajn tagojn, kaj amo senlima baldaŭ enradikiĝis en iliaj koroj.

La dio Vintro fine tion rimarkis, kaj li ekkoleregis. Li fariĝis ankoraŭ pli malmilda ol kutime. Liaj okuloj eligis fulmojn, kaj liaj fortikaj brakoj elradikigis kelkajn maljunajn abiojn, kvazaŭ ili nur estus kanoj. Vento de teruro skuegis l' arbaron en kiu ekregis timo kaj angoro.

Vintro tiel furiozis, ĉar li amis Edelvejson, kiun Frosto al li promesis kiel edzinon.

La knabino nenion sciis pri tio, kaj ŝi kviete kaj dolĉe sin lasis luli de la amo. La kisoj de l'amato blindigis ŝin, kaj ŝi tute ne estis rimarkinta la antaŭsignojn de la kolero de Vintro.

Iun tagon, ŝi ne renkontis sian amaton ĉe la kutima loko. Ŝi atendis, ŝi atendadis, sed neniu venis. Tiam ŝia koro maltrankviliĝis kaj kun teruro, ŝi rimarkis en la malproksimeco la perfidajn vualojn de Nebulo, kiuj certe erarigis la amaton. Ŝi tien volis kuri, sed bruo de galopego altiris ŝian atenton.

Blankaj ĉevaloj, ŝvitantaj kaj fumantaj pro freneza kurado, glitante haltis apud ŝi, kaj Vintro, blekante pro kolero saltis al ŝi el sia glitilo.

"Vi, knabinaĉo, perfidis min por ami sentaŭgulon", diris li. "Mi min venĝos! Ploru, velurecaj okuloj, ploru sangajn larmojn, ĉar vian karulon vi neniam plu vidos. Kaj estos pro vi, ke li mortos. Estos vi, kiu lin altiros al la lando de forgeso, de kie oni neniam plu revenas. Vi iĝos humila kreskaĵo kaj vi kreskos tie, kie homa mano malfacile vin povos tuŝi. Kaj vi, kiu malsatis morton, por ĝi vi laboros altirante viktimojn per via fatala ĉarmo."

Kaj li tuŝis Edelvejson per sia fingro, kaj la bela knabino senmoviĝis. Ŝi, ĥo teruro! sekiĝante kuntiriĝis, kaj jen, ĉe la rando de l' abismo staris malgranda kreskaĵo kun veluraj, blankaj floretoj.

Tiam Vintro foriris, laŭte ridegante, kaj lia rido enhavis tiom da minacoj, ke ĉio tremis en la ĉirkaŭaĵoj.

Dume, Nebulo ne rimarkite direktiĝis al la profundegaĵo, altirante kun si la malkvietan junulon. Kiam li alvenis ĉe la randaĵo, li rekonis la lokon, kie li kutime trovas sian amatinon, sed li vane rigardis kaj vokis. Neniu venis. Subite io altiris lian atenton. Mire li rimarkis la floretojn, kiujn li neniam antaŭe tie vidis, kaj ideo ŝprucis en lia cerbo. "Mi ilin deŝiros por ŝi," li pensis. "Estos la unuaj floroj, kiujn ŝi estos ricevinta de mi."

Li kliniĝis, tuŝis la florojn, sed glitis kaj falis en l' abismon, dum terurkriego disŝiris l'aeron. La floreto iom tremis, kaj la peza silento regis ree en la lando de Frosto kaj Neĝo...

De post tiu tempo, multajn viktimojn altiris la ĉarmo de Edelvejsa, efektivigante la antaŭdiron de la senkompata dio, en kies koro pardono kaj forgeso ne trovis lokon...

Originale verkis,  
LUCETTE FAES

Premiita en la XIII-aj F. L.



## La Tineo

Fablo

«Ho — estas vere flugilhirtige», diras la malgranda blonda tineidino, kaj ĝi efektive hirtigas siajn flugilojn.

«Ĉu vi havas kapdoloron?» zorgeme demandas la tineo patrino, «jes, jen la rezulto, kiam la knabinoj tro multe studadas».

La malgranda tineido estas konsiderata kiel ege instruita. La tutan someron ĝi loĝadis en pelto de profesoro kaj de tiam ĝi estas vokata «fraŭlino doktorino».

Ĝi ja estas tre ekscitita kaj enspiras la aeron tiel konvulsie, kvazaŭ ĝi estas venenigita de naftalino — kaj nur post kelka tempo ĝi kapablas paroli. Jen la kaŭzo: Sur statistika manlibro, kiun la profesoro estas forgesinta en sia pelto, ĝi ekkonatiĝis kun librovermo. Kaj tiu ĉi legis al ĝi, ke kvindek procentoj de ĉiuj tineoj pereas pro tio, ke ili flugas en la lumon.

«Ne, kiel terure: Oni pripensu, kvindek procentoj. Kiel tio do povas okazi? Ĝi ne povas esti vera.»

La patrino ĉagrene kapjesas: «Jes, infano, tio povas esti ĝusta. Dek kvin mil el miaj onklinoj mortis tiamaniere, dumil el miaj fratinoj kaj ankaŭ mia unua amanto, ĉarmega noktopapilio, terure pereis pro petrola lampo».

La malgranda tineido senhelpe kaj senkonsole fiksrigardas sian patrinon. «Sed kial do tiom multaj flugas en la lumon, kvankam ili scias, ke tio estas nepre danĝera? «Povas ja efektive ne esti plezuro bruliĝi?»

La patrino ĝeme respondas: «Infano mia, vi jam ne vidis la lumon.»

«Ne, certe ne», moke rediras la tineido, «sed ĉar mi nun scias, kiel danĝere estas flugi en ĝin, mi certe evitos fari tion.»

Pripenseme ĝi mordetas laŭan ganton, fine ĝi decide kaj fiere diras: «Mi estas konvinkita, ke vi en via malmoda intenco, kaŝi la danĝeron, ne sufiĉe atentigis pri la malutileco de la lumo. Certe ne — ĉar kiel prudenta tineo tamen povus enflugi ĝin?»

«Vi ne konas la lumon», ree ĝemas la patrino.

«Kiel malprogresema do estas panjo», kompateme pensas la tineido. Kaj laŭte ĝi diras: «Tiamaniere nepre ne devas daŭri — io devas okazi. Oni devas klarigi la aferon, kaj precipe al la junaj tineoj. Oni devas disdoni broŝurojn, — oni devas kunvenigi la tinearon, oni devas fari paroladojn. Ĉiu tineo devas scii, kiel insekto kaj kiel tineo, kiu danĝero minacas ĝin.»

«Ekzaltita fraŭlino», murmuris la librovermo, «tenu viajn flugilojn for de aferoj, kiujn vi ne komprenas.» Li estas apartulo kaj principe ne povas toleri studentajn virinojn.

La kunveno fariĝas grandioza.

Estis la tempo de la ĝenerala purigado. Ĉiuj vestaĵoj kaj tapiŝoj estis batataj, tial elvenis ne nur la tineoj el paltoj kaj peltoj, sed ankaŭ tiuj el kurtenoj kaj tapiŝoj. Eĉ tre distinga tineo familio ĉeestas, kiu de post generacioj en nobla izoleco loĝadis en damasta sofo. Kaj kiel fremdaj gastoj kelke da elegantaj noktpapilioj alvenis, kaj el najbara monaĥinejo prezentigis centoj da «monaĥinoj» (nonoj).

La malgranda blonda tineido paroladas entuziasmige.

«Tio ja pruvas, ke ĝi ne vane sidadis en pelto de profesoro», fiere diras ĝia patrino, «kaj tamen ĝi estas tiel modesta.»

«Ni rompu kun la malmoderna kutimo kaŝi la danĝeron», daŭradas la kuraĝa tineido. «Ne, ni malkaŝe rigardu en ĝian vizaĝon — kaj antaŭ ĉio ni klarigu pri ĝi la junularon, ni diru al niaj filoj ke estas danĝere flugi en la lumon — ni malfermu la okulojn de niaj filinoj jes, ni montru al ili la danĝeron!»

Ĉiuj estas entuziasmigitaj.

«Vere senantaŭjuĝa kapo — efektive moderna tineo», oni flustras en la orelon de sia najbaro.

«Ni akceptu novan principon por la traktado de tiu gravega problemo. Ni montru la danĝeron — ni serĉu la lumon», krias la malgranda blondulino en plej alta ekstazo, «kiam hodiaŭ vespere sur la balkono brulos la lampo, ni kunvenos sub ĝi denove kaj en la brilo de tiu lampo ni ĵuros, neniam — neniam flugi en la lumon!»

La tineoj brue aplaŭdegas kaj tuj oni fondas novan societon. «Por ĉesigi la flugadon en la lumon», kaj la malgranda tineido estas elektata unua prezidanto, kaj ĉiuj ceteraj fariĝas honoraj membroj, ĉar neniu volas pagi kotizon.

\*\*\*

«Ne, vere, tiom da tineoj mi ĝis nun neniam forbalais», diris la ĉambristino, kiam ŝi, la sekvantan matenon ordigis la balkonon.

La tuta balkono estis supersemita de mortintaj, forbrulitaj tineoj. Bedaŭrinde ili estis tute karboniĝintaj, alimaniere oni povus vidi, ke ĉiuj portis la societatan insignon sur la maldekstra flugilo.

Plej antaŭe kuŝis la malgranda blonda tineido — la brila paroladistino, ĉar ĝi estis la unua kiu flugis en la lumon.

JAKOBO SCHMID

## «Strofoj por Toska»

(Kvin am-poemetoj)

## I

Kun vi, kun vi —  
 Ho ter' feliĉa!  
 Pro am' kaj pasi'  
 Sentigas pli riĉa  
 Ia kor', ol mi havus monan trezoron. —  
 Vi donas al vivo la rozan koloron!

Sen vi, sen vi —  
 Sorto malĝoja  
 Sopira ekkri',  
 Plendo milfoja  
 Kreskas ĉielen el kor' malfeliĉa — —  
 Sen vi ĉiukaze mi estus malriĉa!

## III

Venu,  
 Adoratin',  
 Ke mia anim'  
 Vin benu

Karesu  
 Sorĉe min,  
 Ke neniam mi vin  
 forgesu!

## II

Kiam vesperiĝas  
 Kantas najtingal'  
 Dolĉe en ĝardeno  
 Apud akvofal'.  
 Kiam vesperiĝas  
 Kantas mia kor';  
 Serĉas koron vian —  
 Plena je dolor'.

Kiam vesperiĝas  
 Venu, sinjorin',  
 Apud akvofalo  
 Kaj la najtingalo  
 Tuj alvokos min!

## IV

Meze de l'nokto  
 Vekiĝis mi;  
 Sendis radion  
 De luno al vi.

Meze de l'nokto  
 Vi songis je mi,  
 Kiam vin tuŝis  
 La luna radi',

Meze de l'nokto  
 Niaj amsentaj  
 Pensoj kunvenis  
 Sur pontoj argentaj. . .

## V

Ĉu ni volas ĉiam kune iri  
 Tra la vivo kaj la tersufero,  
 Esperante, ke la ammistero  
 Povu kontentecon al ni tiri?

Ĉiam estas ja feliĉo vera amo,  
 Anstataŭigebla per nenio;  
 Ĉar el kora amoharmonio  
 Supreniĝas al Dieco brila flamo.

Jen la mia kor' ! — Donu la vian,  
Ke mi gardu ĝin — luma ekzemplo  
De la vera am' — en sankta templo,  
Kie vi gardadu ankaŭ *mian!*

Originale verkis

HANS WINDISCH-SARTOWSKY

Premiita en la XIII I. F. L.



## Floroj el fojno

K. Binkis.

Mi kolektos zorgoplene  
ĉiujn florojn de herbej'  
el falĉita fojn' matene  
kaj internon de loĝej'  
per florkronoj mi beligos.  
Kiam venos li al kort',  
mi per dolĉa flustra vort'  
renkontinte lin haltigos  
kaj ĉe mi eniri igos  
por ripozi post labor' .  
Kaj por tio, ke mi sciu,  
ĉu li amas iom min,  
se demandos li: por kiu  
tiuj floroj, ho knabin'  
floras kvazaŭ en ĝardeno  
kaj odoras jen sen lim' ? —  
mi rakontos nur pri jeno:  
ke atendas mi je l' veno  
de junul' el malproksim' ...  
Kaj atentos kun sinteno  
pri vizaĝa la esprim' ,  
ĝis eldiros la mieno  
liajn pensojn pri alveno.  
Se la vangoj ruĝkoloraj  
iĝos palaj dum moment' ,

se la lipoj, kvazaŭ floroj,  
ektremetos pro turment' ,  
kaj li pala, senespere,  
kun klinita la vizaĝ'  
adiaŭos sen kuraĝ' , —  
ho, mi tiam premos vere  
lin al brusto kun pasi'  
kaj konfesos kun fervoro,  
ke nur sola estas li  
en animo kaj en koro;  
ke la florojn antaŭ tago  
el herbejo ĉe la lago  
mi kolektis kun penad' ,  
kaj ke estis tiu ago  
por li sola, por amat' .  
Sed se li kun ŝercpetolo  
malatentos pri la senc'  
kaj signifo de parolo, —  
ho, jam tiam pri konsolo  
ne plu estu la intenc' !  
Kaj nek unu scios homo,  
kial tiu flora ond'  
jen plenigas per aromo  
mian ĉambbron en la domo;  
ne, neniu en tutmond' !

Trad. el litova

P. LAPIENÉ

Premiita ĉe la Floraj Ludoj 1927.

## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

KIEL MORTIS LA UNUJAJ KRISTANOJ. — Per leterforma sendaĵo de Julio Flavio al Kajo Macero, formante broŝureton 32 - paĝan, 19 × 15, priskribas la aŭtoro J. Kraszewski kortuŝajn scenojn de la kristana vivo sub la Nerona imperio, teruran malliberejon kaj emociigan buĉadspektaklon de ĉiuklasaj romaj personoj, kies nevenkebla spirita elteno ĉe la turmentoj kaj multspeca martirigo, eĉ konvertigas la ekzekutistojn kaj antaŭvidigas la definitivitan triumfon de Kristanismo.

Korekte tradukis tiun ĉi eltiraĵon el la verko «Chretiënne». Em. Robert. Ĝi estas aĉetebla, je 1,50 fr. fr. ĉe «Espero Katolika» rue Vaugirard, 55, Paris-VI.— J. C. G. ptro.

LA ORIGINO DE LA RELIGIO.—Broŝuro 32-paĝa, 12 × 18, esperante verkita de Jos. Schmidt, eldonita de Societo «Sankta Mikaelo» en Paris.

En tiel malmultaj paĝoj la aŭtoro kondense pritraktas gravegan teologiaĵon, sed nur laŭ antropologia natura vidpunkto. Specialaj etnikaj esploradoj ĉe la Pigmeoj, kaj la «biogeneza fundamenta leĝo» de O. Hertwiz pretigas argumentojn konvinkajn pri la monoteista primitiva ideo de l'homo. Ĉiuj religievoluaj teorioj, — kiuj konsideras religion kiel nur subjektivan ideon, ne kiel faktan absolutan kaj pozitivan — kiel animismo, manismo, totemismo, fetiĉismo, magiismo k. c. restas historie nepruveblaj kaj science falsbazaj, ĉar monoteismo estis la unua diideo. La konceptoj de tiaj teorioj estas klare difinitaj en la teksto.

Ĝia legado estas rekomendinda al ĉiuj sciencistoj kaj al la amantoj de prireligiaj studoj. Esperanto estas uzata tute laŭfundamente kaj sen ia notinda prezeraro. Kvar interesaj bildoj ilustras la tekston. Ĝi estas aĉetebla ĉe «Espero Katolika» rue Vaugirard, 55, Paris-VI, je 3 fr. fr.— J. C. G. ptro.

GREKAJ PAPIRUSOJ.—Kompilis kaj tradukis Dro. Julius Penndorf. Biblioteko Tutmonda n-oj 11-12. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalem strasse 46-49, Berlin S. W. 19.—1927, 112 pĝ. 17 × 10 1/2. Prezo: 1 Rm.

Per la belega verketo la aŭtoro prezentas al ni tre interesajn dokumentojn el la antikva Egiptujo. Kiel valora kaj dankinda tasko estas tiu de la serĉantoj de la grekaj papirusoj, kiuj prezentas al la amantoj de la glora lando tre interesajn aspektojn, oni facile povas ĵugi legante la seriozan kolekton de Dr. Penndorf, al kiu ni ŝuldas pro lia merita tasko grandan dankon.

La diversaj dokumentoj, kiujn la aŭtoro de la nomita verketo havigas al ni lerte ordigitaj, evidentigas kian altan kulturnivelon atingis multajn jarojn antaŭ Kristo la loĝantoj de la bela Nilolando. La papirusoj parolas al ni pri la historio kaj moroj de la egiptoj, kies leĝojn kaj spiritajn esprimojn oni ja ne superas hodiaŭ post tiom multaj jarcentoj de konstanta progresado.

La kompilinto majstre regas la lingvon kaj tio donas plian belecon kaj valoron al la libro, kiu jam sen tio estas rekomendinda kaj plia sukceso de la eldonintoj.— Saljo

LA VOJAGHOJ KAJ AVENTUROJ DE BARONO MUNCHHAUSEN.—El la Angla tradukis J. D. Applebaum. Biblioteko Tutmonda n-oj 13-14. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19. 1927, 88 pĝ.  $17 \times 10 \frac{1}{2}$ . prezo: 1 Rm.

Tre malfacile oni povus trovi pli bonhumorajn rakontojn. De la komenco ĝis la fino de la libro, kies paĝojn vi turnas rapide pro la ĉiam kreskanta intereso, la eksterordinaraj aventuroj de la Barono prezentas al vi scenojn de granda komika senco, kiu ridigas vin eĉ kontraŭvole. Por ĉiu danĝera situacio la aventurulo havas rimarkindan solvon, kies neverŝajnecon vi komprenas sed kies spritecon vi admiras.

La tradukinto estas bone konata de la esperantistoj kiel stilisto kaj tio ŝparas al ni la laŭdon, kiun pro la nova verko meritas Sr. Applebaum.—Saljo.

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio.—Eldonita de nia Oficiala Institucio. 1927, 32 pĝ.  $16 \times 12$ . Mendojn sendu al Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris, 9. Prezo: 2 fr. fr.

La libro enhavas la regularon de la Lingva Komitato, tiun pri verkoj rekompencotaj de la Akademio, informojn pri la rilatoj inter la Akademio, kaj la Eksterakademia Sekcio por Scianca kaj Teknika Vortaro kaj adresaron de la membroj de la Lingva Komitato kun ceteraj informoj pri la lingvo, kiun ĉiu reprezentas ktp. Ĝi enhavas ankaŭ la Zamenhofan sistemon pri la landnomoj, pri kiu nia kara prezidanto, Prof. Cart, diras: Pri tiu ĉi demando ne riproĉu al mi mian insiston: Ĉar se ne respekti la individuan liberecon de la verkistoj sub ilia respondeco estus eraro, aliparte tamen en lingvaj demandoj, nepre devigaj estas, por la Oficiliaj Institucioj, la konsiloj de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, kiuj restas fidelaj al la Zamenhofa sistemo.

MILIONOJ, KIUJ NUN VIVAS, NENIAM MORTOS.—El angla lingvo tradukita. Eldonis Garda Turo, Biblio —kaj Traktat— Societo, P. F. 15988, Baden, Argovio, Svisujo. 1927, 80 pĝ.  $17 \frac{1}{2} \times 12$ . Prezo: 2 respondkuponoj.

Se vi interesiĝas pri religiaj demandoj kaj aferoj, vi trovos en la broŝureto interesajn kritikojn, eble ĝustajn konsilojn, ktp. «Ĉiu kataklismo estis antaŭdirita de Kristo, la profeto antaŭvidis la lastan (oni krompenu lastan ĝis kiam oni regalos nin per nova) mondmiliton», kaj «plie la profeto pentras kun belaj vortoj, kiel la tero fariĝos oportuna loĝejo por la homo. La sovaĝejoj (tuta Eŭropo, ĉu ne?) kaj stepoj floros kiel rozo, kaj riveretoj ekfluos en dezertoj. La tero donos sian rikolton, kaj ĉio sur la tero laŭdos Dion pro la plenumo de liaj promesoj» Ĉu vere? Ni iom dubas.

Kelkaj idiotismoj, neologismoj kaj eraroj estas forigindaj en nova eldono.—Saljo.

DIBUK (Inter du mondoj) de S. An-ski.—Volumo 1 de Biblioteko Beletristika. Eldonanto: J. Alfus, Al. Dembowskiego 10, Kraków XXII, Polujo

1927,90 pĝ. 18 × 13. El la juda lingvo tradukis Izrael Lejzerowicz. Prezo: 0,70 sv. fr. afrank.

El la antaŭparolo ni ĉerpas la jenajn paragrafojn: «Inter du mondoj,» jen kie vagadas la meditoj de piaj Hebreoj depost jarcentoj. «Dibuko,» laŭ la hebrea legendo, signifas malbonulon, kiu puniĝis ne trovi ripozon post sia morto, sed vagi en fremda korpo. Laŭ An-ski ĝi estas anima kunfandiĝo de mortinto kun sia «destinito» vivanta aŭ kunfandiĝo de du animoj de sin amantaj homoj post kiam ambaŭ ĉesis vivi. La ĉefa gvidmotivo en la teatraĵo ne estas simpla adoro al la ama problemo, tiel ofta ĉe ĉiutempaj poetoj. An-ski vivigas en «Dibuk» la senmortan ideon pri Justeco, pri kies potenco kaj regado super ĉio la hebrea nacio ĉiam tre forte kredis kaj kredas.

Ni ne trovus pli ĝustajn vortojn por respeguli la animon de la simpatia verketo, kiun faras pli leginda la korekta kaj flua traduko de Lejzorowicz.— Saljo.

LA EVANGELIO laŭ Sankta Marko.— Londono, 1927, 59 pĝ. 11 1/2 × 7 1/2. Havebla ĉe Esperanta Kolportista Asocio, 64, St. Thomas Road, Finsbury Park, London N. 4. Prezo: ne montrita.

LA INDIVIDUALISMA SOCIALISMO de Dro. A. Robertson.— Esperantigis Liber, 15 pĝ. 13 1/2 × 10 1/2. Havebla ĉe Rasa Virina Klubo, 1 bis, rue Coutures Saint-Gervais, Paris 111. Prezo: ne montrita.

GVIDFOLI ) PRI DORDRECHT.— Senpage ricevebla de Gemeentebestuur, Dordrecht. Nederlando.

Pristeribo esperanta ilustrita de belaj fotografiaĵoj sur luksa papero, ĝi estas broŝuro-allogilo por vizito al tiu altira holanda urbo tre antikva, interesa.— Dojo.

«INTERNACIONALSTENOGRAFIO», sistemo por ĉiuj lingvoj.— Gvidilo en Esperanto, de F. de Nunovski.— Eldonejo: Instituto de Internacionalsteno-grafio, Essen-Ruhr, Lübeker Strasse, 63. Germanujo,

Jen la bona didaktika libro internacia.

Stenografie la sistemo de F. de Kunovski vere estas klasebla inter la bonaj.

Ni do povas sincere rekomendi ĝin.— Dojo.

«UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO» de Dro. Benson.— Prezo: 0.25 usona dolaro.— Benson School of Esperanto, Inc. Newark N. J.— U. S. A.

La kvina kaj la sesa broŝuroj de tiu bonega lernigilo de Esperanto jam aperis.

Okaze de la unua ni recenzis pri la metodo kaj diris kial ĝi estas tre rekomendinda kiel propagandilo kaj kiel lernigilo tutmonda por nia lingvo.

Ni bedaŭras ke ni ne konstatis faradon de la granda propagando kiun meritas la «Universala Esperantistigilo».— Dojo.

## Diversaĵoj

Propaganda Kunveno. — En la sidejo de la Esperantista Grupo el la Ĥora Societo "La Lira" Coroleu 15 (S. A.) okazis la 30.<sup>an</sup> de Julio publika kunveno en kiu paroladis elokvente pri Esperanto niaj pioniroj Sroj. Alberich, Grau, Dalmau kaj Valdepeñas. Kursoj de Esperanto estas komencitaj en la laborema societo. Sukceson ni deziras.

*Esperantista klubo Palma.* — Por festi la XXI.<sup>an</sup> datrevenon de la Klubo okazis la 17.<sup>an</sup> de Julio en hotelo "Ca's Català" festeno kiu hunvenigis 40 gesamideanojn el Palma de Mallorca. La prezidan lokon okupis la honora prezidanto de la Klubo, S-ro Narcis Bofill, S-ro Sebastià Crespi efektiva prezidanto kaj S-ro Miquel Arbona el la Grupo el Soller. Post la festeno parolis Sroj. Bofill, Arbona, Barceló, Massanet, Nicolau, Bordoy, Fuster kaj Piña kaj oni kantis la esperantistan himnon.

Poste en la sidejo de la Klubo okazis la disdono de la premioj de la literatura konkurso. Premiitoj estas S-roj A. Arbona, Noguera, Colom, Meneu kaj Nadal. La premiitaj verkoj estis legataj de siaj respektivaj aŭtoroj kaj kolektis aplaŭdojn. Poste oni malfermis la ekspozicion de esperantaj ĵurnaloj.

Vespere en Teatro Principal okazis literatura kaj muzika festo kiu estis ankaŭ sukceso por la Klubo Esperantista el Palma.

Akceptu la malnova Klubo niajn bondezirojn por longa vivo okaze de ĝia XXI<sup>a</sup> datreveno.

*Enciklopedia Akademio "Espero"* estas la nomo de nova grupo lastatempe stariginta en Barcelona, str. Muntanya, 57, kaj kiu jam kalkulas en siaj vicoj pli ol cent propagandistojn, kiuj kun fervoro kaj entuziasmo laboras por la kulturo de la popolo kaj precipe por la diskonigo de nia lingvo. La 3 — an de la kuranta monato paroladis en la sidejo de la Akademio, antaŭ multnombra ĉeestantaro, nia amiko Jaume Grau Casas.

Ni deziras al niaj novaj kunbatalantoj plej grandan sukceson en iliaj entreprenoj.

*Esperanto en Radio Barcelona.* — Lastatempe paroladis antaŭ la mikrofono de la nomita stacio niaj amikoj Conrad Domènech, S. Alberich Jofrè kaj pastro Joan Font Giralt. Ni estos tre dankaj al la aŭdintoj, se ili sendos gratulpoŝtkarton al Radio Barcelona, Casp, 12, Barcelona.

*XL Jubileo de Esperanto.* — "Paco kaj Amo", la ĉiam vigla Barcelona societo, organizis okaze de la XL Jubileo tre belan feston, kiu okazis la 7 — an de la kuranta monato en arbaro apud Sardanyola kaj kiun ĉeestis 125 personoj proksimume. La programo konsistis el diversaj atletaj konkursoj kaj literatura festo. Diversaj kamaradoj faris paroladojn pri la celo de la festo, inter aliaj parolis Cesar Gallego, Caralt, S. Alberich kaj Semo Roig.

## Tio ĉi estas la milito



Franca societo de militkripluloj organizis feston profite de sia kaso «bonfaran feston» ni dirus ĉe ni. La programo estas ilustrita per tiu malloga kaj dolora bildo. La saman fotografajon, large pligrandigitan, oni presis sur afiŝoj algluitaj en la Parizaj stratoj.

Estas eble ke la «Assotiation de Gueules Cassés» celis tuŝi la kompatemajn sentojn de la publiko en la vasta franca urbo. Sed ŝajnas al ni ke ĝi celis prefere malkvietigi ilin. Pli multe ol kompaton, ĝi celas terurigon. Tiu kapo, kies homajn trajtojn bombeksplodo forviŝis, estas la vera bildo de la milito. Antaŭ ĝi, oni sentas

korpremon. - Ĉu ekzistas io en la mondo kio povas pravigi tiujn malfeliĉojn? oni al si demandas.

Egale estas ĉu la portreto de tiu homa ruinaĵo apartenas al malnova franca soldato, aŭ al germana soldato. Egale estas ĉu la afiŝo estas gluita en la stratoj el Parizo, aŭ en tiuj el Berlino. Al ĉiulandaj homoj, kiuj ne havas malkompateman koron, tiu ĉi terura vizio kvazaŭ diras: - Atentu ja, vi kiuj estas ankoraŭ junaj, sanaj, kaj fortaj, vi kiuj eble ne hezitus denove cedi al armilaro la venĝon de la ofendoj kiujn vi supozas vundantaj vian patriotismon, atentu ja: tio ĉi estas la milito!

La bildo de tiu kriplulo, kiu estas reproduktita laŭ miloj da ekzempleroj, estas malagraba, estas malkvietiga, tremiganta pro naŭzeco; sed ĝi estas saniga. Pli konvene ol forturni la okulojn kaj ne voli ĝin rigardi, estas, eble, longe ĝin rigardadi, dirante al si, ĝis plena konvinko, ke tio ĉi estas ja la milito.

(Kataluna artikolo aperinta en la ĵurnalo «La Publicitat»)

## Nekrologo

Nia malnova federaciano, Dro. Segimond Cucurull, kiu, malgraŭ la juna aĝo montriĝis tre lerta kuracisto, mortis. Lia karaktero altiris ĉiun post la unua renkontiĝo kaj tio faris, ke oni estimis lin ĉie kaj ĉiam. Ni perdis amikon kaj fervoran defendanton de nia ideo. Al liaj familianoj ni devas esprimi nian kondolencon plej sinceran.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola  
teknika gazeto

## Internacia RADIO-REVUO

Organo de la Internacia Radio-Asocio.

### KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo (originala popularigata teorio de Radio) — Radiohumoro — Internacia Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

### PREMIO POR ĈIUJ ABONANTOJ:

KOLORTABELO DE 99 SKEMOJ  
KONKURSO KUN MULTNOMBRAJ PREMIOJ  
(i. a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro kaj multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 N.<sup>o</sup> N.<sup>o</sup>) UNU DOLARO aŭ egalval. en nacia mono  
Petu de la eldonejo la tabelon de FAVORAJ PREZOJ, de  
naciaj AGENTEJOJ kaj la kondiĉojn de KONKURSO.

Ĉefredaktoro: D-ro Pierre Corret.

Redaktoro: Ing. E. Aisberg.

ELDONEJO: ETIENNE CHIRON. 40, rue de Seine. PARIS-VI

## FULLES DE PROPAGANDA

### D'ESPERANTO

A dues pessetes el centenar podeu adquirir les fulles de propaganda publicades per la Barcelona Esperanto-Societo. Text en català, arguments de gran força convincent, útils a tot bon propagandista.

Dirigiu les comandes a

**Barcelona Esperanto - Societo**

Bretón de los Herreros, 18, 1.er, 1.<sup>a</sup>

BARCELONA

## "Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO  
OFICIALA ORGANO

DE LA

### Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj  
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj  
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en  
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

# Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complir tots els acords i resolucions que afecten els esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyen i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota quàrtrimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, també pagada a la bestreta.

*Art. cinquè.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

*Art. sisè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia, hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

*Art. setè.* — El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

*Art. vuitè.* — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

*Art. novè.* — Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. desè.* — La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

*Art. onzè.* — Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Representació Constant de les Societats Nacionals Esperantistes.

*Art. transitori.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

## Sobre l'Esperanto per "Radio Barcelona"

"L'esperanto és una genial plasmació del fons lingüístic indo-europeu en un idioma que pot traduir meravellosament tota expressió de cultura, de sentiment i de pensament de tot poble i de tot home.

L'idioma internacional de Zamenhof és una realitat que fa respecte als mateixos intel·lectuals que se n'havien rigut. Es una realitat que va fonent una pila de prejudicis filològics, de falsos academicismes, que abans de l'esperantisme semblaven postulats definitius.

Els senyors intel·lectuals, els senyors professors que encara no l'han après, ja no gosen malparlar-ne, ja prefereixen emmudir, si no coneixen l'esperanto prou bé, i, si el saben, si ja poden llegir-li Tolstoi i Bertrana, Leibniz i Cervantes, Sheakespeare i Pla, ja són senyors esperantistes com Richet i Collinson, Flügel i Privat, Bovet i Barrera.

La *j* en Esperanto no sona gutural, africana ni germànica, sinó llatina, italiana, grega; no és aspra sinó dolça. No es diu *Pako kaĥ Amo*, sinó *Paco kaj Amo* — Pau i Amor; — ni *filoĥ kaĥ fratoĥ*, sinó *filoj kaj fratoj* — fills i germans.

Hispanujo o Hispanlando, Francujo o Franclando, Anglujo o Anglando, Germanujo o Germanlando, Italujo o Itallando, Katalunujo o Katalunlando, etc. volen dir el país — lando — o continent — ujo — dels hispanoj — espanyols — francoj — francesos — angloj — anglesos — germanoj — alemanys, — italoj — italians — katalunoj — catalans, etc. I així també es diu *pomujo* o bé *pomarbo*, la *pomera*, *ĉerizujo* o *ĉerizarbo*, el *cirerer*, *pirujo* o *pirarbo*, la *perera*, *persikujo* o *persikarbo*, el *presseguer*, etc. I els qui diuen *filoĥ kaĥ fratoĥ*, *Angluĥo kaĥ Angloĥ* són precisament els no esperantistes, els qui no saben l'esperanto, els qui encara en son ignorants i ridículs destructors. Si no voleu pertànyer més als ignorants de l'idioma internacional, adreceu-vos als grups o societats esperantistes que l'ensenyen, o a la Federació Esperantista, València, 245, a Barcelona.

A totes les estacions de Ràdio va fent-se ús cada cop més positiu de l'esperanto, i això ens permetrà de fer-les totes comprensibles internacionalment, totes per a cada ràdio-audient de tot recó de món, i cada ràdio-audient capaç per a totes les estacions de qualsevol país.

Mi vin salutas, kaj dankas vian atenton.

Us saludo i agraeixo la vostra atenció. — Salut!"

DELFI DALMAU

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj  
 Federacia sidejo kaj redakstejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
 (Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
 (Joventut Katòlica) Ripollet  
*Frateco*  
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
 (Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
 St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
 (Seminari) Girona  
*Aplec*  
 Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
 Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
 Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burĝono*  
 (Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
 Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
 Provença, 156 Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerica»* Soller  
*Supercelo*  
 Coroleu, 15 Barcelona

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montgut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTO FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: MARIAN SOLÀ

## Kiu mi estas?

Aldo Palazzeschi

Ĉu mi estas poeto? —  
Tute nenia.  
Nur unu tre strangan vorton skribas  
La plumo de mia animo: —  
«Frenezoz»...

Eble pentristo mi estas? —  
Ankaŭ ne.  
Havas nur unu koloron  
La paletro de mia animo: —  
«Melankolion»...

Ĉu do — muzikisto? —  
Des malpli.  
Sole unu noto vibras  
Sub tuŝoj de mia animo: —  
»Nostalgio»...

Ĉu estas mi... kio?  
Pli bone, se mi metos  
Vitron antaŭ la koro,  
Por ke la mondo vidu  
Kiu mi estas: —  
Akrobato de mia animo.

El la itala:  
N. HOHLOV.

## Rubekola Kanto

(Lasta letero)

Migrante tra l'arbaro kaj la montoj  
 De la mirbela hejmolando, ĉion  
 Ĝuante, kion ajn Naturo riĉa  
 Al admiremo nia malavare  
 Donadis; altajn rokojn surgrimpante  
 Kie la plej maloftaj floroj nin  
 Ĝojigis; la vivadon de la bestoj  
 Kaŝobservante, sen moveto ia  
 Malantaŭ arbeto densfolia  
 La kanton de la birdoj aŭskultante  
 —Ho! dolĉememoroj pri naturstudado!—  
 Karulo, ni ja estis feliĉegaj.

Komuna estis ĉio: flor' trovita  
 Kaj sento, ĝoja aŭ malĝoja, kiu  
 La koron de l'amiko emociis.

Nur kiam mi, la rubekolan kanton  
 Aŭdante, ĉion ŝajnis forgesonta,  
 Kvankam modesta nur la arto estas  
 De tiu birdo, vi sendube sentis,  
 Ke tra la koro mia tremas io  
 De l' via ne konata. Ĝojon kaj  
 Doloron vi en la okuloj vidis  
 De la kunulo. Jen iliaj kaŭzoj  
 Antaŭ la morto de mi malkaŝotaj.

### I

Vi konas, memvidinte, la naskiĝan  
 Vilaĝon mian, en kamparo riĉa,  
 Sed de l'naturamiko malŝatata.  
 Nur kulturataj kampoj; nek arbaro,  
 Nek mont' nek erikejo lin ĝojigas.  
 Sed post la vintra dormo ankaŭ tie  
 Printempas, herboj verdas, ĉerizujoj  
 Promese blankas sub ĉiela bluo,  
 Parfumas violetoj, birdoj kantas.  
 La neĝblankan ĉerizujfloraron  
 En la ĝardeno patra mi neniam  
 Forgesi povos; ofte de l'plej alta

Branĉeto rubekolo gaje kantis,  
 Sonanta ruĝa floro inter mutaj.  
 Neniu kamparano ĉesis plugi,  
 Por ĝin aŭskulti, sed malalte inter  
 Du branĉoj de pomuj' kurbtrunka, flanko  
 Ĉe flanko, ni sidadis, du infanoj,  
 La ĉarma blondbukleta Marievo,  
 De l'riĉa muelisto la filino,  
 Kaj mi. En la barilo disiganta  
 La du ĝardenojn, nur de ni konata  
 Mallarĝa difektaĵo ne viditajn.  
 Najbarvizitojn al la par' ebligis.  
 Sidante tie kune sur la branĉo  
 La rubekolan kanton ni ĝuadis  
 Kaj iam ni disputis pri problemo  
 Malnova: kial do la birdo kantas?  
 La kunulino diris ke la patro  
 Klarigis ĝin: la birdo sin deklaras  
 La posedanto de l'ĝardena ĉaso  
 Al vermoj, raŭpoj, papilioj, muŝoj;  
 Ĝi ne permesos, ke alia birdo  
 Samspeca ĉasu en la ĉirkaŭaĵo,  
 Kaj kantas: tie ĉi mi estas reĝo.

Ho ne! mi diris, tion mia onklo  
 Pli bone scias. Ho! se ci lin konus,  
 La arbariston de la Sankta Monto.  
 La Monto kiu bluas malproksime  
 Ĉe l'horizonto —ci ja konas ĝin.  
 Li konas ĉiun arbon, ĉiun planton  
 La floron kaj la frukton; la dangere  
 Koleran apron kaj la kapreolon,  
 La cervon, kiuj nokte paŝtiĝadas—  
 Li scias, kie kaj je kiu horo  
 La bongustaĵojn li mortpafi povos.  
 La birdojn, krom perdrik' kaj urogalo,  
 Malfacilege alirebla besto,  
 Tial fieriganta la kaptinton,  
 La birdojn li ne ĉasas, sed li konas  
 El ili ĉiun; eĉ nur kelkajn sonojn  
 Aŭdinte li cin diras: estas turdo,  
 Silvio, rubekolo; senerare!  
 Kaj ĉiun li imitas kaj instigas  
 Respondi se ci tion aŭdi povus!  
 Estas amuza interparolado.

Li do komprenas ilin, kredu Manjo!  
 Kaj li al mi klarigis—rubekolon  
 Ni estis aŭskultantaj—ke la birdo  
 Allogas kunulinon per la kanto.  
 Ci, ci! li vokas, venu! restu ĉiam  
 Ĉe mi, ni kune faru neston, kune  
 La vermon ĉasu kaj fugeman muŝon;  
 Ni kune kovu kvinon da ovetoj,  
 Ni kune havu idojn, karajn idojn,  
 Gepatre nutru, flegu kaj ŝirmadu  
 Kaj kune amu ilin, amu kiel  
 Ci, ci min amos, kiel cin mi amos.

Atente la klarigon ĝis la fino  
 La kunulino aŭdis kaj — obstine  
 Asertis: tamen mia patro diras  
 Ke provokilo estas la birdkanto,  
 Militprovoko. — Ne! amdeklarado!  
 Aŭskultu nur la dolĉajn du vortetojn  
 Ci, ci! ci mia karulino venu!  
 Mi cin atendas. Ci, ci estu mia!  
 Sed ree ŝi asertis: militvoko.  
 Ne! amdeklaro, diris mi. Ni luktis  
 — Infana sinpravigo kaj popola! —  
 Sed ĉar la manojn mi bezonis ambaŭ  
 Por ŝin kaj min restigi sur la branĉo  
 De la pomujo, mi la kontraŭeman  
 Buŝon nur per la mia povis fermi.

Sub la floranta ĉerizujo tiel  
 La du infanoj sidis disputante  
 Pri amo kaj malpaco. La malpaco  
 Ne daŭris, ĝin printempa venkis amo.  
 Kaj la birdeto kantis el floraro:

— Ci ci koro infana! ci ci amo printempa  
 Feliĉo plej pura! dolĉega sentado!  
 Ci ci daŭru printempo! ci ci amo ne mortu!

## II

Aro da jaroj pasis. Jen la sama  
 Kamparebena, el la vintra dormo  
 Ekvigliganta, sub la same blua  
 Ĉielo jen la sama ĉerizujo  
 Arege floras en la sama patra  
 Ĝardeno. Ĉio sama. Mi malsama.

Malfeliĉega sur la pomujtrunko  
 Mi sidas, la pafilon en la mano.  
 Mi plej volonte al mi mem direktus.

Solena sonas bronzsonorilegoj,  
 Ekpafoj festaj, ĝojkriado, poste  
 Orgenmuziko de l' vilaĝpreĝejo:  
 De mia amikino sur la branĉo  
 Kun mi aŭdinta rubekolajn kantojn,  
 De Marievo la edziĝa festo.

Perfido? Ne! Nenies kulpo. Sorto!

Naturamiko, post la gimnazia  
 Lernado mi ekstudis la naturajn  
 Sciencojn: la vivadon de la bestoj,  
 La ravajn florojn — amo korpigita —  
 La ŝtonigitajn praestafajn restojn,  
 Kiuj sciigas nin pri vivularoj  
 Antaŭ jarmilionoj ekzistintaj —  
 Miraj sciencoj, sed nur la spiriton  
 Nutrantaj, bedaŭrinde! Mi ne povis  
 De hejmo la estigon jam pripensi.  
 Sendube ŝia patro estis riĉa,  
 Sed vivi je la kostoj de bopatro  
 Mi estis tro fiera.

Marievon

Nenio ja malhelpis edziniĝi.  
 Abia kresko, bildo de saneco,  
 Samtempe delikata kiel rozo,  
 De l'patro grandan doton ricevonta —  
 Ne mankis svatiĝantoj, senkompate  
 Malakceptitaj ĉiuj. Nun okazis,  
 Ke fama pentrartisto la permeson  
 Ŝin pentri petis; la portreto baldaŭ  
 Ankoraŭ pli famigis lin — kaj ŝin.

Ĉe la piedo de la Sankta Monto  
 Urbeto kuŝas industrie riĉa.  
 El tie la plej riĉa fabrikisto  
 La bildon vidis de la belulino,  
 Ekkonis ŝin, svatiĝis, malsukcesis.  
 Silente ŝi atendis vorton, kiun  
 Mi estis ne dironta. Sed la patro  
 Malpaciencis. Prave. La filino  
 Prokraston petis — nepre senutilan,  
 Ĉar mi silentis. Tial ŝi obeis  
 La patron, kaj je tiu hor'printempa,

Antaŭ l'altaro – Ho! mi ne kuraĝis  
 Finpensi tion sub la ĉerizujo  
 Memoriganta min pri nia amo  
 Infana. Jen eksonis dolĉa kanto  
 De rubekolo. Sur la sama branĉo  
 Ĝi sidis, kiel tiam sidis birdo  
 Samspeca, kaj la saman kanton kantis.  
 Ci, ci! ĝi vokis la rubekolinon,  
 Min ne atentis, sed mallum' de l' koro  
 Pensigis min, ke ĝi mallaŭdas, mokas:  
 Ci ci trofierulo, stulta homo,  
 Feliĉo estis cia: la plej bela,  
 La plej aminda, pura kaj bonkora  
 Knabino amis cin, sindone amis,  
 Kaj ci oferis tiun amtrezoron  
 Al cia fiereco. Nun alia  
 Ŝin ame ĉirkaŭprenos, nun alia  
 — Mi ne finaŭdis ĝin, mi ekkoleris;  
 Ekpafo; ĝi silentas, falas teren,  
 La verdan herbon, blankajn lekantetojn  
 Per sia varma sango ruĝigonte.

Sed mi, vidinte la plendindan birdon  
 Rigidiĝanta ĉe l'piedoj miaj,  
 Ekkonsciiĝis ke mi senutile,  
 Malprave la heroldon de l'printempo  
 Mortigis, kaj frakasis la pafilon  
 De l'onklo donacitan sur la trunko  
 De la pomujo. Senutila pento.

De tiam mi ne aŭdis rubekolon  
 Pri l'amo kanti; ili ŝajnis ĉiuj  
 Al mi riproĉi la kruelan agon.

### III

Post jartrideko la maljuna onklo,  
 Blankbarba nun, forlasis la arbaron,  
 Ekloĝis emerite en la sama  
 Urbeto, kie ankaŭ ŝi loĝadis.  
 Sed nur dum kelkaj jaroj li ripozon  
 Ĝuanta estis. Baldaŭ mi sciiĝis  
 Ke li malsanas. Ne, li ne malsanis,  
 La ĉiamsanegulo, sedmortonta  
 Li estis, kiel je aŭtunmateno,  
 Kiam post prujna nokto reaperas

La suno, lacaj sed ne deŝirataj  
 Folioj velkaj dolĉe falas teren.  
 Mi alrapidis, lastan havigonte  
 Al li kaj mi ĝojegon de revido,  
 Sed strange: malgraŭ la deziro baldaŭ  
 Alveni, jen ĉe la unua domo  
 De la urbeto min haltigis kanto  
 De birdo. Rubekolo je la griza  
 Vespero de malseka malgajiga  
 Aŭtuna tago kantis sian kanton  
 Printempan. Ĉu printempa? estis io  
 Malsama, malpli ĝoja, sed pli dolĉa,  
 Pli kora; mi ne povis ne aŭskulti.  
 Malgraŭ pluveto, malgraŭ la rigardoj  
 Scivolemaĉaj de la urbetanoj  
 Mi staris ĉe la krado longan tempon,  
 Kial mi venis, preskaŭ forgesante.

La kara onklo, iam tiom vigla,  
 Estis senforta nun, sed ne en lito  
 Mi trafis lin; en sia apogseĝo  
 Li sidis ĉe fajreto pinkonusa.  
 Kiom da ĝojo brilis en la bluaj  
 Ĉasistokuloj, kiam li min vidis!  
 Li ne parolis multe; pli ol vortoj  
 Manpremo diris, kiu longe daŭris.  
 Li bone sciis ke li nun forlasos  
 La belan mondon kun arbaroj verdaj,  
 Gajiga ĉaso, kantemigaj vinoj.  
 Sed kvietkore li pri l'estontaĵo  
 Parolis ridetante: kara nevo,  
 Ci vidas min kaj aŭdas lastafoje.  
 Sed kiam ci tramigros la arbaron,  
 Kiun amigis mi al ci — ĉu vere? —  
 Pensu pri tiu, kiu cin tra ĝi  
 Gvidadis. Aŭskultante iun birdon,  
 Kun kies kanto mi cin konatigis  
 Imagu ke la onkl'al ci parolas!

Je tiuj vortoj mi memoris kaj  
 Rakontis pri la rubekola kanto  
 Aŭdita. — Ĉe l'unua domo? li  
 Demandis, tie loĝas sinjorino.  
 Sed ci ŝin konas, estas la filino  
 De la najbaro via. La plendinda  
 Virino ne plie resaniĝi povis

De post la militmorto de la filo.  
 Hodiaŭ mi sciigis ke ŝi estas  
 Mortonta. — Ve, mortinta! Mi ekĝemis.  
 Kiel la rubekolon mi devigis  
 Aŭskulti, mi nun sciis, kaj la kanton  
 Mi ree aŭdis kaj komprenis jene:  
 Ci ci koro infana! ci ci amo printempa  
 Feliĉo plej rava! dolĉega sentado!  
 Printempo ne daŭris, nun grizas aŭtuno.  
 Ho! kiom kore sonis tiuj vortoj!  
 Ci ci homo kruela, heroldon printempan  
 Mortiginta, la kulpon de cia doloro  
 Pardonas la amo, la amo ne ĉesas.  
 Pardonu dankeginda, sed pli grava  
 Pentigas kulpo, kulpo kontraŭ l'amo.  
 Ci ci pro fierec'perfidinta la amon,  
 Senpekigita pro l'amo senpeka,  
 Pro l'amo purkora, malegoista  
 Ci ĉesigu la penton, cin pardonas la amo.  
 Ne birdo, tion kantis ŝi, kaj mi  
 Responde flustris: dankon, Marievo!  
 Mian sekreton nun la kara onklo  
 Ekkonis, li komprenis nin kaj longe  
 Silentis sian hundon karesante.  
 Fine li petis: Faru al mi ĝojon!  
 Kantu — de longe mi ne aŭdis ĝin —  
 La kanton pri la gaja ĉasistaro!  
 Kaj mi stariĝis kaj kun firma voĉo  
 Ekkantis.  
 La mortintoj vokas min.  
 La mondo estas bela, sed mi tien  
 Deziras iri, kien ili logas.  
 Al vi mi nun malkaŝis mian koron.  
 Adiaŭ! kiam rubekolo kantos,  
 En via koro revivigu nin!  
 Dankon pro via kunmigrad' Adiaŭ!

ED. JUNG

## Postparolo

al «Beethoven. Verkoj kaj vivo.»

de L. Schmidt

La plena verkaro de Beethoven prezentas la rimarkindan fenomenon, ke «(junecaj) brulo kaj impulso» (kiel oni kutimas diri) ne troviĝas komence, sed fine de artista evoluo. Ĉe la komenco de sia vojo li, senkatena en la vivo, kiel artisto estas siu reganta, modeste sin retenanta, pli singarde-ma ol sin antaŭenĵetema. Trankvile li konkeras iom post iom la grundon, sur kiu li intencas verki. Malgraŭ ĉia genienco kaj interna memstareco nenio estas pli malproksima al lia persono ol ribelo kontraŭ la ekzistanta. Klareco, glateco, forma simetrio estas al li kondiĉaro por la artisme bela, kaj nur per la grandeco kaj originaleco de siaj malfruaj verkoj, male, estas fermentado, bolado. Neaŭdite nova io puŝas al formiĝado kaj faras al si proprajn, ankoraŭ ne iritajn vojojn. La matura, maljuniĝanta majstro sentas sin supera al sia ĉirkaŭaĵo, suverena reĝo en novkonkeritaj regnoj. Sed kion ajn li kreas, ĝi portas en si siajn leĝojn kaj naskiĝas ne malpli organe ol la fruverkoj kunligitaj ankoraŭ kun la tradicio. Tial estas malpravaj tiuj, kiuj citas Beethoven'on antaŭulo de siaj arbitraj novaĵprovoj kaj konscie revoluciaj ideoj. Li sciis, kion li faris kaj povis diri sen memfiereco, kiam iu, por pravigi propran senregulecon, atentigis pri liberecoj en la verkoj de l'majstro: «Mi rajtas tion — vi nel!» Se li hodiaŭtage vekigis kaj vidus, kio fariĝis el la arto, por kiu li oferis sian vivon, lia kolero elverŝiĝis super tiaj disĉiploj. La gusta Beethoven-kulto centre lokigos precipe la organan, la internan neceson de lia agado kaj celos, ke la sento pri respondeco, la sankta seriozeco, kiuju li ĉiam konservis al la arto, estu instiga ekzemplo al ni kaj ĉiuj venontaj generacioj por imitado.

La pensado de Beethoven estis kosmopolita, lia verkado altulmonda. Kaj tamen, li estis unu el la plej germanaj majstroj! Lia germaneco ne estis elmontrita naciismo; sed tiam profunde radikis lia tuta esenco, lia homeco kaj lia tuta arto en la hejma tero, ke li povis elkreski nur el ĝi, ke ekster ĝi li estus tute neimagebla. Tion sentis la germana popolo dum la mondmilito, kiam ĝi rifuĝis al li kiel al nacia sanktulo. La Beethoven-kulto ne sen tre profunda kaŭzo atingis sian kulminacion dum la jaroj 1914<sup>a</sup> — 1917<sup>a</sup>. Malrapide, sed konstante ĝi estis kreskinta. La kontraŭdiro, spertita de Beethoven kiel de ĉiuj geniuloj dum la vivo, mutiĝis, ĵus kiam la morto estis lin forpreninta el la disputo de la opinioj. La senpere sekvinta epoko, certe ne malriĉa je ĝerموj al nova, fekunda evoluo, ne prezentas personojn kapablajn kompari sin kun li rilate al krea povo kaj originaleco. Des pli kreskis la figuro de Beethoven, ju pli oni malproksimiĝis de li. Por la samtempuloj, se entute ili lin komprenis, li estis ankoraŭ objekto de respekt-plena preskaŭ timema admiro; por la posteuloj li fariĝas rapidege unu el

la plej konataj kaj adorataj aperaĵoj, altiranta al si malgraŭ Händel, Bach kaj Mozart la plej ardan amon de ĉiuj klasoj. Eĉ tiugrade kaptis la entuziasmo por Beethoven, laikojn kaj fakulojn, ke de post proksimume la duono de l'jarcento li signifas simple la sintezon de ĉio granda en la muziko. Neniun alian nomon ĉirkaŭŝvebas tiel intima brilo, neniun alia enpenetris tiom profunde la popolon. La diro de Schumann parolita en senlima adoro: «Kiu rajtas arogi, laŭdi Beethoven'on?» estas nur troemfaza eĥo de tio, kio vivas en la konscio de l'tuta popolo. La tuta kulturmondo rekonas hodiaŭ en Beethoven ne nur la absolutan reganton de la tonoj, sed unu el la plej grandaj spiritoj de ĉiuj tempoj kaj metas lin en la vicon de viroj, kiel Luther, Kant, Goethe.

Sed kio ŝatigas al ni ĉi tiun majstron antaŭ ĉio, kio ligas nin al li per tiaj fortaj ligiloj kaj donas al liaj tonoj tian nerezisteblan potencon super sentaro kaj ecaro?

En la muziko, kiel, bone komprenite, en ĉiu arto agadas laborante kaj formante du ĉefelementoj diversaj laŭ sia naturo, eĉ ne malofte sin kontraŭbatalantaj. La unu estas la pure artista instinkto, la ĝuo pri ludo, pri kreado, pri formado de la rimedoj kaj de la artaj eksteraĵoj. Ĉi tiu, por nomi ĝin tiel, objektiva arto estas sencela, sed ne sensenca; ĝi servas al la belo per si mem kaj povas enhavi profundan kosman signifon. La alia elemento estas la impulso, eldiri ion per la artaĵo, fari ĝin perilo de animaj sentoj kaj abstraktaj pensoj (per helpo de tonpentraĵoj eĉ por bildi materiajn imagojn). En tia aperformo la arto ne turnas sin nur al la fantazio, sed ankaŭ al sentaro kaj intelekto. Laŭhistorie evidentiĝas ĉi tiu duismo ne malkoneble — kvankam ne severe disigite — kiel postsekvo de unu al alia. Tial ke la instigo al arta kreado fontas el la homa bezono pri interkomuniko, sekvas nesubpremeble al unu kre-maniero la alia, kaj la evoluantaj transiroj de l'pure artista al la psiĥe emociiga prezentas tion, kion ni nomas historia evoluo. Ĉia muziko unue estas formlingvo, poste esprimarto.

En la XIX<sup>a</sup> jarcento Beethoven signas la punkton, ĉe kiu tia transiro, tia antaŭensalto plej senteble rimarkiĝas. Lia muziko ja ligiĝas al la pasinteco produktinta jam tiom da belaĵoj; sed ĝi serĉas kaj parolas novan lingvon. Nova epoko ekestas. Al la kreinto de la Pathétique, Appassionata, Eroica kaj IX<sup>a</sup> Simfonio ĉio formala estas nenio pli ol nura rimedo por la celo, lia celo estas la esprimo, la prezentado de animaj travivaĵoj. En lia bezono de intenseco de l'esprimo li transpasis vaste la limojn, kiujn estis metinta al si antaŭa estetiko, kaj ofendis iafaje la koncepton pri belo de siaj kuntempuloj. Tamen ne en la kvanto da pasio troviĝis la propre nova, estontsukcesa de lia maniero, sed en la pliigita subjektivismo, kiun li konfesis. Kompreneble tio ne validas por ĉiuj liaj verkoj, sed tamen por la decidaj. Jam ne estas la subtiligo de tipe homaj sentoj, ĝeneralaj sentoj, nek ankaŭ la objektivigo de dramecaj figuroj (kiel proksimume ĉe Mozart), kion celas Beethoven. En la Missa Solemnis, kie li pritraktas sian Dion kaj sian kredon, en Fidelio, al kiu lin entuziasmigis sole la ideo pri senrezerva sin-

dono kaj nerompebla fideleco, en la sonatoj, simfonioj kaj kamermuzikaĵoj ĉie estas la Mio, la propra personeco de l'tonpoeto, kiu luktas por esprimi-povo, deziregas sin komuniki. La mondo kian li vidis ĝin, liaj ĝojoj kaj suferoj, lia sopiro kaj lia memsavado — jen ĉi ĉio formas la enhavon de ĉiuj verkoj estantaj en ilia tutaĵo nenio alia ol muzikaj memkonfesoj. Per ĉi tiu subjektivismo de l'sentado devis baldaŭ sekvi la subjektivismo de l'kreado. La malnovaj formprincipoj ĉiam pli kaj pli rompiĝis. Tial Beethoven staras ĉe la komenco de nova epoko, iniciatis interne kaj ekstere la modernan movadon, influis al Berlioz, Liszt, Wagner, Brahms, Bruckner, Mylo, Richard Strauss kaj ĉiujn plinovulojn. Li estis filo de revolucia tempo, de libera Rejnlando, kaj kiel li, malŝatante ĉian konvencion, en sia ekstera agado ne submetis sin al ia devigo, tiel li ankaŭ batalis por la libereco de artista konfesraĵto, tiel li volis detrui ĉiujn malhelpantajn barojn kaj nur kiel homo stari antaŭ homo. Ĉi tiu en la muziko nova forto de l'esprimkapablo estas unue, kiu havigis al li la potencon, la eĥon en la koroj de la tutmondo.

La forto de l'esprimo — kaj tamen la beleco en ĝi. Ĉar tio, konsiderante ĉion, estas memorinda: Beethoven ne estis unu el la revoluciuloj, el la profetoj predikantaj arbitrecon kaj senregulecon. Lia estetika koncepto estis forte konturita, kaj nur malofte — en liaj lastaj pianosonatoj kaj kvartetoj kreitaj en la vespero de lia vivo plena de maldolĉaĵoj, dum la mistikaj enprofundiĝoj en la kreaĵoj solecoj de absoluta surdulo — li kelkfoje ĝin skuis. Sed ĝuste pro tio, ke li malgraŭ plej intensa pasieco de l'sento neniam malatentis formon kaj klarecon de la ideo, ke li restis fidela al la idealo de l'belo kaj de la natureco, tial li efikas sur ĉiuj, estas komuna al ĉiuj kaj egale komprenebla. Ĉi ĉio, certe, sur bazo de genia, unika, specife muzika forma kaj senta kapablo. Ĉar kion utilas en la arto la plej geniaj intencoj, se ne garantias ilian efektivigon la krea talento, la plenkvalto da sentoj!

Kaj krome tria cirkonstanco aldoniĝas: Beethoven estis profundanime etika naturo. La ĉiutagaĵo ne altiris lin, la home malalta ŝajnis al li neinda por arta esprimo. Lia patoso ĉiam estis altnivela. Li societiĝis en la solvo de plej altaj problemoj kun la grandaj spiritoj de la homaro. Lia temo estis la heroo, lia feliĉdeziro la sopiro al interna savado, al daŭra morala perfektigo. Li konis la batalon altrudatan de la vivo al ĉiu ajn, kaj li serĉis la solvon. Super la steloj li trovis ĝin. Tiel la admireginda muzikisto fariĝis pastro. En siaj plej belaj kaj plej signifoplenaj kreaĵoj li ĉiam ree kaj ree pritrakto la heroan temon, kaj eĉ pli ol pri la aganta, li pensis pri la suferanta kaj venkanta heroeco. Ja li mem tiom multe kaj tiom profunde suferadis! Kaj jen la ĉefkaŭzo, kial lia muziko efikas tiel nekompareble sur la homoj: aŭskultante ĉi tiujn komponaĵojn ĉiu el ni povas rilatigi al si mem la enhavon. Ni sentas nin altenigitaj, liberigitaj de ĉia terpezo. Neniam Beethoven lasas nin foriri premitaj, turmentitaj aŭ konsternitaj; lia arto naskita el homa suferado, sed tamen supertera volas emociigi, ne konsterni. Sortobatoj — batalo — venko. Ĉe la fino staras ĉiam la ĝojo.

Tial Beethoven estas al ni signo de forto kaj altiĝo, firma posedo, kian

neniu alia nacio de l'mondo povas nomi propraĵo. La amo al li estas pli ol afero de artkompreno, de gusto: ĝi estas konfeso al pli alta homeco, estas adoro antaŭ la grandeco kaj sankteco de arta revelacio.

El germana lingvo tradukis

JOSEP BERGER

Menciita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

Ĉi tiu postparolo estas eltiraĵo el la libro «Beethoven. Verkoj kaj vivo» de Leopold Schmidt. Ĝi aperis en Wegweiser-Verlag Berlin en la jaro 1924.<sup>a</sup> (Trad.)



## La Maljunulo de la Montaro

Antaŭ multaj, multegaj jaroj, antaŭ ol la renaskiga lumo de l'kristanismo lumigis ĉi tiujn Insulojn kaj ekziligis el la koro de niaj antaŭuloj la kulton al Bathala 1) kaj la Anitoj 2) regadis en la nordaj montoj de Luzono maljuna Apo 3) despota, senkreda, avara kaj, antaŭ ĉio, kruela.

Li estis riĉega, posedis milojn kaj milojn da fortaj ĥinaj taŭroj, bubaloj kaj porkoj indiĝenaj. La Apo tre fieris pro ili kaj nur fordonis unu, se oni pagis al li la prezon preskaŭ ĉiam fabelan kiun li postulis. Liaj paŝtistoj estis tiom multnombraj, ke ili solaj kun siaj familioj formis specon de kabanaro kun centoj da mizeraj domaĉoj.

Kaj okazis, ke iujare terurega sekeco bruligis tiujn regionojn. La fontoj, eĉ la larĝega rivero proksima elsekiĝis kaj en ĝia fluejo de delikata sablo ne vidiĝis pli ol nura rubandeto de la likva elemento, kiu ĉiutage pli kaj pli maldikiĝis.

Por eviti la mortigon de siaj bestoj, la kruela Apo malpermesis decide al siaj paŝtistoj la uzon de l'akvo en tiuj ĉirkaŭaĵoj, kaj ili, por ne morti pro soifo, devis iri al lokoj tre distancaj, por havigi al si akvon; virinoj kaj infanoj sin dediĉis al tiu okupado, tial ke al la viroj estis malpermesite forlasi

- 
- 1) La Dio de la tagaloj.
  - 2) Bonaj spiritoj.
  - 3) Suvereno.

la brutarojn. Tiu laboro senĉesa, nome supreniri malsupreniri montojn por serĉo de malproksimaj fontoj, trairi distancojn konsiderindajn kurbigite sub la pezo de grandaj ujoj plenaj de l'altvalora likvaĵo, kune kun la malbona nutrado, ĉar la sekeco estis elĉerpinta la semitaĵojn, subfosis la mizeran ekzistadon de la montaranoj kaj stranga malsano ilin dekonumis. Timegigite pro la epidemio minacanta detruo la popoleon, ili sin direktis al la Maljunulo plej aĝa de la tribo, kiu oficis kiel ĉefpastro kaj petis lin interveni favore al ili ĉe la kolerigita Kabuniano 1) kiu ilin tiel punis.

La ĉefpastro konsilis al ili soleni «Kanjarojn» 2) dum tri sinsekvaj noktoj kaj buĉi tri taŭrojn, tri bubalojn kaj tri porkojn, la plej belajn el la kabanaro. La paŝtistoj estis «Kajlianoj» 3) nenion posedantaj sur la tero, kaj ne havis ion por pagi ilin kaj tial ili senesperigis; ili sciis, ke la koro de l'avara Apo estas pli malmola ol la roko kaj ke li ne permesos al ili tuŝi eĉ nur unu beston senpage, sed la amo al iliaj gefiloj kaj edzinoj donis al ili kuraĝon por prezentiĝi antaŭ li kaj peti lin kun interplektitaj manoj kaj ploremaj okuloj, ke li permesu al ili elpreni el la brutaro la necesajn bestojn por la festado de l'Kanjaroj. Ili ne trompiĝis! La senkreda Apo turnis al ili la dorson, minacante al ili kruelajn punojn, se ili kuraĝus tuŝi nur unu ĥaron de liaj bestoj.

Kun la morto en la animo ili rehejmeniris. Aj ! La mortemeco pliiĝis, la malsano ĵetis sin sur virinojn kaj infanojn kun sovaĝeco. Ĉar estis malsanaj kaj preskaŭ mortantaj eĉ la plej fortaj, kiu irus por serĉi akvon en la malproksimaj riveroj? Kaj al tiuj mem, kiom da tempo restos por vivi?

La malriĉaj Kajlianoj ekscititaj de l'amo al la vivo, frenezigitaj vidi en agonio la karulojn de siaj koroj kaj firmege kredantaj, ke nur per la festado de l'pentofara ofero mildiĝus la dia kolero kaj saviĝus iliaj edzinoj, gefiloj kaj ili mem, per gesto de vireca ribelo forĵetis la tradician obeemon kaj submetiĝon ŝuldatajn al sia Apo kaj mastro, kaj preninte el la brutaro la tri plej bonajn ekzemplerojn ili buĉis ilin meznokte en la densejo de l'arbaro. Ili festis la Kanjaron, trinkante Basi 4) dancante siajn milite-religiajn dancojn ĉirkaŭ kelkaj ŝtonamasoj starigitaj honore al siaj Anitoj, inter raŭkaj krioj kaj frapsonoj de Gansa 5).

Ili esperis, ke la ceremonio estos nerimarkota de l'Apo; tiom multnombraj estas liaj brutaroj kaj li loĝas tiom malproksime!

Sed ili eraris; sur la transa riverbordo, sur elstaraĵo reganta la ĉirkaŭaĵojn havis sian bienon la maljuna Apo. En la nokto de l'Kanjaroj liaj linkokuloj ekvidis malproksime lumojn moviĝantajn kaj poste la rebrilon de brilanta ŝtiparo, li aŭdis la surdigitan pro la distanco bruadon de l'Gansa

1) Ĉefdio de la Igorotoj.

2) Religia ceremoniaro.

3) Sklavoj.

4) Vino farita el la suko de speco de palmarbetoj.

5) Speco de tamtamo.

kaj suspektante la kaŭzon, la morgaŭan tagon li prezentis sin en la kabana-ro de la paŝtistoj. Tiuj, simplaj kaj veremaj, konfesis la veron. Imagu la furiozecon de la maljuna despoto, kiam li konstatis la malmultan efikon de siaj minacoj! Blinda pro furiozo li disbatis la altaron kaj preninte tri infanojn, ne aŭskultante la plendojn kaj petegojn de la gepatroj, li ĵetis ilin kantaŭen en la riveron dirante:—Se la Anitoj bezonas oferojn, jen ĉi tiuj!

Nokte, terurega kaj furioza ventego skurĝis la montarajn regionojn, fulmoj kaj tondroj sin sekvis senĉese, pluvis torente, ŝajnis kvazaŭ la ĉielaj kluzoj falis malsupren kaj la mondo estas subakviĝonta. Ĉu tio eble estas la venĝo de l'Anito, de l'Granda Agno 1) kolerigita per la sakrilegio farita de l'Apo? demandis sin la montaranoj duonmortaj pro timo kaj aflikto. Post nokto pezinkuba la suno lumigis pejzaĝon dezertigitan kaj malĝojigan; kolosaj arboj kuŝis sur la tero. Akvo ruĝaĉa kaj turba ŝveligis la larĝan riveron, kun muĝoj de incitata monstro; preskaŭ ĉiuj dometoj estis renversitaj kaj la vastaj brutejoj malplenaj. Gebovaroj, bubaloj kaj porkoj estis malaperintaj ĉiuj kaj kiom ajn oni serĉis sur montoj kaj en valoj, oni ne trovis eĉ la plej malgrandan postesignon de ili.

Post senrezultaj esploroj oni serĉis la Apon, por komuniki al li tiel strangan kiel nekomprenblan malaperon, sed ankaŭ lin oni ne trovis; sur la loko okupita de lia bieno ŝtonego granita kaj nigra havanta homan formon, rektiĝis altfiere. Kiam la superakvoj retiriĝis, oni vidis, ke la fundo rivera fakte estis kovrita per miloj kaj miloj da strangformaj ŝtonoj, iuj gigantaj, aliaj malgrandetaj.

Terurigitaj la loĝantoj forkuris por ĉiam de tiu malbenita loko, kaj iliaj posteuloj rakontadas de patroj al filoj, ke fulmradio karbigis la malbonan Apon, kiun la anitoj transformis en rokon malmolan kiel lia koro kaj nigran kiel lia animo kaj ke la brutaroj, kiujn paŝtis iliaj antaŭuloj, kuŝas ŝtonigitaj sur la fundo de l'rivero Bued, egale kiel ilia posedinto.

\* \* \*

Se foje vi supreniros al Bagnio, pasante tra Benguet Road, antaŭ ol atingi la postenon n-ro 1, vi vidos la potencon riveron de la legendo, preskaŭ sekan kaj serpentumantan je mejloj kaj mejloj kun ĝia larĝa fluejo kovrita per nenombreblaj ŝtonoj, kaj pli alte, ne malproksime de l'Zigzago, la nigran rokaĵon de l' «Maljunulo de la Montaro» (The Old Man of the Mountain), kiu ankoraŭ ŝajnas spiti la ĉielon.

JOSEF BERGER

1) Granda Rivero de norda Luzono; Rivero Bued el Benguet estas unu el ĝiaj potencaj branĉoj.

Menciita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj

## La Senmorteco

De Maurice Maeterlinck

En tiu nova epoko kiun ni eniras kaj kiam religioj ne plu respondas al grandaj demandoj de la homaro, unu el problemoj pri kiu oni sin demandas kun pli da maltrankvilo estas tiu de la transtomba vivo. Ĉu kun la morto ĉio cesas? Ĉu postvivado estas imagebla? Kien ni iras, kio ni fariĝas? Kio atendas nin trans la rompebla iluzio kiun ni nomas la ekzistado? En la minuto kiam nia koro haltas, ĉu la materio aŭ la animo triumfas, ĉu eterna lumo aŭ la senfina ombro komencas?

Kiel ĉio ekzistanta ni estas nepereontaj. Ni ne povas koncepti ke io perdiĝas en la universo. Apud la senfino ni ne povas imagi neniaĵon kie materia atomo falas kaj nuligas. Ĉio estanta eterne estos, ĉio estas, kaj nenio estos kio ne estas nun. Sen tio oni devus kredi ke nia cerbo havas nenion komunan kun la universo por kies kompreno ĝi penadas. Oni devus eĉ diri ke ĝi funkcias inverse al tiu, kio ne estas tre probabla, ĉar fine, ĝi povas nur esti ĝia reflektio.

Kio ŝajnas pereii aŭ almenaŭ malaperi kaj anstataŭiĝi, estas la formoj kaj modeloj per kiuj ni perceptas la nepereontan materion; sed ni ne scias al kiuj realaĵoj respondas tiuj fantomoj. Ili estas la teksaĵo de la rubando kiu, almetita al niaj okuloj, donas al tiuj, pro la premo kiu blindigas ilin, ĉiujn bildojn de nia vivo. Kiam tiu rubando estas formetita kio restas? Ĉu ni eniras en la realecon kiu nepre ekzistas tie; aŭ eĉ la fantomoj mem ĉesas por ni sian ekzistadon?

### II

Ke neniigo estas neebla, ke post nia morto ĉio daŭras kaj ke nenio pereas: jen kio ne tre interesas nin. Sola punkto kiu nin tuŝas, en tiu eterna persistado, estas la sorto de tiu parteto de nia vivo kiu perceptis la fenomenojn dum nia ekzistado. Ni ĝin nomas nia konscienco aŭ nia «mi». Tiu «mi», tiel kiel ni ĝin komprenas kiam ni pripensas la sekvojn de ĝia detruado, estas nek nia animo nek nia korpo, ĉar ni rekonas ke unu kaj alia estas nur senĉese renoviĝantaj fluoj. Ĉu ĝi estas nemovebla punkto kiu estas nek la formo nek la substanco, ĉiam evoluanta, nek la vivo, kaŭzo aŭ efekto de formo kaj substanco? Neeble estas ja al ni kapti aŭ difini ĝin, diri kie ĝi loĝas. Kiam oni volas porti sin ĝis lasta fonto ĝia, oni ne trovas pli ol vicon da rememoroj, serion da ideoj cetere malklaraj kaj varieblaj, kaj alligitaj al instinkto mem de la vivo; serion da ideoj cetere malklaraj kaj varieblaj, kaj alligitaj al instinkto men de la vivo; serion da kutimoj de nia sentado kaj da konsciaj aŭ senkonsciaj reagoj kontraŭ la nin ĉirkaŭantajn fenomenojn. Resume, la plej fiksa punkto de tiu nebulozo estas nia memoro, kiu aliflanke ŝajnas tre ekstera, tre akcesora kapablo, almenaŭ unu el malplej solidaj el nia cerbo, unu el tiuj plej rapide malaperantaj pro plej eta ŝanceliĝo de nia farto. «Tio ĉi mem, tre ĝuste diris angla poeto, insiste postulanta la eternecon estas tio kio en mi pereos».

## III

Negrave; tiu «mi», tiel necerta, tiel nekaptebla, tiel forŝoviĝanta kaj tiel delikata, estas tiel forte la centro de nia estaĵo, interesas nin tiel ekskluzive, ke la tuta realo de nia vivo malaperas antaŭ tiu ĉi fantomo. Al ni estas absolute indiferente ke dum la eterneco, nia korpo aŭ ĝia substanco, konu ĉiajn feliĉon kaj gloron, spertu plej belegajn kaj agrablegajn transformiĝojn, fariĝu floro, parfumo, belaĵo, lumo, etero, stelo; estas tute indiferente al ni ke nia inteligenteco ampleksiĝu por miksiĝi kun la vivo de la mondoj, ĝin kompreni kaj regadi. Nia instinkto estas konvinkita ke ĉio ĉi ne tuŝos nin, ne donos al ni ian plezuron, ne okazos al ni mem, se nur tiu memoro pri kelkaj faktoj, preskaŭ ĉiam sensignifaj, ne akompanos nin kaj ne estos atestanto de tiuj neimageblaj feliĉoj. Estas al mi egale ke la plej altaj partoj, la plej liberaj, la plej belaj el mia spirito estu eterne vivantaj kaj lumantaj en la plej superaj ĝojoj; ili ne plu estas miaj, mi ne plu ilin konas. La morto fortranĉis la reton da nervoj aŭ rememoroj kiu ilin ligis al, mi ne scias kiu, centro kie troviĝas la punkto kiun mi sentas esti mia tuta estaĵo. Tiel detranĉitaj kaj flugpendantaj en la spaco kaj tempo, ilia sorto estas al mi tiel fremda kiel tiu de la plej malproksimaj steloj. Ĉio okazanta ekzistas por mi se nur mi povas ĝin rilatigi al tiu mistera estaĵo, kiu sidas mi ne scias kie kaj precize en neniuj partoj; kiun mi kondukas kvazaŭ spegulon tra tiu ĉi mondo kies fenomenoj korpigiĝas nur kiam ili estas tie reflektataj.

## IV

Tiel, nia sopiro al senmorteco detruigiĝas per sia formulo mem, ĉar ni bazas tutan valoron de nia postvivo sur unu el akcesoraj kaj plej nedaŭraj partoj el nia vivo. Al ni ŝajnas ke se nia ekzistado ne povas daŭri kun la plejmulto da mizeroj, da malgravaĵoj kaj mankoj ĝin karakterizantaj, nenio distingas ĝin el tiu de ceteraj estaĵoj; ke ĝi fariĝos guto da nescieco en la oceano da nekonataĵoj, kaj de tiam, ĉio sekvonta tute ne interesas nin.

Kian senmortecon oni povas promesi al homoj kiuj preskaŭ necese komprenas ĝin tiel? Kion fari al tio? diras al ni infana sed profunda instinkto. Ĉia senmorteco kiu ne trenadas tra la eterneco, kvazaŭ la ferbulo de la punlaborulo kia ni estis, tiun strangan konsciencan forĝitan dum kelkaj agititaj jaroj, ĉia senmorteco ne portanta tiun neforviŝeblan signon de nia personeco, estas por ni kvazaŭ ĝi tute ne estus. La plimulto el la religioj bone tion komprenis, kaj ili kalkulis kun tiu instinkto kiu deziras kaj samtempe detruas la postvicon. Jen kial la katolika eklezio, irante ĝis la plej primitivaj esperoj garantias al ni ne nur kompletan pesiston de nia «mi», sed eĉ la reviviĝon en nia propra karno.

El la franca trad.

MARIAN SOLÀ

(daŭrigota)

## La Vivo

Antaŭ granda tendo brue zumis homamaso avide rigardanta la pitoreskajn multpromesajn afiŝojn. Belaj landoj kaj feliĉaj aventuroj estis alloge prezentitaj sur ili. Kaj same alloge, inviteme sonis la voĉo de klasike pala arlekeno:

—Eniru ĉi tien, gesinjoroj! Ĉinĵ eniru senhezite: riĉuloj, infanoj studentoj, malriĉuloj, beluloj, soldatoj, malvirtuloj, honestuloj, malbeluloj, aĝuloj kaj ĉiuj aliaj. En tiu ĉi tendo atendas vin multaj agrablajoj. Vi travivos en ĝi la plej belajn momentojn. Ĉiuj viaj esperoj, ĉiuj deziroj viaj, — plenumiĝos ĉi tie. Ankoraŭ neniu elirinta el nia tendo esprimis sian malkontenton. Do ne atendu, ne perdu plu la valoran tempon, eniru!...

Tiel parolis la arlekeno longe kaj konvinkige. La allogaj bildoj, la unu-tona prometema voĉo —, ĉio ĉi kvazaŭ hipnotigadis la homojn. Kaj unu post la alia ili eniradis la tendon pagante la enirpagon.

Interne regis griza duonmallumo. En la vastan tendegon apenaŭ penetradis la bruo de la homamaso. Iaj nigre vestitaj fantomsimilaj estaĵoj indikadis al la enirantoj iliajn lokojn. La homoj sidiĝis kaj sidiĝinte komencis atendi. Kion? Ili mem ne sciis precize, sed oni promesis al ili ion malprecizan pri agrablajoj ilin ĉi tie atendantaj. Do ili atendis kun forta espero...

La silento penetris la grizan mallumon, interplektiĝante kun ĝi. Apenaŭ distingeblaj estis la linioj de la tendo. Io peza, nedifinebla rezultis el tiu miksaĵo de sensoneco kaj senlumeco. Ŝajnis ke io pli kaj pli profundigadis...

Minutoj forpasadis. La homoj ĉiam atendis, sed iom post iom timo ekpremadas iliajn cerbojn per siaj molaj manoj. La spirado haltadis, fajreto de malkvieteco kuradis en la okuloj...

Minutoj forpasadis... Ĉu minutoj? Eble jarcentoj, eble eternecoj... La homoj ankoraŭ atendis. Sed ili atendis jam senespere, sciante ke ili estas trompitaj, ke neniu prezentado okazos, ke mensogis la arlekeno kaj malveraj estis liaj promesoj. Ili tamen atendis... atendis ĝis la fino.

Ankoraŭ pli mallume fariĝis en la tendo. Pli peza iĝis la silento kaj pli angora la humoro de la ĉeestantoj. Ili atendis la finon senpacience kaj tamen time.

Kaj jen ies voĉo de ie proklamis:

—Fino.

Kaj malrapide, kun malsuprenklinitaĵoj kaj vaganta rigardo la homoj eliradis straton. La elirintojn rapide ĉirkaŭis la atendantoj kaj superŝutis ilin per demandoj.

—Ĉu estas interesa la prezentado? Ĉu valoras tien eniri?...

— Ho jes! Estas tre interese. Rigardu mem! — respondis la elirintoj false ridetante.

Neniu el ili diris la veron, ĉar ili hontis esti tiel infanece trompitaj...

Alloge sonis la voĉo de l'arlekeno, inviteme aspektis la multkoloraj afiŝoj kaj en tendon eniradis novaj grupoj da homoj...

Junulo kun ĉiellazure bluaj okuloj demandis Maljunulon:

— Vi estas ja saĝa, ho Maljunulo! Vi vivas jam multajn, multajn jarojn. Vi havas sperton kaj vi konas la vivon. Diru al mi sincere: ĉu la vivo valoras ke oni travivu ĝin?

Nur momenton hezitis la Maljunulo kaj poste per firma voĉo, ne rigardante en la bluajn profundajn okulojn, li respondis:

— Jes, ĝi valoras.

Junulo ne rimarkis kiel ruĝetiĝis la vangoj de maljunulo: li rapide kuris la ĝardenon de l'vivo por deŝiri tie la plej belajn rozojn... Kiel profunde vundas iliaj dornoj...!

E. AISBERG

Premiita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA KAPITANFILO de A. S. Puŝkin.— El la rusa lingvo tradulis M. Ŝidlovskaja. Biblioteko Tutmonda n-oj 15-17. Eldonis Rufolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19,-1927, 176 pĝ. 17 × 10 1/2. Prezo: 1.50 Rm.

La aŭtoro, la verko mem kaj la tradukintino estas internacie konataj. «La Kapitanfilino», kiun oni tradukis en diversajn lingvojn, estas salutinda akiro por nia literaturo, kiu per tio ricevas plian valoron, tiom pli ke ni ŝuldas la tradukon al la ŝatata Ŝidlovskaja kio garantias ĝian lingvan bonecon.

Puŝkin distingiĝas per la frapanta realeco, kiun li donas al siaj verkoj. Lia stilo estas klara, preciza kaj ĉarma. Ŝidlovskaja sukcesis redoni en Esperanto tiujn specialajn ecojn de la aŭtoro. «La Kapitanfilino» prezentas al ni historiajn epizodojn el la Pugaĉov-a ribelo, okazinta en la apudvolgaj gubernioj. Puŝkin simple priskribas la karakteron kaj morojn de la tiamaj homoj kaj en formo de romano kunligas la historian aspekton kun ama aventuro.

La traduko meritas ĉies laŭdon el ĉiuj vidpunktoj. Tio faras ke ni devas laŭdi la verkojn tute malkaŝe, rekomendante tujan aĉeton. — SALJO.

LA HOMA LINGVO. — Originale verkis W. E. Collinson. Biblioteko Tutmonda n-oj 18-19. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer stasse 46-49, Berlin S. W. 19.-1927, 96 pĝ.  $17 \times 10 \frac{1}{2}$ . Prezo: 1 Rm.

Tian lingvistikan verkon ni ne posedis ankoraŭ en Esperanto. Lingvoscienco estas duoble interesa en Esperanto pro la rolo mem de nia lingvo kaj tio sendube helpas la baldaŭan elĉerpiĝon de la eldono. Tiaj verkoj honoras ne nur la aŭtoron sed la lingvon mem en kiu ili estas skribitaj.

Collinson kompetente disvolvas sian temon kaj pri liaj teorioj ni devas plene konsenti. El la jenaj ĉapitroj konsistas la verko: La naturo de la lingvo, Skizo de fonetiko, La bestaj krioj, La infana lingvo, Lingvaj ŝanĝoj, Disiĝo kaj unuiĝo, Fremdaj influoj, Lingvo kiel karakterizilo de la parolantoj kaj La klasifiko de la lingvoj. Ĉiu ĉapitro estas interese kaj detale pritraktata. La specialeco de la temo postulas kelkajn neologismojn, kiujn lerte enkondukas la aŭtoro.

Kun granda ĝojo ni salutas la elvenon de la verko, kies legadon ni varme rekomendas al ĉiuj studemuloj. — SALJO.

BONHUMORAJ RAKONTOJ de Janusz Korczak. — El la pola lingvo tradukis Anna Weinstein. Biblioteko Tutmonda n-o 20. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Jerusalemer strase 46-49, Berlin S. W. 19.-1927, 64 pĝ.  $17 \times 10 \frac{1}{2}$ . Prezo: 0.50 Rm.

Kvankam la titolo anoncas «Bonhumoraj Rakontoj», en vero oni ne povas diri, ke ili estas bonhumoraj. Ĉiu rakonto estas plena de serioza analizo de diversaj flankoj maldolĉaj de la vivo. Korczak famiĝis danke al siaj brilaj verkoj pri kaj por la infanoj kaj per tio donis plian valoron al la ŝatinda pola literaturo, kiun ni povis koni kank'al la multaj tradukoj, kiujn ni havas en Esperanto.

La tradukintino lerte uzas nian lingvon. Al la glata stilo de la traduko aldonu la ĉarmon kaj profundan sencon ironian de ĉiu rakonto kaj vi komprenos kial ni rekomendas la aĉeton al ĉiuj. — SALJO.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO. — EDMOND PRIVAT. — La Movado 1900-1927. Eldonis Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. 199 paĝoj. Arta koverto.

Esperanto estas jam pli maljuna ol multaj el ĝiaj fervoluroj. Raporto pri la movado estas do afero kiu povas kaj devas interesi la esperantistojn. S-ro Privat kiu de sia tuta vivo estas ligita al la internacilingva movado estas sendube tiu persono kiu pli bone konas ĉiujn okazintaĵojn de Esperantujo kaj sekve tiu kiu plej bone kaj ĝuste povas verki tiun grandan raporton. Li tion faras per larĝaj skizoj preterlasante detalaĵojn kiuj povus lacigi la leganton. De la legado de nia historio oni ĉerpas grandan bonon, nia esperantisteco, se eble, plivigliĝas. Ni havas antaŭ ni la kuraĝan kaj heroan aganon de niaj plej fruaj pioniroj, ni vidas kiajn ba-

rojn kiajn danĝerojn la mondlingva ideo travenkis kaj tio donas al ni kuragon por plua batalado. La ekzemplo de niaj ne plu vivantaj sambatalantoj devigu nin firme teni nian standardon.

Ofte ni vidas kiel multaj personoj nuntempe venas al niaj kursoj, lernas bone Esperanton kaj tuj poste ni ne plu vidas ilin en niaj vicoj. Ili konas la lingvon ili ne estas esperantistoj. Ili ne konscias la grandegan laboron kiun reprezentas la unua disvastiĝo de Esperanto. Al ili ni donu por legi la verkon de S-ro Privat kaj ĝi estu por ili atestanto de la granda kvanto da fervoro kaj penado kiu estis necesa por atingi la nunan staton. Eble tiel ili ankaŭ klopodos per siaj fortoj helpi la movadon kaj ĉesos kredi ke la aferoj antaŭeniras sen ies puŝado.

Pri la lingvo estas superflue paroli: kiam mi finas la legadon de libro kiel tia mi ne povas ne pensi denove ke la elpenso de Zamenhof estas mirindaĵo. — M. S.

POLLANDO KAJ GDANSK.— Eldonita de Pollanda Esperanto Delegitaro. Havebla ĉe Administrejo de «Pola Esperantisto» Warszawa, Smolenska 9. Prezo 1,50 zloty. Paĝoj 110; diversaj ilustraĵoj.

Jen nova gvidlibro ampleksa pri sendependa Polujo. Kiu estus antaŭvidinta antaŭ deko da jaroj la reviviĝon de tiu malnova nacio dispartigita inter tri el la plej potencaj eŭropaj ŝtatoj? Plej fortikaj kasteloj tamen falas. Poloj neniam ĉesis esperi pri la sorto de propra patrujo. Jen ekzemplo.

La libro enhavas interesajn statistikojn pri loĝantaro, vasteco, agrikulturo k. c.. Per ili oni vidas ke laŭ grandeco ĝi estas nun unu el la plej gravaj eŭropaj ŝtatoj. Vasta priskribo de la ĉefurbo estas la unua ĉapitro de la libro kiu ankaŭ enhavas priskribon de Danzig, Lwow, Lodz, Krakow kaj aliaj pli malgrandaj urboj. Belaj fotografiaĵoj ilustras la libron kiu estas tre bone kaj korekte redaktita kaj invitas al veturado al Pollando. Ni sincere rekomendas la verkon al niaj legantoj. — M. S.

WELTHUMOR IN ESPERANTO. — Dr. Emil Pfeffer. Sprachen-Bücher Tagblatt-Bibliothek nr. 541-542-87 paĝoj; prezo nemontrita. Eldonita de «Steyermühlen Wien 1 Wollzeile 20. — Tiu-ĉi libro kiu apartenas al serio de legolibroj, el kiuj ĉiu havas la saman tekston en du malsamaj lingvoj, estas tre interesa verko egale bona por tiuj kiuj lernas Esperanton kaj tiuj kiuj volas lerni la germanan lingvon. Ĝi entenas kompletan liston de anekdotoj kaj spritaĵoj ĉerpitaj el diversaj landoj kaj klare rakontitaj. Jen specimeno de bonhumoro: Vagabondo: «Ĉu vi donacus al mi unu frankon, kara sinjorino, por ke mi povu viziti mian familion? » Sinjorino: «Certe, bona viro. Jen vi havas unu frankon. Kie estas via familio? » Vagabondo: «En kino». — Mi kuraĝus fari al la kompilinto riproĉeton: kelkaj radikoj kiuj ŝajnas al mi superfluaĵoj. — M. S.

GVIDLIBRETO POR JAPANLANDO. — 37 ilustraĵoj, 9 landkartoj, 102 paĝoj, bela arta japanstila koverto. Traduko de Japano Esperanto Instituto. Eldo-

nita de Japana Ministerio de Ŝtat-Fervoj Tokio. Senpaga, petu ĝin rekte al la Ministerio.

Jen verko kiu povas per si sola varbi indiferentulon kaj kiu klare montras la ŝaton kiun por nia lingvo oni havas en la oficialaj japanaj rondoj. La verko montras interesajn statistikojn pri la orienta insulo, korektajn kartojn de la diversaj provincoj de la lando kun fotografajoj de la urboj kaj raportoj pri iliaj plej gravaj vidindaĵoj. La bildoj estas tre saĝe elektitaj por allogi la turiston. Vera regalo por okcidentano. Mi konsilas al niaj legantoj ke ili petu la libron, tralegu ĝin, montru ĝin al neesperantistoj kaj se ili havas sufiĉe da tempo ili veturu al Japanlando por konstati ke la lando efektive respondas al la beleco de la reklamo. — M. S.

NATURSCIENCO MONDKONCEPTO RELIGIO de Dro. Johannes Reinke. Tradukis el germana lingvo Ewald Brenken. Eldonita de Katolika Mondo Koeln-Lindenthal 159 paĝoj. Prezo nemontrita. — La verko estas sendube tre interesa, kaj ĝi pruvas ke en niaj modernaj tempoj, de multaj kalumniitaj kiel materialistaj, tamen oni publikigas kaj legas librojn kiuj parolas al ni pri problemoj de la spirito kaj metafiziko. Nia epoko estas karakterizata per la disradiado de nia intelekto en ĉiujn direktojn, nia intelekto konsiderata kiel la intelekto de la homa speco samtempe kiam la individua intelekto pli kaj pli specialĝas. Ĉiu ŝatos konstati ke en Esperanto oni publikigas ofte verkojn sciencajn kaj ne sole beletristikajn: tio montras efektivan progreson kaj neniel intancas esti mallaŭdo de beletristiko. Tion dirinte mi devas bedaŭri ke la tradukinto de la verko ne donis al ni ion pli bonan: la verko tre interesa en sia originalo ne havis la ŝancon renkonti bonan tradukanton: novaj vortoj troviĝas tute nenecesaj, sufikso ende uzata en preskaŭ ĉiuj paĝoj (mi verkas en Esperanto jam de dudek jaroj almenaŭ kaj mi sincere konfesas ke mi netrovis ankoraŭ la okazon uzi sufikson enda) kaj precipe la stilo estas tute ne alloga. Mi konsilus al la tradukinto ke li legu la verkojn de Zamenhof, Kabe kaj aliaj klasikuloj kaj post dek jaroj de tia ekzercado li denove traduku la verkon pri kiu mi recenzas. Mi estas tute certa ke la traduko neniel similos la nunan. Tiam la aŭtoro posedos tiun supernacian stilon kiu hodiaŭ mankas al li ankoraŭ —. M. S.

KONGRESLIBRO SOLLER.—25 paĝoj kun ilustraĵoj. Redaktita de la Organiza Komitato de la XIV<sup>a</sup> Kongreso de K. E. F. 5-7 de Junio 1927<sup>a</sup>.

La libro tre korekte redaktita estas gvidlibro de Soller la bela baleara urbeto, ĝi entenas krom tio la programon de la Kongreso, la nomojn de la samideanoj el kiuj konsistis la Organiza Komitato, la Direkta Komitato de la Federacio kaj la liston de kongresanoj, federacianoj kaj aliĝintaj grupoj. Ni gratulas la aŭtorojn por la bonega laboro. — M. S.

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

## Diversaĵoj

**Kataluna Vespero en Praha.** — Ni ricevis de afabla samideano la jenan raporton pri «Kataluna vespero», kiun Esperantista klubo en Praha (ĉeĥa) aranĝis je honoro de 20-jara esperantisteco de ĝia prezidanto S-ro Hromada.

La salonego en «Palaco de Sindikatoj» estis tutplena, ĉar alvenis multaj gastoj. La programo montriĝis tiel interesa, ke oni devis multon pli detale priparoli ol oni ĝenerale intencis. Tial oni devis post du horoj interrompi la kunvenon por daŭrigi la programon venontfoje, t. e. post unu semajno.

Post honorigo de la jubilanto S-ro Hromada per paroladeto de sekretario de la klubo S-ro konsilanto Koutek, parolis D-ro Cestmir Parma pri kataluna lando kaj popolo, pri la kataluna lingvo kompare al hispana, itala kaj franca, kaj li priskribis kiel la historio de la lingvo estas samtempe historio de la kataluna popolo kaj atentigis je mirinda simileco tiurilata inter ĉeĥa kaj kataluna lingvoj. Fine li image vojaĝis kun la ĉeestantoj tra la kataluna teritorio helpe de ricevitaĵoj bildoj. La bildoj de moderna pentrarto kataluna plaĉis al ĉiuj treege, same la statuo moderna de Sankta Georgo, de la skulptisto Llimona.

Poste parolis S-ro Ginz, premiito ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj, precipe instigante al partopreno de ili. Oni montris samtempe fotografiaĵojn de la festo de Floraj Ludoj, kaj F-ino Richtrová deklamis la poemon «Al Fraŭlino Caterina Muntaner, Reĝino de la Floraj Ludoj» de Jaume Grau Casas el liaj «Novaj Amaj Poemoj»,

Sekvis paŭzo, post kiu S-ro Echtner parolis pri literaturo kataluna kompare al literaturo ĉeĥa. Li substrekis specialaĵojn katalunajn kaj priskribis pli detale kelkajn aŭtorojn. Fine li prelegis «Pri Esperanto» de Xenius kaj parton pri adiaŭo de Anaksagoro de Periklo (Pompeu Gener).

Estis jam malfrue kaj oni devis prokrasti la programon — deklamojn, recitaĵojn, popolajn kantojn katalunajn, por la venonta fojo.

En la dua kunveno, F-ino Richtrová legis poemojn el «Kataluna Antologio», S-ino Parma ludis plane kaj F-ino Rousková kantis popolkantojn. Fine F-ino Richtrová, post dekminuta paŭzo, recitis el la vere bonegaj «Novaj Amaj Poemoj».

La bildoj pri kataluna arto kaj naturbelaĵoj estos ekzpoziciataj en la Praha klubo.

**Esperanto ĉe Radio Barcelona.** — La anoncisto de Radio Barcelona ĉe la fermo de la stacio uzas diversajn lingvojn por sciigi la ĉesigon de la disaŭdigado. Lastatempe li lernis la kutiman frazon en Esperanto kaj uzas tiun ĉi lingvon inter la aliaj. Tio estas nova pruvo pri la speciala ŝato, kiun ĝuas nia lingvo ĉe tiu stacio.

**Esperanto ĉe Oficiala Lernejo.** — Ĉe la Oficiala Laborlernejo, kiun

subtenas la Barcelona Diputacio, oni organizas dum somero la kursojn, kiujn petas difinita nombro da lernantoj. Antaŭ la komenco de la kursoj tridek ok lernantoj petis kurson de Esperanto. La Direktoro de la lernejo sin turnis al KEF. petante kompetentan profesoron. Sro. Artur Domènech prenis sur sin tiun taskon kaj la kurso okazis kun granda sukceso sub lia sperta gvido.

**Festo ĉe Paco kaj Amo.**— «Paco kaj Amo» anoncas por la 16-a de oktobro eksterordinaran feston por festumi la XX datrevenon de la fondiĝo de la Societo. Estas anoncitaj literaturaj kaj teatraj festoj kaj festeno. Ni deziras grandan sukceson al la malnova kunbatalanto, kiu kun granda entuziasmo kaj sukceso ĉiam batalis por nia afero.

Sukcesaj paroladoj de S. Alberich, J. Grau, kaj D. Dalmau okazis ĉe «Supercelo» kaj «Acadèmia Politècnica», novaj grupoj kaj kuraĝaj batalantoj por Esperanto, kaj en «Nova Sento», la jam malnova vigla grupo.

*Kiu deziras okazigi en sia urbo nian XVan Kongreson?*—Pro la diritaj cirkonstancoj en nia antaŭa numero, niaj samideanoj en Navàs ne povas organizi ĝin, eĉ post peto kaj provoj.

Laŭ niaj Statutoj, ĉiuj samideanoj en katalunlingva teritorio, tio estas, ne nur en Katalunujo, sed ankaŭ en Rusiljono, Balearaj Insuloj kaj Valencio povas aliĝi al nia Federacio kaj organizi ĝiajn kongresojn interkonsente, en sia urbo aŭ urbeto. La balearaj esperantistoj jam dufoje tre sukcese kaj dankinde tion faris. Rusiljonaj, Valenciaj kamaradoj, ĉu vi? — La nuna graveco de la Internaciaj Floraj Ludoj, la helpemo de la Katalunujaj esperantistoj kuraĝigu vin!

*Amikoj.*—Nian alvokon «Respondu, amiko», respondis per donacoj de 50 ptoj ĉiu: *Fino. Louise Briggs*, nia malnova karega samideanino el Anglujo, nia kara Bofill el Palma kaj *Sro. Hans Windisch-Sartowsky*, nia estimata poeto el Germanujo, premiita florldinto, kies nomon erare ni nur aperigis en la ĝenerala listo de la menciitoj, anstaŭ citi ĝin ĉefe inter la premiitoj. Malpli talenta kaj malavara samideano estus plendinta, aŭ koleriĝinta kontraŭ ni pro tiu eraro kiu kaŝis la ĉefen meriton. Sro. Hans. Windisch-Sartowsky, kontraŭe, faris mondonacon por nia Federacio, por ke nia agado por Esperanto kaj la Internacia Literaturo estu daŭrigata.—Dankon!—DELFI DALMAU.

*Du junaj fraŭlinoj kaj Kornelino.*—Du noveloj el la bonekzemplaj de Miĥaelo de Cervantes. (Tutmondfama aŭtoro de «Kiĥoto».) Tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn. Hispana Esperanto-Biblioteko, Madrid (Hisp.), Glorieta de Bilbao, 5.—1927.—70 pĝ. 13:19 cm. Prezo 1.75 sv. fk. aŭ 3 resp-kup.

Komandanto Mangada aperigis pluan volumeton de klasika deveno en la Hispana Esp.-Biblioteko. Komparante la tradukon kun la originalo, mi konstatas ĉiurilatan algustigon, sed bedaŭrinde ankaŭ tro laŭvortan tradu-

kon je hispanismoj spicitan. Modela tradukado estas arto, kiu postulas artiston. Ili estas maloftaj en Esperantujo.

Tre atentinda ŝajnas al mi sciigo je la fino de l' libro, ke baldaŭ elvenos kompleta traduko de Don Kiĥoto (en 32-paĝaj sinsekvaj kejeroj). Mi konsilas al s-ro M., ke li kune kun aliaj lingvospertaj samideanoj prizorgu la gigantan laboron kaj submetu la manuskripton al severa kritiko de diverslandaj kompetentuloj. Tia mondfama verko devas resti majstraĵo ankaŭ en Esperanta traduko. — «Manĉujo» ne plaĉas al mi. Pro kio ne «de la Manĉa»? Ĉu en «Manĉujo» loĝas «manĉoj»? Oni evitu troan Esperantigon de propraj nomoj, precipe ĉe librotitoloj. M. Butin, LK. — EL «HEROLDO.»

*Kursoj.*—Ĉar nun estas la tempo kiam ĝenerale niaj grupoj komencas la instruadon de Esperanto, per la malfermo de vintraj kursoj, ni tre ŝatus ricevi de la sekretarioj de la grupoj sciigojn pri la nombro de kursoj malfermataj kaj se eble pri nombro de partoprenantoj. Ni tre volonte estas pretaj publikigi statistikon pri tiu grava, certe la plej grava, flanko de nia movado.

*Danziga kongreso.*—Pro manko da spaco ni ne publikigas raporton pri nia lasta Internacia Kongreso kiu okazis la unuan de Aŭgusto en Danzig. La nombro de kongresanoj atingis 900 kaj certe la intereso ĉe la loĝantaro estis granda. La kongresanoj estis akceptitaj solene de ĉiuj urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. En Zoppot, marurbo apud Danzig, oni plantis abion kiel memoraĵon de la Kongreso kaj multaj kongresanoj alportis plenmanon da tero el siaj respektivaj landoj por ke la arbomemoraĵo havu internacian grundon. La Kongreso finiĝis en Varsovio kie la esperantistoj estis akceptitaj en la Urbodomo. Ankaŭ oni aranĝis ekskurson al Byalístock kaj tie pilgrimis al la naskiĝdomo de la Majstro.

*Kongresanoj.*—Oni diris al ni el Danzig ke nur unu samlandano partoprenis la Universalan Kongreson: tiu feliĉulo estas S-ro Andreu Piñó.

*Estontaj Kongresoj.*—La organiza Komitato de la Universala kongreso por la venonta jaro jam komencis siajn taskojn. Kiel oni scias ĝi okazos en Antverpeno de la 3.<sup>a</sup> ĝis la oka de Aŭgusto. Federacianoj kiuj intencas ĉeesti la kongreson petu de ni aliĝilojn kaj informojn.

Por 1929<sup>a</sup> la kongresurbo estos Budapeŝt. Berlin petis la kongreson por 1930.

*Radio Barcelona.*—Lundon la 19<sup>a</sup>n de Septembro nia Prezidanto S-ro Delfi Dalmau parolis katalunlingve antaŭ la mikrofono. Temo: propagando de Esperanto.

*Julio Baghy.*—Nia kara amiko kaj inspiroplena verkisto anoncas sian la boremon per la publikigo de nova libro «Dancu, marionetoj» kiu aperos la 1<sup>a</sup>n de Novembro proksima.

# L' ARALDO ESPERANTISTA

“ESPERANTHEROLDO”

*ĉiudusemajna Esperanto - journalo*

**Direktoro - Fondinto: KONRADO CHERRI**

Direktejo - Administrejo - Redaktejo: **AREZZO** (Italujo)

---

La plej malmultkosta — disvastigata — aktuala  
4-8 paĝa — grandformata

**ELDONNOMBRO: 6000 ekzempleroj**

**FAVORA - ABONPAGO: Lit. 8,- aŭ Sv. Fr. 3,-**

de 1<sup>a</sup> de julio ĝis 31<sup>a</sup> de decembro k. j.

**SAMIDEANOJ:** Subtenu tiun-ĉi ĵurnalon. Ĝi estas la plej subteninda, ĉu por ĝia disvastigo kaj abonpago, ĉu por ĝia estonteco.

Ne forgesu, ni korege bonigos ĝian enhavon laŭ bezono.

Skribu tuj. Ni serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj.

**Sed ni bezonegas en via lando almenaŭ 130 abonontojn.**

**ABONU — ABONIGU ĜIS 100 ABONOJ**

# Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complimentar tots els acords i resolucions que afecten els esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anyals.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyen i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, també pagada a la bestreta.

*Art. cinquè.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

*Art. sisè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia, hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè el pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el lloc i data de l'Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

*Art. setè.* — El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

*Art. vuitè.* — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

*Art. novè.* — Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. desè.* — La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

*Art. onzè.* — Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Representació Constant de les Societats Nacionals Esperantistes.

*Art. transitòri.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## A la Societat de Nacions

... En una de les comissions prenia part no fa gaire, segons diu el Cri de Paris, un senyor qui es feia remarcar de tot-hom pel seu aspecte elegant i per la seva cortesia. Assiàtic, ho era segurament, però tan anglès d'actituts, de gestos i de llenguatge aparentment.

No va obrir per a res la boca en tots els dies que durà el treball fins a la sessió final, quan abans d'estampar les signatures, tot-hom va resumir la seva opinió.

Quan li arribà el seu torn, s'incorporà, saludà profundament i començà un discurs amb accent anglès. Però els comissionats anglesos feren senyals de que no l'entenien. Igualment els demés asiàtics.

Discretament es feren venir tots els interprets, pararen les orelles. No percaçaren ni un mot.

I l'orador continuava parlant boi saludant, i potser les seves observacions eren del més alt interès...

Per fi, s'assegué. Hom no sabia què respondre-li, quan un delegat francès va tenir una idea lluminosa. S'aixecà, saludà el seu preopinant, i també amb accent anglès va dir-li:

— Les seves observacions han estat altament interessants per a la comissió. I és per això que li demanem de fer-nos a mans un resum per escrit.

Aplaudiments; l'estranger tornà a saludar, i la sessió fou aixecada.

Però des de llavors, tot-hom a Ginebra es pregunta:

— Quin llenguatge deu parlar aquest home?

(De «La Movado»)

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. rovekz emplerio 2 respondkuponoj  
 Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
 (Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
 (Joventut Katòlica) Ripollet  
*Frateco*  
 Placo Pi i Margall, 4. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
 (Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
 St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
 (Seminari) Girona  
*Aplec*  
 Montserrat, 9, 1.<sup>er</sup> Sabadell  
*Bela Espero*  
 Carretera de Vich, 4. Mauresa  
*Esperanta Idealo*  
 Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burgono*  
 (Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
 Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
 Provença, 156 Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerica»* Soller  
*Supercelo*  
 Coroleu, 15 Barcelona

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Amelilla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Molins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orbitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montgut:* Fino. Lluïsa Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Euric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Bracons  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Feliu de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino. Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidreres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTO FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: MARIAN SOLÀ

## La festo de la libro

Niaj enlandaj legantoj sciigis, almenaŭ per la ĵurnaloj, ke tiu festo okazis jam en nia lando antaŭ nelonge kaj ke multe da literaturaj libroj verkitaĵ en la patra lingvo estas disvenditaj ĉe la barcelonaj librovendejoj. Por ni esperantistoj, jen estas nova okazo partopreni tute saman feston, kiu tiun ĉi fojon havos universalan karakteron: la lasta universala esperanto kongreso en Danzig rekomendis al ĉiuj esperantistoj, kun la celo antaŭenpuŝi la progreson de la literaturo kaj ankaŭ inde kaj dece rememorigi la naskiĝotagon de D-ro Zamenhof, aĉeti en tiu ĉi tago esperantajn librojn kaj al la esperantaj societoj aranĝi laŭpove kunvenojn por konigi la staton de nia literaturo kaj konstati aŭtaŭ la membraro la atingitajn progresojn. Ni povas nur laŭdi tiun rekomendon kaj deziri ke ĝi estu kiel eble plej multe akceptita; sincere kaj kore ni petas al niaj katalunaj grupoj kaj al ĉiuj individuaj federaciaĵoj ke ili ne forgesu en la 15<sup>a</sup> de Decembro almenaŭ iom rememori kaj mediti pri la heroa tasko de Zamenhof, pri liaj longaj laboroj, tute sindonaj por la bono de la homoj. Se iu el ni eksentis sin malforta kaj eble sopiris de nun sin teni pli pasive koncerne la movadon, se iu el ni sentas sin iom laca kaj avidas ripozon post la longa penado, se iu perdis esperon pro tro longa atendo, li tralegu denove la vivon de Zamenhof: kuraĝo kaj fervoro ree lin puŝos.

Zamenhof iam diris, rifuzante honorojn, monumenton ni havas en nia verko. Por liu honorigi nenio estos pli bona ol helpi la progresadon de lia verko. Kaj unu el la plej taŭgaj rimedoj por tion ĉi fari estas la aĉetado de esperantaj libroj, kiu sola povas plivalorigi kaj plivastigi nian jam tre valoran kaj legindan literaturon. En la datreveno de la naskiĝo de Zamenhof ni faru al ni devon akiri almenaŭ unu esperantan libron.—M. S.

## La funebro

Mi rajdas sur griza, ŝaŭmanta ĉevalo,  
 Mi estas vestita per nigra vualo  
 Kaj ĉiun mi domon vizitas.  
 Sed kie mi estas kaj kien mi venas.  
 Nur kelkaj min dankas, sed multaj malbenas  
 Min ĉiuj laŭpove evitas.

Noktmezo loĝadas en mia okulo  
 la frunton kovradas densega nebulo,  
 Min nigra bukloro ornamas.  
 Je mia rigardo animoj ekstremas,  
 Ĉar brulan doloron en ilin mi semas,  
 mi ĝojon, feliĉon malamas.

Mi flugas rapide tra hela aero:  
 Nubiĝas ĉielo, nigriĝas la tero...  
 Jen freŝajn floretojn mi trovas,  
 Jen rozoj belegaj kaj blankaj lilioj,  
 Ĉe ili flirtadas la ĝojpapilioj,  
 Sed ĉiujn mi ilin mortblovas.

Mi vidas patrinon ĉe bela lulilo  
 En ŝia okulo feliĉa ambrilo,  
 Sur lipoj afabla rideto...  
 Sed mi ne kompatas, al ili mi venas  
 Kaj de la patrino infanon forprenas,  
 Formortas amata fileto.

Mi ĝojas trovante malgajan junulon  
 Mi ridas vidante larmantan okulon.  
 Mi ĝuas, ĉar ĉiuj suferas...  
 Fianĉon forprenas mi de la knabino  
 Amikon fremdigas al la amikino.  
 Feliĉon mi ne, ne toleras!

Mi rajdas sur griza, ŝaŭmanta ĉevalo,  
 Mi estas vestita per nigra vualo  
 Sub kiu mi havas trezorojn.  
 Per zorgoj, trompiĝoj mi brustojn purigas,  
 Mi en dolorego animojn kunigas  
 Pli mildaj mi faras la korojn...

VARMA JARVENPAA

## Ĉu...

Se ĵetos mi trezoron, oron  
aŭ stelojn lumajn de l' ĉielo  
al belaj, Ciaj piedetoj,  
ĉu cia koro ne ŝanĝiĝos?

Ĉu cia koro ne ŝanĝiĝos,  
eĉ se mi kante gloros amon  
kaj cian nomon tra la mondo  
ripetos poste la jarcentoj?

Kaj se nenion mi alportos.  
nur *koron* amoplenan mian  
al ci oferos, Amo Mia,  
ĉu cia koro ne ŝanĝiĝos?

Ĉu cia koro ne ŝanĝiĝos  
en hor' trankvila kaj silenta  
dum la vesper' melankolia  
Ĉu cia koro ne ŝanĝiĝos?

S. GRENKAMP-KORNFELD

Menciita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj



## Rememoro

Virinojn multajn — mi konfesas ĝin —  
jam amis mi per am' pli-malpli ĝasta:  
vi estis nek l'unua nek la lasta; —  
do kiam mi memoras ĝuste vin?

Vin, kiun la kaprico de l'hazardo  
kondukis en la urb' sur mia voj'; —  
malriĉan blankan liton en mansardo  
partigis ni kun senmalica ĝoj'.

Ebriaĵ de la ĝuo, kun frivol'  
ni interŝanĝis vantajn ampromesojn; —  
ankoraŭ sentas viajn mi karesojn  
kaj viajn varmajn kisojn sur la kol'.

Vi, kiun mi dum unu nokt' adoris,  
foriris je l' krepusko de l' maten';  
sen teda, dramatika amoscen'  
disiris ni — kaj ni ne vane ploris...

Ne scias mi, ĉu iam mi renkontos  
ankoraŭ vin sur nia vasta ter',  
sed per animo mia prirespondos  
mi poste por la via en l'infer'.

Originale Verkis:

JAN VAN SCHOOR

Premiita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



## Karnavala Romanco

(dediĉata al Jaume Grau Casas)

Kiel digna kaj pala vi aspektis hieraŭ,  
Kun la brovoj belformaj de la korva kolor' !  
Mi rigardis, sorĉita de l' triumfa apero,  
Kun la mano tremanta ĉe l' kor'.

Estis brila salono de la bal' karnavala,  
Estis brua amuzo de la gajurbanar',  
En susuro de l' paŝoj, sub "jazz-band" triviala  
Flekse movis sin paro post par'.

Kaj vi, kvazaŭ antikva, plej majesta diino,  
De svenige-alloga kaj belkreska statur',  
Pasis meze de l' svarmo, en la lustrilumino,  
Tra la flustra virina murmur'.

Ĝuavide-mienaj, vin salutis la viroj,  
Sub mizera knarado de l' usona "fox-trott",  
Kaj el ĉiu angulo vin minacis konspiroj,  
Aŭ senforta, kaŝita komplot'.

Sed vi restis dieca, malintima fiero,  
Konservante malvarmon de statua marmor' ...  
Mi vin sekvis rigarde, sen dezir', sen-espere,  
Kun la mano rigida ĉe l' kor'.

N. HOHLOV

## La Senmorteco

de Maurice Maeterlink

(fino)

Jen estas la centro de la enigmo. Postuli ke tiu eta konscienco, tiu sento de "mi" speciala, preskaŭ infana kaj ĉiam eksterordinare limigita, kredeble malsano de nia inteligenteco, postuli ke ĝi akompanu nin en la senfino de la tempo por ke ni tiun ĉi komprenu, por ke ni ĝin ĝuadu, ĉu tio ne estas kvazaŭ ni volus percepti objekton per helpo de organo tute ne destinita al tiu perceptado? Ĉu tio ne estas kvazaŭ peti ke nia mano vidu la lumon aŭ ke nia okulo flaru la parfumojn? Ĉu, ankoraŭ, tio ne estas kondukti kvazaŭ malsanulo kiu, por retrovi sin, esti certa ke li ja estas li mem, kredus necese konservi sian malsanon en la bonfarto kaj en la senlima daŭro de la tempo? La komparo estas cetere pli ĝusta ol ordinara komparo. Imagu al vi blindulon samtempe paralizitan kaj surdan. Li troviĝas en tiu stato de sia naskiĝo kaj ĵus atingis sian tridekan jaron. Kion brodis la horoj sur la senbilda teksaĵo de tiu malfeliĉa vivo? La malfeliĉulo eble kolektis en la fundo de sia memoro, pro manko de aliaj rememoroj kelkajn palajn sentojn de varmo kaj malvarmo, de laceco kaj ripozo, de fizikaj doloroj pli-malpli akraj, de soifo kaj malsato. Kredeble ĉiuj homaj ĝojoj, ĉiuj esperoj kaj ĉiuj revoj de la idealo kaj de niaj paradizoj, resumigos por li en la nedifinita bonstato kiu sekvas la estingiĝon de doloro. Jen estas la sola ebla konsisto de tiu konscienco kaj de tiu «mi». Ĉar la intelekto neniam estis alvokita el ekstere, ĝi profunde dormos ne sciante pri si mem. Kaj tamen la malfeliĉulo havos sian propran malvastan vivon al kiu ĝi sopiros per tiel streĉa fervoro kiel la plej feliĉa homo. Li timos la morton; kaj la ideo eniri en la eternecon ne portante kun si la emociojn kaj la rememorojn de sia konscienco, de siaj ombroj kaj de sia silento, metos lin en la malespero en kiu nin trempas la penso forlasi por la frosto kaj nokto de la tombo vivon de gloro, de lumo kaj amo.

### V

Ni supozu ke miraklo subite vigligas liajn okulojn kaj orelojn, malkaŝas al li tra la fenestro malfermita apud lia lito, la tagiĝon sur la kampoj, la kanton de la birdoj sur la arboj, la murmuron de la ventoj inter la folioj, kaj de la akvo apud la bordoj, la travideblan sonoron de homaj voĉoj en la matenaj montetoj. Ni supozu ankoraŭ ke la sama miraklo, kompletante sian faron, donas al li la uzadon de liaj membroj. Li leviĝas, etendas la brakojn al tiu mirindaĵo kiu por li posedas ankoraŭ nek versajnecon nek nomon: la lumo! Li malfermas la pordon, ŝanceliĝas pro lumblindiĝo kaj tuta lia korpo fandiĝas en tiujn mirindaĵojn. Li eniras nedireblan vivon, en ĉielon kiun neniu revu antaŭsentigis; kaj, pro kaprico tre akceptebla en tiaj resaniĝoj,

kiam la sano enkondukas lin en tiun nekoncepteblan kaj nekompreneblan ekzistadon, ĝi forviŝas de li ĉiun rememoron pri tagoj pasintaj.

Kiu estos la stato de tiu «mi», de tiu centra kerno, magazeno de ĉiuj niaj sentoj, loko kien kunvenas ĉio kio apartenas propre al nia vivo, plej supera punkto, punkto «egotika» de nia estaĵo, se oni povas ekuzi tiun neologismon? Kiam la memoro estas nuligita, ĉu li retrovos en si mem kelkajn trajtojn el la antaŭa homo? Kiam nova forto, la intelekto, vekigās subite kaj laboras per neaŭdita aktiveco, kian rilaton konservos tiu intelekto kun la senmova kaj eta ĝermo el kiu ĝi naskiĝis? Al kiuj anguloj el sia pasinteco ĝi alkroĉiĝos por daŭrigi sin? Kaj tamen, ĉu ne postrestos en li iu sento aŭ instinkto, sendepende de la memoro, de la inteligenteco kaj mi ne scias de kiuj aliaj kapabloj, kiu komprenigos lin ke estas ja en li mem kie ĵus eksplodis la liberiga miraklo, ke estas ja lia propra vivo kaj ne tiu de lia najbaro, transformita, nerekonebla, sed substance identa, kiu elirinte el malheleco kaj silento, plilongiĝas en la lumo kaj harmonio? Ĉu ni povas imagi la konfuzon, la fluojn kaj refluojn de la malserenigita konscienco? Ĉu ni scias kiel la hieraŭa «mi» kuniĝos al la hodiaŭa, kaj kiel la «egotika» punkto, la sentema punkto de la personeco, la sola kiun ni volas konservi netuŝite, kondutos sin en tiuj deliroj kaj tiuj renversiĝoj?

Ni provu unue respondi kun sufiĉa precizeco al tiu demando kiu apartenas al nia vivo nuna kaj videbla; kaj se ni ne povas tion fari, kial esperi la solvon de la alia problemo kiu stariĝas antaŭ ĉiu homo en la momento de la morto?

## VI

Tiu sentema punkto kie resumiĝas la tuta problemo, ĉar ĝi estas la sola pridiskutata, kaj en ĉio ĝin ne koncernanta la senmorteco estas certa, tiu mistera punkto al kiu, en ĉeesto de la morto, ni aljuĝas tiel altan valoron, estas tre strange ke ni ĝin perdas ĉiumomente en la vivo ne sentanta plej malgrandan ĝenon. Ne nur ĉiun nokton ĝi estingiĝas dum nia dormado, sed eĉ en maldormo, ĝi estas je la hazardo de vasta nombro da akcidentoj. Vundiĝo, puŝego, malbonfarto, kelkaj glasoĵoj da alkoholo, iom da opiumo, iom da fumado sufiĉas por ĝin estingi. Eĉ kiam ĝin nenio ĝenas, ĝi ne estas egale vigla. Ofte oni bezonas klopodon, iom da sinatento por retenigi ĝin, por konscii ke tiu aŭ alia okazo venas sur nin. Je plej malgrava distriĝo, feliĉo preterpasas apud ni, ne tuŝante nin, ne liverante al ni la entenatan plezuron. Oni dirus ke la funkcioj de tiu organo per kiu ni ĝuas la vivon, kaj rilatigas ĝin al ni, estas intermitaj kaj ke la ĉeesto de nia «mi», escepte en la doloro, estas nur rapida kaj senĉesa sinsekvo de iroj kaj reiroj. Kio nin trankviligas estas la certeco ke post revekiĝo, post la vundo, la frapo, la malatento, ni retrovos ĝin netuŝite kaj kontraŭe ni estas konvinkitaj ke, tiel malfirman ni ĝin sentas, ĝi devas por ĉiam plu malaperi en la timinda skuo kiu apartigas vivon de morto.

## VII

Unua vero, atendante aliajn kiujn sendube la estonteco senvualigos, estas ke en tiuj ĉi demandoj pri vivo kaj morto, nia imago restis tre infana. Preskaŭ ĉie ĝi antaŭiras la racion; sed tie ĉi ĝi restas ankoraŭ ĉe la provoj de la unuaj epokoj. Ĝi nutras sin per la revoj kaj barbaraj deziroj per kiuj ĝi lulis la timojn kaj esperojn de la homo de l'kavernoj. Ĝi postulas neeblajn aferojn, neeblaj ĉar malgrandaj. Ĝi postulas privilegiojn kiuj, atingitaj, estus pli timindaj ol la plej grandegaj malfeliĉoj per kiuj nin minacas la neniigo. Ĉu ni povas sentreme pensi al eterneco tute enfermita en nia mal-supera nuna konscienco? Kaj jen kiel en ĉio ĉi ni obeas al nelogikaj kapricoj de tiu en aliaj tempoj nomita «frenzulino de la hejmo». Kiu el ni, se li endormiĝus tiun ĉi vesperon, kun la scienca kaj sperta certeco ke li revekiĝos post cent jaroj, tia kia li estas nun kaj kun korpo sendifekta, eĉ kun la kondiĉo perdi ĉiun rememoron pri sia antaŭa vivo (ĉu tiuj rememoroj ne estus senutilaj?), kiu el ni ne akceptus tiun centjaran dormon kun la sama konfido kiel la dolĉan kaj nedaŭran dormon de ĉiu nokto? Anstataŭ timi ĉu multaj ne alkurus al tiu sperto kun fervora scivolemo? Ĉu ni ne vidus multajn homojn albatoli per petoj la fordonanton de la sorĉa dormo, kaj petegi kvazaŭ favoron tion kion ili kredus mirakla plilongiĝo de sia vivo? Kaj tamen dum tiu dormado kio restus al ili, kaj post ilia revekiĝo, kion ili trovus de si mem? Kia ligilo, en la momento kiam ili fermas la okulojn, religos ilin al la estaĵo revekiĝonta sen rememoroj, nekonata, en nova mondo? Kaj tamen ilia konsento kaj ĉiuj iliaj esperoj en la eniro en la longan nokton, dependus de tiu ĉi ligilo kiu tute ne ekzistus. Ne estas ja inter vera morto kaj tiu endormiĝo io pli ol la diferenco de tiu revekiĝo dum jarcento prokrastita, revekiĝo tiel fremda al tiu endormiĝinto kiel naskiĝo de postmorta infano.

## VIII

Aliflanke kiel ni respondos la demandon kiam ne plu temas pri ni sed pri tio kun ni spiranta sur la tero? Ni konsideru ekzemple la postvivan de la bestoj. Hundo, la plej fidela, plej afabla, plej inteligenta, de kiam ĝi estas mortinta, fariĝas nur naŭza restaĵo de kiu ni liberigas nin kiel eble plej baldaŭ. Eĉ eble ne ŝajnas al ni demandi ĉu io el la vivo jam spirita kiun ni amis en ĝi daŭras en alia loko ol en nia memoro, kaj ĉu ekzistas alia mondo por la hundoj. Ŝajnus al ni tre ridinde ke la spaco kaj tempo konservu zorge dum la eterneco, inter astroj kaj la senlimaj palacoj de l'etero, animon de malfeliĉa besteto, konsistanta el kvin aŭ ses tuŝantaj sed tre naivaj kutimoj, kaj de deziro trinki, manĝi, varme dormi kaj saluti siajn kamaradojn laŭ konata maniero. Kio restus cetere el tiu animo tute formita de kelkaj bezonoj el malperfekta korpo, kiam tiu korpo ne plu ekzistos? Sed kiarajte ni imagas, inter ni kaj besto, abismon kiu ne ekzistas eĉ inter mineralo kaj kreskaĵo, inter kreskaĵo kaj besto? Estas tiu rajto kredi nin tiel malproksi-

maj, tiel malsamaj al ĉio vivanta sur la tero; estas tiu ĉi pretendo altiĝi nin al kategorio kaj regno kiun eĉ la de ni mem kreitaj dioj ne ĉiam povus atingi, kiun oni devas antaŭ ol ĉio ekzameni.

## IX

Oni ne povus rakonti ĉiujn mallogikaĵojn de nia imago pri la demando kiu okupas nin. Jen ni facile alkonformiĝas al disruiniĝo de nia korpo en la tombo. Neniel ni celas ke ĝi akompanu nin en la senfino de la tempoj. Se ni pripensas, ni estus eĉ ĉagrenataj ke ĝi eskortu nin kun ĉiuj siaj neeviteblaj mizeroj, siaj malperfektaĵoj, siaj malbelaĵoj kaj ridindaĵoj. Kion ni volas kunporti estas nia animo. Sed kion ni respondos al tiu kiu demandos ĉu estas eble koncepti ke tiu animo estas io alia ol la tuteco de niaj intelektaj kaj moralaj kapabloj, kunigitaj, se oni volas, por kompletigo, al ĉiuj kiuj dependas de la instinkto, de la senkonscio, de la subkonscio? Kaj tamen kiam ĉe la sojlo de maljuneco ni vidas kiel malfortiĝas aŭ en ni aŭ en aliaj, tiuj samaj kapabloj ni ne pli malkvietiĝas, ni ne pli malesperas ol kiam ni vidas la malrapidan dekadencan de la korpaj fortoj. Ni konservas netuŝebla nian konfuzan esperon de postvivo. Ŝajnas al ni tre nature ke la stato de unuj dependas de tiu de la aliaj. Eĉ kiam la unuaj estas tute nuligitaj en amata de ni persono, ni ne kredas esti lin perdintaj, nek ke li perdis sian «mi», sian moralan personecon, de kiu tamen nenio restas. Ni ne plorus lian perdon, ni ne kredus ke li ne plu ekzistas, se la morto konservus tiujn kapablojn en ilia stato de ruiniĝo. Sed se ni ne aljuĝas ĉefan gravecon al dissolviĝo de nia korpo en la tombo, nek al estingiĝo de niaj intelektaj kapabloj dum vivo, kion do ni volas ke la morto ŝparu; kaj de kiu nerealegebla revo ni postulas la efektivigon?

## X

Ni ja ne povas, almenaŭ nun, imagi akceptindan respondon al la demando pri senmorteco. Kial miri pri tio? Jen estas lampo sur mia tablo. Ĝi kaŝas neniun misteron; ĝi estas la objekto plej malnova, plej konata kaj plej uzata en la domo. Mi tie vidas oleon, meĉon, vitran kloŝon; kaj ĉio ĉi formas la lumon. La enigmo ne komencas ĝis la momento kiam ni demandas al mi kio estas la lumo, el kie ĝi venas kiam mi ĝin vokas, kien ĝi iras kiam mi ĝin estingas. Kaj tuj, ĉirkaŭ tiu malgranda objekto kiun mi subtenas, kiun mi malmuntas kaj kiun mi povus konstrui per miaj manoj, la enigmo estas nesondebla. Kunvenigu ĉirkaŭ mian tablon ĉiujn homojn vivantajn sur nia tero, neniun povos al ni diri kio estas per si tiu ĉi malpeza flamo kiun laŭ mia plaĉo mi naskas aŭ estingas. Kaj se unu el ni kuraĝas hazarde eldiri unu el tiuj tiel nomataj sciencaj difinoj, ĉiu el nomoj de l'difino multigos la nekonataĵon kaj malfermos ĉiufanken, neesperitajn porojn antaŭ la nokto senfina. Se ni scias nenion pri la esenco, pri la vivo, pri iom da intima lumo kies elementoj estas ĉiuj de ni kreitaj, kies devemo,

proksimaj kaŭzoj kaj efektoj povas teniĝi en porcelana kaliko, kiel esperi penetri la nekomprenoblecon de vivo kies plej simplaj elementoj kuŝas je milionoj da jaroj, je miliardoj da mejloj el nia inteligenteco?

## XI

De kiam ĝi ekzistas, la homaro ankoraŭ unu paŝon ne progresis sur la vojo de la mistero kiun ni primeditas. Ĉiu demando kiun ni povas fari tiucele, per neniuj flanko ŝajne tuŝas, la sferon en kiu formiĝis nia inteligenteco kaj en kiu ĝi moviĝas. Eble neniuj rilato estas ebla aŭ eĉ imagebla inter la organo kiu faras la demandon kaj la realeco kiu devus ĝin respondi. Plej aktivaj kaj plej rigoraj elserĉoj en tiuj lastaj jaroj nenion instruis al ni. Sciencaj kaj konsciencaj psikaj societoj, precipe en Anglujo, kolektis imponan amason da faktoj kiuj pretendas pruvi ke la vivo de la estaĵo spirita aŭ nerva povas ankoraŭ dum iom da tempo daŭri post morto de la materia estaĵo. Ni akceptu ke tiuj faktoj estas nekontesteble kaj science starigitaj; ili nur de kelke da linioj, de kelke da horoj simple prokrastus la komencon de la mistero. Se la fantomo de amata persono, rekonebla kaj ŝajne tiel vivanta ke mi adresas al li parolon, eniras mian ĉambron hodiaŭ vespere en la minuto mem kiam la vivo deapartiĝas de la korpo kuŝanta je mil mejloj de la loko kie mi troviĝas, tio ĉi, sendube estas tre stranga en mondo el kiu ni ne komprenas la unuan vorton; sed tio ĉi montras maksimume ke la animo, la spirito, la blovo, la nerva nekaptebla forto de la plej subtila parto de nia materio, povas deŝiri sin de ĝi kaj postvivi dum momento kiel la flamo de lampo kiun oni estingas foje deŝiras sin de la meĉo kaj dum momento staras en la nokto. La fenomeno estas ke ĝi ne okazu pli ofte kaj per nia volo, en la pleneco de la vivo. Almenaŭ ĝi tute neklarigas la demandon. Nenian unu el tiuj fantomoj montris plej malgrandan konsciencan pri nova vivo, vivo supertera kaj malsama al tiu ĵus forlasita de la korpo el kiu ĝi elflugis. Kontraŭe, ilia spirita vivo, en tiu momento kiam ĝi devus esti pura ĉar liberigita de la materio, ŝajnas tre malsupera al tiu estinta kiam la materio ĝin subtenis. La plej multaj aŭtomate daŭrigas, per ia sonnambula idioteco, la plej sensignifajn el siaj kutimaj sinokupoj. Unu serĉas sian ĉapelon sur meblo forgesitan, alia malkvietiĝas pro ŝuldeto aŭ informiĝas pri la horo. Kaj ĉiuj, iom poste, kiam la vera postvivo estus komenonta, forvapiĝas kaj por ĉiam malaperas. Mi konsentas ja ke, tio pravas nenion nek por nek kontraŭ la ebleco de postvivo. Ni ne scias ĉu tiuj mallongegaj aperoj estas la unuaj ekbriloj de alia ekzistado aŭ la lastaj de tiu ĉi. Eble la mortintoj uzas kaj tiel profitas, pro manko de io pli taŭga, la lastan ligilon kiu kunigas ilin kaj igas ilin ankoraŭ senteblaj al niaj sentiloj. Eble ili poste vivadas apud ni, sed ne plu sukcesas, malgraŭ ĉiuj klopodoj rekonigi sin nek vekti en ni la ideon de sia ĉeesto, ĉar ni ne havas la organon necesan por ilin percepti; tiel same kiel ĉiuj niaj penoj ne sukcesus doni al naskita blindulo la plej malgrandan ekkonon pri lumo aŭ koloroj. Ĉiuokaze la en-

ketoj kaj taskoj de tiu nova scienco de «Borderland», kiel la angloj ĝin nomas, lasis ja la problemon ĝuste en la sama loko kie ĝi troviĝas de la komenco de homa konscienco.

## XII

Meze de la nevenkebla nescio en kiu ni troviĝas, nia imago povas do elekti niajn eternajn destinojn. Nu, ekzamenante la diversajn eblecojn, oni devas nepre konfesi ke la plej belaj ne estas la malplej verŝajnaj. La unua, jam tuj sendiskute forĵetinda hipotezo, ni tion konstatis, estas tiu de la absoluta neniigo. Dua hipotezo fervore karesata de niaj blindaj instinktoj, promesas al ni pli-malpli integralan konservon, tra la senfino de la tempoj, de nia konscienco aŭ de nia nuna «mi». Ni ankaŭ pristudis tiun hipotezon, iom pli akceptindan ol la unuan, sed funde tiel mallarĝan, tiel naivan kaj infanan, ke oni ne bone vidas, tiel por la homoj kiel por bestoj kaj kreskaĵoj la manieron ĝin apliki racie en la spaco kaj tempo senlimaj. Ni aldonu ke el ĉiuj eblaj destinoj, ĝi estus la sola vere timinda, kaj ke pura kaj simpla nuligo estus milfoje preferinda.

Restas la duobla hipotezo de postvivo sen konscienco, aŭ kun konscienco plilarĝigita kaj aliformigita, pri kiu nia aktuala tute ne povas doni al ni ideon, kontraŭe ĝi malhelpas al ni ĝin kompreni, tiel same kiel nia nepperfekta okulo malhelpas al ni koncepti alian lumon ol tiun kiu iras de la infra-ruĝo al ultra-violo; malgraŭ tio ke tiuj lumoj, kredeble mirindaj, blindigus ja ĉie pupilon alie formitan ol tiu nia.

Kvankam unuavide duobla, la hipotezo revenas al simpla demando pri konscienco. Diru, ekzemple, kiel ni estas tentataj tion fari, ke postvivo sen konscienco egalvaloras neniigon, estas kvazaŭ tranĉi apriorie kaj sen meditado tiun problemon de la konscienco, la ĉefan kaj plej malklaran el ĉiuj kiuj nin interesas.

Ĝi estas, kiel tion proklamis ĉiuj metafizikoj, la plej malfacila el ĉiuj, ĉar la objekto de la kono estas tio ĉi men kio celas koni. Kion faros do tiu spegulo ĉiam kontraŭ si mem, se ne reflekti sin senfine kaj senutile? Kaj tamen en tiu rebrilo nekapabla eliĝi el sia propra multigo, kuŝas la sola radio kapabla lumigi ĉion ceteran. Kion fari? ne ekzistas alia rimedo por elŝteliĝi el propra konscienco ol ĝin nei, ĝin konsideri kvazaŭ organisman malsanon de la tera inteligenteco, malsano de kiu oni devas sin kuraci per ago kiu povas al ni aperi kvazaŭ ago de frenezo perforta aŭ laŭvola, sed kiu transe de niaj ŝajnaĵoj estas kredeble ago saniga.

## XIII

Sed neeble estas elŝteliĝi; kaj ni fatale revenas rondiri ĉirkaŭ nia konscienco fondita sur nia memoro, plej malfirma el niaj kapabloj. Ĉar estas evidente, ni diras, ke nenio povas pereĝi, ni nepre estas vivantaj antaŭ nia nuna vivado. Sed ĉar ni ne povas religi tiun antaŭan ekzistadon al nia ak-

tuala vivo, tiu certeco estas al ni tiel indiferenta, iras tiel malproksime de ni, kiel ĉiuj certecoj pri la postviva ekzistado. Kaj jen, tiel antaŭ la vivo kiel post la morto, la apero de la mnemonika «mi», pri kiu decas ankoraŭ unu fojon sin demandi ĉu tio kion ĝi faras en la mallongaj tagoj de sia aktiveco estas ja sufiĉe grava por tiel decidi, je propra kosto, la problemon de la senmorteco. Ĉu de tio ke ni ĝuas nian «mi» per maniero ekskluziva, tiel speciala, tiel malfirma, tiel efemera, sekvas ke ne ekzistas alia formo de konscienco, nek iu plia maniero ĝui la vivon? Popolo de naskitaj blinduloj, por reveni al trudiĝanta komparo, ĉar ĝi plej bone resumas nian situacion en la nokto de la mondoj, popolo de naskitaj blinduloj, al kiuj unika vidanto laŭdus la ĝojojn de la lumo, neus ne nur ke tiu estas ebla, sed eĉ imagebla. Por ni, ĉu ne estas preskaŭ certe ke tie ĉi malsupre mankas al ni, inter mil da aliaj sentoj, sento supera al tiu de nia konscienco mnemonika por ĝui larĝe kaj pli certe nian «mi»? Ĉu oni ne dirus ke iufoje ni perceptas malklarajn signojn aŭ ekvekiĝojn de tiu sento ĝermanta aŭ atrofita, almenaŭ subpremita, kaj preskaŭ nuligita per la reĝimo de nia vivo surtera kiu alcentrigas ĉiujn fazojn de nia ekzistado sur la saman senteman punkton? Ĉu ne troviĝas iaj konfuzaj momentoj kiam, kvankam senindulge, kvankam science ni deprenu la parton de la egoismo serĉante eĉ en la plej malproksimaj kaj sekretaj fontoj, restas en ni io absolute sinfororgesema kaj ĝojanta pro la bono de aliaj? Ĉu ne estas ankaŭ eble ke la puraj ĝojoj de la arto, la kontentiĝo kvieta kaj plena kiun en ni naskas la admirado de bela statuo de perfekta monumento, kiu ne apartenas al ni, kiun neniam plu ni revidos, kiu vekas neniun utilon; ĉu ne estas eble ke tiu kontentiĝo estu la pala brileto de alia konscienco kiu filtriĝas tra fendeto el nia mnemonika konscienco? Se ni ne povas imagi tiun konsciencon malsaman, tio estas nenia pravigo por ĝin nei. Mi eĉ pensas ke estus pli saĝe diri ke tio estas motivo por ĝin akcepti. Nian tutan vivon ni pasigus meze de objektoj por ni neimageblaj se niajn sentojn, anstataŭ esti al ni donitaj en kuneco, ni ricevus unuope kaj de jaro al jaro. Cetere, unu el tiuj sentoj, la sento, kiu vekigis nur apud la viriĝo, montras al ni ke la malkaŝo de nesuspektita mondo, la translokiĝo de ĉiuj aksoj de nia vivo, dependas de akcidento de nia organismo. Dum la infaneco, ni neniel suspektis la ekziston de tuta mondo da pasioj, da ebriecoj kaj doloroj, kiuj agitas la «grandajn personojn». Se hazarde, iu nekompleta eĥo de tiuj bruoj atingis niajn naivajn kaj scivolajn orelojn, ni ne sukcesis kompreni kia frenezo tiel forte kaptis niajn pliaĝulojn; kaj ni promesis al ni, kiam la tempo venos, esti pli saĝaj, ĝis la tago kiam la amo subite aperinta ŝanĝis la pezo-centron de ĉiuj niaj sentoj kaj de la plej multo el niaj ideoj. Oni vidas do ke, kompreni aŭ ne kompreni, estas tre malmulte por ke ni havu la rajton dubi pri la ebleco de tio kion ni ne povas imagi.

## XIV

Kio malpermesas kaj longe al ni malpermesos ĝui la trezorojn de la universo, estas la heredita rezignacio per kiu ni vivadas en la malvasta karcero de niaj sentiloj. Nia imago, kiel ni ĝin direktas hodiaŭ, tro facile alkonformiĝas al tiu kaptiteco. Sendube ĝi ja estas la ido sklava de tiuj sentiloj kiuj nur solaj ĝin nutras. Sed ĝi ne tro favoras la intuiciojn kaj antaŭsentojn kiuj diras al ĝi ke ĝi estas absurde mallibera kaj ke ĝi devas serĉi elirvojojn eĉ trans la plej grandiozaj kaj plej senfinaj rondoj de si mem kreitaj. Grave estas ke ĝi pli kaj pli serioze diru al si ke la reala mondo komenciĝas je miliardoj da mejtoj pli malproksime ol ĝiaj plej ambiciaj kaj plej senbazaj revoj. Neniam ĝi havis la rajton aŭ la devon esti pli freneze aŭdaca. Ĉio kion ĝi sukcesas konstrui kaj pligrandigi en la spaco kaj tempo kiel eble plej vaste ĝi kapablas koncepti, estas nenio kompare al la ekzistanta realo. La plej malgrandaj eltrovoj de la scienco en la humila ĉiutaga vivo, instruas jam al ĝi ke eĉ en tiu modesta medio ĝi ne povas superregi la realecon, ke ĝi estas konstante superverŝita, konfuzita, blindigita de ĉio neatendita kiu kaŝiĝas en ŝtono, salo, glaso da akvo, kreskaĵo, insekto. Jam io signifas esti konvinkita pri tio, ĉar tio kondukas al spiritostato kiu atente observas ĉiujn okazojn favorajn rompi la rondon de nia blindeco; ĉar tio persvadas nin ke ne decas esperi en tiu rondo iun definitivan veron kaj ke ĉiuj kuŝas ekstere. La homo, por konservi la ĝustan senton de proporcio, bezonas diri al si ĉiumomente, ke se oni lin subite lokus meze de la realaĵoj de la universo, li estus ĝuste komparinda al formiko kiu, konante nur la mallarĝajn vojetojn, la malgrandajn truetojn, la apudaĵojn kaj horizontojn de sia formikejo, troviĝus subite sur pajla trunketo meze de Atlantiko. Atendante nian eliron el karcero kiu malhelpas nin interrilati kun la superimagaj realaĵoj, estas pli facile tuŝi hazarde fragmenton de vero imagante la plej neimageblajn aferojn, ol obstinante alkonduki tra la eterneco, inter la digoĵoj de la logiko kaj aktualaj eblecoj, la revojn de tiu nia imago. Ni klopodu forpeli el niaj okuloj, ĉiufoje kiam nova revo aperas, la rubandon de nia surtera vivo. Ni diru al ni ke, inter ĉiuj eblecoj kiujn al ni kaŝas ankoraŭ la universo, unu el la plej facile realigeblaj, unu el plej probablaj, malplej ambiciaj kaj malplej konfuzigaj, estas ja la ebleco ĝui nian estaĵon laŭ maniero pli alta, pli larĝa, pli perfekta, pli daŭra kaj pli certa ol tiu kiun al ni ebligas nia nuna konscienco. Se oni akceptas tiun eblecon, kaj malmultaj estas tiel verŝajnaj, la problemo de nia senmorteco estas principe solvita. Decas nun trovi aŭ antaŭvidi tiun manieron, kaj inter la cirkonstancoj kiuj plej multe interesas nin, koni la parton el niaj intelektaj kaj moralaj akiroj transironta al nia eterna kaj universala vivo. Tio estas tasko nek hodiaŭa nek morgaŭa; sed alitaga...

Tradukis el franca lingvo

MARIAN SOLÀ

## La abismo

el J. Roig i Raventós

Inter ĉielo kaj tero, en la mezo mem de altega monto, ĉiam makulita de neĝo, montriĝis kuŝanta sur abrupta rokaro la plej malnova domo el la regiono. Tie sube, ĉe la bordo de la rivereto, staris la vilaĝo Altaj Rokoj, kun siaj brunkoloraj domoj tegmentitaj per ardezaj tavoloj kiuj de malproksime ŝajnis la skvamoj de giganta serpento. Sur ĝia supro altiĝis tuta cirklo da montdekvilo kie la flugantaj nuboj dorlotis la neĝamasojn fariĝantajn malgrandaj, malgrandaj, kiel forgesata penso, antaŭ la somera suno briliganta la plumaron de la agloj kiuj traflugas la ĉielon plenaj de majesteco.

En tiun izolitan domon, kiu, pro sia tiel alta suprestaro, ŝajnis konstruita por gastigi la anĝelojn, la tuta vilaĝo Altaj Rokoj estis direktinta la okulojn ekscititajn de mistero. Depost kiam Rozario estis revininta el la malsupra lando, ŝiaj gepatroj havis kortuŝantan aspekton de afliktituloj kaj ili parolis malmulte kaj tenis ĉiam la okulojn mallevitaj. Aliflanke Rozario neniam eliris el la domo. Neniu rimarkis ŝin amasigi onobrikon, nek herbokapti tra la kampoj, kaj neniu ŝin aŭdis kantantan, dum ŝi funkciigis la ŝpinilon. Ŝiaj manoj ne plu pikiĝis per la dornaj stipoj. Ĉiam fermita hejme, ŝi nur eliris nokte, sola kaj laca kiel enigma kaj vivanta ombro.

— Ĉu al la terpeco, vi iras, Tano?

— Kion do mi faru!

— Estas ĝojige vidi la rikolton... ĝi estas abunda, estas abunda!...

— Jes ĝi ja estas tia!

— Kaj Rozario, kion ŝi faras?

— Ŝi travivas... Adiaŭ... adiaŭ! — kaj la patro de Rozario tuj forŝoviĝis kun la felvinujo pendanta kaj la plugpioĉo sur la ŝultro.

La virinoj neniam sukcesis aldemandi la patrinon de Rozario. Ŝi ĉiam iradis rapide, apartiĝante de la konitaj sciavidulinoj kaj ne haltante ĉe la pordosojloj kiel antaŭe ŝi faris. Tuj kiam oni ŝin vokis, ŝi havis pretan respondon: La porkino sin liberpaŝtas, la azenido ne estas alligita, la kortbirdaro malproksimiĝinta... kaj Rozario kun febro.

— Ĉu ne eliras via filino, Silo?

— Iaokaze...

— Ĉu ŝi ne ne leviĝas?

— Iaokaze...

Unutagon Tano kaj Silo kontraŭdiriĝis. La patro diris ke ŝi kuŝas en ĵito kaj la patrino ke ŝi troviĝas ĉe l' draŝejo; kaj tra la tuta vilaĝo pasis kiel mizera ventblovo la ideo ke ili mensogas.

La Kukurbaĉo, la frato de Rozario, estis tiu kompatinda kropulo alta

kaj fortika, kun rigardo de infano kaj rideto de kreteno. Kiam oni alparolis al li, li ĉiam oblikve alrigardis kaj mallevis la kapon.

— Jakobĉjo! Ho Jakobĉjo! Kion faras Rozario?

— Ŝi trikas.

— Ĉu kuracisto ne ŝin vizitas?

— Ŝi trikas.

— Ĉu vere cia patrino rekomendis al ci nenion diri?

— Nu, Rozario trikas.

Kaj oni ŝovis al li vangfrapon aŭ donis forpuŝon.

— Ve!... Ve!

— Plendoj al la diablo! Fil' tia granaĝulo kaj li nenion scias.

Kaj kreskis la mistero.

La tagon de la pilgrimado al Sankta Maji', (1) Rozario ne alestis kiel ĉiujare al la dancoj kiujn oni okazigis sur la draŝejo de la Nigra farmodomo, kaj tio kvankam tiun jaron blovis la ŝalmon la maljunulo de la domo Rok', kiu pepadis kiel neniu alia. Ĉiuj flirtuloj atendis kun dezirego tiun vesperon por admiri la sopiratan ĝentilecon de Rozario, aŭdi de ŝi tiun voĉon tiel naivan kaj ricevi, eĉ se ĝi estus nur oblikvokule, ekrigardon de ŝiaj okuloj plenaj de reviga dolĉeco.

Kiam la ŝalmo kaj la sakfajfilo eksilentis, la suno subiĝis kaj la gajeco estingiĝis, ekkreis la tuta malico de l' edzino de la transportista stalisto.

— Al la diablo tiom da misteroj! Mi kredas ke Rozario havas la malŝanon de mia azenino.

— Dio vin igu bona! Serpentlanga virino!

— Mi bone ĝin scias! se mi parolas tiele ĝi estas ĉar mi tion povas. Ĉu vi scias kiu estas tiu virino kiun kondukis Tano surĉevale? La akuŝistino el Fustanyà!... Ĝi estas certe kiel mi manĝis hodiaŭ terpomojn. —

Depost tiu tago la plej malnova domo estis rigardata kun ektimo, kaj la virinoj reregardis la pordojn de siaj domoj por konstati ĉu estas forfaltintaj la krucoj el benita palmofolio kiujn la tagon de la Palmofesto ili fiksis sur ĝin por ke ne eniru la sorĉpovo.

Kiam la nuboj, tagojn post tagoj, envolvis la domon de Rozario, ĉiu sentis la ĝojon havi malprobsime malamikon, kaj kiam la vento disblovis ilin ĉien, la vilaĝo Altaj Rokoj travivis la angoron pro superstiĉa ondofluo. Se hazarde fulmo ŝiris abion aŭ nizo mortigis la kokinojn aŭ apro disdifektis la terkulturaĵojn, la malnova farmodomo estis rigardata kun indigno, la pugnoj ĝin minacis kaj la langoj ĝin malbenis incititaj de malamo.

\* \* \*

La ŝtormo okazis forta; la tondroj brurulis inter la nubaro, la fulmoj falis en la arbardensaĵon kaj la hajleroj kiuj frapsaltis sur la rokojn kaŝiĝis

(1) ermitejo

inter la herbojn kaj malrapide fandiĝis. La aero havas revivigan freŝecon. Oni perceptas la odoron de malsekigita tero kaj inter la nuboj moviĝantaj kvazaŭ ili volus ekiri, elvidiĝas blua ĉielpeco, neta kaj pura kaj radianta de gajeco.

La domo de Rozario estas tute bruna. Ĝi ŝajnas groto; ĉio estas nigraĵoj. La muroj kaj la kamenkloŝo, la fajraro kaj la dorsbenko, la tegmento kaj la laboriloj, la vestaĵoj de l' patrino, la kvasta bareteno de l' patro... kaj la rigardoj kaj la koroj kaj la animoj! Ĉio ŝajnas elspieguli la enaeron el la terura ŝtormo. Dume Rozario muta kaj rezignaciiginta akuŝis infaninon... kaj inter tiuj mallumaĵoj ekkreis blupeco kiel sur la ĉielo... ĝi estis la okuloj de l' filino kiu moviĝis kaj ploradis vivoplena.

La tondroj aŭdiĝis ĉe ĉiu spiro pli malproksimaj; la patrino murmuris ja malbenojn pli mallaŭte kaj la akuŝistino krucsignis sin kun malpli da pieco.

— Nu, Silo, ne estu obstinega! Liveru al mi tolajetaron por la infanino! Tiel vigla kia ŝi estas!

— Eĉ ne unu fadenon; ŝi mortu pro malvarmo!

— Kian kulpon prihavas la etulino?

— Se vi reparolas al mi pri tio, mi enjetos ŝin en la puton — kaj ŝi ekprenis la fromaĝmodelilon kaj ĝin resaltigis kontraŭ lignotrunkon ekzistantan apude de la kamenhokoj kiuj subtenis kaldronon.

Rozario, ploranta, ekstaziĝis rigardante tiujn rozkolorajn vangojn kaj tiun silkecan kapeton, dum ŝi sentis grandan bedaŭron esti difektinta la vestaĵojn de la pupo kiuj nun taŭgus por ŝia etulino, kies mentono tremis.

Rezignaciiginta ŝi ekprenis la kufeton kiun ŝi kaŝe ellaboris por la kapeto de sia filino, kaj el la ruĝa litkovrilo, ŝi konfekciis vestaĵon, dum la akuŝistino ploradis konstatinte ke tiu etulino irados ruĝkolora vestita kiel diableto, en domo kie ekzistas kesto plena de pura kaj bone parfumita tolajaro.

La naskiĝo de tiu infanino alportis al la malnova domo, frenezulan maltrankvilecon. Silo pasigis la tagon plorante kaj malbenante; Tano, tiu fortika kaj bonkora viro, kiu iaokaze dormiĝis, ekprovis ŝin konsoli kaj neniel li sukcesis. Lia edzino respondis al li insultante kaj minacante lin. Rozario, ĉiam silenta, pasigis la tagojn rigardante sian filinon, kaj la kropulo ne apartiĝis de apud la infanino ruĝkolora vestita kiel papavo kaj li al ŝi tuŝis la ŝaman nazeton per la fingropinto kaj ekridis, ridis plena de simplaminco.

Ĉies okuloj en la domo interevitis al si la rigardojn. Oni manĝis kaj dormis, eliris kaj eniris ion ne dirinte. La rido de l' kropulo krevis en la sovaĝa silento. La ventbruetoj kaj la arbarkantaĵoj eniris en la domon miksiĝante kun la bruoj de l' kuirpoto kiu bolis kaj la piedbatado de l' brutaro. Kaj la maltrankvilo enmordetis nokte kaj tage.

La patrino foje fariĝis delirema. Ŝi levis la pugnojn, kunprenis la dentojn malfermis la okulojn kiel demonposeditino. Unutagon, kun la draŝi-

loj suprenlevitaj, ŝi persekutis Rozarion por ŝin ekbati, kaj ŝi ĉirkaŭpre-mante sian filinon ekiris sin ĵeti tra la fenestro sur la draŝejajn pajlamasojn por forkuri tra kampoj antaŭen, sed en tiu momento elaperis la almozisto de la Dipatrino de la Mondo, kiu dum la lankolektepoko, venis almozpeti ŝaflanaĵon, kiel ĉiujare, kaj aŭdinte la kriegadon de l' patrino, li kvietigis ŝian furiozon montrante al ŝi la imagaĵon de la Dipatrino kaj igante ŝin ki-si per ŝiaj kolertremaj lipoj, la piedojn, la manojn, kaj eĉ la vizaĝon de la Virgulino.

Dume Rozario, terurita, decidis forkuri por ĉiame kaj ekiri almozpeti.

\* \* \*

Jen ni en mateno plena de helaĵoj; la suno suriras ĝojige kaj la roso mortas ridante; la arbaro kantas kaj la akvero saltetas sur la ŝtonoj; la ae-ro forpasas malpeza kvazaŭ ĝi volus kuratingi la moruskolorajn libelojn kiuj per siaj nevideblaj flugiloj, malproksimiĝas, proksimiĝas kaj haltas en ja aero. Regas la gajeco de la unuaj varmotagoj; la terpomujoj mortadas kaj la grenoj havas la spikojn superplenaj kaj fleksiĝintaj; ili ŝajnas humilaj monaĥoj, kapklinitaj, envicigitaj kaj en superbela preĝado; pasas la vento venanta el la ĉielo kaj nedubeble ĝi demandas al ili ĉu ili amas Dion ĉar ĉiuj spikoj moviĝas kaj jesas, kaj tra la kampoj etendiĝas milda bruetado kiu estas eterna jeso, mallaŭtvoĉe dirita.

Rozario malfermas la fenestrovrilon duondormante: ŝia spiro haltas kaj ŝia koro batas, trapenetrata de teruro. Ŝia etulino ne estas kiel kutime apud ŝi. Ŝi rigardas ekscitita sub la liton, traserĉas konsternita ĉiujn domangulojn; dismovas la pajlajn kaj eliras el sia dormoĉambro; ŝi direktas esploran ekrigardon. Ĉio estas sur sia loko: la ŝarĝoselo, la kaldrono, la falĉilo, felsako, la splitoj kaj la ŝtipoj, la kamenpendigilo kaj la kulerego kaj la bobenilo. Rozario eligas krion, plorante, kaj neniu alrespondas. Kokino klukas sur la draŝejo. Oni aŭdas la remaĉon de la bovoj kiuj restas kuŝantaj en la stalo plena de araneaĵoj. Poste, kun avido, ŝi enrigardas la ŝrankojn, la fornon, la puton, la pajlejon, la kokinejojn, la porkan stalon. Novan fojon la teruro ŝin traskuas, vidinte la kufeton en la porkmanĝujo. — Ĉiela Dio, ĉu eble ili manĝis mian filinon! = Kaj ŝi vokpetegas la Ĉielon surgenue kaj suprenlevante la manojn, kaj larmo falrulas sur ŝia trema vizaĝo. Tute subite, kvazaŭ ŝi estus ion rimarkinta, ŝi stariĝas, viŝas al si la plorhavajn okulojn kaj ekkrias:

— Tio estas afero de la patrino! —

Kaj ŝi direktis sin dismovi la pajlon ĉe la pajlamasoj; la kokidetaroj forkuris rapidmove, la cignoj levis la bekon supren kaj la gardohundo rigardis ŝin kun timo,

— Jakobĉjo!... ho, Jakobĉjo! — Lacigita de l' serĉado inter la pajlo ka de malfarado de pajlamasoj, ŝi restis grandan tempospacon pripensante. Ŝi prenis el si la harojn kaj ilin tiris, mordis al si la lipojn kaj fermis la ma-

nojn, kaj la kokidetoj bekpikis ĉe ŝia ĉirkaŭo, kaj la vento ŝin orumis per la grajnŝelo de l' draŝejo.

— Jakobĉjo... ho, Jakobĉjo!... Jakobĉjo, karulo!... Jakobĉjo!... —

La kropulo prezentiĝis lamante kaj eligante salivoŝaŭmojn.

— Jakobĉjo, mira kara! Jakobĉjo, kie estas la infanino?— ŝi eldemandis lin forte lin ĉirkaŭpremante inter sufokantaj plorsingultoj; kaj la kropulo mallevis la kapon kaj oblikvokule rigardis kaj ekploris aŭdinte ploradi.

Rozario, malespere surgenuiĝis antaŭ la kropulo kaj kisis al li la piedojn kaj petis pardonon pro la batofendoj kiujn ŝi junaĝe al li estis kaŭzinta, kaj la kropulo, kiu ĉiam restadis silenta kaj malgaja, vidante sin kisata rapidmove, eksentis por la unua fojo en sia vivo la frenezigon de la ĝojo, li kiu korpremiĝis pro ĵaluzo kiam oni karesis la hundon aŭ havis la katinon sur la genubenko! En la atrofian animon de tiu virego, eniris la unua emocio, kaj li deziris paroli kaj ridis kaj ploris kaj piedfrapadis.

— Jakobĉjo, ci vidas do kiel mi cin amas, diru al mi kie troviĝas mia filino.

La kropulo tremetante pro ĝojo, restadis kun la buŝo malfermita kaj la okuloj larmkovritaj ion ne dirante. Lia animo naskiĝis antaŭ amesprimo.

Rozario tiam sentis sin pentema je tio ke ŝi ĉiam apartiĝis de sia frato ĉar li kaŭzis al ŝi honton, kaj ŝi frapis sian frunton per siaj genuoj, vidinte ke ŝia frato ne alrespondas.

— Jakobĉjo, diru al mi, kie troviĝas la infanino? — La kropulo rerigardis oblikvokule... li tion sciis... sed li estis obstinega kaj senkonfida kaj obeema. Se la patrino rekomendis al li aferon, li ĝin faris eĉ se tio kostus al li la vivon. Rozario sentis sin senfortiĝi. Ŝia frato ja ne diros kie estas ŝia filino, eĉ se ŝi lin mortigus. Se ŝi lin minacis tio estis plej malbone; kaj sentante sin senkuraĝigita ŝi lasis sin fali sur la pajlon kaj krevis per kortuŝa ploro. La kropulo sidiĝis apud ŝi, dirante al ŝi de tempo al tempo: — Faru al mi pli da karesoj!...

Tra l' okuloj de Rozario pasis ekradio de heleco. Ŝia animo ridetis. Inter la nigraĵoj de ŝiaj penoj elmontriĝis kelke da ekbrilaĵo.

— Jakobĉjo, ne diru do al mi kie troviĝas mia filino, ĉu ci aŭdas? Ĉar patrino cin batus! Iru, mi ĵam donacas ŝin al ci... iru, tuŝu al ŝi la nazeton! — kaj ŝi, ellasis ŝajnigan ridon, malsanan ridon de deliranta frenezulino. La kropulo aŭdinte ridi ankaŭ ekridis, frotante al si la manojn.

— Rapidu, Jakobĉjo, ekiru! tuŝu la nazon de l' filino kaj mi donacos al ci jupplenajon da piroj!... — kaj ŝi stariĝis.

— Mi ne!

— Kial?

— Mi ne!

— Ĉu ci ne volas ke mi cin akompanu? Kial? Ĉu mi ja ne donacos al ci la infaninon? Akompani cin? Iru, nul... ja... ja... ja! Mi iras kaj preni la pirojn. Adiaŭ, Jakobĉjo!... vidu, se ci amos la infaninon, mi batos tiujn kiuj alnomos cin *Kukurbaĉo*.

Kaj la kropulo infanece ridetis; kaj Rozario sentis ke ŝia koro larĝiĝas, kaj ekprenis inter siajn manojn la kapon de sia frato kaj stampis kison sur ĝian fruntplataĵon fermante kun fervoro la okulojn kvazaŭ ŝi kiskus la imagaĵon de sia filino, spegulitan sur la malsaneca menso de la kompatinda kropulo kiu ekiris al la loko kie troviĝis la infanino por tuŝi al ŝi la saman nazeton, kiel li kutime faris.

— Gardu bone la infaninon ĉu ci aŭdas? ĉar ŝi nun estas cia!

— Ĉu vere jes? Rapidu! ĉar mi volas la pirojn!

— Tuje! —

La malfeliĉa Rozario vidante ke ŝia frato foriras tra la zigzaganta vojo, kiu ebeniras laŭborde de l' krutegrokaro, sentis tiel intensan emocion ke ŝi ne povis stariĝi. Ŝi estis laca, lacpremita, kaj sentis ke ŝiaj membroj sternaĝas surtere kvazaŭ ili estus mortaj kaj ne volus lasi la eternan ripozon.

La kropulo daŭrigis vojiron antaŭen, kun rapideco. Ĉar la moko kaj batoj igis lin malicema, senkonfida kaj obstinega, de tempo al tempo li turniĝis, kaj vidinte ke Rozario ne lin sekvas, malsaĝe li ridetis. Intertempe, lia fratino atendis ke li turnirus la plej proksiman arbaron el abioj por lin sekvi kaŝitire.

Rozario stariĝis inter la pajlamasoj; ŝi ŝajnis kadavro eliranta el la tombo. Alblovoj de malfeliĉaj pensoj ŝin traskuis, la senhonorigo kien ŝin kondukis la urba nizo konfuzigis ŝian menson per kolera ondofluo; la minacoj de ŝia patrino, la forŝtelo de ŝia filino, la timo esti vidata de ŝia frato, la dezirego ŝmaci ŝian idineton, komunikis al ŝia vizaĝo la tutan belecon de l' tragedio; kaj ŝi entreprenis la iron post la kropulo.

Ĉe la ekiro al la arbaro ŝi vidis la porkinon, kiu ĉar oni ne estis metinta al ĝi la nazegnajlon, maĉadis la terpomojn kaj ilin manĝadis kun avido. Rozario preterpasis ĝin paŝo post paŝo, kun timo ke ĝi forkurus kaj ŝi estus rimarkita de l' kropulo. Poste ŝi faris kuron kaj alkaŝiĝis malantaŭ la unua arbobazo de l' arbaro kie en vintro blekegas la malsataj lupoj. Tie ŝi restis sur la musko tapiŝanta la rokojn, spionante sian fraton kiu suprenrampadis la monton. Kaj ŝi daŭrigis lin sekvi kun malfermitaj okuloj kaj la haroj pendantaj. La patrino amo sentigis al ŝi la fortikan volon de la delirantaj frenezuloj, kaj en ŝiaj muskoloj la magian forton de la histeriuloj; kaj inter roko kaj roko, ŝi treme daŭrigis vojiron, ŝi estis la imago de l' doloro sekvanta stultan sed gvidantan naŭvombrom. Ŝi rigardis la kropulon kvazaŭ li estus la gvida stelo en la plej superbela nokto dum la jaro!

Transirita la arbaro, Rozario kaŭrante sin inter la arbustoj, sekvis la postsignojn de l' kropulo ne lin vidante. Subite, proksima brueto glaciigis al ŝi la spiron kaj kvar kapreoloj preterpasis kiel vento forkurante de ŝia frato. Ŝi jam estas supre de la monto kaj la ventblovo glaciigas al ŝi la ŝviton; ŝi sentas ke ŝi iras tro malŝirmita je la kolo kaj kovras sian buŝon timante fari ternon, kaj tra ŝiaj pupiloj eniras ĉarmantaj helaĵoj, kaj ĉe ŝia ĉirkaŭo elŝprucas tuta mondo da montdeklivoj, rokaltajoj, ŝtonhaosoj kaj krutegrokaroj, kaj ŝia domo subvidiĝas malgranda; ĝi ŝajnas ŝtono fa-

linta de la monto. Rozario tremas pro timo kaj malvarmo. Ŝi estas alveninta apud la blua marĉeto, kaj tie elkreskas nek arbaro nek arbustoj; ŝi deprenis du el tiuj ĉi kaj per ili ŝi kovras al si la tutan korpon kaj daŭrigas irante. Se la kropulo rigardis, ŝi haltis malantaŭ la arbustoj, kaj tiamaniere ŝi daŭrigis marŝante apudborde de la revigaj akvoj de la lago, ĉirkaŭita de pinastroj, malgrandaj kaj fortikaj. La ranidoj, ŝin vidinte, altiĝis el la fundo plena de ŝlimo kaj refundiĝis kuŝi kaj la lagakvoj malklariĝis. La ranoj enakviĝis, kaj multego da malgrandaj ondoj kiuj vastiĝadis kaj mortis, vidigis tremanta la figuron de Rozario enspegulitan en la lago; tio kvaŝaŭ ŝajnis ke la akvoj agas kiel spegulo de ŝia trema kaj avida animo.

La kropulo jam troviĝis trans la lago kaj estis trapasinta la rivereton per kvar krursvingosaltoj. Rozario, kiu lin perdis el la okuloj, antaŭeniris sencele, kun ploremaj okuloj, la vestaĵaro ĉifonita. Ŝi ekprovis trapasi la murmurplenan rivereton kaj falis de ŝi la arbustoj, kaj celante ne esti rimarkita, ŝi kaŭriĝis en la frostan akvon, kaŝante sian kapon sub rokon kiu formis groton. De tie mem, ŝi vidis sian fraton etendantan la fingron inter dornaj stipoj kaj krevantan per triumfa rido.

— Mia filino estas tie, — ekkriis Rozario ploranta pro emocio, kaj ŝi eligis kiel ŝippereulo el la akvo, eldirante preĝojn, petante kompaton. Inter sopiroj kaj plorsingultoj Rozario alvenis tien kie estis la kropulo tuŝanta la nazeton de l'infanino. Ŝi apartigis per siaj nudaj brakoj la dornajn branĉojn kaj eligis sian etulinon el tiu dorna lulilo, tute pikvunditan, sangantan kaj malvarman, kun la okuloj malfermitaj kaj sekigitaj de la suno boliganta la tutan teron.

La juna patrino, kiel demonposeditino alpremis sian filinon kontraŭ sian febran bruston... ŝi melkis el si lakton en ŝian malfermitan buŝon, kaj sur la vizaĝo de l'infanino kunmiksiĝis la sango de ŝiaj dornpikitaj brakoj kaj la lakto de ŝia brusto, ŝi ŝprucigis la vivon el siaj vejnoj, ŝprucigis la vivon el sia sino, sur tiun etulinon ĉielokulan, mortintan inter dornoj:

— Jakobĉjo, ŝi estas morta! —

La kropulo etendis la fingron kaj tuŝis al ŝi la nazeton ridante kaj diris:

-- Donu ŝin al mi, ĉar ŝi estas mia. Rapidu! ĉar ŝi estas mia!

— Kiu ŝin portis ĝis ĉi tie?... — demandis Rozario kun brulantaj okuloj kaj sen larmoj.

— La patrino! —

La malfeliĉa Rozario, malespere, pasigis la manojn sur la okulojn kaj kun la malvarma filino sur siaj brakoj, ekkuris inter la rokoj eliĝantaj meze de la malalta herbo, kiel kadavraĵoj ostoj duone enterigitaj.

Ŝi alvenis al la abismo, antaŭ la valo trapenetrita de heleco kaj kvieto, kaj kaptita de frenezradiko, ŝi ekkriis rigardante sian patrinon kiu subvidiĝis malgranda sur la draŝejo, serĉante ŝin maltrankvilema:

— Malbona porkino!... terura fulmo vin mortigu! vi mortigis mian filinon!... jen mi nun mortigos la vian! — kaj ŝi sin ĵetis en la abismon.

Kaj la kropulo diris al si: — Kia ensalto! — kaj li malproksimiĝis lamante kaj farante plorĝemon.

— Mi volas la pirojn!... ŝi trompis min!... mi volas la pirojn!... mi volas a pirojn!...

El la kataluna lingvo tradukis kun afabla permeso de la aŭtoro

JOSEP VENTURA

Premiita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



## La sistemoj tonike-ritma kaj silabmezura en la Esperanta versfarado

(Respondo al kelkaj kritikoj)

### ENKONDUKO

Jam de longe, en gazetrecenzoj aŭ en privataj leteroj pri miaj verketoj «**AMAJ POEMOJ**» kaj «**NOVAJ AMAJ POEMOJ**» kaj ankaŭ pri miaj versaj tradukoj en la «**KATALUNA ANTOLOGIO**», mi ricevis riproĉojn de esperantistoj pri tio, ke mi plejparte verkis miajn Esperantajn poemojn laŭ la sistemo silabmezura, prefere uzata ĉe la latinidaj popoloj, anstataŭ verki ilin laŭ la sistemo tonike-ritma, komune uzata ĉe la germana lingvo kaj ankaŭ uzita ĝis nun ĉe la plimulto de Esperantaj poemoj.

Mi ne respondis publike al tiuj riproĉoj, ĉar, krom tio ke ili estis tute afablaj, mi ne kredis ke estas jam veninta la tempo diskuti pri la afero kaj larĝe prezenti la problemon kaj serĉi ĝian solvon. Mi nur sendis demandan leteron al la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio S-ro Th. Cart, ĉu mi rajtas uzi en Esperanto versfaradan sistemon kutiman ĉe grandaj kulturlingvoj en Okcidenta Eŭropo, kaj poste, antaŭ nelonge en mia Prezidanta parolado ĉe la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj, mi aludis la problemon pri la *ritmo* en la Esperanta poetiko.

Sed, lastatempe, aŭtoritataj voĉoj akcentis la riproĉon al mi, kiel ekzemple D-ro Edmond Privat okaze de la Danziga kongreso, en sia raporto al la Akademio kiel Direktoro de la Sekcio pri Premioj, kaj aliflanke, kelkaj miaj amikoj, aŭ eĉ tute nekonataj legintoj de miaj poemoj, plene

aprobintaj de la unua momento mian versfaradan sistemon, instigis min ke mi respondu al la kritikintoj kaj defendu mian liberecon uzi la silabmezuran versfaradon, pri kiu nenia malpermeso estas en la «Fundamento» nek en la respondo kiun mi ricevis de la Prezidanto de la Lingvaj Institucioj.

Jen kelkaj specimenoj de la kritikoj al mi adresitaj: S-ro Karl Minor skribis sur «Germana Esperantisto» en Januaro 1925: «Entute oni devas laŭdi ilin. Belajn poeziecajn ideojn enhavas la poemoj. Ĝenerale la rimoj estas lertaj kaj elegantaj, kaj kelkafoje la aŭtoro eĉ faras perrimajn ĵonglaĵojn (ekzemple en «Kanto de l' Trobador'»), tamen ne malzorgante pri la poezieco de la poemo. Sed ne kontentigas min, kiel li traktas la ritmon. Mi ne ŝatas—sed ne mallaŭdas—neregulan ritmon, se almenaŭ ĝi permesas fluan legadon. Sed malagrade min tuŝas, se—kiel en «Ama Malkvieto»—oni estas devigata legi «kiám», «preskáu», k. t. p. La aŭtoro ja povus ĉi-rilate resendi min al nia Majstro mem, sed vere nepardonebla laŭ mia sento estas la ritmo en «Beno de la Manĝotablo», kie oni vole-nevole akcentas «vián gvidón» kaj «átingi».—Nu, tiu ĉi kritiko estas tute subjektiva, ĉar mi min gvidas per la modeloj de nia Majstro kaj per mia sento kaj opinio. Sed la aŭtoro tute ne atentis la ritmon, kian mi serĉas kaj konas el la Germana kaj modela Esperanta poezio. En liaj poemoj la versoj nur havu ĉiam la difinitan nombron da silaboj (ne verspiedoj), jen ĉio. Do la poemoj estas senriproĉaj, se ni premisas, ke la aŭtoro rajtas procedi laŭ tio en Esperantaj poemoj. Ĉu li rajtas? Ĉu en Esperanta poezio ĉiu povas starigi siajn proprajn leĝojn kaj regulojn? Ĉu Esperanto havas sian propran vivon nur en prozo?»

La konata poeto Kolomano de Kalocsay, en la numero Majo 1924 de «Literatura Mondo», diris la jenon: «Nun mi metu nigrajn okulvitrojn por diri, ke pri la ritmo mi havas iom malsaman opinionon ol la aŭtoro. Ne ofte, sed troviĝas lokoj, kie du akcentitaj silaboj estas unu apud la alia: «rigard' hela», «amatin' ĉarma», «al mia sent' taŭĝan» k. t. p. Estas eble, ke en sia evoluo la Esperanta poezio formetos la severajn germanajn ritmoregulojn kaj proksimiĝos al la italaj kaj francaj. Tamen, laŭ mia opinio, ĝi ĉiam devos eviti la sinsekvon de du akcentitaj silaboj.

Kaj ĉi tio nepre ne estos malfacila por nia poeto. Li ja facile movas sin en la plej malfacilaj formoj, kaj lia ritmo estas plejparte vigledanca, preskaŭ petola. Kaj kiel facile li povas kuri en la memfaritaj katenoj, tion bone montras per sia pulsanta marŝo kaj emfaza enhavo lia poemo: «Kanto de l' Trobador'».

S-ro F. K., sur «Heroldo de Esperanto» (11. Februaro 1927) recenzis: «Se verkisto sukcesas restigi ĉe la leganto la samajn sentojn, kiujn li mem havis kreante la versojn—tio estas poezio, eĉ se mankas regula ritmo kaj rimoj. Rimoj ne mankas en tiuj ĉi versaĵoj, sed la ritmo estas parte tre arbitra. Tamen oni devas lasi la laŭdon: s-ano Grau Casas manipulas (kaj pri tio ekzistas nenia dubo) majstre nian lingvon; li kvazaŭ ĵonglas per ĝi kaj

kelkaj versaĵoj, ekzemple «Portreto de mia fianĉino», estas belegaj kaj tute perfektaj ankaŭ koncerne la ritmon.»

S-ro Franz Zwach, en »Aŭstria Esperantisto» (Aprilo 1927), skribis, «Ili estas bonaj, ĉarmaj kaj kortuŝaj. Iu supersevera prozodisto eble trovos, ke la ritmo kelkloke ne estas sufiĉe glata, ĉar en iu aŭ alia strofo alternas jamboj kun trokeoj—kio cetere per malgranda ŝanĝo en la sinsekvo de la vortoj estus facile evitebla—sed, ĉu la esenco de la poezia verkado konsistas en la sklava obeo al la rigidaj formoj de la prozodio? La ĉefaĵo estas, ke la poemo superfontiĝu el la plena koro de l' poeto kaj veku simpatian eĥon en la koro de la leganto. Kiel diras «La Kantisto» de Goethe?... «Mi kantas kiel kantas fring'—en la densej' arbara;—la kant' venante el laring':—jen rekompenc' plej kara.» — Laŭ tiu ekzemplo kantas Grau Casas.»

S-ro G. S., en la numero Marto 1927 de «Esperanto», diris, ke mi bazas mian versfaradon sur la silabnombro kaj ne sur la ritmo. (Li devus diri: sur la *tonika* ritmo). Krom tio, S-ro G. S. asertas, ke mi, per mia neregula *ritmado*, tre proksimiĝas al la franca *senritma* verso, kaj li konkludas ke la vortoj de S-ro Cart «Via libereco pri ritmoj estas plena» ne estas pravigo por mi, sed male «sufiĉe severa kritiko.»

Private, mia kara amiko S-ro Josep Berger skribis al mi.: «en kelkete da versoj ne tute plaĉis al mi la akcento, kiu laŭ la ritmo kontrŭas iafoje la akcentleĝon de Esperanto. Sed eble mi prijuĝas tro severe ion, kio estas «poeta licenco», kaj la konata verkistino F-ino Louise Briggs skribis «sinceran gratulon, kvankam mi devas konfesi ke mi estas unu el tiuj, kiuj ofte perdas la plenan ĝuon de via belega poeziaĵo pro via traktado de la subaj akcentoj.»

La respondo al mia aludita letero al S-ro Cart, estis jena: «Vi plene rajtas uzi en poezio la formon, kiu plej plaĉas al vi kaj al viaj legantoj. Via libereco pri ritmoj, rimoj, asonancoj, forigo de la rimo aŭ eĉ de la asonanco estas plena, se nur vi ne forgesas (*kaj tion vi ne forgesis*) ke la tonika akcento ludas en Esperanto grandan rolon kiel en itala, hispana, germana k. t. p. lingvo (*ne* en la franca). La *sola* regulo en poezio estas *harmonio* (kaj tion vi ankaŭ ne forgesas). En mia verketo «Versfarado» mi montris la Zamenhofan sistemon, sed *neniam* asertis ke aliaj sistemoj ne estas eblaj.»

Kiam mi, post ricevo de tiu letero, ektrankviliĝis pri miaj paŝoj en la Esperanta versfarado, mi ricevis aliajn leterojn, kiuj pli kuraĝigis min, ekzemple unu de la eminenta tradukinto de «Amfitriono» S-ro Enrique Legrand, el Montevideo, kiu petas min «Skribu pri versfarado, Esperanto tion bezonas!», kaj aliajn, vaste pritraktantajn la temon, de S-ro Nikolao Hohlov, el Zagreb, bonega literatura kritikisto en Esperantujo kaj plej komprenema spirito.

Stimulita de la afableco de unuj kaj de la interesiĝo de la aliaj, mi fine decidis ankaŭ aŭdigi mian voĉon, kaj, ĉar mi kredas ke la plej urĝa afero estas montri mian sistemon al tiuj samideanoj kiuj ne aŭ nesufiĉe ĝin konas, mi ne plu parolos pri mi mem nek defendos detale miajn poemojn, sed pe-

nos prezenti kiel eble plej klare kaj koncize la karakteron de la poetika ritmo en la lingvoj greka kaj latina (piedoj konsistantaj el silaboj longaj aŭ mallongaj), en la lingvoj sampitaj kiel la germana (piedoj konsistantaj el silaboj tonike akcentitaj aŭ senakcentaj), en la ligvo samtipaj kiel la kataluna (ritmo sen piedoj, rezultanta el nur unu aŭ du ritmaj akcentoj en ĉiu verso, kies difinita loko dependas de la nombro da silaboj), kaj mi konkludos ke la Esperantaj poetoj rajtas versfari ne nur laŭ la maniero *germana*, sed ankaŭ laŭ la maniero kataluna aŭ *novlatina*, kiu parte estas ankaŭ *slava*.

Pretendi ke la spirito de Esperanto adaptiĝas al unu sola el tiuj du manieroj, estus nei la ĝeneralan Eŭropan bazon de la internacia lingvo kaj forŝiri la junajn flugilojn de la belega, neimageble riĉa kaj promesplena Esperanta Poetiko.

(Daŭros)

JAUME GRAU CASAS



## Diversaĵoj

*Terrassa.* — En grupo «Lumon» post finiĝo de somera kurso gvidata de Prof. Delfi Dalmau, kiu atingis novajn adeptojn al nia idealo, oni malfermis tri novajn kursojn en la grupa sidejo gvidataj laŭ jena aranĝo: unuagrada kurso por fraŭlinoj kaj knaboj, S-ro. Ramon Marsà; por viroj, S-ro. T. Surralles kaj supera kurso S-ro. S. Chaler.

En katolika societo «Centre Social» estas aranĝata kurso sub la gvido de samideano S. Chaler. 15 lernantoj ĉeestas la klasojn.

Lokaj ĵurnaloj «El Dia», «Crònica Social» kaj «La Acciòn» ofte publikigas artikolojn favorajn al esperanto. — SIMPLEMULO.

*Rubi.* — Grupo «Esperanta Burgono» malfermis sian vintran kurson kun granda sukceso ĉar estas pli ol 30 lernantoj gvidataj de fervora propagandisto el Terrassa, S-ro. S. Chaler. Certe urbeto Rubí estas ĉarma ido de esperanta urbo Terrassa. — KORESPONDANTO.

*Kongreso.* — Ni esperas doni baldaŭ kontentigajn sciigojn prila aranĝo de la Kongreso de K. E. F. en la venonta jaro.

*Jubilea Festo.* — Kun eksterordinara sukceso okazis la 16-an de oktobro la vesperfestoj, kiun organizis «Paco kaj Amo» el Barcelona por soleni la XX datrevenon de la fondiĝo de la societo. Ĉirkaŭ 300 personoj partoprenis la feston, kiu konsistis el teatra prezentado, deklamado de poezioj kaj pa-

roladoj. Post la festo okazis frata vespermanĝo, kiun partoprenis multaj membroj el la grupo.

*Tio-ĉi estas la milito.* — La «Interniario» Kristana Societo kiu havas sian sidejon en Londono bonvolis eldoni folipresita la artikolon kiu aperis en nia antaŭa numero de K. E. kun la titolo «Tio-ĉi estas la milito». La flugfolioj enhavas ankaŭ la anoncon de nia gazeto. Ni kore dankas la estraron de «La Interniario».



## Nekrologo

La 9-an de novembro pasinta mortis en Barcelona S-ro. Delfi Dalmau Gibert patro de nia kara prezidanto de K. E. F. Prof. Delfi Dalmau Janer La funebran enterigon ĉeestis diversaj samideanoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj el la Direkta Komitato de nia Federacio.

Al nia kara amiko kaj familianoj ni esprimas nian sinceran kondolencon

## Avís importantísim

Novament hem de pregar als nostres abonats que encara no han pagat l'abonament de 1927, que sense més ajornament ens trametin el deute que tenen amb KATALUNA ESPERANTISTO, si no volen comprometre serio- sament la situació econòmica de la Federació. És un deure que cap bon samideano pot oblidar.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la mili- tista cenzuro.

La 15 - a de decembro

estas la naskiĝtago de

**D-ro L. L. Zamenhof,**

nia ĉiama spirita gvidanto.

La 15 - a de decembro

estas dediĉita por la

**Festo de la Libro**

kulturtago por manifesti pri vivanteco de

**Esperanto.**

Rememoru pri la Majstro!

Oferu laŭvolan sumon por nia

**literaturo**

kaj aĉetu **almenaŭ** unu libron!

# Estatuts de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» hom constitueix una federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» és la unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, pels fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto celebrat a Barcelona, per a complir tots els acords i resolucions que afecten els esperantistes com a col·lectivitat, emanats dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu de l'abonament a la revista serà de sis pessetes anuals.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyen i els altres directament i en caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada a la bestreta, de 0'40 ptes. almenys per cada soci i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. anuals, també pagada a la bestreta.

*Art. cinquè.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

*Art. sisè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» convocarà almenys una vegada a l'any, en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia, hom donarà compte als assistents dels treballs i gestions acomplerts pel referit Comitè Directiu durant el seu exercici, hom acordarà el lloc on deurà celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, hom nomenarà els individus que deuran constituir el Comitè del pròxim exercici, i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i anunciades en l'ordre del dia.

*Art. setè.* — El Comitè serà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto, les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè de bell nou elegit.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat pel mateix.

*Art. vuitè.* — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu i vot en les Assemblees anuals, però el seu vot serà delegable al president d'un grup o una altra persona qualificada, prèvia la presentació dels corresponents carnets de soci.

*Art. novè.* — Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicades en la seva totalitat, puix que només podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. desè.* — La llengua oficial de la «F. C. d'E.» serà l'Esperanto, podent també emprar-se la catalana en les Assemblees.

*Art. onzè.* — Aquesta «F. C. d'E.» podrà actuar mentre compti amb dues col·lectivitats organitzades o trenta membres isolats. En cas de dissolució, previ acord d'ella, l'actiu existent serà lliurat al caixer de la Representació Constant de les Societats Nacionals Esperantistes.

*Art. transitori.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245.